

Elektronika eldono de

Memorlibro pri la Zamenhof- Jaro

kun permeso de Birthe Lapenna

www.kehlet.com

Antaŭvorto de la eldonisto

Por atingi sinkronizadon inter la paĝnumeroj de la presita, origina eldono kaj la elektronika, mi uzas la unuajn, nudajn paĝojn por diversaj informoj.

Ankaŭ mi prenis la enhavtabelon de malantaŭe en la libro kaj metis sur paĝon 4.

Vi verŝajne uzas “Acrobat” por legi la libron. Ĉu mi rajtas sugesti, ke vi bone studu la eblecojn, kiujn tiu programo donas al vi. Bv.legi la instrukciojn. Se vi ne komprenas la lingvon de la aldonita eldono (sur la originala kompaktdisko) vi povas senpage elŝutigi alian en via propra nacia lingvo en la retejo “www.adobe.com”.

Torben Kehlet
eldonisto

MEMORLIBRO

pri la

ZAMENHOF-JARO

Antaŭparolo	7
Internacia Patrona Komitato	8
Deklaracio	10
Baza Programo	11
Internacia Organiza Komitato	12
Biografiaj Informoj pri D-ro L. L. Zamenhof, <i>R. Jossinet</i>	13
Geografia Indekso	21
Teksto de la Naskiĝdokumento de D-ro Zamenhof	22
Zamenhof Lazaro Ludoviko, <i>G. Waringhien</i>	23
Pri la vorto "Majstro"	26
D-ro L. L. Zamenhof, <i>E. Privat</i>	27
La valoro de Esperanto el lingvistika vidpunkto, <i>W. E. Collinson</i>	29
Pri la Lingvo Internacia	30
Esperanto, la lingva kreaĵo de Zamenhof, <i>E. A. Bokarev</i>	31
Centjara estus jam la koro, <i>K. Kalocsay</i>	32
La grandeco de Zamenhof, <i>I. Lapenna</i>	33
Pri la Idea Fono	35
D-ro L. L. Zamenhof, oftalmologo, <i>A. Albault</i>	36
Tolstoj, Zamenhof kaj Esperanto, <i>Kolobanov-Lapenna</i>	37
Rememoroj pri la lastaj tagoj de mia patro, <i>A. Zamenhof</i>	39
Pri la Mondlingva Problemo, <i>P. Ravila</i>	41
Pri la evoluo de la Internacia Lingvo	42
La Genio de Zamenhof : Efekta Lingvo, <i>V. Setälä</i>	43
Esperanto kaj la teorio de komunikado, <i>P. Davis</i>	44
El : La Vojo	45
L. L. Zamenhof - Pionira Poeto, <i>M. Boulton</i>	46
Saluto al Zamenhof, <i>E. Privat</i>	49
Integro kaj latentoj en la verko de Zamenhof, <i>J. Francis</i>	50
Zamenhof, <i>F. Szilagyi</i>	53
La Internacia Lingvo kiel Belarta Tradukilo, <i>W. Auld</i>	54
Pri literaturo, teatro, gazeto	67
La plej juna literaturo en la mondo, <i>C. Conterno</i>	68
El Proverbaro Esperanta	69
"Lando" de Libereco, Egaleco kaj Frateco, <i>J. Régulo Pérez</i>	70
La uzado de la Internacia Lingvo, sur la scienca kampo, <i>G. Canuto</i>	71
Kial mi fariĝis esperantisto? <i>S. Nishi</i>	74
Prologo okaze de la jubileo de I.S.A.E., <i>P. Thorsen</i>	75
Lingvaj spertoj en la praktiko de la scienco, <i>H. Sirk</i>	76
Lingvaj problemoj en la natursciencoj, <i>C. Stöp-Bowitz</i>	78
Rezolucioj de sciencistoj pri la uzo de Esperanto	80
Zamenhof en la Evoluo de la Komunikado, <i>G. F. Makkink</i>	81
Esperanto — Heredaĵo al la Infanoj de la Mondo, <i>D. Kennedy</i>	84
Al Josephine Baker, <i>P. Thorsen</i>	86
La Internacia Lingvo kiel familia lingvo, <i>F. Moravec</i>	87
Ĉarmaj rimoj por infanoj	89
Unu Mondo - Unu lingvo, <i>J. C. Isbrucker</i>	90
Pri Egalrajteco	91
Zamenhof kaj la Movado, <i>G. C. Figliera</i>	92
Prologo al la celebrado, <i>Poul Thorsen</i>	95
Resuma trarigardo pri la celebrado de la Zamenhof-Jaro	95
U.N.E.S.C.O. oficialigas la centjaran datrevenon	103
U.N.E.S.C.O. honorigas la nomon de D-ro Zamenhof, <i>I.L.</i>	103
Fotoj	

MEMORLIBRO
pri la
ZAMENHOF-JARO

MEMORLIBRO

ELDONITA OKAZE DE LA
CENTJARA DATREVENO DE LA NASKIĜO DE

D-ro L. L. ZAMENHOF

Redaktoro

PROF. D-RO IVO LAPENNA

Honorofica Direktoro de C.E.D.

Sekretario de I.O.K.

1960

Universala Esperanto-Asocio

Centro de Esploro kaj Dokumentado

Londono

Antaŭparolo

Jam en Aŭgusto 1957, dum sia kunsido de Marseille, la Komitato de U.E.A. unuanime decidis, ke la jaro 1959 estu dediĉita al la memoro de D-ro L. L. Zamenhof. La preparlaboroj tuj komenciĝis. Speciala Internacia Organiza Komitato (I.O.K.) formiĝis baldaŭ. Ĝia agado okazis sub la aŭspicioj de Internacia Patrona Komitato, en kiun eniris elstaraj personoj de diversaj landoj. Por havigi la necesajn minimumajn financajn rimedojn, la Estraro de U.E.A. establis apartan Fondaĵon Zamenhof. Kontribuoj venis el ĉiuj partoj de la mondo.

La I.O.K. havis sian unuan kunsidon en Mainz la 5-an de Aŭgusto 1958. Estis akceptitaj la Baza Programo, Deklaracio kaj Alvoko al la Esperantistaro. La elirpunkto de la plano estis, ke la Zamenhof-Jaro estu festata ne sole de la Esperanto-organizaĵoj, sed de la tuta kultura homaro, ĉar Zamenhof fariĝis personeco de monda formato. La celo de la aranĝoj estis duobla: esprimi dignan omaĝon al la aŭtoro de la Internacia Lingvo kaj samtempe larĝe diskonigi lian verkon, fortikigi la poziciojn de Esperanto, disvastigi la lingvon.

Dum la tuta jaro 1959 viciĝis unu post la alia diversaj solenaĵoj: de nomigo de placoj aŭ stratoj laŭ la nomo de Zamenhof ĝis solenaj kunsidoj en sciencaj institucioj. La Universala Kongreso de Esperanto en Varsovio (Aŭgusto 1959) kun la vizito al Bjalistoko kaj la decembraj festoj markis la du kulminajn punktojn de la Zamenhof-Jaro, precize kiel antaŭvidite en la plano.

Dank'al la bona organizo, al la internacia harmoniigo de la agado kaj al la trafa laboro de multaj organizaĵoj kaj unuopuloj, la fundamenta ideo de la Baza Programo kaj la esenca celo de la Zamenhof-Jaro en ambaŭ aspektoj realiĝis tre kontentige. La pozitivaj rezultoj vidiĝas jam nun,

sed ili tute certe sentiĝos ankoraŭ pli forte en la sekvantaj monatoj kaj jaroj.

En tiu ampleksa agado elstaran rolon havis la Centro de Esploro kaj Dokumentado. Aparte menciindaj estas la studoj kaj artikoloj, kiujn verkis ĝiaj kunlaborantoj. Kelkaj el ili aperis en la revuo ESPERANTO; aliaj estis senditaj al la landaj Informaj Fakoj kaj al la presagentejoj. Tiuj materialoj estis abunde utiligitaj por verkado de nacilingvaj prelegoj, artikoloj kaj informoj. Pluraj aperis komplete en multaj naciaj lingvoj.

Kiel finan kontribuon al la Zamenhof-Jaro, C.E.D. nun eldonas tiun ĉi MEMORLIBRON. En ĝi troviĝas unuavice la fundamentaj dokumentoj por la Zamenhof-Jaro. Sekvas aro da artikoloj kaj studoj. Ĉiuj iliaj aŭtoroj, kun la escepto de Prof. D-ro Paavo Ravila, estas kunlaborantoj de C.E.D. Tiuj kontribuoj estas grupigitaj ĝis la ebla maksimumo laŭ la ĉeftemo pritraktita: Zamenhof, la lingva problemo kaj Esperanto, literaturo, scienco, infanoj, kun du konkludaj artikoloj. Superflue diri, ke ĉiu aŭtoro respondecas pri la enhavo kaj lingvo de sia verkaĵo. En la fino troviĝas resuma trarigardo pri la plej gravaj aranĝoj en la Zamenhof-Jaro, verkita de F-ino M. H. Vermaas laŭ la informoj ricevita de la landaj aŭ lokaj organizintoj. Al la verko estas aldonitaj kelkaj paĝoj da fotoj pri Zamenhof, pri la solenaĵoj okaze de la Kongreso en Varsovio kaj pri la decembraj festoj.

C.E.D. esperas, ke ankaŭ tiu ĉi ĝia eldonaĵo estos diversmaniere utiligata por serioza dokumentado, por efika argumentado kaj entute por la plua disvastigo de la Internacia Lingvo. Tio per si mem estas la plej grava, la plej bela kaj la plej daŭra honorigo de D-ro L. L. Zamenhof.

En Londono, la 31-an de Decembro 1959.

I. L.

Internacia Patrona Komitato

POR LA ZAMENHOF-JARO

D-ro Juscelino Kubitschek de Oliveira, Prezidanto de la Respubliko, Brazilo;

Vincent Auriol, antaŭa Prezidanto de la Franca Respubliko; *Enrico Celio*, antaŭa Prezidanto de la Svisa Konfederacio;

D-ro Felix Hurdes, Prezidanto de la Nacia Konsilantaro (Parlamento) kaj estinta Federacia Ministro, Aŭstrujo; *Camille Huysmans*, Prezidanto de la Ĉambro de Deputitoj, Belgujo; *Czesław Wycech*, Marŝalo de la Pola Parlamento (Sejm), Gvidanto de la Unuigita Kampanara Partio, Pollando; *István Vass*, Vicprezidantino de la Parlamento, Sekretariino de la Landa Konsilantaro de la Patriota Popolfronto, Hungarujo;

Józef Cyrankiewicz, Prezidanto de Ministroj de la Pola Popola Respubliko; *D-ro W. Drees*, Honor-Ministro, antaŭa Ĉefministro de Nederlando; *Gaston Eyskens*, Ĉefministro de Belgujo; *Inĝ. D-ro H. C. Leopold Figl*, estinta Federacia Kanceliero, nun Ministro de Eksterlandaj Aferoj, Aŭstrujo; *Guy Mollet*, antaŭa Ĉefministro kaj Vicprezidanto de la Konsilantaro de Ministroj, Francujo; *Rt. Hon. Walter Nash*, Ĉefministro de Novzelando; *Inĝ. Julius Raab*, Federacia Kanceliero (Ministro-Prezidanto) de Aŭstrujo; *Prof. Antonio Segni*, estinta Prezidanto, nun Vicprezidanto de la itala registaro kaj Ministro de Defendo, Italujo;

Birger Bergersen, Ministro de Ekleziaj Aferoj kaj Instruado, Norvegujo; *Władysław Bienkowski*, Ministro de Klerigo, Pollando; *R. G. Casey*, Ministro de Eksterlandaj Aferoj, Aŭstralio; *Krste Crvenkovski*, Membro de la Federacia Ekzekutiva Konsilantaro kaj Sekretario de la Konsilantaro por la Kulturo kaj Edukado, Jugoslavio; *W. Dahanayaka*, Ministro de Edukado, Cejlono; *R. Edenman*, Ministro de Kulturaj kaj Edukaj Aferoj, Svedlando; *Prof. Oscar Secco Ellauri*, Ministro de Eksterlandaj Aferoj, estinta Ministro de Publika Instruado, Membro de la Plenuma Komitato de U.N.E.S.C.O., Urugvajo; *Prof. Tadeusz Galinski*, Ministro de Kulturo kaj Artoj, Pollando; *Marin Geškov*, Vicministro de Instruado kaj Kulturo, Bulgario; *Prof. Guido Gonella*, Ministro de Justico, Italujo; *Jørgen Jørgensen*, Ministro de Edukado, Danlando; *István Kossa*, Ministro de Trafiko kaj Poŝtaj Aferoj, Hungarujo; *Jayaweera Kuruppu*, Ministro de Loka Registaro kaj Kulturaj Aferoj, Cejlono; *Halvard Lange*, Ministro de Eksterlandaj Aferoj, Norvegujo; *Ernst Lemmer*, Federacia Ministro por Tutgermanaj Aferoj, Germanujo; *Kolonelo Marco Aurelio Mérida*, Ministro de Publika Edukado, Gvatemalo; *D-ro Francisco Negrão de Lima*, Ministro de Eksterlandaj Aferoj, estinta Urbestro de Rio de Janeiro, Brazilo; *D-ro Ferenc Nezvál*, Ministro por Justico, Hungarujo; *Søren Olesen*, Ministro de Enlandaj Aferoj, Danlando; *Prof. D-ro Clovis Salgado*, Ministro de Edukado kaj Kulturo, Brazilo; *D-ro Inĝ. Hans-Christoph Seebohm*, Federacia Ministro por Trafiko, Germanujo; *Lic. Jesús Unda Murillo*, Ministro de Eksterlandaj Aferoj, Gvatemalo; *Prof. Stefan Żółkiewski*, Ministro de Superaj Lernejoj, Pollando;

D-ro Inĝ. Hans Frenzel, estinta Ministro, Prezidanto de la Ŝtata Kalkula Kortumo, Aŭstrujo; *D-ro José Carlos de Macedo Soares*, estinta Ministro de Justico, Internaj Aferoj kaj Eksterlandaj Aferoj, Membro de la Brazila Beletristika Akademio, Brazilo; *Prof. D-ro Maurício de Medeiros*, estinta Ministro de Sano, Membro de la Brazila Beletristika Akademio, Brazilo; *Rt. Hon. Lordo Pakenham of Cowley, P.C., M.A.*, estinta Ministro de Transportoj, Britujo;

Lordo Boyd-Orr of Brechin Mearns, estinta Ĝenerala Direktoro de F.A.O. (Organizacio por la Nutraĵo kaj Agrikulturo), Prezidanto de la Brita Paca Konsilantaro, Hon. Prezidanto de la Monda Asocio de Mondaj Federalistoj, Nobelpremiito por la Paco (1949), Britujo; *Trygve Lie*, estinta Ĝenerala Sekretario de Unuiĝintaj Nacioj, Guberniestro de Oslo kaj Akershus, Norvegujo;

Prof. Wäino Aaltonen, skulptisto, Membro de la Akademio de Sciencoj, Finnlando; *Prof. Gustinus Ambrosi*, skulptisto, Aŭstrujo; *Rafael Arevalo Martinez*, poeto kaj verkisto, Gvatemalo; *Paulo Ariste*, lingvisto, Akademiano, Membro de la Akademio de la Estona Respubliko, U.S.S.R.; *Marius Barbeau*, D. Litt., F.R.S.C. Direktoro de la Nacia Muzeo, Kanado; *D-ro Alexandre José Barbosa Lima Sobrinho*, estinta ŝtatestro de Pernambuco, Membro de la Brazila Beletristika Akademio, Brazilo; *Kardinalo Don Jayme de Barros Camãra*, Ĉefepiskopo de Rio de Janeiro, Brazilo; *Prof. Pierre Bovet*, psikologo, Hon. Prof. de la Universitato de Genëve, estinta Direktoro de la Internacia Oficejo pri Edukado, estinta Direktoro de la Instituto J. J. Rousseau pri Edukaj Sciencoj, Svislando; *D-ro Anton F. Bruun*, Direktoro de la Galathea-ekspedicio profundmara, Danlando; *Prof. D-ro Pedro Calmon*, Rektoro de la Universitato de Brazilo, Membro de la Beletristika Akademio, Brazilo; *Prof. D-ro Milton Campos*, Senatano, estinta Ŝtatestro de Minas Gerais, Brazilo; *Ferreira de Castro*, verkisto, Portugalujo; *József Darvas*, verkisto kaj Direktoro de Film-entrepreno, Hungarujo; *Prof. Emile Delage*, Rektoro de la Akademio de Bordeaux, Francujo; *Emile*

Delaruelle, Urbestro de la urbo Elisabethville, Kongo Belga; *Prof. Petar Dinekov*, Profesoro de la Bulgara Literaturo, Membro-Korespondanto de la Bulgara Akademio de Sciencoj, Bulgarujo; *Zygmunt Dworakowski*, Prezidanto de ĉefurbo Varsovio, Pollando; *Prof. Carlos Sabat Ercasty*, verkisto kaj poeto, Membro de la Urugvaja Belarta Akademio, Profesoro de Literaturo en la Fakultato de Humanismo kaj Sciencoj, Prezidanto de la Ateneo en Montevideo, Urugvajo; *Prof. D-ro Clemente Estable*, sciencisto biologo, histologo kaj pedagogo, Doktoro Honora de la Fakultato de Medicino kaj ties Profesoro, Direktoro de la Nacia Instituto de Biologiaj Esploroj, Membro de la Urugvaja Belarta Akademio, Vicprezidanto de la Urugvaja Komisiono de U.N.E.S.C.O., Urugvajo; *D-ro Johan Falkberget*, verkisto, Norvegujo; *Fernando Ferrari*, Federacia Deputito, Gvidanto de la Brazila Laborista Partio, Brazilo; *Prof. René Maurice Fréchet*, Membro de la Franca Akademio de Sciencoj, Membro de la Akademio de Sciencoj de Pollando kaj Nederlando kaj de la Internacia Akademio de Scienca Filozofio, Francujo; *Maurice Genevoix*, Membro de la Franca Akademio, Francujo; *Akademiano Vladimir Georgiev*, Sekretario de Fako en la Bulgara Akademio de Sciencoj, Bulgarujo; *Frank G. Hanson*, Redaktoro de "The Commonwealth", Kanado; *Inĝ. Heikki H. Herlin*, Mineja Konsilanto, Rotariano, estinta Membro de la Estraro de Internacia Rotario, Finnlando; *Prof. Martti Hela*, emerita Rektoro de la Instruista Altlernejo en Helsinki, Finnlando; *Thor Heyerdahl*, verkisto, Gvidanto de la Kon-Tiki-Ekspedicio, Norvegujo; *Jean Hiernaux*, Rektoro de la Oficiala Universitato de Kongo Belga kaj Ruanda-Urundi, Kongo Belga; *Sigurd Hoel*, verkisto, Norvegujo; *Generalo Francisco Jaguaribe Gomes de Matos*, Prezidanto de la Brazila Societo de Geografio, Brazilo; *Franz Jonas*, nacia konsilanto, land- kaj urbestro de Vieno, Aŭstrujo; *Georgi Karaslavov*, verkisto Bulgarujo; *Prof. D-ro Seiji Kaya*, Rektoro de la Universitato de Tokio, Prezidanto de la Ligo de Ŝtataj Universitatoj, Japanujo; *Prof. D-ro Tadeusz Kotarbinski*, Prezidanto de la Pola Akademio de Sciencoj, Pollando; *Stanisław Kulczyński*, Prezidanto de la Tutpola Paca Komitato, Prezidanto de la Pola Demokrata Partio, Pollando; *Tyney Leivo-Larsson*, Ambasadoro de Finnlando en Oslo, Finnlando; *Mag. Rita Lopez De Llergo*, Direktorino de la Nacia Instituto pri Geografio, Meksikio; *Prof. D-ro G. P. Malalasekera*, O.B.E., M.A., Ph. D., D. Litt, Profesoro de Pali kaj Budhana Civilizacio, Dekano de la Fakultato de Orientaj Studoj, Ĉefredaktoro de Enciklopedio de Budhismo, Unua Prezidanto de Tutmonda Federacio Budhana, Ambasadoro de Cejlono por U.S.S.R., Ĉeĥoslovakio kaj Pollando, Cejlono; *Prof. D-ro Octávio Mangabeira*, Senatano, estinta Ŝtatestro de Baía, Membro de la Brazila Beletristika Akademio, Brazilo; *D-ro Carlos Martínez Durán*, Rekt. de la Nacia Univers. de Gvatemalo; *Lic. José Mata Gavidia*, Dekano de la Fakultato pri Socialaj Studoj, Gvatemalo; *Janko Maur*, verkisto, Membro de la Belorusa Verkista Unuiĝo, U.S.S.R.; *Prof. D-ro Aladár Mód*, Akademiano, Hungarujo; *D-ro Herbert Moses*, Prezidanto de la Brazila Gazetara Asocio, Brazilo; *Herbert A. Mowat*, publicisto, Kanado; *Georgi Naĝakov*, Akademiano, Vicprezidanto de la Bulgara Akademio de Sciencoj, Membro de la Tutmonda Konsilantaro por Defendo de la Paco, Bulgarujo; *Odd Nansen*, arĥitekto, Prezidanto de la Norvega Sekcio de la Mondasocio de Mondfederalistoj, Norvegujo; *Martin Niemöller*, Prezidanto de Germana Pac-Societo, Germanujo; *Prof. Belčo Nikolov*, Rektoro de la Universitato en Varna, Bulgarujo; *E. Norinder*, Konsilanto pri Edukaj Aferoj, Svedujo; *Sergej Obruĉev*, Akademiano, Membro de la Akademio de U.S.S.R., U.S.S.R.; *R. H. Oittinen*, Ĉefdirektoro de la Instrua Administrado, Finnlando; *Erich Ollenhauer*, Prezidanto de la Socialista Partio, Germanujo; *Prof. Marcus L. Oliphant*, F.R.S., Direktoro de la Departemento de Kernfiziko en la Aŭstralia Nacia Universitato, Aŭstralio; *Lic. Adolfo Molina Orantes*, Direktoro de la Nacia Komisiono de U.N.E.S.C.O., Gvatemalo; *Prof. D-ro Gyula Ortutay*, folkloristo, Membro de la Prezidanta Konsilantaro de la Hungara Popolrespubliko, Rektoro de la Scienca Universitato en Budapest, Hungarujo; *Jean Paelinck*, Guberniestro de la Provinco Katanga, Kongo Belga; *Prof. Mario Pei*, lingvisto, Usono; *Prof. Aarni Penttilä*, Rektoro de la Pedagogia Altlernejo en Jyväskylä, Finnlando; *D-ro Ademar Pereira de Barros*, Urbestro de São Paulo, Brazilo; *Camille E. Pouliot*, M.D., Ministro de Ĉasado kaj Fiŝkaptado de la Provinco de Québec, Kanado; *Jorge G. Quintana*, Direktoro de la Nacia Altlernejo de Biologio, Meksikio; *Prof. Paavo Rivila*, Eks-rektoro, Membro de la Akademio de Finnlando, Finnlando; *D-ro Alfonso Reyes*, verkisto, Prezidanto de la Lingva Akademio, Meksikio; *Jules Romains*, verkisto, Francujo; *Prof. D-ro István Ruzsnyák*, Prezidanto de la Hungara Scienca Akademio, Hungarujo; *Prof. Gurgen Sevak*, lingvisto, Akademiano, Membro de la Akademio de la Armena Respubliko, U.S.S.R.; *F. E. Sillanpää*, verkisto, Nobelpremiito por literaturo 1939, Finnlando; *S. F. de Silva*, B.A. (Lond.), Direktoro de Edukado, Cejlono; *Lola Solar*, Prezidantino de la Eŭropa Asocio de Kristan-demokrataj Virinoj, Aŭstrujo; *Franz Stein*, Ĉefurbestro de Mainz, Hon. Senatano de la Universitato de Mainz, Germanujo; *Prof. D-ro Sutarman*, Profesoro de Medicina Fakultato en Djakarta, Sekretario de la Indonezia Universitato, Prezidanto de la Skolta Movado, Indonezio; *Árpád Szakasits*, publicisto, Prezidanto de la Hungarlanda Ĵurnalista Asocio, Hungarujo; *Prof. Stanisław Turcki*, Rektoro de la Varsovia Universitato, Pollando; *Prof. Kalle Väisälä*, Fil. D-ro, Membro de la Finna Scienca Akademio, Finnlando; *Prof. Yrjö Väisälä*, astronomo, Membro de la Akademio de Finnlando, Finnlando; *Amand Van Roy*, Rektoro de la Reĝa Ateneo, Kongo Belga; *Prof. Arĥitekto José Claudio Williman*, Prezidanto-Direktoro de la Instituto de Superaj Studoj, Urugvajo; *Prof. D-ro Hideki Yukawa*, fizikisto, Nobelpremiito, Japanujo; *Prof. Ramón Menéndez Pidal*, Prof. pri hispana filologio kaj romanida lingvistiko, Prez. de la hisp. Akademio de la Lingvo, em. prof. de Madrida Universitato, fondinto de Hispana Filologia Skolo.

Deklaracio

Okaze de la 100-jara datreveno de la naskiĝo de D-ro L. L. Zamenhof

La 15-an de decembro 1959 estos la 100-jara datreveno de la naskiĝo de D-ro L. L. Zamenhof.

Inspirita de profunda humanismo kaj konscia, ke la diverseco de lingvoj prezentas la fundamentan obstaklon al ĉiuj aspektoj de internacia komunikado kaj, sekve, ankaŭ al pli bona kompreniĝo inter la popoloj, L. L. Zamenhof dediĉis sian grandan talenton kaj ĉiujn siajn fortojn al la solvo de tiu problemo.

En la jaro 1887 aperis en Varsovio la unua lernolibro de Internacia Lingvo, kiun li publikigis sub la pseŭdonimo "Esperanto", laŭ kiu ankaŭ la lingvo estis poste ofte nomata.

En iom pli ol nuraj sep jardekoj la lingvo disvastiĝis tra la tuta mondo kaj fariĝis en niaj tagoj senduba socia fakto kaj grava kultura faktoro.

Ĉiujare 10.000 ĝis 15.000 personoj, apartenantaj al plej malsamaj lingvaj komunajoj, kolektiĝas en diversaj internaciaj kongresoj, konferencoj, seminarioj kaj aliaj aranĝoj utiligante por la raportoj, lekcioj, prelegoj, diskutoj kaj personaj kontaktoj nur la Internacian Lingvon. Ĉi tiuj estas la solaj internaciaj renkontiĝoj de la hodiaŭo, dum kiuj la komunikado okazas ne nur sen interpretistoj, sed ankaŭ sen humiligoj, surbaze de plena egaleco, per la uzo de unu nura neŭtrala lingvo.

Nekalkulebla nombro da homoj, el ĉiuj sociaj tavoloj, daŭre efektivas per la Internacia Lingvo skribajn kontaktojn trans ĉiujn lingvajn limojn.

La scienca kaj belarta literaturo en la Internacia Lingvo — kaj traduka kaj originala — estas jam tre multflanka kaj valora. Novaj libroj senĉese aperas. Konsiderinda nombro da gazetoj kaj fakaj revuoj estas regule publikigata en Esperanto. La apliko de la lingvo en la scienco kaj por fakaj celoj konstante vastiĝas.

En radio, turismo, komerco kaj en aliaj sferoj Esperanto akiras novajn poziciojn.

Paralele la lingvo interne evoluis laŭ la sama maniero, laŭ kiu evoluas kiu ajn literatura lingvo, sed samtempe, pro la daŭra intensigado de la internaciaj kontaktoj, ankaŭ plifirmiĝis ĝia unueco kaj kohereco.

Per sia Rezolucio de la 10-a de decembro 1954 la Ĝenerala Konferenco de U.N.E.S.C.O. diskutinte la Raporton de la Ĝenerala Direktoro de tiu organizaĵo, "notis la rezultojn atingitajn per Esperanto sur la kampo de la internaciaj intelektaj interŝanĝoj kaj por la proksimigo de la popoloj" kaj rekonis, "ke tiuj rezultoj respondas al la celoj kaj idealoj de U.N.E.S.C.O."

La praktika apliko de Esperanto montris, ke la fundamenta baro al internacia komunikado kaj kunlaborado — la lingva obstaklo — estas venkita por tiuj, kiuj scias la Internacian Lingvon. Tiu obstaklo estas, same tiel, venkebla por ĉiuj aliaj. Necesas nur bona volo kaj iom da fortostreĉo por ellerni la lingvon.

Dum la tuta jaro 1959 okazos ĉie tra la mondo diversaj aranĝoj por memori la 100-jaran datrevenon de la naskiĝo de D-ro L. L. Zamenhof. Por kunordigi tiun agadon, kiu atingos sian kulminon la 15-an de decembro 1959, formiĝis speciala Internacia Organiza Komitato, kiu laboras sub la aŭspicioj de Internacia Patrona Komitato, en kiun eniris elstaraj personecoj de la scienco, literaturo kaj ĝenerale kultura kaj publika vivo de diversaj landoj.

La Internacia Organiza Komitato direktas

Alvokon

*al ĉiuj internaciaj ŝtataj kaj privataj organizaĵoj;
al ĉiuj internaciaj kaj naciaj sciencaj, literaturaj,
klerigaj, kulturaj, komercaj kaj aliaj institucioj;
al ĉiuj direktoj de televido kaj radio;
al la redakcioj de gazetoj kaj revuoj;
al profesoroj kaj instruistoj kaj al ĉiuj aliaj kul-
turaj agantoj*

memorigi en konvena formo la 100-jaran datrevenon de la naskiĝo de D-ro L. L. Zamenhof kaj doni sian helpon kaj apogon por la plua disvastigo de la Internacia Lingvo Esperanto.

La Internacia Organiza Komitato turnas sin rekte al ĉiu persono, kiu mem spertis la malfacilaĵojn de la lingva obstaklo en la internaciaj rilatoj, ellerni senprokraste Esperanton kaj tiamaniere ne nur mem utiligi la multnombrajn avantaĝojn, kiujn donas la scio de tiu lingvo, sed ankaŭ kontribui al ĝia disvastigo. Ju pli granda estas la nombro de personoj, kiuj scias kaj uzas la Internacian Lingvon, des pli granda estas ĝia valoro kaj des pli utila fariĝas la scio de la lingvo por ĉiu unuopa individuo.

Esperanto ne celas anstataŭigi la ekzistantajn naciajn lingvojn, sed forigi la lingvan haŭson en la internaciaj rilatoj servante al ĉiuj kiel neŭtrala instrumento de internacia komunikado.

En Mainz, la 5-an de aŭgusto 1958.

Baza Programo

de la

aranĝoj okaze de la Zamenhof-jaro

La Internacia Organiza Komitato akceptis, dum sia kunsido de la 5-a de aŭgusto 1958 en Mainz, jenan Bazan Programon de la aranĝoj en la Zamenhof-Jaro :

1. Disvastigo de la verko de Prof. E. Privat pri la vivo de Zamenhof kaj eventuale de aliaj biografiaj verkoj pri Zamenhof en Esperanto kaj en kiel eble multe da naciaj lingvoj.
2. Speciala dokumento pri la vivo kaj verko de Zamenhof en Esperanto kaj en kiel eble plej multaj naciaj lingvoj (prizorgota de la Centro de Esploro kaj Dokumentado, Londono).
3. Serio da dokumentoj pri Zamenhof kaj la Internacia Lingvo, eldonotaj de la Centro de Esploro kaj Dokumentado dum la tuta jaro 1959.
4. La Centro de Esploro kaj Dokumentado liveros rekte al la mondaĵ presagentejoj kaj al siaj kunlaborantoj (por traduko kaj publikigo en naciaj lingvoj) artikolojn pri Zamenhof, verkitajn de la plej elstaraj personoj de diversaj landoj, precipe lingvistoj, kiuj parolas la Internacian Lingvon. Se iel eble, tiuj artikoloj estos publikigitaj ankaŭ en formo de libro fine de la jaro 1959.
5. La Informa Fako de Universala Esperanto-Asocio liveros dum 1959 informojn pri Zamenhof kaj la lastjaraj progresoj de la Internacia Lingvo al la Informaj Fakoj de la landaj Esperanto-organizaĵoj kaj al la mondaĵ presagentejoj por publikigo en la nacilingvaj gazetoj kaj revuoj.
6. Speciala kampanjo en televido kaj radio, utiligante tiucele precipe la radio-staciojn, kiuj jam elsendas en la Internacia Lingvo.
7. Specialaj festoj dum la Universala Kongreso de Esperanto en la Jubilea Jaro en Varsovio, 1959.
8. La internaciaj Esperanto-revuoj dediĉu la tutan decembran numeron 1959 al la aŭtoro de Esperanto. En januaro, 1959, aperu enkondukaj artikoloj pri la Zamenhof-Jaro.
9. La estraroj de la landaj Esperanto-organizaĵoj publikigu nacilingve specialan numeron de sia gazeto kun artikoloj pri la vivo kaj verko de Zamenhof en kiel eble plej multe da ekzempleroj kaj prizorgu ĝian vastan distribuon.
10. Ĉiuj Esperanto-kongresoj — landaj, fakaj kaj specialaj — havu solenajn kunsidojn (kun prelegoj, muzikaj punktoj, deklamadoj k.s.) dediĉitajn al Zamenhof. Personoj, parolantaj la Internacian Lingvon, memorigu la datrevenon ankaŭ en aliaj internaciaj aŭ naciaj kongresoj kaj konferencoj.
11. Ĉiuj lokaj Esperanto-grupoj en la mondo organuzu la tagon mem de la datreveno alt-nivelajn publikajn aranĝojn en la plej belaj salonoj, laŭ la ebleco en kunlaboro kun gravaj kulturaj institucioj kaj organizaĵoj de la loko, kaj invitu la ĵurnalistojn, la reprezentantojn de la lokaj, provincaj aŭ ŝtataj kulturaj institucioj kaj edukaj instancoj (detaloj pri tiuj festoj estu donitaj de la landaj Esperanto-organizaĵoj; sugestoj estos donitaj de la Kultura Komisiono de Universala Esperanto-Asocio).
12. Jubileaj poŝtmarkoj, eldonotaj en kiel eble plej multe da landoj.
13. La landaj Esperanto-organizaĵoj kaj la lokaj Esperanto-societoj klopodu atingi, ke en kiel eble plej multe da lokoj po unu strato aŭ placo ricevu la nomon de "Zamenhof, aŭtoro de la Internacia Lingvo Esperanto" aŭ "Esperanto". La fakto, ke jam ĉirkaŭ 100 urboj havas stratojn aŭ placojn je la nomo "Zamenhof" aŭ "Esperanto", faciligos tiun klopodon. Oni ankaŭ klopodu starigi monumentojn al D-ro L. L. Zamenhof imitante plurajn urbojn, kiuj tion jam faris.
14. Publikigo de dokumenta filmo pri Zamenhof kaj lia verko (prizorgota de Pollando).
15. Laŭ la ebleco eldono en 1959 de kompleta bibliografio pri la verkoj publikigitaj en la Internacia Lingvo.
16. Eldono de memorigaj glumarkoj kaj foto en pluraj formatoj de D-ro L. L. Zamenhof (prizorgota de Universala Esperanto-Asocio).
17. Ĉiuj festoj kaj aranĝoj — ĉu en lokaj, ĉu en landaj, aŭ internacia kadro — estu vaste utiligataj por plia informado pere de la gazetaro, radio, ekspozicioj, afiŝoj, flugfolioj kaj aliaj rimedoj laŭ la landaj kaj lokaj cirkonstancoj.

En Mainz, la 5-an de aŭgusto 1958.

Internacia Organiza Komitato

Prezidanto :

Prof. D-ro G. Canuto,

Profesoro en la Universitato de Torino, estinta Rektoro de la Universitato en Parma, Gr. Uff. de la Itala Respubliko.

Sekretario :

Prof. D-ro I. Lapenna,

Estinta profesoro en la Universitato de Zagreb, "Fellow" en la Londona Altlernejo de Ekonomia kaj Politika Scienco de la Universitato en London.

Vicprezidantoj :

Prof. D-ro Eŭgeno Bokarev, Univ. profesoro, lingvisto (Soveta Unio); *Prof. D-ro Björn Collinder,* Univ. profesoro, lingvisto (Svedlando); *Prof. D-ro W. E. Collinson,* Univ. profesoro, lingvisto (Britujo); *Prof. D-ro Carlos Domingues,* Univ. profesoro (Brazilo); *Inĝ. Edmund Fethke* (Pollando); *Prof. D-ro José Font y Puig,* Univ. profesoro, lingvisto-latinisto (Hispanujo); *Inĝ. J. R. G. Isbrucker,* docento en Alta Teknika Lernejo (Nederlando); *John L. Lewine* (Usono); *Prof. D-ro E. Privat,* Univ. profesoro, lingvisto (Svislando); *Prof. D-ro Hideo Yagi,* Univ. profesoro (Japanujo).

Helpa Sekretario :

Norman R. Smith, B.Sc. (Britujo).

Membroj :

D-ro fil. C. J. Adcock (Novzelando), *José Antunes* (Portugalujo), *D-ro Inĝ. G. Azzi* (Italujo), *Generalo L. Bastien* (Francujo), *Hans Bauer* (Aŭstrujo), *Paroĥestro Alfons Beckers* (Belgujo), *Univ. prof. Fujio Egami* (Japanujo), *Prof. M. Fernández-Menéndez* (Urugvajo), *Advokato Rafaelo Gastón,* *Membro de la Belarta Akademio* (Hispanujo), *Ralph Harry,* diplomato (Aŭstralio), *D-ro Rama Hegde* (Hindujo), *D-ro W. Herrmann* (Germanujo), *H. W. Holmes, O.B.E.* (Britujo), *H. A. de Hoog* (Nederlando), *S. Hujucz* (Ĉinujo), *M. Jaumotte,* industriisto (Belgujo), *David W. M. Jenkins* (Kanado), *D-ro Jaromir Jermář* (Ĉeĥoslovakio), *Hasan Kocaman* (Turkujo), *Hans Kürsteiner* (Svislando), *Marton Lajos* (Hungarujo), *Maurice Lewin* (Britujo), *R. Llech-Walter* (Francujo), *Privat-docento D-ro P. Neergaard* (Danlando), *Univ. Prof. D-ro Seiho Nishi* (Japanujo), *Philip Ogwuazor* (Nigerio), *Violin Oljanov,* ĵurnalisto (Bulgarujo), *Univ. Prof. D-ro Juan de Oyarzabal* (Meksikio), *Pierre Paulus* (Kongo Belga), *D-ro Erlino Salzano* (Brazilo), *Inĝ. Hektor Sánchez-Latour* (Gvatemalo), *Univ. Prof. D-ro Mikaelo Sancho Izquierdo* (Hispanujo), *D-ro Jorge Sato* (Argentino), *J. Selbekk* (Norvegujo), *Mag. Vilho Setälä* (Finnlando), *Univ. lektoro L. Sinha* (Hindujo), *Univ. prof. D-ro Hugo Sirk* (Aŭstrujo), *Kort. Konsilisto Hugo Steiner* (Aŭstrujo), *Jan Strønne* (Svedujo), *Cejlona Sanghana Njanasatta Thero,* *Budhana ĉefmonaĥo* (Cejlono), *Charles Thollet* (Maroko), *Rangkajo Ch. Sj. Datoe Toemenggoeng,* verkistino (Indonezio), *E. W. Woodruff* (Sudafriko), *Inĝ. Ludvik Zaleski-Zamenhof* (Pollando), *Peter Zlatnar* (Jugoslavio), *Inĝ. Mohamed Youssef* (Un. Araba Respubliko).

Biografiaj informoj pri D-ro L. L. Zamenhof

Lia vivo — Liaj vojaĝoj

de

Roland Jossinet (Francujo)

(Por la uzitaj mallongigoj vidu p. 21)

DATOJ	LOKOJ	OKAZAĴOJ	REFERENCOJ
15.12.1859	Białystok	L. L. Zamenhof naskiĝas	Kopio de akto pri naskiĝo en <i>La Nova Epoko</i> XII-1929
8.69	Białystok	ulica Zielona (= "verda") Nro 6 (ekde 11.6.19 : Ulica Zamenhofa)	
10/11(?) .69	Białystok	lernanto en la Reallernejo	U.10 - E.17
1(?) .70	Białystok	eliras el la lernejo pro malsano	A.Z.
12.73	Warszawa	reeniras en la lernejon ul. Nowolipie 28	A.Z. U.10 - L.Z. 112
8.74	Warszawa	lernanto en la 2a Filologia Gimnazio (4a Klaso)	<i>Galerio</i> p.12 - U.10 - A.Z.
17.12.78	Warszawa	"Lingwe Uniwersala" ul. Nowolipie 28	E.17 - U.10 - <i>Letero al Borovko</i>
6.79	Warszawa	finiĝo de la gimnazia kurso	U.10
8.79	Moskva	studento en la Universitato, Medicina Fakultato loĝas : ul. Tverskaja 27 (nuna ul. Gorkij) dom Miklaŝevskago	U.10 <i>La Nova Epoko</i> XII - 1929
Komenco Aŭg. 81	Warszawa	studento en la Universitato, Medicina Fakultato, 3a Kurso	U.10. - <i>La Nova Epoko</i> XII - 1929 - <i>La Nica</i> <i>Literatura Revuo</i> 3-1958 (Arkivoj de la Fakultato (esploroj de Domoslawski) <i>La Nica Literatura Revuo</i> 5.58
(13).6.82	Warszawa	Lia unua provo fondi cionistan grupon	<i>La Nica Literatura Revuo</i> 5.58
(18).8.83	Warszawa	fondas unuigitan cionistan asocion (Cion-Amantoj)	<i>La Nica Literatura Revuo</i> 5.58
1.85	Warszawa	ricevas la kuracistan diplomon	U.10 - E.17 - L.Z. 112
2.85	Wejseje	loĝas ĉe sia fratino, Fania Pikower	<i>Letero</i> 18.1.52 de Kohen-Cedek (Jerusalem) al Jossinet
en 1885	iras al Kovno		L.Z. 112 - E.17 privata artikolo de Dambrauskas, tradukita 1958 de Naudzius, nun ĉe Waringhien
ĉ. 5.85	Warszawa	studas okulmedicinon en la hebrea hospitalo	U.10 - L.Z. 112

DATOJ	LOKOJ	OKAZAJOJ	REFERENCOJ
12(?) .85 5.86 aŭtuno aŭ fino 1886 30.3.87 1887	Plock Wien Warszawa Warszawa foje en Wejseje kaj Kovno	Hotel Hammerand, Florianigasse 8; studas okulmedicinon ul. Muranowska 40 fianĉigas	U.10 - Privat 33 U.10 - L.Z. 112 U.10 - A.Z. - L.Z. 112 Privat 34 privata artikolo de Dambrauskas, tradu- kita 1958 de Naudzius, nun ĉe Waringhien <i>Heroldo</i> 4.59 U.12 (3a Kajero) - O.V. 573 - A.Z. U.12 (3a Kajero) - O.V. 573 - A.Z. L.Z. 112 - <i>Familia</i> <i>Rondo</i> 1947 - <i>Esperanto Post</i> Dec. 51 Privat 36 E.17 Privat 37 O.V. 489 - O.V. 484 - Brüggemann L.Z. 113 - O.V. 485
2.6.87	Warszawa	cenzero-permeso por la <i>Unua Libro</i>	U.12 (3a Kajero) - O.V. 573 - A.Z.
26.7.87	Warszawa	Unua Libro	U.12 (3a Kajero) - O.V. 573 - A.Z.
9.8.87	Warszawa	edziĝas (ceremonio en la salono Harmonja)	L.Z. 112 - <i>Familia</i> <i>Rondo</i> 1947 - <i>Esperanto Post</i> Dec. 51 Privat 36
30.1.88 Post 24.10.89	Warszawa Brest-Litovsk Białystok Ĥerson	ekloĝas : ul. Przejazd 9 cenzero-permeso por la Dua Libro	E.17 Privat 37 O.V. 489 - O.V. 484 - Brüggemann L.Z. 113 - O.V. 485
Fino 10.89 aŭ Komenco 11.89 4.90	Ĥerson	forveturas	<i>The British Esp-ist</i> sept. okt. 52 L.Z. 114 - O.V. 489 <i>The British Esp-ist</i> Sept. Okt. 1952
Komenco 5.90	Warszawa		O.V. 73 - O.V. 417 O.V. 511 - O.V. 490 - E. 17 - L.Z. 114
Jam en 9.90 10.93 25/27.11.93 11.93 7(?) .97 8.97	Warszawa Grodno Warszawa Grodno Warszawa Wien	ul. Nowolipki 21 ul. Policejskaja dom Raĥmanina prenas sian familion Hotel Hammerand, Florianigasse 8, restudas medicinon	U. 10 U. 10 - O.V. 511 O.V. 519 E. 17
11(?) .97 12.97 Komenco 98	Warszawa Grodno Warszawa	ul. Dzika 9 (ekde 24.11.31 : ulica Dr Ludwika Zamenhofa)	U. 10 O.V. 491 O.V. 491 Privat 42 L.Z. 171
22 aŭ 23.7.1905 23/27.7.05	Warszawa Berlin Köln Liège	forveturas vizitas Borel	<i>Lingvo Internacia</i> 15.8.05 - L.Z. 172 <i>Germana Esp-isto</i> Aŭg. Sept. 05
28.7.05	Paris	alvenas en "Gare du Nord" je la 16 h. gasto de Javal. 5 Bd. de la Tour-Maubourg	O.V. 538 - E. 30.7.05 - L.Z. 172 - E. 10.9.05
29.7.05	Paris	Kun Javal kaj Bourlet vizitas ministron Bienvenu-Martin; nomita Kavaliro de la Franca Honora Legio	<i>Enciklopedio</i> 149 O.V. 437 No. 18 arĥivoj de la Honor- legia Kancelario Lia P.K. de tie al Sofia Z.
30.7.05	Paris	tagmanĝas en la Turo Eiffel	

DATOJ	LOKOJ	OKAZAJOJ	REFERENCOJ
30.7.05	Paris	prezidas disdonon de premioj en la Urbdomo de la 4-a Distrikto	programo de la <i>Esp-ista Grupo de Paris</i> 24.7.05
31.7.05 (probabla dato)	Rouen	renkontiĝas kun de Beaufront	L.Z. 191 - Letero 26.7.05 de Beaufront al Michaux (Arkivoj de Deligny) - <i>La Belga Sonorilo</i> Aŭg. 05)
1.8.05	Paris	vizitas la "Presa Esp-ista Societo" 33, rue Lacépède; lin akceptas Prof. Cart	aŭtografo de Z. sur albumo (arĥivoj de F-ino C. Royer)
		akceptata en la Ĉefa Urbdomo festeno en "Hôtel Moderne"	Poŝtkarto de la "Presa Esp-ista Societo" (ties butiko) 1906
2.8.05	Vailly-sur-Aisne	4, rue de l'Hôtel-Dieu vizitas sian bonevon D-ron Kaplan	<i>Lingvo Internacia</i> 8.05
3.8.05	Paris	forveturas je 15 h. 15	<i>L'Espérantiste</i> 12.05 <i>L'Espérantiste</i> 10.05 - <i>Lingvo Internacia</i> 1905 L.Z. 172
			Vagonarhoroj - Arkivoj de la Francaj Fervojoj.
			Francaj ĵurnaloj "La France du Nord" kaj "Le Boulonnais" (Aŭg. 05) (Franca Nacia Biblioteko). Noto: Dum sia restado en Paris, Z. ankaŭ vizitis la Librejon Hachette (L.Z. 181); li estis fotografita de Eugène Pirou (eble, 5 Bd Saint-Germain), kaj de Meys ("L'illustration" 12.8.05).
3.8.05	Boulogne-sur-Mer	aŭvenas je la 18 h. 49	Samaj francaj ĵurnaloj
5.8.05	Boulogne-sur-Mer	1-a U.K. Lia fama parolado	Samaj francaj ĵurnaloj
6.8.05	Wimereux kaj Boulogne-sur-Mer		<i>Bibliografio de Internacia Lingvo</i> de Stojan (UEA) No. 5092
10.8.05	Folkstone Dover		Brüggemann <i>The British Esp-ist</i> Sept.-Okt. 05
11.8.05	Calais		O.V. 239 - <i>The Esperantist</i> okt. 05
12.8.05	Boulogne-sur-Mer		<i>L'Espérantiste</i> Aŭg.-Sept. 05
13.8.05	Boulogne-sur-Mer	forveturas je la 12 H. 40	Francaj ĵurnaloj "La France du Nord" kaj "Le Boulonnais"

DATOJ	LOKOJ	OKAZAĴOJ	REFERENCOJ
8.07 12.8.07	Folkestone Cambridge	3a U.K.	L.Z. 33 <i>Esperantista Dokumentaro The British Esperantist</i> 1907 p. 188 - <i>La Revuo</i> p. 108
18.8.07	London	vizitas Moscheles	<i>The British Esperantist</i> 1907 p. 188 - <i>La Revuo</i> p. 108
19.8.07	London	paroladas en Guildhall	L.Z. 34 - <i>La Revuo</i> p. 109 <i>Esperantista Dokumentaro - La Tria</i> (libro) p. 28 Noto : Dum sia restado en London, li estis akceptita de Herbert Samuel, Subministro de l'Interne (<i>Lingvo Internacia</i> p. 464 - Informoj de Norman Williams)
20.8.07	London	vizitas la oficejon de la Brita Esperantista Oficejo	<i>Esperantista Dokumentaro The British Esperantist</i> Sept. 07 p. 178
almenaŭ ĝis 23.8.07	London		O.V. 556
8.07 26.8.07	Calais Frankfurt- am-Main		<i>L'Espérantiste</i> okt. 07 Letero 22.5.51 de Carl Barthel al Jossinet
kaj tuj al	Bad Nauheim		Letero 22.5.51 de Carl Barthel al Jossinet
19.07	Bad Nauheim	ĉeestas feston en "Kurhaus"	L.Z. 37 - <i>Esperanto-Post</i> No. 4 Aprilo 1951
15.9.07	Frankfurt- am-Main	Steinernes Haus	<i>Esperanto-Post</i> No. 4 Aprilo 1951 <i>The British Esperantist</i> No. 07 - <i>Tra la Mondo</i> p. 170 <i>L'Espérantiste</i> Okt. 07 <i>Lingvo Internacia</i> 07 - p. 466
9.07	Bad Nauheim		L.Z. 38 - <i>Esperanto-Post</i> No. 4 Aprilo 1951
fino 9.07 10.8.08 17.8.08	Warszawa Dresden Dresden	por partopreni la 4-an U.K. akceptata en la Teknika Kolegio	L.Z. 41 O.V. 565 <i>La Bela Mondo</i> 1908 - p. 7
18.8.08	Meißen	ŝipe	<i>Esperantista Dokumentaro - Germana Esperantisto</i> okt. 08
19.8.08	Dresden		<i>Esperantista Dokumentaro - Germana Esperantisto</i> okt. 08

DATOJ	LOKOJ	OKAZAĴOJ	REFERENCOJ
20.8.08	Wehlen	ŝipe	<i>Esperantista Dokumentaro - Germana Esperantisto</i> okt. 08
21.8.08	Dresden		
22.8.08	Chemnitz		<i>Germana Esperantisto</i> sept. 08
23.8.08	Dresden, Weißer Hirsch		<i>La Bela Mondo</i> p. 45
ŝipe al	Loschwitz		"
	Dresden		"
24.8.08	Berlin	akceptata de la Ministro pri Instruado	"
25.8.08	Potsdam	(probable)	<i>La Revuo</i> Nov. 08
26.8.08	Berlin	forveturas	"
	Warnemünde		"
	Insulo Falster		"
	Köbenhavn		"
27.8.08	Hälsingborg		<i>Dana Esperantisto</i> 08
	kaj		
	Köbenhavn		
29.8.08	Köbenhavn	forveturas	<i>La Revuo</i> Nov. 08
08	Warszawa		
jam antaŭ			
20 ĝis 28.8.09	Bad Reinerz		L.Z. 250 - <i>La Duonmonata</i> 15.12.09
30.8.09	Lyon	vizitas D-ron Dor	L.Z. 250
4/11.9.09	Barcelona	5-a U.K.	<i>La Revuo</i> Nov. 09
14/17.9.09	Valencia		<i>Esperantista Dokumentaro</i>
18.9.09	Barcelona		<i>Esperantista Dokumentaro</i>
19.9.09	Genève	haltas inter du vagonaroj	<i>Esperanto</i> 5.10.09
20.9.09	Dresden	renkontiĝas kun Ostwald dum 1½ horo en la stacidomo	<i>Svisa Espero</i> Sept. 09 - <i>La Suno Hispana</i> Dec. 09
21(?)			L. de Z. 24.9.09 al Generalo Sebert (Arkivoj de Warnier)
ĝis 26.9.09	Bad Reinerz		sama referenco <i>Esperanto</i> 5.10.09
jam antaŭ			
29.9.09	Warszawa		O.V. 571
4 ĝis 7.5.10	S. Peterburg	1-a rusa nacia Kongreso	L.Z. 260 - <i>La Ondo de Esperanto</i> O.V. 566
			<i>Lingvo Internacia</i> junio 10
jam antaŭ			<i>Le Monde</i>
10.5.10	Warszawa		<i>Espérantiste</i> p. 124
			<i>Belga Esperantisto</i> junio 1910 (L. de Z. al la Belga Kongreso)
5.6.10	Ciechocinek	salutas samideanojn el (la tiam germana) Bromberg	<i>Germana Esperantisto</i> p. 158 majo 10 junio 10
5.6.10	Warszawa		<i>Germana Esperantisto</i> p. 158 majo 10 junio 10
2.8.10	Bremen	ekveturas sur la germana ŝipo "George Washington"	<i>La Ondo de Esperanto</i> - O.V. 566

DATOJ	LOKOJ	OKAZAĴOJ	REFERENCOJ
3.8.10	Southampton	halto de tiu ŝipo en la haveno	<i>Marto</i> 20.11.10 - <i>La Ondo de Esperanto</i>
3.8.10	Cherbourg	halto de la ŝipo	<i>Paris-Esperanto</i> Okt. 10 - <i>La Ondo de Esperanto</i>
11.8.10	New York	alveno de la ŝipo	Arkivoj de Ŝip-Kompanioj
13.8.10	Washington	16-a h. 30; 6-a U.K.	<i>La Simbolo</i> Sept. 10 - <i>Franca Esperantisto</i> 10 p. 145
15.8.10	Mount Vernon Washington	ŝipe sur la riverego Potomac	<i>Tutmonda Espero</i> <i>Franca Esperantisto</i> 10 p. 145
ĝis 20.8.10	Washington Niagara akvo-falo Quebec	vizitas sian kuzon Ludoviko Zamenhof	<i>Lingvo Internacia</i> Sept. 10
dum unu semajno en fino 8.10	Montreal New York de New York	vizitas sian kuzinon S-inon Lewis	"
3.9.10		forveturas sur ŝipo "Kaiserin Augusta Victoria"	Arkivoj de Ŝip-Kompanioj <i>Universo</i> II p. 164
12.9.10	Hamburg	alveno de la ŝipo	<i>Le Monde Espérantiste</i> p. 188 <i>Germana Esperanto Gazeto</i>
9.10	Warszawa		L.Z. 263 - Lia letero 19.9.10 al <i>La Itala Esp.-isto</i> Sept. Okt. 1910
ĉ. 12.7.11 15.7.11	Berlin Bad Kissingen	Bismarckstraße, Villa Franconia	L.Z. 297 L.Z. 294 - L.Z. de Zamenhof al Sebert 15.7.11 (Arkivoj de Warnier nun ĉe Jossinet)
jam antaŭ 7.8.11 18/27.8.11	Warszawa Antwerpen	renkontiĝas kun siaj bofratoj Levite kaj Josef Silbernik	<i>La Familia Rondo</i> No. 42 Somero 1947 L.Z. 297
28.8.11 (nur dum unu tago)	Paris	vizitas la redakcejojn de la ĵurnalo "Le Petit Parisien" 18. rue d'Enghien Paris X - vizitas "Aéro-Club" (Place de la Concorde) lian voĉon registras la firmo Gaumont, rue des Alouettes, Paris XIX (en kvartalo Belleville) - vizitas la redakcejojn de la ĵurnalo "Excelsior" 88, Avenue des Champs-Elysées, Paris.	<i>La Revuo</i> Okt. 11 - <i>Amerika Esperantisto</i> Okt. 11 <i>Franca Esperantisto</i> Nov. 11 - O.V. 561 <i>Paris-Esperanto</i> Nov. 11
9.11 post 7 kaj antaŭ 11.6.12 6.7.12	Warszawa Bad Salzbrunn → Warszawa	Villa Waldfrieden forveturas al	L.Z. 310 - 309 L.Z. 309 - 310 O.V. 576

Deklaracio

Okaze de la 100-jara datreveno de la naskiĝo de D-ro L. L. Zamenhof

La 15-an de decembro 1959 estos la 100-jara datreveno de la naskiĝo de D-ro L. L. Zamenhof.

Inspirita de profunda humanismo kaj konscia, ke la diverseco de lingvoj prezentas la fundamentan obstaklon al ĉiuj aspektoj de internacia komunikado kaj, sekve, ankaŭ al pli bona kompreniĝo inter la popoloj, L. L. Zamenhof dediĉis sian grandan talenton kaj ĉiujn siajn fortojn al la solvo de tiu problemo.

En la jaro 1887 aperis en Varsovio la unua lernolibro de Internacia Lingvo, kiun li publikigis sub la pseŭdonimo "Esperanto", laŭ kiu ankaŭ la lingvo estis poste ofte nomata.

En iom pli ol nuraj sep jardekoj la lingvo disvastiĝis tra la tuta mondo kaj fariĝis en niaj tagoj senduba socia fakto kaj grava kultura faktoro.

Ĉiujare 10.000 ĝis 15.000 personoj, apartenantaj al plej malsamaj lingvaj komunaj, kolektiĝas en diversaj internaciaj kongresoj, konferencoj, seminarioj kaj aliaj aranĝoj utiligante por la raportoj, lekcioj, prelegoj, diskutoj kaj personaj kontaktoj nur la Internacian Lingvon. Ĉi tiuj estas la solaj internaciaj renkontiĝoj de la hodiaŭo, dum kiuj la komunikado okazas ne nur sen interpretistoj, sed ankaŭ sen humiliĝoj, surbaze de plena egaleco, per la uzo de unu nura neŭtrala lingvo.

Nekalkulebla nombro da homoj, el ĉiuj sociaj tavoloj, daŭre efektivas per la Internacia Lingvo skribajn kontaktojn trans ĉiujn lingvajn limojn.

La scienca kaj belarta literaturo en la Internacia Lingvo — kaj traduka kaj originala — estas jam tre multflanka kaj valora. Novaj libroj senĉese aperas. Konsiderinda nombro da gazetoj kaj fakaj revuoj estas regule publikigata en Esperanto. La apliko de la lingvo en la scienco kaj por fakaj celoj konstante vastiĝas.

En radio, turismo, komerco kaj en aliaj sferoj Esperanto akiras novajn poziciojn.

Paralele la lingvo interne evoluis laŭ la sama maniero, laŭ kiu evoluas kiu ajn literatura lingvo, sed samtempe, pro la daŭra intensigado de la internaciaj kontaktoj, ankaŭ plifirmiĝis ĝia unueco kaj kohereco.

Per sia Rezolucio de la 10-a de decembro 1954 la Ĝenerala Konferenco de U.N.E.S.C.O. diskutinte la Raporton de la Ĝenerala Direktoro de tiu organizaĵo, "notis la rezultojn atingitajn per Esperanto sur la kampo de la internaciaj intelektaj interŝanĝoj kaj por la proksimiĝo de la popoloj" kaj rekonis, "ke tiuj rezultoj respondas al la celoj kaj idealoj de U.N.E.S.C.O."

La praktika apliko de Esperanto montris, ke la fundamenta baro al internacia komunikado kaj kunlaborado — la lingva obstaklo — estas venkita por tiuj, kiuj scias la Internacian Lingvon. Tiu obstaklo estas, same tiel, venkebla por ĉiuj aliaj. Necesas nur bona volo kaj iom da fortostreĉo por ellerni la lingvon.

Dum la tuta jaro 1959 okazos ĉie tra la mondo diversaj aranĝoj por memorigi la 100-jaran datrevenon de la naskiĝo de D-ro L. L. Zamenhof. Por kunordigi tiun agadon, kiu atingos sian kulminon la 15-an de decembro 1959, formiĝis speciala Internacia Organiza Komitato, kiu laboras sub la aŭspicioj de Internacia Patrona Komitato, en kiun eniris elstaraj personecoj de la scienco, literaturo kaj ĝenerale kultura kaj publika vivo de diversaj landoj.

La Internacia Organiza Komitato direktas

Alvokon

*al ĉiuj internaciaj ŝtataj kaj privataj organizaĵoj;
al ĉiuj internaciaj kaj naciaj sciencaj, literaturaj,
klerigaj, kulturaj, komercaj kaj aliaj institucioj;
al ĉiuj direktoj de televido kaj radio;
al la redakcioj de gazetoj kaj revuoj;
al profesoroj kaj instruistoj kaj al ĉiuj aliaj kulturaj agantoj*

memorigi en konvena formo la 100-jaran datrevenon de la naskiĝo de D-ro L. L. Zamenhof kaj doni sian helpon kaj apogon por la plua disvastigo de la Internacia Lingvo Esperanto.

La Internacia Organiza Komitato turnas sin rekte al ĉiu persono, kiu mem spertis la malfacilaĵojn de la lingva obstaklo en la internaciaj rilatoj, ellerni senprokraste Esperanton kaj tiamaniere ne nur mem utiligi la multnombrajn avantaĝojn, kiujn donas la scio de tiu lingvo, sed ankaŭ kontribui al ĝia disvastigo. Ju pli granda estas la nombro de personoj, kiuj scias kaj uzas la Internacian Lingvon, des pli granda estas ĝia valoro kaj des pli utila fariĝas la scio de la lingvo por ĉiu unuopa individuo.

Esperanto ne celas anstataŭigi la ekzistantajn naciajn lingvojn, sed forigi la lingvan haŭson en la internaciaj rilatoj servante al ĉiuj kiel neŭtrala instrumento de internacia komunikado.

En Mainz, la 5-an de aŭgusto 1958.

Plock
sur riverego Wisła (Vistulo), 100 km for de Warszawa, mar-direkte.

Saßnitz
haveno en Insulo Rügen (Germanujo), ĉe okcidenta Balta Maro.

Vailly-sur-Aisne
urbeto 15 km. or. de Soissons.

Vevey
ĉe Lago Léman (norda bordo, oriente).

Wehlen
20 km. sud-or. de Dresden, sur riverego Elbe, font-direkte.

Wejseje
vilaĝo, nun en Sovet-Unio, 50 km. oriente de Suwalki; 50 km. norde de Grodno.

Wimereux
7 km. norde de Boulogne-sur-Mer.

Zakopane
80 km. sude de (la tiama) Krakau, ĉe Montoj Tatra (Tatry).

Teksto de la naskiĝdokumento de D-ro Zamenhof

(Vidu bildon sur la unua fotopaĝo de ĉi tiu libro)

КНИГА ДЛЯ ЗАПИСКИ РОДИВШИХСЯ ЕВРЕЕВЪ НА 188... ГОДЪ ЧАСТЬ 1. О РОДИВШИХСЯ						
Номера	Кто совершил обрядъ обрѣзанія	Число и мѣсяцъ рожденія и обрѣзанія		Где родился	Состояніе отца, имена отца и матери	Кто родился; какое ему или ей дано имя
		Христианский	Еврейский			
47	Лейнъ Хонъ Вольфъ Суроский	Декабря 3—10 26—19		В Бѣлостокѣ	Мардка Фей- вановичъ Замен- гофъ, Либа Шо- лановна Соферъ	сынъ Лейзеръ

TRADUKO

REGISTROLIBRO PRI NASKIĜINTAJ HEBREOJ EN LA JARO 188... PARTO 1. PRI NASKIĜINTOJ						
Numeroj	Kiu faris la riton de cirkumcido	Tago kaj monato de naskiĝo kaj de cirkumcido		Kie naskiĝis	Stato de patro, nomoj de patro kaj de patrino	Kiu naskiĝis; kiu nomo estas al li aŭ ŝi donita
		Kristana *	Hebrea			
47	Lejn Hon Volf Suroskej	De decembro 3—10 26—19		En Bjalostok	Mardka, filo de Fej- van, Zamenhof, Liba, filino de Solan, Sofer	Filo Lejzer

* Malnova kalendaro

El la rusa lingvo tradukis A. Holzhaus

Zamenhof Lazaro Ludoviko

de

Prof. G. Waringhien (Francujo)

Lia familio

Li devenis de juda familio, laŭdire elpelita el Hispanujo en 1492, kiu elmigris, en la komenco de la 19a jarcento, el Bavarujo (eble el la vilaĝo Samhof) al Tykocin (rusa Polujo), kie naskiĝis, la 27.I. 1837, Samenhof Mordeĥaj Markus. Tiu ĉi, same kiel lia patro, fariĝis privata instruisto pri germana kaj franca lingvoj. Sed liaj ambicioj estis pli grandaj: en la industria urbo Białystok (Bjalistoko), kien li migris, li fariĝis pioniro de la klerisma movado, kiu celis ĉesigi la ritan apartismon kaj partoprenigi la judojn al la moderna kulturo; krome li difinis al si ŝtatan karieron, kiun li atingis, malgraŭ sia judeco, dank' al sia fera volo kaj al sia rusisma lojaleco. Tial li transloĝiĝis en decembro 1873 en la ĉefurbon Varsovio, kie li estis baldaŭ nomita instruisto pri germana lingvo en la „reala gimnazio”. Li kronis tiun promocion elektiĝinte en 1878 regna cenzuristo super la hebrea kaj jidaj eldonaĵoj en Varsovio. Li estis pedanta homo, skrupulema, severmora kaj ŝparema; krom siaj oficialaj okupoj, li ankoraŭ trovis la tempon gvidi la studojn de kelkaj lernantoj, kiujn li pensionis. Li havis ok infanojn, kiujn li edukis etburĝe: el la kvar filoj, tri fariĝis medicinaj doktoroj kaj unu farmacia — preskaŭ la solaj intelektaj karieroj malfermataj al la ruslandaj judoj.

Lia kariero

La plej aĝa filo estis naskita jam en Bjalistoko, la 15.XII.1859, kaj ricevis la hebrea nomon El'azar, transskribitan en la rusaj dokumentoj Lazar; laŭ la kutimo, oni aldonis duan kristanan antaŭnomon, kun la sama komenclitero, Ludovik. La knabo vizitadis inter 1869 kaj 1873 la „realan lernejon” de Bjalistoko, kaj de decembro 1873 ĝis julio 1879 la „Filologian Gimnazon” de Varsovio. Post du jaroj de studenteco ĉe la Medicina Fakultato en Moskvo kaj kvar jaroj ĉe tiu de Varsovio, li ricevis sian kuracistan diplomon; sed, tro impresigema antaŭ la suferoj de la malsanuloj kaj de la mortantoj, li, post mallonga praktikado, elektis la specialaĵon oftalmologio, kaj iris ĝin elstudi en Vieno (1886). Li edziĝis en 1887 — kaj ĝis 1897 serĉis, unue en Varsovio, poste en Ĥerson, en Grodno ktp. krei al si klientaron sufiĉan por vivteno. En la komenco de 1898 li definitive hejmiĝis en la juda kvartalo de Varsovio, kie li praktikados ĝis sia morto, la 14.IV. 1917. Tiu medicina kariero, kvankam konsciencie kaj ame plenumata, alportis al li multe pli da zorgoj ol da profito; pro la malriĉeco de siaj klientoj, li devis akcepti ĉiutage 30 ĝis 40 el ili, kaj ricevis nur sufiĉe por certigi modestan vivon al sia familio (tri infanojn li havis). Cetere, tio estis nur malĉefa parto de lia aktiveco.

Lia karaktero

La juna Zamenhof estis tre inteligenta kaj tre laborema, ĉiam la unua en siaj klasoj kaj ĉiuj liaj kamaradoj profetis al li brilajn sukcesojn. Li havis apartan dispozicion por la lingvoj; tri li parolis libere, la rusan, polan kaj germanan, tri li legis flue, la latinan, la hebrea kaj la francan — se ne paroli pri la jida, nur parolata ĵargono, kiun li esploris dum du jaroj, kaj pri kiu li ellaboris tutan gramatikon; pri la greka, la angla, la itala kaj kelkaj aliaj, li havis okazan kaj pli teorian konon. Sed li ĉiam rigardis la rusan kiel sian hejman lingvon (nur en ĝi kaj en Esperanto li skribis iam versojn), kaj Litovujon li sentis kiel sian patrujon (probable ĉar li pasigis siajn plej feliĉajn feriojn en Vejseje).

Tiu poligloto estis nur la respegulo de la kondiĉaro, en kiu li vivis, kaj kiu ne povis ne influi sur la penson de tiel sentema knabo, kune kun la neforviŝebla spuro de la hebrea mistikismo kaj la hereda kredo al misia tasko de lia gento. Vivante, ekde la infaneco, en mezo de popolmiksaĵo (en Bjalistoko loĝis en 1897 66% da judoj, 18% da poloj, 8% da rusoj, 6% da germanoj kaj 2% da bjelorusoj); apartenante al raso, kiu povis esprimi sin nur per malviva aŭ per malpropra lingvo, kaj, disigita inter la nacioj, ne povis ĝui la rajtojn de la ceteraj nacioj; edukite laŭ la klerisma principo, ke ĉiuj homoj estas egalrajtaj fratoj, lia denaska idealismo inspiris al li obsedan revadon pri unuiĝo de la homaro en harmonia egaleco. Kaj pro lia aparta naturdoto, tia revo rapide identiĝis kun la revo de universala lingvo, kiu, sennacia kaj neŭtrala, redonus al la judoj la sendependecon kaj ebligus al la homaj grupoj pli bone interkompreniĝi.

La unuaj provoj

Tiun revon Zamenhof serioze konsideris jam en siaj gimnaziaj jaroj. Laŭ la natura malvolviĝo de la ideoj, la knabo, sence repaŝante la spurojn de multaj antaŭirintaj utopiistoj, ekpensis unue pri reviviĝo de la mortinta latina lingvo; poste pri tute apriora lingvo, kies vortoj konsistis el la matematika serio de ĉiuj elparoleblaj kuniĝoj de literoj (a, aa, ab, ac... ba, ca, da ktp...). Sed, kaj en tio montriĝis lia propra genio, ĉiun novan sistemon li elmetis al praktikado, kaj spertinte ties difektojn, anstataŭ blinde obstini en senelirejo kiel faris la tiamaj interlingvistoj, li kuraĝe antaŭenserĉadis. Lia studo de la angla lingvo instruis al li, ke la riĉaj deklinacioj kaj konjugacioj de la antikvaj kaj slavaj lingvoj estas tute ne necesaj; la funda esploro de la rusa kaj de la germana montris al li, kiom bona elekto de taŭgaj afiksoj povas maldikigi la vortaron; la pola kaj la germana malkovris al li

la ekziston de jam preta trezoro da internaciaj vortoj; la germana kaj la franca pruvis la utilecon de la difina artikolo, nekonata al la slavaj; ktp. ktp. De ĉiu lernitaĵo li tiris frukton por sia kara projekto, kaj, dum la ferioj de 1878, li finpretigis sian lingvon sub la nomo „Lingwe Uniwersala”: unu gramatiko, unu vortaro, kelkaj tradukaĵoj kaj eĉ originalaj versoj. Sed tio, kion la okaklasa gimnazio kredis definitiva, prezentis nur la unuan el la ŝtupoj, kiuj devis konduki lin al Esperanto.

El tiuj „pra-Esperantoj” konserviĝis malmulto: nur du stadioj estas iom konataj al ni, tiu de la gimnazia projekto en 1878, kaj tiu de la nova projekto, ellaborita dum la ferioj de 1881—1882 far’ de la varsovia studento. La unua montras la junan lingviston precipe atenta al la internacieco de la radikoj kaj de la finaĵoj (pluralo per -s, infinitivo per -are ktp.), kaj al la simpleco de la gramatiko (nenia kazo). En la dua, ni konstatas, ke, elprovante plu sian lingvon, kaj elparolante ĝin, li ekkonsciis pri aliaj bezonoj, notinde la belsoneco (kaj li de tiam rezignas pri la internacia s-pluralo) kaj la klareco (kaj li de tiam alprenas akuzativon); sed, kiel ofte okazas, li puŝas tro malproksimen tiun serĉon de la oportuneco en la parola uzado, decidante, ekzemple, unusilabigi ĉiujn ofte uzatajn radikojn, de tio, multaj neakcepteblaj kripligoj, kiuj igas tiun formon de lia lingvo preskaŭ nekomprenebla je la unua vido. Inter la jaroj 1882 kaj 1885, li evidente sentis tiun eksceson, kaj provis trovi kompromisan solvon, kiu kontentigos, almenaŭ parte, ĉiujn postulojn de lingvo destinita al ĉiuj homoj kaj ĉiaj uzoj. En la jaro 1885, en kiu li ankaŭ doktoriĝis, li jam fiksas Esperanton tia, kia ni ĝin konas en ĝia vortaro kaj gramatiko. La du jaroj, kiuj pasis en la vana serĉado de eldonisto, ĝis li decidis eldoni mem sian verkon, la 26. VII. 1887, montris al li la malfacilojn, kiuj atendis lin ĉe la propagando: tial li rezignis pri la imperfekto (finiĝanta per -es) kaj pri pluraj sufiksoj, kiuj ŝajnis ne absolute necesaj. Li konsciis pri la nepra postulo, ke la lingvo aperu kiel eble plej simpla.

Naskiĝo de Esperanto

Per la kvar broŝuroj, respektive en la rusa, pola, franca kaj germana lingvoj kaj subskribitaj de la pseŭdonimo „D-ro Esperanto” (kiu nomo poste forglitis al la lingvo mem), li elmetis sian projekton de „lingvo internacia” al la kritiko de la spertuloj, kun la promeso, ke, post unu jaro, li perfektigos ĝin laŭ la proponotaj plibonigoj. Tiujn broŝurojn li dissendis al multaj eŭropaj gazetoj, revuoj, societoj ktp. Li reklamis per anoncoj en rusaj kaj polaj gazetoj. Uzante, kun ŝia konsento, la doton de sia edzino, li, en la jaroj 1888—1889, lanĉis tutan serion da libroj, la „Duan Libron”, la „Aldonon al la Dua Libro”, la „Neĝan Blovadon” kaj „Gefratojn” (tradukitajn de A. Grabowski), la tradukojn de la „Dua Libro” kaj de la „Aldono”, „Mezan Vort-

aron Germanan”, „Plenan Vortaron Rusan”, anglan kaj svedan lernolibrojn, „Princinon Mary” (tradukitan de E. von Wahl), „Adresaron”, kaj li ankaŭ donis la monon necesan por la eldono de la propagandaj verkoj de L. Einstein kaj H. Phillips. En la fino de 1889, pro tia granda pres-aktiveco kaj ankaŭ pro ofero de granda sumo, kiun li faris por ŝirmi sian patron kontraŭ la rankoro de moskva cenzuristo, li estis plene ruinigita. De tiu tempo, kvankam li restis ĝis 1905 la ĉefa motoro de la movado, la propagando materiale dependis de la unuaj varbitoj kaj de iliaj monrimedoj.

Kia do prezentiĝis la nova lingvo? Tri karakteroj unuavide frapis la observanton: 1-e ĝi estis, per la elekto de la radikoj kaj de la afiksoj, tiritita ĉefe el la romanaj kaj germana lingvoj, vere internacia kaj facile komprenebla por la kleruloj; 2-e ĉiuj ĝiaj radikoj estis senŝanĝaj, ĉiuj ĝiaj gramatikaj distingoj estis esprimitaj per apartigeblaj fonetikaj elementoj, kaj la vortoj konsistis nur el kunmeto de tiuj radikoj kaj de tiuj elementoj — tiel ke la plena lingvo, gramatika same kiel leksikona, troviĝis en la vortaro kaj povis esti komprenata eĉ de homo, kiu neniam ĝin lernis; 3-e tiu lingvo, kvankam konsistanta el nacilingvaj eroj, estis plene aŭtonoma kaj havis propran individuecon.

Zamenhof kiel lingvisto

La dua parto de la aktiveco de Zamenhof sur la kampo de la lingvo internacia daŭris inter 1905 kaj lia morto en 1917. Ĝin ebligis la liberaj tempoj, kiujn havigis al li la jam kreskintaj profitoj de liaj eldonaĵoj kaj precipe la enspezoj de liaj kontribuajoj al „*La Revuo*”, kreita de la firmo Hachette dank’ al la interveno de Carlo Bourlet. Ĝi alprenis precipe tri formojn: prilingvaj verkoj, tradukoj kaj ideologiaj eseoj.

En la prilingvaj verkoj estas aparte rimarkinda la singardemo kaj toleremo de la aŭtoro. Zamenhof liveris komence nur la minimumon, 16-regulan gramatikon kaj 917-radikan vortareton, „lasante ĉion alian al libera iom-post-ioma ellaboriĝado”. Ĉiam li evitis aldoni al tiu primitiva fundamento novajn devigojn, li timis ĉiujn precizigojn, kiuj fariĝus katenoj. Preskaŭ sur ĉiu paĝo de liaj „Lingvaj Respondoj” (kolektitaj libroforme en 1912), oni trovas la saman sintenon: „Nur la uzo iom post iom ellaboros definitivajn regulojn... Ne venis ankorau la tempo, ke ni estu tro pedantaj... Ni ne devas peni, ke nia lingvo estu tro preciza, ĉar tiam ni nin mem nur katenus... En tiaj okazoj, kie kelka libereco alportas al ni nenian malutilon, kial ni devus senbezone nin malliberigi?...” ktp. ktp.

Sed tiu toleremo, kiu celis fari la evoluon de Esperanto vere kolektiva laboro, estis ebla nur, ĉar la bazoj de la lingvo estis firmigitaj kontraŭ ĉia ŝancelo. Tion li atingis, havigante karakteron de netuŝebleco al la tri verkoj „Plena Gramatiko”,

„Ekzercaro” kaj „Universala Vortaro”, kiujn li kolektis en 1905 sub la titolo „Fundamento de Esperanto”. Por ke iu ajn lingvo povu regule kreski kaj disvolviĝadi, estas necese, ke enestu en ĝi ia potenca incerciforto, kiu konservas al la ĉefaj elementoj de tiu lingvo oportunan sensanĝon kaj stabilecon, neprajn kondiĉojn por interkompreniĝado. En la naciaj lingvoj, tiun incerciforton prezentas la jarcenta tradicio; en Esperanto, kie tia tradicio ne ekzistis, Zamenhof anstataŭigis ĝin per la Fundamento, kun sia karaktero de „netuŝebleco”. Tiu lingva tabuo estas, post la kreado mem de Esperanto, la plej genia elpenso de ĝia aŭtoro. Ĝi certigis al ĝi senriskan evoluipovon, tiel ke, en la ĵus eldonita „Antologio (de la originalaj esperantaj poemoj) 1887—1957” la leganto spertas nenian malfacilon pro la verkadato de iu ajn peco.

Zamenhof kiel tradukisto

La tradukoj prezentas en la verkaro de Zamenhof la plej ampleksan parton, kaj la plej gravan. Lia unua traduko (*La Batalo de l'Vivo*, de Dickens), ĉar ĝi aperis libroforme nur en 1911, kvankam felietone publikigita en 1891, ne havis grandan influon. Sed jam la dua (*Hamleto*, de Shakespeare), kiun li publikigis en 1894, kaj republikigis en 1902 en Parizo, ĝuis senkomparan influon kaj pli efikis por la disvastigo de la lingvo, ol ĉiuj plej lertaj teoriaj admonoj. Responde al la kritikoj de reformistoj, li brile pruvis la taŭgecon de Esperanto por eĉ literaturaj taskoj. Tiun fekundan laboron li rekomencis nur post la fondo de „*La Revuo*”, por kiu li entreprenis sisteman tradukadon de gravaj literaturaj verkoj. Tiel sinsekve aperis: *La Revizoro* de Gogol (1907), *La Predikanto*, el la Biblio (1907), *Georgo Dandin* de Molière (1908), *Ifigenio en Taŭrido* de Goethe (1908), *La Rabistoj* de Schiller (1908), *La Psalmaro*, el la Biblio (1908), *La Rabeno de Baĥaraĥ*, de H. Heine (1909), *La Gimnazio*, de Alejhem (1909), *Marta* de E. Orzesko (1910), *La Proverbaro* (1910), *Genezo* (1911), *Eliro*, *Levidoj* (1912), *Nombroj Readmono* (1914), ĉiuj kvin el la Biblio.

Je sia morto, Zamenhof lasis, manuskripte, la kompletan tradukon de la *Fabeloj* de Andersen (tri volumoj aperintaj inter 1923 kaj 1932), kaj la tuton de la *Malnova Testamento* (eldonita en Londono, 1926, de la Brita Biblia Societo).

Oni povas miri antaŭ la nombro kaj amplekso de tiuj tradukoj, precipe en la jaroj 1907—1909; verŝajne kelkaj el ili estis jam pretaj; sed lia rapideco en la laboro restas eksterordinara: se oni memoras, ke li povis labori nur en la vespero, post longa laciga tago, oni demandas sin, kiel li povis efektiviĝi ekzemple la *versan* tradukon de *Ifigenio* en la daŭro de kvar monatoj (marto-junio 1908). Evidente, tia rapideco ne malhavis kelkajn difektojn; sed ĝi

havas ankaŭ siajn avantaĝojn: ĝi konservis al la tradukoj viglan, fluan stilon, sen ia ajn kabineta pedanteco. Kaj precipe grandega estas ilia valoro por la lingva evoluado. Ili pruvis efektive al ĉiuj kontraŭdirantoj, ke „Esperanto povas servi kiel lingvo por libera esprimado de ĉiuj geniaj verkoj de la homa literaturo”; ili kontribuis al la riĉiĝado de la vortaro pro la neceso redoni kelkfoje subtilajn idenuancojn de la beletraj ĉefverkoj; ili helpis al la ellaboriĝado de la stilo, devigante al penado por „en tiu aŭ alia maniero nepre traduki tiajn esprimojn, kiujn ĉiu lingvo nepre devas posedi”; ili progresigis Esperanton al „kreskanta elasteco” kaj fleksebleco, ĉiam memorigante al la verkistoj, ke „nia lingvo devas servi ne sole por dokumentoj kaj kontraktoj, sed ankaŭ por la *vivo*”; fine ili stabiligis kaj fiksas la idiomajn, prezentante kvantegon da kunmetaĵoj, vortkonstruoj, metaforoj kaj proverboj, komunan trezoron da pretigitaj difinitaj parolturnoj, kiujn la leksikologoj kolektis en siaj vortaroj kaj verkistoj uzadas por la pli granda unueciĝo kaj kohereco de la lingvo. Oni ne troigus la rolon de la Zamenhofaj tradukoj dirante, ke sen ili, Esperanto ne vere ekzistis: ĝi estus pala teoria fantomo, kiel estis aliaj projektoj. Per siaj gramatikaj kaj leksikonaj verkoj, Zamenhof estis konstruinta la skeleton de la lingvo; per sia persista tradukado, li vestis tiun ostaron per sukplena, sangriĉa karno. La animon oni serĉu cetere en liaj originalaĵoj.

Zamenhof kiel pensulo

Dank' al la kreskado de la afero kaj al la entreprenemo de kelkaj francoj, inter ili Michaux kaj Bourlet, oni povis la unuan fojon en la historio de la homaro, kunvenigi en Bulonjo-ĉe-Mar, en 1905, kongreson de homoj diversnaciaj, kiuj parolis ĉiuj la saman lingvon kaj sentis ĝin sia egalrajta posedaĵo. Estis por Zamenhof la okazo insisti pri la morala kaj socia valoro de tiu homara akiraĵo. La sekvantan jaron, en Genevo, li esprimis antaŭ la kongreso siajn profundajn konvinkojn, ke la Lingvo Internacia estas antaŭ ĉio rimedo alproksimigi la homojn unuj al la aliaj, kaj ekzalti tiun humanecon, tiun universalan fratecon, kiu ŝajnas al li la sola formo de kulto akceptebla por ĉiuj gentoj kaj ĉiuj eklezioj. Tiele li provizis la lingvon per unuiga kaj fortikiga ideologio. Se ankoraŭ hodiaŭ, pli ol 40 jarojn post la morto de Zamenhof, la Esperanta afero vekas tiom da admirindaj sindediĉoj, da fidelecoj kaj eĉ da sinoferoj, tion oni ŝuldas al la genio de ĝia iniciatoro, kiu sciis, ke ne estas granda kaj fruktodona hom-aktiveco sen ia interna sentoardo, sen ia korveka idealo. Tiel, jaron post jaro, de 1905 ĝis 1912, li elvokis antaŭ la kongresanoj ĉiujn grandajn demandojn, ĉiujn grandajn problemojn, kiujn la vivo metis al tiu senprecedenca socia-lingva movado, kaj la altajn celojn, kiujn ĝi devas aspiri. La kolekto de tiuj kongresaj „Paroladoj” (kompilitaj en Japanujo, de Tasku Sasaki kaj Ĵuntaro Iŭŝita,

1932), estas emocia kaj animaltiga legaĵo, unu el tiuj ne multaj verkoj, kiuj honorigas la homaron.

Sed kun la tempo, tiu rolo de gvidanto de la konsciencoj ŝajnis al li tiel grava, ke li decidis, en 1912, lasi la destinon de Esperanto al la jam elprovita „Lingva Komitato”, kaj dediĉi sin al pure ideologia agado. Li provis, per diversaj plibonigitaj projektoj („Hilelismo”, „Homaranismo”), trovi tere-non de interkonsento por ĉiuj sinceraj kredantoj, ĉu ili apartenas al iu eklezio, ĉu ili estas liberpensantoj. La teruran problemon de la rasismo li pristudis en rimarkinda „Memuaro por la Kongreso de Rasoj” (1911), en kiu li demonstris, ke la kaŭzo de la intergenta malamo estas la reciproka malfido naskita de la alieco de lingvo kaj de religio. En 1914, li volis uzi la okazon de la Universala Esperantista Kongreso en Parizo, por tie kunvoki ankaŭ unu „Kongreson de Neŭtrala Religio”, kiu difinus la principojn de tia pure spirita religio — laŭ la instruo de la lasta profeto el lia raso: „*Nek sur tiu ĉi monto, nek en Jerusalemo.... sed en spirito kaj en vero*”. En 1915, meze de la ŝtormoj de la unua mondmilito, li verkis gravan „Alvokon al la Diplomatoj”, avertante ilin, ke la ĉefa kaŭzo de ĉiu milito ĉiam estis „la regado de unuj gentoj super aliaj gentoj”, kaj ke ilia ĉefa devo, ĉe la estonta packontrakto, estos certigi al ĉiuj gentoj, interne de la regnoj, la egalecon kaj la liberecon, ĉar nur tiuj ebligas la fratecon.

Tiaj estis la lastaj penoj de tiu granda koro, kiu, tutlonge de sia vivo, efektive batis nur por la bono de la homaro kaj la ekrego de la paco.

Zamenhof kiel homo

Zamenhof estis malaltstatura, kun barbeta brune-griza kaj frutempe kalva kapo. Li portis pormiopajn okulvitrojn. Li ne estis oratoro, kaj misprononcis la siblantajn konsonantojn. Li multe fumis, precipe cigaredojn. Jam de ĉirkaŭ la jaro 1900 li suferis je malforteco de la koro kaj manko de pulso en la piedoj. Tial, kiam liaj enspezoj tion ebligis, li vizitis germanajn ban-urbojn: Bad-Reinerz (1906, 1909), Bad Nauheim (1907), Bad Kissingen (1911), Bad Salzbrunn (1912), Bad Neuenahr (1913).

Li estis, kiel lia patro, pedante ordama en la ordinara vivo, naiva en komercaj aferoj, timema antaŭ publiko, malinklina al ĉiuj oficialaj ceremonioj. Nature modesta kaj pacama, li penis mildigi ĉiujn konfliktojn ĉirkaŭ si, kaj neniam montris ian resenton kontraŭ siaj ofendintoj. Li estis unu el tiuj maloftaj homoj, kiuj ludis gravan internacian rolon, kaj tamen havas nenion por timi el la publikigo de lia tuta korespondado: ĝi rivelas nur lian denaskan ĝentilecon kaj lian altan senton pri justeco.

Sed plej gravaj trajtoj de lia karaktero estis la volo, per kiu li ĉion oferis por siaj idealoj, kaj la pacienca obstino, per kiu li forpuŝis ĉiujn obstaklojn al ilia efektivigado. Kaj tiun volon kaj tiun paciencon li ĉerpis el la vere senmezura amo, kiu instigis lin alporti, per ĉiuj fortoj de sia korpo kaj spirito, iom da helpo al tiu fizike kaj morale blindiĝinta homaro.

Pensoj de Zamenhof:

Pri la vorto „Majstro”

”La aŭtoro de Esperanto en la kongreso devas esti rigardata kiel mortinto kaj neekzistanta; por la kongreso devas ekzisti nur la afero. Neniam kaj nenie devas esti elparolata la vorto ”majstro” k.t. p. . . . Ĉio tio ĉi ne estas ”modesteco” de mia flanko — ĝi estas ”neceso”. Nia afero prosperados nur en tia okazo, se ĝi estos ĉiam *absolute senpersona*” . . . ”Uzante la okazon, mi nun ripetas publike

tion, kion mi jam ofte diris kaj skribis private : mi kore petas ĉiujn esperantistojn, ke en siaj leteroj al mi aŭ en sia buŝa parolado kun mi ili neniam uzu la vorton ”majstro”, *kiu estas al mi tre malagrabla*, sed ili ĉiam uzu simple la vorton ”sinjoro”. (*Leteroj de L. L. Zamenhof, I, pp. 120 kaj 126.*)

D-ro L. L. Zamenhof

de

Profesoro D-ro Edmond Privat (Svislando)

Cento da urboj en Eŭropo kaj Sudameriko jam donis al unu el siaj stratoj la nomon de D-ro Zamenhof, kiu publikigis en 1887 en Varsovio sian unuan lernolibron de Internacia Lingvo sub la pseŭdonimo "D-ro Esperanto" — la homo, kiu esperas. Fakte li esperis ke tiu vortareto de la vortradikoj komunaj al la ĉefaj hido-eŭropaj lingvoj servos kiel bazo de neŭtrala komunikilo inter la diversaj popoloj kaj ke la uzado donos al ĝi la kreskon, la riĉigon kaj la fluecon de vivanta lingvo.

Por tion ebligi li fiksas kelkajn simplajn regulojn de gramatiko kaj liston de prefiksoj kaj sufiksoj por derivado normala. Li fidis al la vivo kaj naturo por la resto anstataŭ proponi artefaritan fabrikan tute pretan. Ĉefe en tiu saĝo kuŝis lia scienca klarvido. Efektive la lingvo vokalsona, kiun oni aŭdas nun el diverslandaj radio-stacioj kaj en ĉiam pli multaj internaciaj kongresoj sub la nomo Esperanto konstruis sin mem per la uzado sur la fundamento donita de Zamenhof, kiu volis esti iniciatoro, ne kreinto, kiel li mem diris.

Profeta motivo

La kresko de la lingvo kaj de la literaturo en Esperanto estis forte helpata de la idealista motivo, kiu inspiris Zamenhof kaj liajn amikojn. Li naskiĝis en 1859 en Bjalistok en Litovio, tiu orienta regiono de la malnova pola respubliko, kiu aneksis la rusa imperio kaj kien la caroj forpuŝis centmilojn da Hebreoj. La patro de Zamenhof estis mem Hebreo kaj instruisto de fremdaj lingvoj.

La filo Ludoviko suferis, kiel infano, pro la malamikaj rilatoj inter la diverslingvaj partoj de la loĝantaro de Bjalistoko. Tiel la oficialuloj estis grek-ortodoksaj kaj parolis ruse, la riĉuloj plej parte katolikoj parolantaj pole, la malriĉuloj parte Litovoj aŭ Blankkrutenoj, la komercistoj plej ofte Hebreoj parolantaj *jiddisch* kaj vivantaj en aparta kvartalo. Lingvoj, kutimoj, religioj malsamis kaj antaŭjuĝoj dividis la homojn. La knabo havis la impreson ke la nescio kaj nekompreneo kaŭzis multajn el la plej krudaj interbataloj. Li opiniis ke komuna lingvo jam forigus parton de la baroj kaj ebligus almenaŭ interkompreniĝon inter malsamaj popoloj.

Tiu ideo lin sekvis al Varsovio, kien migris la familio kaj kie li eniris la gimnazion. Ĝi sekvis lin dum lia tuta kariero kun la volo dediĉi sian vivon al la repaciĝo inter la nacioj. Li profunde sentis la fundamentan unuecon de la homaro sub la diversaj apartiĝoj kaj akcentis tiun senton en siaj postaj poeziaj verkoj, ĉar li havis poetan kaj profetan spiriton.

Zamenhof antaŭvidis ke venos tempo kiam la homaro serĉos sian animon kaj bezonas organon por ĝin esprimi. Tiu konvinko instigis lin ne nur al lingva, sed al literatura iniciato kaj ĝi certe donis flugilojn al la Esperanto-movado kun ĝiaj kongresoj, ĝia gazetaro kaj ĝia libraro.

Tion konstatis la Ligo de Nacioj en la raporto voĉdonita de sia ĝenerala kunveno en 1922 kaj U.N.E.S.C.O. en sia rezolucio de 1954, deklaranta ke la rezultatoj atingitaj per Esperanto korespondas al la celoj de U.N.E.S.C.O. mem por akceli tuthomaran konscion. Ĝuste tion deziris Zamenhof.

La kariero

Neniu lingvo vivas sen animo. Ĉiu nacia idiomo esprimas la animon de unu popolo aŭ civilizo. Esperanto esprimas sopiron de la homaro al unueco kaj tiu inspiro klarigas la sekreton de ĝia viviĝo. Eĉ laŭ pure lingva vidpunkto la fenomeno vekas intereson. Zamenhof mem rakontas ke li kaj liaj gimnazianaj amikoj kantis en la nova lingvo pri la falo de la malamikaj baroj inter la nacioj en 1878, kiam ili lernis la internacian vortaron, kiun li kunmetis jam kiel knabo. Sed lia realista patro konfiskis la kajerojn, sur kiuj la junulo skribis vortaron, gramatikon aŭ poemojn kaj ordonis al sia filo forlasi la revojn por prepari karieron. Li do finis la gimnazion, studis medicinon en Moskvo kaj fariĝis kuracisto. Poste li ankoraŭ studis en Vieno kaj specialiĝis en Varsovio kiel okulisto.

Tamen lia revo neniam forlasis lin kaj al sia vivcelo li restis obstine fidela.

En 1887 li edziĝis kaj lia bopatro Silbernik helpis finance la eldonon de la Unua Lernolibro kaj internacia vortaro de D-ro Esperanto. Tre malrapide alvenis aliĝoj, ĝis kiam Leo Tolstoj, la granda rusa verkisto, legis la libreton kaj en la revuo de la eldonejo *Posrednik* en 1894 publike rekomendis al ĉiuj kristanoj lerni la lingvon ĉar

"la ofero estas tiel malgranda kaj la eblaj rezultoj tiel egaj por la homaro ke neniu devus rifuzi la provon".

En la lastaj jaroj de la centjaro famaj francaj scienculoj interesiĝis kaj en la Akademio de Moralaj kaj Politikaj Sciencoj George Picot prezentis raporton de la ĝeneva filozofo Ernest Naville, kiu rekomendis la enkondukon de Esperanto en la lernejojn de la tuta mondo.

Gazetoj en la lingvo ekaperis en diversaj landoj, kursoj okazis, societoj fondiĝis kaj en 1905 okazis en Boulogne-sur-Mer la unua universala kongreso en Esperanto, kie partoprenis D-ro Zamenhof mem kun generalo Sébert de la Franca Akademio de Sciencoj, la psikologo Boirac, Rektoro de la Universitato en Dijon kaj 800 pioniroj de 30 landoj.

Estis la unua vasta internacia renkontiĝo en kiu nur Esperanto estis uzata. Estis ankaŭ la unua okazo por multaj kongresanoj aŭdi kaj paroli la lingvon. Oni demandis sin ĉu la eksperimento sukcesos kaj la ĵurnalistoj miris pri la plena interkompreno kaj facileco en la diskutoj. Se oni komparas la nunajn kongresojn kun la unua, oni rimarkas kompreneble pli grandan unuecon en elparolado, pli rapidan fluecon kaj pli oftan elokventecon, sed tiam la lingvo sonis jam viva, speciale sur la lipoj de la Slavoj.

La plej mirigita estis D-ro Zamenhof mem, kiun la franca registaro faris tiam kavaliro de la honora legio. El la buŝo de la kongresanoj sonis la nova lingvo, kiu kreskis el la bazo, kiun li provis kun siaj kungimnazianoj dum sia juneco. Sed lin eĉ pli impresis la ĝenerala frateco inter la diversnaciaj delegitoj kaj ilia liberiĝo el ĉiuj kompleksoj de malsupereco aŭ supereco de la gepatra lingvo. Tion li esprimis en memorinda parolado, en kiu li ĝojis pri tiu egaleco. Siaflanke la kongresanoj estis impresitaj de lia videbla modesteco, eĉ ioma timemo antaŭ la publiko. Li tenis sin ĉiam tre humile kaj lasis la ĉefan lokon al aliaj personoj.

Ideoj pri etiko

La dua universala kongreso de Esperanto okazis en 1906 en Genevo kaj tie D-ro Zamenhof esprimis sian doloron pri la pogromo, kiu ĵus sangumis la stratojn de lia naskiĝurbo Bjalistoko. La tria okazis en Cambridge en 1907 kaj poste la urbestro de Londono, Sir Vezev Strong, ceremonie akceptis D-ron Zamenhof en la Guildhall ĉe granda publika kunveno, kie li respondis per rimarkinda parolado pri la diferenco inter patrujamo kaj ŝovinismo. Ĉiujare kunvenis tiaj kongresoj kaj Zamenhof ĉiam klarigis per memorinda malferma parolado siajn ideojn pri toleremo kaj homaj rajtoj.

Post 1912 li ĉesigis tiun kutimon kaj decidis

forlasi ĉian honoran lokon en la kongresoj por repreni sian plenan privatan liberecon. Lin priokupis etikaj problemoj de la homaro kaj li deziris lasi la pure lingvan flankon en la manoj de la fonditaj organizaĵoj, interalie de la Akademio de verkistoj kaj lingvistoj, kiu kontrolis la normalan evoluon de la lingvo kaj oficialigis la novajn vortojn enkondukitajn per la internacia vivo kaj uzado.

Al la mondkongreso pri rasoj en Londono en 1911 li prezentis raporton subtenante la scienculojn, kiuj opiniis la tradiciajn kaj morajn diferencojn pli realaj ol la fizikaj. Laŭ li ĉefe apartigas la popolojn iliaj lingvoj kaj religiaj kutimoj. Pro tio li proponis instruadon de neŭtrala lingvo kaj akcepton de neŭtrala tuthomara etiko. Ĉiu homo estu fidela al sia gepatra lingvo kaj propra religio, sed li rilatu kun fremduloj per neŭtrala lingvo kaj komuna etiko laŭ la konsilo: "Ne faru al la ceteraj tion, kion vi ne ŝatus ke oni faru al vi".

La unua mondmilito en 1914 estis kruela bato al tiu granda amiko de la homaro. Rusaj kaj poste germanaj armeoj okupis Varsovion dum li jam suferis je grava kormalsano. En 1916 li verkis "Leteron al Diplomatoj" por rekomendi ke oni ne nur pripensu la nurajn ŝanĝojn de landlimoj, sed garantiu la lingvaj kaj religiajn rajtojn de la malplimulto. Li ankaŭ konsilis doni nomojn neŭtralajn, prefere geografiajn, al provincoj aŭ regnoj kun diverslingva loĝantaro por eviti ke partoj de ĝi sin sentu fremdaj en propra lando se oni nomas ĝin per la nomo de unu gento reganta. Li laŭdis tiajn nomojn kiel Usonon aŭ Svislandon, kiuj ne entenas nomon de unu gento super ceteraj. Kiel povus ekzisti harmonio se oni nomus Svislandon "Alemanujo" aŭ "Romanujo" aŭ se oni nomus Belgion "Flandrujo" aŭ "Valonujo"?

D-ro Zamenhof mortis en aprilo 1917. Lia Internacia Lingvo perdis dufoje per mondmilitoj grandan parton de siaj adeptoj kaj bibliotekoj, sed dufoje reviviĝis kaj revastiĝis. Nun ĝin uzas ne nur Esperanto-kongresoj sed aliaj mondkonferencoj teknikaj aŭ specialistaj, ekzemple kunvenoj edukistaj, katolikaj, protestantaj, turistaj, laboristaj k.t.p. Ĉie, kien ĝi penetras, ĝi enkondukas ankaŭ iom de la homaro spirito, kiu inspiris ĝian iniciatoron Zamenhof. Laŭ pure lingva vidpunkto ĝi evoluas kaj kreskas laŭ la natura maniero, kiun li antaŭvidis.

La presita verkaro de Zamenhof entenas ne nur liajn poemojn, paroladojn kaj artikolojn, sed ankaŭ tradukojn de Gogol, de Shakespeare, de Dickens, de Goethe, de Molière, de Andersen kaj de la tuta Malnova Testamento, kiun eldonis en Esperanto la angla Biblia Societo kune kun la Nova. Li estis talenta verkisto kun forta sento pri muzika ritmo de la stilo.

La Valoro de Esperanto el Lingvistika Vidpunkto

de

Prof. D-ro W. E. Collinson M.A. (Anglujo)

Bedaŭrinde ĝis nun malmultaj fakaj lingvistikuloj okupiĝis pri la problemoj de internacia lingvo. Kelkaj — tute sen praktikaj spertoj — nepre kondamnis la tutan ideon. Ilia vidpunkto estis ofte neracia. Ekde Brugmann ripetiĝis la juĝo ke — estante "neorganika" — konstruita lingvo ne estas vivkapabla. Se oni komprenas la sencon de „organika" laŭ la aktuala biologia uzo, ĝi indikas, ke ĉe multĉela estaĵo ĉiu korpoparto havas strukturon taŭgan por difinita funkcio kaj estas klare distingebla, kaj ke ĉiuj partoj interrilatiĝas kaj kunlaboras. Laŭ tiu senco Esperanto ja povas pretendi esti „organika"! Kompreneble, se oni uzas la vorton specife por naturdirektata kreskado kaj evoluado, oni per tiu difino laŭcele ekskluzivas konstruitajn lingvojn, sed tiukaze oni ne rajtas aserti, ke Esperanto nepre disfalos en dialektojn. Oni forgesas la alian poluson de naturlingva evoluo, nome la emon unuigi, kaj aliaflanke la malsamajn vivkondiĉojn de konstruita planlingvo kompare kun tiuj de natura lingvo. Ĉiukaze la unueca evoluado de Esperanto dum sepdek du jaroj refutas praktike la argumenton.

La fama dana lingvistikulo Otto Jespersen iam verkis valoran artikolon, en kiu li montris kiom da elementoj en „natura" lingvo estas „artefaritaj" kaj kiom da elementoj de „artefarita" lingvo estas „naturaj". Krome estas atentinda la fakto ke Esperanto estas ellaborita de individuo kaj ne de komitato. Pro tio la elementoj de Esperanto estas glate kaj harmonie kunartikigitaj kaj formas „organikan" tutaĵon.

Ofte tiuj kiuj favoris Esperanton staris ekster la klasika kaj okcidentlingva tradicio, ekz. esplorantoj de ugro-finnaj lingvoj kiel Emil Setälä kaj Björn Collinder, aŭ de mongolaj, altajaj kaj turkaj kiel la finno, G. J. Ramstedt. Ne nur Collinder, sed ankaŭ la itala leksikografo Bruno Migliorini verkis bonegajn ĉapitrojn pri la problemoj de interlingvistiko en siaj respektivaj enkondukoj en la lingvoscienccon. Ankaŭ la slavistoj montras malpli da antaŭjuĝoj.

Pri la valoro de interlingvistiko al la lingvoscienculo, Jespersen havis nenian dubon. Li diris al mi, ke tiu intereso ofte stimulis kaj igis pli klara alian lingvopensadon. Ĉiu kiu analizas lingvajn strukturojn povus konfirmi tion, sed ankaŭ la filo-

logo kiu interesiĝas pri historia evoluado de lingvoj trovos riĉan laborkampon en Esperanto.

La Esperanta literaturo — jam sufiĉe ampleksa kaj diverstema — estas ankoraŭ plene kaj ĝisfunde explorebla. Ekde la komenco Esperantaj revuoj recenzis kaj komentis ĉiun novan verkon, atentigante pri lingvaj kaj stilaj punktoj. Kelkfoje la verkoj mem aldonas vortaretojn kun difinoj aŭ klarigoj de neoficialaj vortoj aŭ esprimoj. Siavice tiuj ĉi estis kolektataj, kaj se ili ricevis oficialan aprobon de la Akademio, kuniĝis en sinsekvaj suplementoj al la oficiala radikaro. Abundaj materialoj troviĝas disponeblaj en la biblioteko de UEA (Palais Wilson, Genève), la kolekto de BEA ĉe S-ro Butler (Kingston, Surrey), la arĥivoj de la Akademio en Hago kaj la dokumentoj ĉe prof-o Lapenna en lia Centro de Esploro kaj Dokumentado ((Wembley, Middlesex). Malofte oni povas en nacia lingvo konstati la unuan aperon kaj fazojn de enmodiĝo de neologismo. La „iron curtain" aŭ „fera kurteno" de Winston Churchill kaj la „brinkmanship" t.e. emo dum politikaj disputadoj iri ĝis la rando de la abismo, inventita de Adlai Stevenson, estas rimarkindaj esceptoj. En Esperanto estas multe pli facile konstati la fonton de novaj vortoj kaj signifoŝanĝoj kaj fiksi la daton kaj lokon de ilia unua apero. Por montri ĝis kia grado Esperanto evoluis laŭ stilo kaj esprimaro la nederlanda revuo La Progresanto reprenis en 1955 en paralelaj kolumnoj du tradukojn de La Neĝa Blovado de A. Puŝkin: tiun de A. Grabowski (1888, 1893) kaj tiun de A. Fiŝer (1923). Same oni povas, traserĉante la protokolojn kaj raportojn de kongresoj kaj konferencoj, taksi la evoluadon de la fakterminoj uzataj en publikaj kunvenoj.

Por la lingvoscienculo kiu precipe interesiĝas pri gramatikaj strukturoj, Esperanto bone servas kiel bazo de komparo inter diversaj lingvaj sistemoj. Praktika interkomunikilo efektive ne povas esti rigide „logika". Esperanto, ekzemple, ebligas esprimi, krom abstraktaj konceptoj, emociojn kaj subjektivajn sintenojn. Ĝi ne nur informas, sed ankaŭ admonas, persvadas kaj flatas. Tial ĝi havas nuanĉigitajn sinonimojn, ekz. trankvila/kvieta, disputi/kvereli. Malofte ĝi eĉ havas homonimojn, ekz. kolego/kol-eg-o, homaro/hom-ar-o. En la sintakso

troviĝas ofte alternativaj konstruoj por formuli identan logikan propozicion, ekz. la muzeo estas jam fermita/ oni jam fermis (estas ferminta) la muzeon/la muzeo jam fermiĝis. Aliflanke Esperanto certe estas multe pli konsekvenca kaj sistemigita ol naciaj lingvoj. En kelkaj rilatoj ĝi estas unika: (1) ĉiu gramatika finaĵo havas unu, ja nur unu klare difinitan funkcion, ekz. -j kiu indikas ĉiam kaj senescepte la pluralon, kontraste kun la angla kie -s indikas aŭ la pluralon (*cats* „katoj”) aŭ la genitivan (*cat's paw* „piedo de kato”) aŭ la trian personon singularan de la presenco (*the cat jumps* „la kato saltas”); (2) la derivaj afiksoj povas esti aplikataj libervole sen arbitraj aŭ konvenciaj limoj, ekz. *sukerujo*, *piprujo*, *salujo*, *supujo* por kiuj la franca havas *sucrier*, *poivrier* (*poivrière*), *salière* apud *sel*) kaj *soupière*. Pro tio ke Esperanto estas tiel regula kaj normigita, ĝi bone taŭgas kiel kadro de koordinatoj per kiuj oni povas mezuri kaj taksi similaĵojn kaj malsimilaĵojn inter la strukturoj de diversaj kulturlingvoj. Ĝi eĉ ebligas lingvan eksperimentadon kiel montris al mi en 1928 talentplena rusa matematikisto kaj lingvisto, G. Kolo-vrat. Oni povas kunmeti aŭ derivi tutan serion da

Esperantaj vortoj kaj serĉi la ekvivalentojn en sia gepatra lingvo — cetere, bona rimedo por pli-ampleksigi kaj precizigi siajn proprajn konojn. Oni povas, ekzemple, enketi kiel diversaj lingvoj esprimas la vortojn: *frandemulo*, *kverelemulo*, *silente-mulo* aŭ *fraŭleco*, *regioneco* ktp. Oni eĉ povas eksperimenti per iom bizaraj vortkonstruaĵoj kiel *maljam* — ofte estas pli facile elpensi logikajn rilatojn per la konsidero de konkreta ekzemplo, kiun oni povas enmeti en kuntekston.

Kompreneble, Esperanto povas esti en la praktika vivo tre utila korespondilo ankaŭ por la lingvoscienculo. Pere de Esperanto kolego mia en Londono kolektis valorajn donitaĵojn por sia studo de la regionaj diferencoj de certaj fakterminoj en la islanda lingvo. Mi mem ofte uzis Esperanton por informiĝi pri sintaksaj fenomenoj en lingvoj ne perfekte konataj de mi kiel la finna, turnante min al mia amiko, V. Setälä.

Resume, la lingvistikulo ŝuldas al Esperanto la eblecon (1) studi lingvoevoluaĵon sub plej favoraj kondiĉoj laŭ loko, tempo kaj sociaj medioj, kaj (2) uzi Esperanton kiel normon por kompare esplori la strukturon de diversaj lingvoj.

Pensoj de Zamenhof:

Pri la Lingvo Internacia

„Por ke lingvo estu tutmonda, ne sufiĉas nomi ĝin tia”. (*Moto sur la 1-a paĝo de la Unua Libro.*)

„La Internacia Lingvo, same kiel ĉiu nacia, estas socia propraĵo; la aŭtoro forlasas por ĉiam ĉiujn personajn rajtojn al ĝi”. (*Dua paĝo de la Unua Libro.*)

„Sed mia lingvo havas ankoraŭ alian celon: ne-kontentigante je *internacieco*, ĝi devas ankoraŭ fariĝi *tutmonda*, t.e. atingi tion, ke la plejparto de la mondo scianta legi kaj skribi povu libere paroli ĝin”. (*El antaŭparolo al la Unua Libro.*)

„Por mi persone estus kompreneble multe pli oportuna teni la sorton de l' lingvo internacia en miaj manoj. Tial, mi esperas, la leganto komprenos, ke kreinte la fundamenton de l' lingvo mi nun deponas de mi tutan aŭtoritaton nur tial, ke mi profunde kredas, ke tion postulas la interesoj de l' afero. La tempo, mi esperas, montros, ke mi ne

eraris”. (*El Antaŭparolo al la Dua Libro, Originala Verkaro, p. 36.*)

„Via granda batalado kontraŭ la diversaj projektoj de novaj lingvoj ŝajnas al mi tute superflua, ĉar laŭ mia opinio vi batalas kontraŭ fantomoj. Ili dissendas leterojn al diversaj personoj kiuj komprenas la plej gravajn eŭropajn lingvojn kaj poste ili trumpetas al la mondo, ke tiuj personoj tuj komprenis iliajn leterojn pli ol leterojn en Esperanto. Sed tio ĉi estas ja nur trompa iluzio, kiun multaj personoj bedaŭrinde ne rimarkas, sed kiu tuj aperas, kiam oni volos *lerni* ilian „lingvon”. Poliglotaj personoj facile komprenos ilin ankaŭ se ili skribos *angle*, *france*, aŭ *latine*; sed ĉu kolektoj da vortoj kompreneblaj por poliglotuloj estas *lingvo* kaj povus servi al la *tuta mondo*? ... Ĉu ni kontraŭ ĉiu el ili batalos? Ĉu ni ĉiam denove ripetados la malnovan kanton? La sola batalilo kontraŭ tiuj ĉi malamikoj estas absoluta silentado”.

(*Originala Verkaro pp. 559, 560 kaj 168.*)

Esperanto, la lingva kreaĵo de Zamenhof

de

Prof. D-ro E. A. Bokarev (Sovetunio)

Inter diversaj lingvoprojektoj de lingvo internacia, Esperanto sola fariĝis larĝe uzata. Neniu lingvoprojekto ne nur ne povis superi Esperanton tiurilate, sed esti eĉ iom komparebla al ĝi.

Kio estas la kaŭzo de tio ĉi? En esperantologia literaturo tiu fakto ordinare estas klarigata per pure sociologiaj kaŭzoj. Jam dekomence Esperanto fariĝis instrumento de praktika interkompreniĝo en pli-malpli granda kolektivo kaj estis traktata de ĝiaj adeptoj precipe de tiu vidpunkto, sed ne kiel objekto de teoriaj diskutoj. La periodoj de teoriaj diskutoj, kiuj iafaje komenciĝis inter esperantistoj, ĉiam sekvigis malaltiĝon de ĝia disvastigo kaj praktika utiligo. Aliaj lingvoprojektoj, kontraŭe, restis precipe objektoj de teoria studado kaj diskutado. Estas atentinda la fakto, ke idistoj dum sia pli ol kvindekjara laboro eldonis sufiĉe multajn librojn, dediĉitajn al la lingvo mem (propaganda, polemika, instrua literaturo), sed relative tre malmultajn librojn pri scienco, belliteraturo k.t.p., kie Ido estus nur rimedo, sed ne celo. Ido ne fariĝis rimedo de pli-malpli larĝa uzado, ĉar idistoj fakte ne tion atentis unuavice en sia laboro. Do klarigo per sociologiaj kaŭzoj esence estas tute vera.

Sed detale tuŝi tiun sociologian flankon de la problemo ne estas celo de tiu ĉi artikolo. Ĝia celo estas iom trakti pure lingvan demandon, nome kiuj lingvaj trajtoj de Esperanto ebligis al ĝi fariĝi instrumento de interkompreniĝo kaj superi tiurilate siajn konkurantojn. La reprezentantoj de aliaj sistemoj de lingvo internacia precipe atentis en siaj teoriaj rezonadoj ne tiujn trajtojn, kiuj karakterizas lingvon internacian kiel instrumenton kaj esprimsistemon, sed tiujn, kiuj reprezentas iun teorian principon, tute ne plej gravan de praktika, funkcia vidpunkto. Por la t.n. naturalistoj (adeptoj de Occidental, Interlingua k.t.p.), ekzemple, kiuj ĉiam plej atentis la etimologian flankon de la problemo, sistemeco kaj strukturo de lingvo internacia restis afero de duagrada, iafaje eĉ de nula, graveco. Ili ĉiam diskutis pri kriterioj kaj gradoj de natureco: ĉu estu atentata nur ĝenerala vortfonduso aŭ scienca terminaro ankaŭ, ĉu estu atentata nombro de lingvoj aŭ nombro de parolantoj, ĉu estu atentataj nur modernaj lingvoj aŭ la latina kaj greka ankaŭ, ĉu estu atentataj nur romidaj lingvoj aŭ ankaŭ iuj aliaj k.t.p. La naturalistoj, atentante unuavice la similecon de internacia lingvo al la naturaj, similas homojn, kiuj penas taksi iun sistemon de aeroplano ne laŭ ĝiaj teknikaj, strukturaj kvalitoj, sed laŭ grado de ĝia

simileco al natura birdo. Ofte impresas, ke adeptoj de iuj lingvoprojektoj, diskutante pri diversaj temoj de lingva teorio, tute forgesas, por kio iliaj lingvoj estas kreaĵaj, ĉu por esti kabinetaj etimologiaj sistemoj, ĉu por esti praktikaj rimedoj de internacia interkompreniĝo.

Kiuj do trajtoj de lingvo estas plej gravaj, se ni atentus ĝin kiel praktikan rimedon, respondantan al koncernaj postuloj de socia praktiko? Internacieco de lingva materialo estas tre grava en lingvo internacia, sed ĝi devas esti subigita al tiuj esencaj trajtoj de lingvo, kiuj karakterizas ĝin kiel rimedon de interkompreno: aŭtonomeco de lingva sistemo, integra kohereco de ĝiaj elementoj kaj reguleco-analogeco de ilia funkciado. Nur tio faras lingvon plej manovrebla kaj esprimkapabla en internacia interkompreno.

Ni analizu kelkajn trajtojn de Esperanto, kiuj karakterizas ĝin kiel principe pli taŭgan rimedon de interkompreno, ol multajn aliajn projektojn de lingvo internacia.

1. Oni devas opinii tre grava por lingvo internacia la eblecon libere krei laŭbezone novajn vortojn pere de produktivaj vortderivaj elementoj. Kaj la sistemo de vortderivado en Esperanto devas esti alte taksata de tiu vidpunkto. Unue, ĝi tre faciligas la studadon de la lingvo kaj ebligas al ĝia uzanto kvante tre riĉan vortformadon anstataŭ studado de multaj pretaj kliŝaĵoj. Due, samtempe ĝi estas granda avantaĝo, ĉar ĝi ebligas al ĝia uzanto formi novajn vortojn, kiam aperas neceso pri tio. La sistemo de vortfarado en Esperanto faras la lingvon morfologie tre diafana. Kontraŭe, la "naturalismaj" projektoj estas tre limigitaj je vortderivaj eblecoj, ĉar en ili precipe estas uzataj nur tiuj derivitaj vortoj, kiuj jam ekzistas en la naciaj lingvoj. En unu el plej naturalismaj projektoj, en Interlingua de IALA, praktika vortderivativa sistemo fakte eĉ ne ekzistas, ĉar ĝia afiksaro estas nur etimologia sistemo de vortderivaj elementoj en naciaj lingvoj, ne regule kaj ne produktive uzataj en Interlingua.

2. Tre grava el la funkcia vidpunkto estas ankaŭ la sintaksa diafaneco de lingvo internacia, kiu ebligas tujan komprenon de sintaksa frazstrukturo, de uzata sintaksa modelo. En Esperanto tion ebligas parte jam la vortderivativa sistemo, sed precipe specialaj karakteriziloj de ĉefaj morfologiaj vortklasoj: substantivo, adjektivo, verbo, adverbo. Tiuj karakteriziloj helpante larĝan vort-

derivon (ekz., telefono, telefona, telefoni, telefone), pliriĉigas la lingvon. Due, ili cementigas la propozicion, farante ĝian sintaksan modelon preciza kaj tuj komprenebla; se eĉ iuj vortoj en propozicio ne estas komprenitaj, specialaj vortfinaĵoj komprenigas ĝian ĝeneralan kaj abstraktan signifon: a . . . isto . . . e . . . as . . . aĵon de . . . aj . . . oj. Lingvoj sen tia kvalito multon perdas ne nur en sia esprimkapablo, sed ankaŭ en sia sintaksa diafaneco kaj precizeco.

3. De l'funkcia vidpunkto estas ankaŭ grava la libera vortordo en propozicio, ĉar ĝi ebligas la uzadon de inversa vortordo por pliriĉigo de senca enhavo de parolo, por intensigo de iuj sencaj nuancoj kaj kromsignifoj. Tion kaŭzas en Esperanto ne nur la vortkaraktiziloj, sed ankaŭ la akuzativo kaj varieblaj adjektivoj. Projektoj de lingvo internacia, ne havantaj tiujn eblecojn, multon perdas en sia precizeco kaj esprimkapablo. Nedeviga akuzativo neniel kompensas tiun mankon, ĉar, se ne uzata aŭtomate, la akuzativa karakterizilo ofte estas forgesata tiam, kiam ĝi estas esence necesa. Eĉ tiaj eminentaj idistoj, kiel L. de Beaufront, ne nur unufoje eraris, forgesante pri ĝia uzo en inversa vortordo.

Iafoje oni opinias la analizan lingvostrukturon

pli perfekta ol la sintezan. Efektive, tre ofte la analizaj lingvoj estas pli simplaj ol la sintezaj, sed la kaŭzo ne estas la analiza strukturo mem, ĉar la sintezaj lingvoj (ekz., turkaj) ankaŭ povas esti tre simplaj. La uzo de kelkaj rimedoj de sintezaj lingvoj (ekz., de specialaj vortkaraktiziloj, de libera vortordo) estas tre valora el la funkcia vidpunkto kaj devas esti utiligita ankaŭ en internacia lingvo.

4. Ankaŭ la fonetika ortografio en Esperanto devas esti alte taksata el la funkcia vidpunkto. Male, la tradicia ortografio de la "naturalismaj" projektoj ne povas esti defendata, ĉar ĝi tute kontraŭas al la raciaj principoj de planlingvo.

Do la ĉefaj trajtoj de la lingva strukturo de Esperanto karakterizas ĝin kiel tre praktikan rimedon de internacia interkompreno kontraste al multaj "naturalismaj" projektoj, kiuj malatentas la funkcia vidpunkton, la plej gravan por lingvo internacia, kaj atentis unuagrade la etimologian flankon de la problemo, kiu tute ne estas ĉefa, se oni konsideras lingvon internacian kiel instrumenton de praktika interkompreno. Ne nur sociologiaj, sed ankaŭ pure lingvistikaj kaŭzoj destinis al Esperanto larĝan praktikan utiligon kaj devastiĝon.

Poemo voĉlegita de Julio Baghy dum
la Zamenhofftago en Varsovio :

Centjara estus jam la koro

*Centjara estus jam la koro
de l' homarano, kiu arde
sopiris, brule de fervoro,
ke homo homon fratrigarde
renkontu kaj ke paco-garde
la gentoj vivu en konsento
kaj ilin gvidu verdstandarde
per nova vort' la Nova Sento.*

*Kaj tiu kor' ne mortis tuta !
Ĝi vivas inter ni konstante !
En nia voko pac-saluta
li vokas mem pac-salutante !
La lingvo vivas verse-kante,
postvivis lin per kvardek jaroj,
kaj tra jarcentoj diamante
lin fajlos plu fidelaj aroj !*

*Ĉi tie, en la lando, kie
li vivis age kaj produkte,
mi diru, iom elegie
kiel li ĝojis bonafrukto,
kaj kiel ĝemis pene-lukto
en la mondbrolo katastrofa.
Aŭskultu, karaj, senterupte,
pri ĉi BALADO ZAMENHOFA.*

Balado

*Kiam li antaŭ sepdek jaroj
l' Unuan Libron ekkaresis,
kaj inter liaj okulharoj
grandguta ĝojolarmo mezis :
la Verk', por kiu li elspezis
junaĝan ĝojon, staris brile,
ekskanti al li tre necesis :
"Ho kor', ne batu maltrankvile !"*

*Kaj kiam, malgraŭ ĉiuj baroj,
l' Aĵero kreskis kaj progresis,
kaj jam entuziasmaj aroj
en Bulonjo sur Mar' kongresis,
mirakla sento lin impresis,
kaj krii volis li jubile :
sed gorgopremo ne permesis :
"Ho kor', ne batu maltrankvile !"*

*Kaj en la tempo de l' amaroj,
kiam la mondo murd-ekcesis,
el homa sango kreskis maroj,
ĉiuj esperoj ŝajne ĉesis,
al koro, kiu tiel pezis
en brust' spiranta malfacile,
la lastan peton li adresis :
"Ho kor', ne batu maltrankvile !"*

*Vin mil-mil langoj ne forgesis
Majstro, sed ĝemas ni simile
nun, ĉar la mond' atomarmile
sin minacante refrenezis :
"Ho kor', ne batu maltrankvile !"*

Kolomano Kalocsay

La grandeco de D-ro L. L. Zamenhof

de

Prof. D-ro Ivo Lapenna (Jugoslavio, nun Britujo)

Antaŭ 100 jaroj — precize la 15-an de decembro 1859 — naskiĝis homo, kiu supervivis sin mem. La spertoj de intergenta sangado en Bjalistoko de lia infanaĝo inspiris lin al la suproj de sublime altruisma sindediĉo por la bono de ĉiuj homoj. La kru-elaj malfeliĉoj, surverŝitaj grandparte de lingvo-diverseco sur tiun terpeceton inter Okcidento kaj Oriento, kuraĝigis lin serĉi kaj trovi solvon por la lingva problemo en kadroj mondaj.

Lazaro Ludoviko Zamenhof estis Judo: membro de tiu popolo suferanta, kiun jarcentaj persekutoj kaj torturoj hardis kaj multilate nobligis, kaj kies filoj donis al la kulturo kaj ĝenerala progreso nombron da eternaj valoroj. Lia patrolando estis Pollando, sed en la oficialaj registroj li estis enskribita kiel civitano de la Rusa Imperio, ĉar la krucumo de Pollando donis tiun regionon al la caroj. Sed Zamenhof, restante fidela al sia gento kaj patrujo, samtempe tamen leviĝis super sia popolo, super sia ŝtato kaj fariĝis loĝanto de la mondo, apartenanto de la homaro.

Naskita en medio modesta, humila laŭ sia karaktero, li grandiĝis per sia verko kaj fariĝis personeco de formato tutmonda. Kaj hodiaŭ, cent jarojn post lia naskiĝo, lia nomo estas solene festata en ĉiuj landoj. Prezidantoj de respublikoj, ĉefministroj kaj ministroj, grandaj sciencistoj, lingvistoj kaj Nobelpremiitoj, artistoj, verkistoj kaj poetoj, edukistoj kaj kulturaj agantoj de diversaj landoj, de malsamaj politikaj sistemoj, religiaj kredoj kaj filozofiaj konvinkoj unuiĝis por patroni omaĝon de la homaro al homo, kies tuta vivo, ĉiuj intelektaj energioj kaj fizikaj fortoj estis dediĉitaj al ĝia pli granda feliĉo.

* * *

En kio konsistas la grandeco de Zamenhof?

En julio de la jaro 1887 aperis en Varsovio la unua lernolibro de la Internacia Lingva por Rusoj. La 40-paĝa libreto konsistas el antaŭparolo, plena gramatiko kaj vortaro Internacia-Rusa kun klarigoj pri ĝia uzo. Ĝi estis la rezulto de multjara laborado.

El tiu malgranda semeto elkreskis en iom pli ol sep jardekoj fortika arbo kun profundaj radikoj, abundaj branĉoj kaj densa foliaro. Ĝi estas nekontestebla fakto. Spitante ĉiujn obstaklojn — antaŭjuĝojn, rasismojn kaj ŝovinismojn, militojn, misprezentojn, rektajn malpermesojn kaj ne malofte persekutojn — la Internacia Lingvo traboris al si la vojon en ĉiujn partojn de la mondo, penetris

en ĉiujn sociajn tavolojn, konstante riĉiĝadis per nova kultura enhavo kaj, paralele, daŭre interne evoluadis. El genia projekto ĝi transformiĝis en nuancoplenan instrumenton de pensado kaj komunikado. Ĝi fariĝis vivanta lingvo, kun tute propra spirito, de vivanta internacia kolektivo.

Antaŭ Zamenhof multaj — inter ili kelkaj veraj gigantoj de la homa penso — serĉis konvenan solvon de la lingva ĥaoso. Post Zamenhof pluraj aliaj klopodis — ĉu pro persona gloremo, ĉu pro nescio aŭ nekompreneo de la problemo — ankoraŭfoje malkovri jam malkovritan Amerikon. Kelkfoje tiuj provos elvokis iom da publika interesiĝo kaj kreis iom da konfuzo. Plej ofte ili restis seneĥaj. Neniu el ili sukcesis firmiĝi. Neniu transpasis la limojn de teorie pli aŭ malpli taŭge planita projekto. Neniu socie enradikiĝis. Kaj pli aŭ malpli baldaŭ — kuinte depende de la disponeblaj financaj rimedoj — ili malaperis unu post la alia en la mallumo de la forgeso.

Kial, do, Esperanto sukcesis, dum ĉiuj aliaj projektoj de komuna lingvo, kvankam kelkfoje verkitaĵoj de rekonitaj lingvistoj kaj apogataĵoj de famaj nomoj, fiaskis?

La kaŭzoj estas pluraj, sed tri el ili ŝajnas al mi esencaj:

1. Zamenhof bone komprenis, ke lingvo internacia devas konsisti el *elementoj maksimume internaciaj*. Tial li metis en ĝian vortaron radikojn jam internaciigintajn kaj signis la vojon por plua riĉigo de la lingvo per novaj internaciaj esprimoj. Sed li ankaŭ perfekte komprenis, ke lingvo ne konsistas nur el vortoj; plue, ke unuflanke, ne ekzistas absoluta internacieco de la vortoj — nek laŭenhave, nek laŭforme — kaj ke, aliflanke, por atingi facilecon estas necese ordigi kaj sistemigi tiun internacian lingvomaterialon kaj liberigi ĝin de balastaj akcesoraĵoj kaj absurdaĵoj.

Nur iom post iom Zamenhof solvis tiujn demandojn, pri kiuj li okupiĝis ekde siaj plej junaj jaroj. Lia grandioza verko estas sendube rezulto de eksterordinara talento, sed same tiel ankaŭ de senfina pacienco kaj diligento. En la komenco la komplikaj gramatikoj de la lingvoj, kiujn li sciis, kaj iliaj dikegaj vortaroj timigis lin. Kelkfoje li efektive malesperis, sed ĉiam denove li provadis, kreadis, serĉadis la solvon. Lernado de la angla lingvo montris al li, ke eblas simpligi la gramatikon ĝis maksimumo. Hazarda rimarko de surskribo "suker-

aĵejo" donis al li la ideon kiel, per bone planita sistemo de afiksoj, solvi la problemon de tro multaj vortoj. Restis ankoraŭ la demando de la vortradikoj. Unue li pensis, ke la vortojn oni povas tute simple inventi. Nur poste li rimarkis, ke granda nombro da vortoj jam internaciigis en la normala evoluprocezo de la lingvoj. „Mi baldaŭ rimarkis — li skribis al Borovko — ke la nunaj lingvoj posedas grandan provizon da pretaj vortoj jam internaciaj, kiuj estas konataj al ĉiuj popoloj kaj faras trezoron por estonta lingvo internacia — kaj mi kompreneble utiligis tiun ĉi trezoron.”

Surbaze de tiuj principoj, kies ĝustecon li mem elprovidis dum multaj jaroj tradukante kaj verkante en sia lingvoprojekto, la fundamento de la Internacia Lingvo ricevis sian definitivan formon. Ĉio en tiu fundamento estas bone pripensita kaj antaŭe elprovita en la praktiko. Ĉio celas krei bazon de plena lingvo, efektive internacia laŭ sia interna strukturo kaj ĝis maksimumo facila. Tial, ekzemple, Esperanto havas fonetikan ortografion. Tial en ĝi ĉiu elemento ricevis difinitan signifon kaj la tuta lingvo aglutinan karakteron kun plej simpla gramatiko. Per la sistemo de afiksoj la Internacia Lingvo akiris vastajn eblecojn de subtila derivado. Tio unuavide kelkfoje iom ĝenas la t.n. „tujan kompreneblecon”, per kiu kelkaj pseŭdosciencaj fabrikantoj de novaj projektoj provas blufi personojn parolantajn plurajn okcidenteŭropajn lingvojn, sed ĝuste tio donas al la lingvo multe pli grandan, *veran* kaj *realan*, internaciecon: ne, kompreneble, el vidpunkto de difinita nacio aŭ grupo da nacioj kaj de iliaj intelektaj satelitoj, sed el vidpunkto monda. Samtempe tiuj karakterizoj helpas la rapidan ellernon de la lingvo kaj ebligas ĝian tujan praktikan uzon skribe, lege kaj parole ne sole en Okcidento, sed sur ĉiuj kontinentoj; ne nur fare de kleruloj, sed ankaŭ fare de la plej ordinaraĵoj homoj.

La moto „Por ke lingvo estu tutmonda, ne sufiĉas ĝin nomi tia”, presita sur la kovrilpaĝo de la unua lernolibro, entenas fundamentan principon de unuaranga graveco.

2. Lingvo estas *socia fenomeno*. Por ke ĝi povu meriti la nomon de lingvo, ĝi devas kontentigi ĉiujn bezonojn de pensprimado de difinita homgrupo. Tio signifas, ke ĝi ne povas esti limigita nur al scienco aŭ nur al kiu ajn alia speciala fako, sed ĝi devas rilati al ĉiuj homaj aktivecoj. Tio plue signifas, ke ĝi povas esti evoluigata ne de tiu aŭ alia unuopulo — eĉ ne de la plej genia — sed nur de la tuta kolektivo, kies spirita proprieto ĝi estas, surbaze de la efektivaĵoj bezonaj de tiu kolektivo. Ankaŭ tiun grandan veron Zamenhof bone komprenis. Li tuj „forcedis ĉiujn personajn rajtojn” je la lingvo kaj akcente deklaris jam en la unua lernolibro: „Internacia Lingvo, simile al ĉiu nacia, estas propraĵo socia”. Precize tia ĝi estis kaj estas konsiderata de tiu internacia kolektivo, kiu ĝin akceptis ne por eksperimente aŭ lude pasigi la

tempon dum ripoza neniofarado, sed por utiligi ĝin en siaj internaciaj rilatoj.

Laŭ tiu korekta principo la lingvo efektive evoluis „per tiu sama natura vojo”, per kiu evoluas „ĉiu alia lingvo”, kiel diris Zamenhof en la jaro 1910. Sed li povis prave konstati jam en 1908: „Nia lingvo konstante pli riĉiĝas kaj elastiĝas. Iom post iom konstante aperas novaj vortoj kaj formoj, unuj fortikiĝas, aliaj ĉesas esti uzataj. Ĉio fariĝas kviete, senskue kaj eĉ nerimarkeble”. De tiam laŭ la sama maniero la lingvo plue konsiderinde evoluis kaj samtempe fortikiĝis ĝia interna unueco kaj kohereco pro la ampleksiĝo kaj daŭra multobligado de ĉiaspecaj internaciaj kontaktoj inter ĝiaj uzantoj.

3. Sendube, la lingvaj malfacilaĵoj troviĝas en la radikoj mem de la ideo de komuna supernacia lingvo. Sed tiuj malfacilaĵoj fariĝas objektivaj obstakloj kaj sentiĝas kiel tiaj ĝuste tial, ĉar oni ekkonceptas *la homaron kiel principe unuecan* kaj la mondon kiel principe tutecan. Animo delikata kiel tiu de Zamenhof ne povis ne eksenti tion, des pli ke li naskiĝis, edukiĝis kaj vivis en medio plur-nacia, saturita de reciprokaj intergentaj antagonismoj. Tute nature, do, li enspiris en la lingvon spiriton de humaneco kaj internaciismo. Ankaŭ tiurilate lia subjektiva penso harmonie akordis kun la objektivaj formiĝantaj kondiĉoj.

Jam en la jaro 1878, kiam Lazaro Ludoviko estis ankoraŭ lernanto en gimnazio, li kaj liaj junaj kolegoj entuziasme kantis en la unua, ankoraŭ ne ellaborita projekto de komuna lingvo:

Malamikete de las nacjes

Kadó kadó, jam temp' está.

Malamikeco de la nacioj falu, falu, jam tempo estas! Por Zamenhof komuna tuthoma lingvo ne-niam estis celo al si mem, sed unu el la plej gravaj rimedoj por forigi la miskomprenojn, suspektojn kaj malamon inter la popoloj, por krei kondiĉojn de interkompreniĝo kaj reciproka respektado. La esenco de tiu ideo estas koncize esprimita en unu sola simpla frazo, kiun li eldiris en sia rimarkinda parolado en Bulonjo-sur-Maró tiun gloran tagon de la jaro 1905, kiam la unuan fojon en la historio de la homaro homoj de diversaj nacioj interkompreniĝis per komuna supernacia lingvo: „Ni konsciu bone la tutan gravecon de la hodiaŭa tago, ĉar hodiaŭ inter la gastamaj muroj de Bulonjo-sur-Maró kunvenis ne Francoj kaj Angloj, nek Rusoj kun Poloj, sed homoj kun homoj”.

Zamenhof tamen ne supertaksis la rolon de la lingvo, kiel kelkfoje neinformitaj personoj klopodas kredigi. En Genevo, en 1906, li precizigis:

„Ni ne estas tiel naivaj, kiel pensas pri ni kelkaj personoj: ni ne kredas, ke neŭtrala fundamento faros el la homoj anĝelojn; ni scias tre bone, ke

la homoj malbonaj ankaŭ poste restos malbonaj; sed ni kredas, ke komunikigado kaj konatigado sur neŭtrala fundamento forigos almenaŭ la grandan amason de tiuj bestaĵoj kaj krimoj, kiuj estas kaŭzataj ne de malbona volo, sed simple de sinnekonado kaj de devigata sinaltrudado”.

La humaneca internaciismo — hodiaŭ praktikata kaj flegata en sia plej pura formo inter la personoj parolantaj la Internacian Lingvon — estis kaj estas potenca ideo fono de la lingvo. Ĝi donis al la Internacia Lingvo koron kaj animon, tute specialan karakteron kaj apartan fizionomion. Kaj sen tiuj neniuj lingvo povas vivi, kreski kaj maturiĝi.

La tri tuŝitaj elementoj kaŭzis la plenan sukceson de Esperanto el lingva vidpunkto. Ili estas unu el la garantioj por la plua disvastiĝo kaj evoluo de la Internacia Lingvo, por ĝia ĉiam pli ampleksa apliko en la internaciaj rilatoj, por ĝia estonteco. Tia efektive *internacia* lingvo estas samtempe baza rimedo de integriĝo en supera homara tuto, sed tiel ke samtempe estu konservitaj la individuoj de ĉiuj nacioj, de la naciaj kulturaj valoroj kaj de iliaj plej grandaj trezoroj: la naciaj lingvoj.

Cento da placoj kaj stratoj tra la mondo hodiaŭ portas la nomon de D-ro L. L. Zamenhof. Monumentoj estas starigitaj al li en diversaj lokoj. Ne plu ekzistas enciklopedio aŭ serioza lingvistika verko, kiu ne menciis la iniciatinton — kiel li mem sin nomis — de la Internacia Lingvo. Ofte oni diras, ke tiu aŭ alia grandulo de la spirito vivas plue tra la daŭra valoro de sia verko. Sed se pri iu tiu diro estas ĝusta, tiam certe unuavice pri Zamenhof. Ĉar li plue ekzistas kaj ekzistos en la estonteco tra la lingvo, kies fundamentojn lia genio donacis al la homaro kaj kiu hodiaŭ vivas en la abunda kaj daŭre kreskanta tutmonda literaturo, en la gazetararo kaj revuoj, sur la ondoj de radio kaj ekranoj de televido, en kongresoj kaj konferencoj, en internaciaj amikaj rondoj kaj eĉ en familioj, sur la lipoj de miloj kaj miloj da personoj tra la mondo, alportante ĉien, kien ĝi penetris, almenaŭ iom de tiu bonvolemo, kiu enspiris en ĝin la nobleco de homo kun granda animo kaj profunda menso el Bjalistoko. Jes, monumentoj estas starigitaj al Zamenhof, sed la plej grandan kaj la plej belan monumenton li starigis al si mem per sia verko.

Pensoj de Zamenhof:

Pri la ideo fono

„La diferenco de la lingvoj prezentas la esencon de la diferenco kaj reciproka malamikeco de la nacioj, ĉar tio ĉi antaŭ ĉio falas en la okulojn ĉe renkonto de homoj: la homoj ne komprenas unu la alian kaj tial ili tenas sin fremde unu kontraŭ la alia . . . Kiu unu fojon provis loĝi en urbo, en kiu loĝas homoj de diversaj reciproke batalantaj nacioj, tiu eksentis sendube, kian grandegan utilon alportus al la homaro lingvo internacia, kiu, *ne entrudigante en la doman vivon de la popoloj*, povus, almenaŭ en landoj kun diverslingva loĝantaro, esti lingvo regna kaj societa”. (*El Antaŭparolo al Unua Libro.*)

„Tiu ĉi ideo — vi ĉiuj sentas ĝin tre bone — estas frateco kaj justeco inter ĉiuj popoloj. Tiu ĉi ideo akompanadis Esperanton de la unua momento de ĝia naskiĝo ĝis la nuna tempo”. (*Originala Verkaro*, p. 372.)

„La dua kulpigo, kiun ni ofte devas aŭdi, estas tio, ke ni esperantistoj estas malbonaj patriotoj.

Ĉar tiuj esperantistoj, kiuj traktas la esperantismon kiel ideon, predikas reciprokecon kaj fratecon inter la popoloj, kaj ĉar laŭ la opinio de la gentaj ŝovinistoj patriotismo konsistas en malamo kontraŭ ĉio, kio ne estas nia, tial ni laŭ ilia opinio estas malbonaj patriotoj, kaj ili diras, ke la esperantistoj ne amas sian patrujon. Kontraŭ tiu ĉi mensoga, malnobla kaj kalumnia kulpigo ni protestas plej energie, ni protestas per ĉiuj fibroj de nia koro! . . . La esperantismo, kiu predikas amon, kaj la patriotismo, kiu ankaŭ predikas amon, neniam povas esti malamikaj inter si. Ĉiu povas paroli al ni pri ĉiuspeca amo, kaj ni kun danko lin aŭskultos; sed kiam pri amo al la patrujo parolas al ni ŝovinistoj, tiuj reprezentantoj de abomeninda malamo, tiuj mallumaj demonoj, kiuj ne sole inter la landoj, sed ankaŭ en sia propra patrujo konstante instigas homon kontraŭ homo — tiam ni kun la plej granda indigno nin deturnas. Vi, nigraj semantoj de malpaco, parolu nur pri malamo al ĉio, kio ne estas via, parolu pri egoismo, sed neniam uzu la vorton „amo”, ĉar en via buŝo la sankta vorto „amo” malpurigaĝas”. (*Originala Verkaro*, p. 382.)

D-ro L. L. Zamenhof, oftalmologo, inciatinto de la Internacia Lingvo

de

D-ro A. Albault, Oft. (Francujo)

En la kvin kontinentoj, en ĉiuj landoj, dum la jaro 1959, estas honorata la memoro de D-ro Zamenhof, inciatinto de la Internacia Lingvo. Okulkuracisto en Varsovio, li estas mondkonata kiel lingvisto: sur la esenca bazo de liaj laboroj, kreiĝis en 70 jaroj unu el la plej belaj monumentoj pri kiuj la civilizacio povas fieri: vivanta internacia lingvo, rezulto de la longjara verkado de aŭtoroj el plej diversaj kulturoj, el plej malsamaj lingvoj.

L. L. Zamenhof naskiĝis en pola urbeto, Bjalistoko, la 15-an de decembro 1859 en meze bonstata familio hebreo-pola. Lia patro estis lingvoprofesoro kaj tre frue, la juna Zamenhof estis incita al la grandaj literaturaj lingvoj. Dank' al sia denaska lingvotalento, li bone asimilis ankaŭ la popolajn lingvojn aŭ dialektojn parolatajn de la kamparanoj en lia apudeco. Kiel infano, li suferis pro la malamo, kiu ĵetis unu kontraŭ la alian la diversajn gentojn de Bjalistoko: polaj burĝoj kaj rusaj administrantoj, germanaj metiistoj kaj litovaj kamparanoj, krome hebreaj komercistoj! Lia lingvokompreno montris al li, ke — kvankam tio ne povas ĉion klarigi — la malsameco de la lingvoj estas unu el la plej gravaj obstakloj por pli bona harmonio inter la homoj. Kaj li ekrevis pri komuna lingvo, kiu ebligus al ĉiuj kompreni kaj esti komprenataj, manifesti siajn bezonojn, pensojn kaj sentojn, kiu ajn estas iliaj nacioj kaj gepatraj lingvoj, egale ĉu ili estas kleruloj aŭ scienculoj, simpluloj aŭ kamparanoj. Tamen, post fino de la licea tempo dum kiu li studis ankaŭ la antikvajn lingvojn, li decidigis dediĉi sin al medicino. Li, ĉefe en Varsovio, studas sed ankaŭ en Moskvo. Poste, li iras en Vienon por specialiĝi pri oftalmologio.

Lia vivo de specialkuracisto estas senhistoria: li praktikas en Varsovio ĝis la mezo de la Unua Mondmilito honorata de siaj kunfratoj, amata de siaj malsanuloj. Ni aldonu, ke li havis viglan korespondon kun kelkaj specialistoj, kiuj ne hezitis el-lerni la novan lingvon. Ni citu *Javal*, tiel fama inter esperantistoj kiel inter oftalmologoj, kiu, interalie, kreis en sia laboratorio ĉe Sorbono, kun sia disĉiplo Schiötz, la nepre necesan oftalmometron ("javal") kaj kies lecionoj pri optika fiziologio estas ankoraŭ aktualaj.

Ĉiuokaze, Zamenhof apartenas al tiuj homoj kiuj, fakulo en unu branĉo, tamen famiĝis en alia. Multaj, kiel *Leibnitz* kaj *Descartes*, antaŭe preparolis la problemon de komuna lingvo. Malpli multaj donis al ĝi praktikan solvon. Neniu el tiuj proponoj konis ioman sukceson.

Zamenhof, kun vera lingvotalento, komprenis ke jam ekzistas internacia bazo — ĉefe greko-latina — sed li ne konsideris sin sklavo de tiu bazo, kiel aliaj poste faros, sensukcese. Komuna lingvo devas

utili al homoj el plej malsamaj devenoj kun lingvokutimoj ofte kontraŭaj. Necesis ne trudi al ili tro latinajn lingvajn apartaĵojn. Ke li sukcesis, montras la disvastiĝo de la nova lingvo. Jam en 1878 unua skemo de la „lingwe uniwersala” ekzistis sed nur en 1887 post intensa tralaborado, tradukado kaj originala verkado li eldonas en Varsovio la definitivan skemon en broŝuro titolita: „D-ro Esperanto: Lingvo Internacia”. Poste lia pseŭdonimo transiris al la lingvo mem.

Iom post iom, la lingvo disvastiĝis tra Eŭropo, precipe ekde 1905, dato de la unua Universala Kongreso de Esperanto, kiu grandaskale kaj plej evidente demonstris la vivipovecon de la lingvo. Hodiaŭ, la Internacia Lingvo disvastiĝis al ĉiuj kontinentoj. Ankoraŭ ne oficiale akceptita ĝi tamen meritis en 1954 la agnoskon de grava internacia forumo kiel UNESKO, kiu deklaris ke Esperanto havas grandan valoron por la internaciaj intelektaj interŝanĝoj kaj la proksimigo inter la popoloj. Oni ne uzas Esperanton en ĉiuj internaciaj revuoj sed la nombro de revuoj kiuj akceptas ĝin inter aliaj lingvoj, ĉu por aperigi originalajn studojn, ĉu por aldoni resumojn kreskas de jaro al jaro. La japanoj eldonis antaŭ nelonge bibliografion de sciencaj verkoj faritaj de japanaj aŭtoroj en la Internacia Lingvo; simila sed aparta bibliografio devis esti farata nur pri la laboroj de japanaj medicinistoj. La samon oni povas diri pri internaciaj kongresoj. Sed oni devas agnoski, ke disvastiĝo de intelektaj progresoj povas esti nur malrapida. Ĉiuokaze la nombro de la kuracistoj, kiuj uzas la Internacian Lingvon jam estas atentinda. Ekzistas „Tutmonda Esperantista Kuracista Asocio” (TEKA). Ĝi eldonas revuon en Japanio: „Medicina Revuo”.

Kompreneble, ne ĉiuj uzas Esperanton nur pro profesiaj motivoj. Por pli ol unu la lingvo mem estas ŝatokupo, kaj ili estas verkistoj, kiel ekzemple Kalocsay, ĉefe en hospitala servo de Budapeŝto jam de multaj jaroj, kiu estas tutmonde konata kiel la „Princo de la esperanta poezio”, aŭtoro de multaj originalaj poemoj, tradukinto de ĉefverkoj kiel ekzemple la „Infero” de Dante, aŭ „Tragedio de l' Homo” de Madàch.

Resume, D-ro Zamenhof, la modesta okulisto Varsovia, la granda idealisto kaj lingvogenio, sukcesis doni al la surdamuta homaro lingvon, kiu penetris en ĉiun landon, en ĉian okupon, lingvon, kiu nun montriĝas ne nur, kiel vivanta lingvo, sed ankaŭ kiel potenca instrumento de kulturo. Se oni mezuras la valoron de homo per la fruktoj de lia kreaĵo, eĉ nur pro tio oni devas meti D-ron L. L. Zamenhof inter la plej grandaj bonfarintoj de la homaro.

Tolstoj, Zamenhof kaj Esperanto^{*)}

Estas ĝenerale konata la favora sinteno de L. Tolstoj al Esperanto. La scio pri tiu sinteno de la granda rusa verkisto baziĝas ĉefe sur kelkaj plej konataj diroj de Tolstoj pri Esperanto, unuavice sur lia longa letero de la 27-a de aprilo 1894 al grupo da esperantistoj en Voroneĵ, en kiu li skribis:

„La facileco de ĝia lernado estas tia, ke, ricevinte antaŭ 6 jaroj gramatikon de Esperanto, vortaron kaj artikolojn, skribitajn en tiu lingvo, mi povis post ne pli ol du horoj da okupiĝo, se ne skribi, do plene libere legi en tiu lingvo” (Vol. 67, p. 101).

Fakte la diroj de Tolstoj pri Esperanto tute ne estas limigitaj al tio, kio estas ĝis nun menciita en la Esperanto-gazetaro. Pli detala studo de la tuta skriba heredaĵo de Tolstoj montras, ke li ekde la unuaj tagoj de sia konatiĝo kun Esperanto en 1889 ĝis la lastaj tagoj de sia vivo konservis sian pozitivan starpunkton rilate al la lingvo, konfirmante tion plurfoje en diversaj formoj.

La unuan kontakton kun Esperanto Tolstoj certe havis meze de 1889, kiam li ricevis de la verkisto kaj ĵurnalisto V. V. Majnov leteron kun la aldonita lernolibro, publikigita en Varsovio en 1888. Traduinte ĝin, Tolstoj tuj taksis la malgrandan libreton kiel gravegan eventon, utilan por la homaro. Sendinte respondon al Majnov, Tolstoj skribis en sian taglibron la 13-an de septembro 1889:

„Mi skribis leteron al Majnov pri la lingvo Esperanto. Bona verko” (Vol. 50, p. 142).

La fakto, ke Tolstoj notis en sia taglibro la forsendon de letero pri Esperanto, kaj ankoraŭ pli lia firma konkludo „bona verko”, klare montras, ke li ne nur atente trastudis la senditan libreton, sed ankaŭ profunde pensis pri ĝia enhavo. Tion konfirmas ankaŭ la enhavo de lia letero al Majnov de la 13-a de septembro 1889, kiun li mencias en la taglibro. En tiu letero li skribis:

„Mi atente tralegis la lernolibron de la Internacia Lingvo, kiun vi sendis al mi, kaj mi trovas, ke tiu lingvo plene kontentigas la bezonojn de internacia eŭropa (Eŭropo kun la kolonioj, inkluzive Amerikon) lingvo... Mi opinias tiun agon — la akcepton de unu lingvo fare de la Eŭropanoj — ago de unuaranga graveco, kaj tial mi estas tre dankema al vi pro la alsendo kaj mi, laŭ miaj fortoj, klopodos devastigi tiun lingvon; la plej ĉefa estas mia konvinko pri ĝia nepra neceso” (Vol. 64, p. 304).

Ne gravas ĉi tie la formo, en kiu esprimis sin Tolstoj — „Eŭropo kun la kolonioj inkluzive Amerikon”, kio praktike en tiu epoko signifis preskaŭ la tutan mondon — sed gravas lia senkondiĉa aprobo de la Internacia Lingvo kaj la akcentado, ke ĝi estas nepre necesa.

En decembro, 1889, Majnov sendis al Tolstoj

vortaron kaj kelkajn librojn en Esperanto. Tolstoj denove dankis al li per letero. Ŝajnas ke Majnov ne bone komprenis la favoran sintenon de Tolstoj rilate la Internacian Lingvon. Kiel sekvas el la postaj leteroj, Majnov atendis, ke Tolstoj fariĝos aktiva disvastiganto de la lingvo. Majnov eĉ montris malkontenton, ke Tolstoj prokrastas tion. Tolstoj respondis en sia letero de la 30-a de majo 1892:

„Mi estas ĉiam pli kaj pli okupata, kaj da tempo mi havas ĉiam malpli kaj malpli. Pro tiu kaŭzo, senkonsidere al la fakto, ke mi plene aprobas la disvastigon de la Internacia Lingvo Esperanto, mi ne havas la tempon okupiĝi pri ĝi” (Vol. 66, p. 223).

En aprilo, 1894, V. L. Kravcov, distrikta juĝisto en Voroneĵ, petis en la nomo de la loka grupo, ke Tolstoj donu sian opinion pri Esperanto. Responde Tolstoj sendis longan leteron kun eldiroj pri Esperanto jam vaste konataj kaj menciitaj en la komenco de tiu ĉi artikolo. En tiu letero Tolstoj detale esprimas sian opinion pri la internacia lingvo ĝenerale kaj pri Esperanto speciale. Li diras, ke la enkonduko de la Internacia Lingvo estas „unu el la plej proksimaj antaŭŝtupoj”, garantiantaj „la reciprok-an interkompreniĝon de la homoj unuj kun la aliaj” sur la vojo al tuthomara frateca unueco. Pritraktinte la tri eblecojn de komuna lingvo por internaciaj rilatoj, li konkludis, ke la tria solvo estas la plej bona: Tiu solvo estas, „ke ĉiuj homoj de ĉiuj nacioj kreu por si unu internacian facilan lingvon kaj ke ĉiuj lernu ĝin; en tio konsistas la ideo de la esperantistoj, ŝajnas al mi, ke la lasta ebleco estas la plej racia kaj, ĉefe, realigebla plej rapide” (Vol. 67, p. 101).

Tolstoj ne nur principe aprobis Esperanton, sed ankaŭ donis al la lingvo sian apogon. Li konsentis, ke kelkaj liaj artikoloj aperu en la gazeto „La Esperantisto”. La kunlaborado de la granda verkisto, kompreneble, devis altiri la atenton de la larĝa publiko kaj fortikigi la pozicion de la gazeto. Neatendite, tamen, la publikigo de la traduko de la artikolo de L. Tolstoj „Prudento kaj Kredoj” en la

^{*)} Tiu ĉi artikolo estas mallongigita traduko de la studo, kiun verkis F. I. Kolobanov (Leningrad) en la rusa lingvo sub la titolo „L. Tolstoj kaj Esperanto”. La parenteze cititaj volumoj kaj paĝoj rilatas al la Plena Verkaro de Leo Tolstoj, publikigita en la rusa lingvo. Preparante la ruslingvan studon, F. I. Kolobanov esploris ĉiujn leterojn, taglibrojn, notlibrojn k.t.p., entenitajn en la menciita Plena Verkaro. La mallongigon kaj tradukon faris, kun la permeso de la aŭtoro, I.L.

n-ro 2, 1895, de la gazeto, kaŭzis, ke la cara cenzuro malpermesis la gazeton en Rusujo. Tio estis granda bato por la ankoraŭ malforta Esperanto-Movado, ĉar la plej granda parto de la abonantoj estis en Ruslando. Tiu fakto tre amarigis Tolstoj kaj li ankaŭ sentis sin respondeca pro la malpermeso, kvankam, kompreneble, li neniel kulpis. En la letero de la 5-a de majo 1895 al N. N. Strahov li skribis:

„Estas iu doktoro Zamenhof, kiu kreis la Esperantan lingvon kaj publikigadis en ĝi gazeton, ŝajnas en Dresden. La gazeto havis ĉ. 600 abonantojn, el kiuj la plimulto estis en Ruslando. Miaj amikoj, precipe unu, Tregubov, granda apoganto de Esperanto, dezirante subteni la gazeton, publikigis tie unu mian leteron pri la rilato de la racio al la religio, tre senkulpan, kaj ankaŭ unu artikolon pri la nepagado de la impostoj en Nederlando. Tio kaŭzis, ke oni malpermesis enlasi la Esperantogazeton en Ruslandon, kaj Zamenhof, pasie dediĉita al sia verko, kaj materie ruiniĝinta jam antaŭe pro tiu verko, suferis parte ankaŭ de mi. Ĉu ne eblas havigi al li denove la permeson por allaso de la gazeto en Ruslandon?” (Vol. 68, p. 89).

Efektive, N. N. Strahov parolis pri la afero kun la poeto Appolon Majkov, kiu en tiu tempo estis prezidanto de la Komitato por Eksterlanda Cenzuro, kaj tiu promesis plenumi la peton de Tolstoj. N. N. Strahov informis Tolstoj pri sia interveno en la letero de la 6-a de junio 1895. La malpermeso estis nuligita, sed tio tamen ne savis la gazeton, kiu ĉesis aperadi en aŭgusto, 1895. En decembro de la sama jaro komenciĝis la publikigo de la revuo „Lingvo Internacia”.

En aŭgusto, 1909, petita doni la permeson por publikigo en „Internacia Socia Revuo” de traduko de kiu ajn el siaj verkoj, Tolstoj konsentis kaj skribis en la letero de la 17-a de aŭgusto 1909:

„Mi plene konsentas kun la opinio, esprimita en via letero, pri la granda signifo de la Internacia Lingvo kaj ankaŭ mi mem tre volonte kunlaborus en tiu agado, laŭ miaj fortoj, inter la aliaj agantoj. Mi esprimas mian konsenton pri traduko al Esperanto de kiu ajn el miaj verkoj. Ĉu vi ne opinias konvena fari Esperantan tradukon de mia artikolo pri la paco, ankoraŭ ne publikigita, sed preparita por la Stokholma Tutmonda Kongreso de la Paco? Mi ankaŭ volonte skribus pri la signifo de la Internacia Lingvo, sed mi dubas ĉu mi trovos tempon kaj povos” (Vol. 80, p. 65).

La menciita artikolo de Tolstoj aperis en „Internacia Socia Revuo”, 1910, n-ro 1, pp. 49—52.

Estas tre karakterize, ke Tolstoj sugestis por traduko al Esperanto precize sian raporton pri paco. La granda verkisto kaj pensulo bonege komprenis, ke Esperanto estas ligita al la paco kaj al la amikaj rilatoj inter la popoloj.

Tolstoj alte aprezis la edukon valoron de Esperanto. En siaj multaj diroj li akcentadis la gravecon koni diversajn lingvojn ne nur por akiri kaj larĝigi siajn sciojn, sed ankaŭ por la proksimigo de la homoj de diversaj nacioj. Li bone komprenis, ke ne estas eble ellerni multajn lingvojn. Tial li konsilis lerni nur la plej necesajn. En sia letero de la 10-a de aprilo 1905 al P. I. Birjukov, li skribis:

„Rilate la lernadon de la lingvoj — ju pli multaj, des pli bone — mi opinias, ke jen, tiujn ĉi, laŭ mi, viaj infanoj devus lerni: la francan kaj germanan nepre, la anglan kaj Esperanton, se eble” (Vol. 73, p. 68).

La fakto, ke Tolstoj enmetis Esperanton en la mallongan liston de “elektitaj” lingvoj, kiujn oni devus lerni, montras la grandan signifon de la Internacia Lingvo en lia penso.

Oni rimarkos, ke en ĉiuj ĉi diroj pri Esperanto Tolstoj ĉiam parolas pri „la internacia lingvo” aŭ „Esperanto”. Neniaj superfluaĵoj, eraraĵoj kaj konfuzigaj epitetoj. Tolstoj akceptas Esperanton kiel plenan lingvon, kiel instrumenton de ĉiaspeca rilato de la homoj de diversaj nacioj. Tia majstro de la vorto, kiel Tolstoj, tutcerte ne povis ignori la valoron de la lingvo por arta kreado, kvankam en tiu tempo ankoraŭ ne ekzistis tiel granda literaturo en Esperanto, kiel hodiaŭ. Tio montras, ke Tolstoj neniel dubis pri la grandaj esprimaj eblecoj de la Internacia Lingvo kaj pri ĝia plena taŭgeco por literatura kreado. Diversaj pseŭdoautoritatuloj, kiuj sen ia ajn scio pri la afero donas kelkfoje „profundepensajn” opiniojn pri la kvazaŭa netaŭgeco de Esperanto por literatura kreado (ĉar ĝi estas „artefarita” k.t.p.), agus pli bone kaj pli inteligente, se ili imitus la ekzemplon de la rusa geniulo, konatiĝus ne nur kun la lingvo, sed ankaŭ kun ĝia literaturo, kaj trastudus plej atente la opinion de Tolstoj.

En aliaj okazoj Tolstoj publike montris siajn simpatiojn por Esperanto. Pluraj Esperanto-organizaĵoj elektis lin honora membro kaj li ĉiam afable dankis. Nur duonjaron antaŭ sia morto Tolstoj ricevis leteron de V. S. Bodnarski, reprezentanto de la Studenta Ligo „Esperanto” en Moskvo, kun informo, ke tiu organizaĵo elektis lin honora membro. Tolstoj respondis la 3-an de februaro 1910, per korespondaĵo, en kiu li skribis: *„Mi plene konsentas kun la celoj de agado de via Ligo kaj mi dankas pro la honorigo”* (Vol. 81, p. 86).

La eksplicitaj diroj de Tolstoj pri Esperanto, lia konsento pri publikigo de diversaj liaj verkoj en tiu lingvo, liaj intervenoj kaj akcepto de honorigoj sendube atestas, ke li konscie, post profunda pripensado, plene aprobis la Internacian Lingvon kaj donis al ĝi sian tutan apogon, kiam ajn li povis.

Rememoroj pri la lastaj jaroj de mia patro^{*)}

de

Adam Zamenhof (Pollando) †

En Aŭgusto 1914 devis okazi la X-a Universala Kongreso de Esperanto en Parizo. Mia patro kune kun la patrino forveturis al la Kongreso, kvankam oni jam ĉie parolis kaj skribis pri la minacanta milito. Sed tamen ĝenerale oni ne tro kredis, ke la milito efektive povas okazi kaj certe neniu supozis, ke ĝi estos tiel serioza kaj longa. Miaj gepatroj veturis tra Germanujo kaj ili ĵus alvenis al Köln, kiam ili eksciis, ke la milito estis deklarita inter Germanujo kaj Rusujo. Oni anoncis al ili, ke ili devas tuj forlasi Germanujon kiel civitanoj de malamika lando, ĉar Varsovio ja apartenis en tiu tempo al la rusa registaro. Mia patro estis tamen tiel sugestita per la penso pri la internacia paca kunveno en Parizo, ke li eĉ hezitis, ĉu li devas nepre reveni Varsovion, aŭ daŭrigi la vojaĝon al Parizo. Li supozis, ke la kongreso malgraŭ ĉio okazos en paco, kaj, post la kongreso, la milito jam certe estos finita. Sed jam li rimarkis strangan ŝanĝon ĉe la oficistoj kaj kunvojaĝantoj, kaj baldaŭ komprenis, ke la pacaj interrilatoj inter la homoj povas facile kaj rapide malaperi, kiam oni publike anoncas, ke civitano de iu lando aŭ homo de alia gento estas malamiko.

Do, laŭ konsilo de kelkaj germanaj amikoj esperantistaj, miaj gepatroj decidis reveni hejmen, kvankam la vojaĝo jam ne povis okazi per normala vojo kaj ili devis esti preskaŭ forpelitaj en iun neŭtralan landon. Estis do granda ĉirkaŭira vojaĝo tra Svedujo, en amaso da multaj aliaj, depost hieraŭ "malamikaj" fremduloj, kiuj multnombre troviĝis en tiu ĉi tempo en diversaj germanaj kuraĉlokoj. Tiu ĉi vojaĝo ne nur estis tre laciga kaj malagrabra por mia patro pro ne tro forta stato de lia sano, sed precipe pro la fortega morala bato, kiun li kvazaŭ ricevis, vidante la subite aperintan malamon inter la homoj, al kiuj li predikis la fratecon. Kaj baldaŭ anstataŭ la internacia paca kongreso ekregis en Eŭropo internacia milito.

Li revenis hejmen kun koro rompita ne nur en senco simbola. La grava kormalsano komenciĝis efektive en tiu ĉi malgaja epoko. Malgaja li rekomencis sian ĉiutagan laboron en Varsovio, ĉiam pli malgaja, kiam li vidis, ke la milito fariĝas ĉiam pli kruela kaj la espero pri baldaŭa fino estas pli kaj pli malcerta.

Kiel juna kuracisto mi jam helpadis al mia patro en lia medicina laboro. Li intencis nur iom post

iom enkonduki min en sian kuracistan praktikon kaj tute ne supozis, ke tio okazos subite. Kaj jen la 22-an de novembro 1914, dum la nokto, la patrino vekis min kaj, terure timigita, vokis al la patro, kiu sidis sur la lito kun vizaĝo pala kiel papero. La unuan fojon en mia vivo mi aŭdis la patron ĝemi. Li suferis pro fortega doloro de koro. Mi tuj decidis telefoni al iu sperta kuracisto inter la kolegoj kaj amikoj de mia patro, sed li energie malpermesis al mi tion fari, dirante, ke li ja mem estas kuracisto, kiu scias tre bone, ke la atako baldaŭ pasos, kaj li ne volas maltrankviligi kolegojn dum la nokto sen vera bezono. Tamen la doloro daŭris kaj mi, malgraŭ la malpermeso, venigis unu el amikoj de la patro, doktoron Kunig, faman specialiston de kormalsanoj. Kiam li alvenis, la patro jam fartis pli bone kaj forte riproĉis min pro mia malobeo. Tamen montriĝis, ke la stato de la koro estis tre grava kaj la patro estis devigita resti en la lito kelkajn tagojn. Mi dume anstataŭis la patron en lia kabineto por malriĉaj pacientoj, kiuj ĝis tiam grandamase vizitadis lin por demandi konsilon kaj kuracon kaj de tiu momento mi ne plu allasis lin al tiu vere laciga matenlaboro. Depost tiam li havis matenojn liberajn por labori nur por Esperanto, akceptis pacientojn nur dum du horoj posttagmeze kaj nun jam ne estis devigita sidi ĝis postnoktomezo apud sia skribtablo por fari sian laboron esperantan. Sed denove, kvankam pli trankvile, li laboris dum tuta tago senripoze, preskaŭ ne elirante el la domo. Vane lia zorgema edzino preskaŭ forpeladis lin ĉiutage eksteren, por ke li ĉerpu iom da freŝa aero, movigu la kruojn kaj ventumu la cerbon. Ne ekzistis interesaj lokoj por promeno en la ĉirkaŭaĵo de la strato Dzika, en la malriĉa, sed plena de bruo kaj movado juda kvartalo. Oni devis veturi malproksimen per tramo aŭ droŝko, por serĉi iom da verdaĵo kaj pura aero. Tial ni pensis, ke estus pli bone por la patro, se li loĝus ie apud ĝardeno, ĉar li certe pli volonte farus almenaŭ malgrandajn promenojn, kiuj ripozigus lin kaj bone influus la staton de lia sano. En julio de la jaro 1915 miaj gepatroj transloĝiĝis en la straton Królewska, apud la centra urba ĝardeno. Tie ĉi la kondiĉoj por trankvila laboro estis vere bonaj, des pli, ke la patro povis pli facile forgesi

*) (Presita en "Pola Esperantisto" 1957).

la fakton, ke li ne plu estis kapabla al tiel laciga laboro, al kiu li estis al kutimigita en la malnova loĝejo. Nur malmultaj pacientoj estis allasitaj al lia kuracista kabineto kaj ili ne forrabadis al li la tempon, kiun li pli volonte uzis por sia kara ideo.

Li ofte diradis ke li estus feliĉa, se li povus labori la reston de sia vivo nur por kaj per Esperanto. Li tamen neniam bedaŭris, ke li rezignis de ĉiuj personaj rajtoj koncerne la lingvon mem, sed li esperis, ke eble per sia laboro kiel verkisto kaj tradukisto li povos gajni sufiĉe por la ĉiutaga pano.

La programo de lia tago estis tre precize ellaborita. Ĉiutage dum kelkaj horoj li tradukis en Esperanton la plej gravajn verkojn de la tutmonda literaturo. Estis lia intenco eldoni grandan klasikan bibliotekon, enhavantan kelkajn paralelajn fakojn. Li supozis, ke la fako literatura povos certigi al li konstantan perlaboron kaj permesos al li samtempe okupiĝi pri aliaj fakoj, destinitaj al la lingvaj esploroj, meditoj kaj rememoroj, priparoloj pri filozofiaj kaj etikaj demandoj.

La ideo de homaranismo multe okupis mian patron en tiu ĉi epoko. Li revis pri fondiĝo de "neŭtrallingva kulturejo, kie la adeptoj de la pure homa etiko povus kuniĝi por diskuti pri diversaj demandoj. Dume li intencis aranĝi "akcepttagojn" por tiu ĉi celo. La simpatianoj de la ideo kolektiĝus por amikaj interparoladoj "por ekzerci la koron kaj spiriton".

La rompo de ĉiuj internaciaj rilatoj, kaŭzita per la milito, estis tre peniga por la aŭtoro de Esperanto, al kutimigita al la intensa interŝanĝo de ideoj kun samideanoj de la tuta mondo. Li tre suferis pro la perforta izoleco, kvankam kelkaj esperantistaj amikoj ofte lin vizitadis. Inter tiuj amikoj la plej ĝojiga estis ĉiam Grabowski, kiu en tiu tempo tradukis "Sinjoron Tadeo" de Mickiewicz kaj de tempo al tempo vizitadis mian patron, por tralagi la novajn ĉapitrojn de tiu ĉi majstra verko. Lia entuziasma deklamado de la vere belsona traduko treege interesis mian patron, ĉar en la buŝo de Grabowski Esperanto efektive vivis kaj brilis. Ankaŭ la belege konstruitaj kaj libere fluantaj paroloj de Leo Belmont faris al la patro grandan plezuron. Tre ĝoje vidita gasto estis profesoro Odo Bujwid, la universitata kolego de mia patro kaj lia granda amiko kaj fidela samideano. Kun Wiesenfeld li tre volonte diskutadis pri lingvaj demandoj. Kelkaj aliaj samideanoj de tempo al tempo forpeladis la ombron de izoleco; inter ili estis la tiama havena komandanto de Varsovio dum germana okupado, majoro Neubarth. Sed neniam mia patro ĉesis esti optimisto kaj ĝis la lasta momento de sia vivo forte kredis, ke baldaŭ la terura milito cedos la lokon al la forta kaj frata kunlaborado de ĉiuj popoloj.

En sia laboro li estis tre regula kaj sistema. Lia ĉiutaga tasko estis antaŭfiksita kaj devis esti nepre

plenumita: tiom da paĝoj de traduko ĉiutage, tiom dum la monato. Mi ofte admiris la akuratecon, kun kiu la laboro estis finita laŭ la dato notita en la kalendaro je la komenco. Kaj se ekzemple tri tagoj estis fiksitaj por ĝoja ripozo post la fino de la traduko de la Biblio, la fabeloj de Andersen jam estis sur la skribtablo precize en la kvara tago. Sed baldaŭ la kormalsano ĉiam pli ofte malhelpadis la regulan laboron ĉe la skribmasino. De tempo al tempo li devis resti kelkajn tagojn en la lito por fortigi la koron. Sed li ne povis resti eĉ unu tagon sen laboro. Lia cerbo ne toleris ripozon. Kaj eĉ malsana, li faris notojn en malgranda poŝkalendaro, kiu ĉiam troviĝis sur la noktotablo. Kaj se foje ni singarde volis eniri en lian ĉambron, por rigardi ĉu li dormas aŭ eble ion bezonas (li neniam mem vokis iun), ni preskaŭ ĉiam vidis lin kun kraĵo en la mano. Li ĉiam meditis, notis, forstrekis, denove skribis, laŭ la devizo, ke oni ĉiam devas noti bonajn pensojn, ĉar alie oni ilin facile forgesas.

Li multe fumis, kaj la kuracistoj malpermesis al li la fumadon, pensante, ke tiamaniere oni pli bone subtenos la forton de lia koro. Li efektive ĉesadis fumi kelkajn fojojn, kaj en la kalendaro ni trovas kelkfoje la noton: "lasta fumado". Sur unu karteto ni trovas surskribon: Ne fumis 20.III. — 3.V. . . . 20.V. — 27.V. . . . 12.VII — 25.VII. 15.VIII. — 25.VII. . . . Tiuj notoj estis faritaj en la jaro 1916. Sed tiu senigo de cigaredoj estis por li vera sufero, eble ne tiom pro la kutimo mem, sed precipe pro tio, ke li tute ne povis labori sen fumado. Tio estis la sola kaŭzo, ke post kelkaj tagoj aŭ semajnoj li denove rekomencadis fumi, dirante ke li preferas vivi iom pli mallonge kaj ion krei, ol vivi longe, sed senutile. Se li tamen tiel ofte ĉesadis la fumadon, tio pruvas nur, ke la ripetaj atakoj de kordoloro estis sufiĉe gravaj.

La lastaj semajnoj de lia vivo estis por li tre malĝojaj. Li denove jam ne fumis, sed ankaŭ ne plu faris notojn en sia kalendaro, ĉar, devigita resti en lito pro grandaj suferoj, li estis tiel malfortigita, ke estis al li malfacile iom skribi. Kvankam li neniam plendis, ĉar li ne volis, ke iu alia ankaŭ suferu, kiam li suferas, tamen li aspektis tiel malĝoje kaj kompatinde, kiel neniam ĝis tiam ni lin vidis. Sed ŝajnas, ke ĝis la morto li ne tiom pensis pri si mem, kiom pri sia kara ideo, per kiu li volis feliĉigi la homaron, kaj li sentis sin vere malfeliĉa, ke pro la malsano li ne plu povis plenumi sian ĉiutagan taskon, kiu devis konduki lin al la venko.

La lastan tagon de la vivo li fartis pli bone. Ŝajnis al li, ke li denove povos rekomenci la laboron, kaj tiu penso bone influis lian humoron. Sed lia koro ĉesis bati, eble en la momento, kiam li pensis:

Ho, mia kor', ne batu maltrankvile. . . .

Pri la Mondlingva Problemo^{*)}

de

Prof. D-ro Paavo Ravila (Finnlando)

La fakton, ke mi estas petita, estimataj gesinjoroj, elparoli ĉi tie kelkajn vortojn, mi eble rajtas interpreti tiel, ke oni deziris, en ĉi tiu festo dediĉita al la memoro de rimarkinda personeco kaj lia vivoverko, aŭdi ankaŭ la pensojn de lingvisto, kiu ne mem kalkulas sin inter la faktaj esperantistoj.

La problemo pri mondlingvo ja sendube estas hodiaŭ multe pri urĝa ol tiam, kiam Zamenhof kreis Esperanton. Kaj tamen ni ankoraŭ estas tre malproksimaj de la racia solvo.

La kapturiga evoluo teknika de la lastaj tempoj multe proksimigis la popolojn unu al la alia, kaj malgraŭ la militoj kaj malamikecoj la bezono de internacia komunikado kreskis egalpaŝe kun la eblecoj. La gazetoj, kun grandega disvastiĝo, atingas sian legantaron eĉ en la plej malproksimaj regionoj, en la daŭro de kelkaj horoj, kaj la parolata, viva vorto povas trafi sian aŭskultanton kie ajn. Estu kio ajn la enhavo de nia esprimo „homa kulturo”, ĝian plej profundan esencon verŝajne respiegulas la konstanta batalo kontraŭ la katenanta efiko de la spaco kaj tempo. Ni povas diri, ke almenaŭ la voĉondoj de radiodisaŭdigo venkis la limojn en la spaco, kaj la delikataj metodoj de konservado de homa voĉo estas trofeoj el la kampanjo kontraŭ la tempo. Tio, kion ni hodiaŭ parolas kaj diras, povas esti reproduktata preskaŭ same freŝe kaj klare post kiel ajn longa tempo. Tio, kion ĝis nun la tempo malaperigis en efemera momento, povas nun vivi jaron post jaro, teorie tiel longe kiel la homo kaj lia kulturo. En la mondo de lingvo kaj lingvoj tio estas netakseble grava. La konstantan ŝanĝiĝon kaj malkonverĝadon anstataŭas konserviĝo kaj intersimiliĝo. La studento de la lingvo-historio scias el la spertoj de sia ĉiutaga laboro, kion tempo kaj spaco signifas en la vivo de lingvo. Kiam la geografiaj kontaktoj rompiĝas aŭ malfortiĝas, la kohereco de la lingvo neeviteble disbloviĝas. Ekestas konstante novaj dialektoj, kaj la diferencoj povas tiom kreski, ke anstataŭ unu lingvo ni havos plurajn. En la fluo de la tempo siaparte la malfortiĝo de la ligoj inter la generacioj havas saman rezulton. En kelkaj jarcentoj la lingvo povas tiel malsamiĝi, ke nur lingvosciencisto kapablas vidi la komunan trunkon.

La presarto kaj efika instrua sistemo jam longe influis stabiligante la lingvojn. Ni ja povis konstati, kiel la dialektoj malaperas antaŭ niaj okuloj, kaj ilin anstataŭas komuna nacia lingvo. Sed nur la lastatempa progreso de la tekniko kreis la plejnajn premisojn por tiu evoluo. Sekve, ni povas diri,

ke la eksteraj premisoj por la solvo de la mondlingva problemo jam ekzistas: la ekzisteblo de komunlingvo, kiu restas konstanta je la fonetika sistemo kaj gramatika strukturo, estas garantiita. Ni ne plu bezonas timi, ke la lingvo baldaŭ ree disdialektiĝos.

Sed ĉu estas same kio koncernas la internajn premisojn?

Por respondi al tiu demando, ni devas klarigi al ni kelkajn fundamentajn faktojn. Lingvo kaj kulturo estas nedisigeble interligitaj. La vera kaj nefalsa interpretanto de nacia kulturo povas esti nur la propra gepatra lingvo. Forlaso de la hejma lingvo signifas samtempe rezignon pri sia nacieco. Certe oni povus imagi, ke simile kiel la gentoj kunfandiĝis en naciojn, la nacioj iom post iom formus pli grandajn unuojn, tiel ke fine en estonteco naskiĝus vera tutmonda ŝtato baze de kohera tutmonda kulturo kaj unusola tutmonda lingvo. Ĉi tiaj piaj kosmopolitikaj utopioj tamen estas de sama klaso kiel la revoj pri miljara regno. Ni vidas hodiaŭ fortajn tendencojn krei koheran Eŭropon, sed serioza propono pri tio, ke ĉi tiu tre esperinda celo estu atingota per malaperigo de naciaj unuoj kaj sur bazo de unu sola tuteŭropa lingvo, ne ekzistas. La angla lingvo ne povas, pli ol la franca aŭ la germana, respieguli la tutan eŭropan kulturon; ĝi reprezentas nur unu flankon, certe gravan, de la eŭropa kulturo. Eĉ nordlanda solida kohereco ne estas planebla sur tiu bazo, ke la norvega, dana kaj sveda lingvoj estu kunfandotaj en unu lingvon. Se iu premias tian aspiron kiel bazon de la kunagado, li farus veran ursan servon al la solida kunlaboro. La popoloj, kiuj atingis certan gradon de matureco, insiste gardas kun plena rajto sian hejman lingvon kaj ne volas eĉ pridiskuti tian perspektivon, kiu signifus la malaperon de la nacia lingvo. Samtempe, kiam la malgrandaj naciaj lingvoj sekurigis al si pozicion, la nombro de la granda, kulturlingvoj rapide kreskas. La vekigi de la aziaj popoloj kun centmilionoj da membroj estas fakto, kaj iliaj lingvoj postulos kaj akiros baldaŭ gravan pozicion en la internacia vivo. La levigado de la rusa lingvo inter la plej gravajn grandajn lingvojn de la mondo nenio povos kontraŭstari. En ĉi tiuj cirkonstancoj laŭ mia kompreno nenio krom

*) Parolado de prof. d-ro Paavo Ravila, eksrektoro de la Universitato de Helsinko, membro de la Akademio de Finnlando kaj de la Internacia Patrona Komitato de la Zamenhof-jaro, en la Zamenhof-festo la 20-an de septembro 1959 en la malgranda Solena salono de la Universitato de Helsinko.

planlingvo povas certigi vastan, universalan komunikadon inter ĉiuj popoloj. Kaj precipe el la vidpunkto de malgrandaj nacioj ĉi tio estas ekstreme grava. La sintrudo de fremda, vivanta nacia lingvo en dominantan pozicion en la vivo de malgranda lando signifas fakte la iom-post-ioman morton de ĝia nacia kulturo. Ĉar oni ne imagu, ke la fremda lingvo venos nur kiel lingvo, ĝi kunportas sian kulturon, ĉar, kiel mi diris, lingvo kaj kulturo estas nedisigeble interligitaj. Pro tio devus precipe la malgrandaj nacioj, kiuj amas sian sendependecon, forte favori la aferon de planlingvo.

La memcentra misia fervoro de ni, eŭropanoj, kiuj opiniis ke la eŭropa kulturo kiel tia estus taŭga kaj sufiĉa por ĉiuj popoloj de la mondo, suferis lastatempe grandan malvarmiĝon. Ni devis konstati, ke la vekigo de la popoloj bazas sin sur ilia propra tradicio, kiu en kelkaj okazoj estas multe pli grandaĝa ol la nia. Ekzistas tamen terenoj, sur kiuj la eŭropa kulturo fakte estas agnoskita kaj aprobita kiel universale taŭga. Mi celas la sciencon kaj teknikon. Neniu popolo povas atingi internacian nivelon de plenaloreco, se ĝi ne enkorpiĝis al si ĉi tiujn eŭropajn atingojn. Kaj ĉar

la terminologio de scienco kaj tekniko estas esence grek-latina, oni povas diri, ke planlingvo, kiu konstruas sian vortaron baze de tiu heredaĵo, havas certan rajtigon al vera universaleco.

La solvo de la mondlingva problemo estas en la manoj de ŝtatestoj kaj ne de la lingvistoj. La esperantistoj montris per sia neprofitema kaj idealala laborado, ke ili povas proponi taŭgan instrumenton, konstruitan sur ĝustaj principoj. Estas bedaŭrinde, ke de flanko de tiuj, kiuj direktas la sorton de la nacioj, oni montris malmultan intereson al ĉi tiuj problemoj. En la jaro 1886 Friedrich Nietzsche antaŭ'ris, ke oni konstruos, en malproksima estonteco, novan lingvon, kiun oni uzos unue en la komerco, poste en la intelekta kunlaboro de ĉiuj popoloj. Tiel okazos, li diris, same certe, kiel la aerveturado foje estos realigita fakto. La flugado estas hodiaŭ ĉiutaga, sed la urĝa problemo pri mondlingvo ankoraŭ atendas sian solvon. Aspektas en la nuna momento, ke la homoj pli frue trovos vojon tra la spaco al novaj planedoj ol la rektan vojon al siaj najbaroj.

(Tradukis Vilho Setälä)

Pensoj de Zamenhof:

Pri la evoluo de la Internacia Lingvo

„Kion ajn vi devos fari, prezentu al vi de nun ĉiam, ke la iniciatoro de la lingvo jam ne ekzistas, ke ekzistas nur la lingvo mem kaj ĝia popolo (la esperantistoj). La nuna vortaro de nia lingvo estas multege pli riĉa ol la vortaro de ĉia juna, ankoraŭ ne sufiĉe potenca popolo; sekve se en tiuj lingvoj rapida riĉigado de la lingvo per fortoj komunaj iras tre facile kaj rapide, des pli facile ĝi iros en nia lingvo”. (Originala Verkaro, p. 217.)

„La evoluado de la lingvo fariĝos plej kredeble nur per tiu sama natura vojo, per kiu ĝi fariĝis en ĉiu alia lingvo, t.e. per la senrompa vojo de neologismoj kaj arĥaismoj”. (Originala Verkaro, p. 399.)

„Vi diras, ke la aperado de novaj vortoj faras la lingvon pli malfacile ellernebla. Sed kial? Ili ja tute ne elpuŝas la antaŭajn vortojn kaj ne ŝanĝas en io la ĝisnunajn principojn de la esperanta vortfarado. Ili ja servas nur por la okazoj de efektiva bezono kaj garantias kontraŭ la Babilona konfuzo,

kiu aperus, se en okazoj de bezono ĉiuj aparte kreus vortojn *malegalajn*: sed kiam oni tiujn vortojn ne bezonus, oni ilin ne uzas”. (Originala Verkaro, p. 429.)

„Ĉiu, kiu legis la antaŭparolon de la „Fundamento de Esperanto”, scias tre bone, ke ĝi ne sole ne prezentas ian baron kontraŭ la evolucio de la lingvo, sed kontraŭe, ĝi donas al la evolucio tian grandegan liberecon, kiun neniu alia lingvo jam posedis eĉ parte... Se la esperantistoj ĝis nun tre malmulte faris uzon de tiu granda libereco, kiun la Fundamento al ili donas, ĝi ne estas kulpo de la Fundamento, sed ĝi venas de tio, ke la esperantistoj komprenas tre bone, ke lingvo, kiu devas trabati al sia la vojon ne per ia potenca dekreto, sed per laborado de amasoj, povas disvolviĝi nur per tre singarda vojo de natura evolucio, sed ĝi tuj mortus, se oni volus ĝin disvolvi per kontraŭ-natura kaj danĝeriga vojo de revolucio”. (Originala Verkaro, p. 446.)

La Genio de Zamenhof: Efekta Lingvo

de

Vilho Setälä (Finnlando)

Pri efekto en la senfigura senco de la vorto ni kutimas paroli nur en tekniko, pensante pri la efiko ricevita kompare kun la energio uzita. Ĝis niaj tagoj neniu pensis pri tio, ke ankaŭ lingvo estas instrumento de homa agado, pri kies efekto oni povas paroli.

Ĉio, kion ni konas pri la estiĝo de Esperanto montras, ke D-ro Zamenhof pli sekvis intuicion ol teoriajn rezonadojn kaj konkludojn. Intuicie ankaŭ la lernanto de Esperanto estas ravata per la genia konstruado de la lingvo kaj ĝuas pri la rapida progreso, kiun li faras iom post iom ekposedante ĝian sistemon de esprimado.

Same intuicie prijuĝas la pedagogoj la lernadon de lingvoj. Antaŭ nelonge okazis en Stockholm konferenco de la instruistoj de modernaj lingvoj, kie la centra problemo estis la instruado de la angla lingvo. Instrua konsilanto Birger Thoren menciis en sia referato, ke la kompreno de ordinara angla teksto (sen fakaj terminoj) postulas minimume konon de 10.000 vortoj (el la 25.000 plej ordinaraj); el tiuj la svedaj abiturientoj tamen konas nur 7000, kaj eĉ el tiuj nur 3000 aktive, dum la resto, 4000, estas konataj nur pasive, tio estas per la helpo de kunteksto. En la kadro de la nuna instrua plano oni tamen ne povas pligrandigi la kvanton de lecionoj por la angla lingvo, pro kio estus gravege koncentri la instruon al la vere kerna vortaro.

En la citita informo estas pluraj neprecizaj detaloj. Antaŭ ĉio ne estas precizigita, kion signifas "kompreno". Eĉ en "ordinara" teksto kelkfoje — estu tre malofte — aperas vorto kiu ne apartenas al la 25.000 "plej ordinaraj" vortoj, kaj la sola bazo por la prijuĝo de la grado de kompreno estas studo de la kvoto de nekonataj vortoj renkontataj en hazarde elektita, sufiĉe ampleksa teksto. Tio signifas statistikan studon de la lingvo, kiu ja donas ne absolutajn sed probablajn rezultojn, sed tamen multe pli ekzaktajn ol nura intuicia prijuĝo.

Mi ne intencas enprofundiĝi en la detalan studon, pri kiu mi povas aludi al mia studo en "Esperantologio", I.1. (1949). Sed ni faru komparon inter la angla kaj esperanta lingvoj sur la bazo de rezultoj deriveblaj per la vortostatistiko. Por tiu celo mi donas tabelon jenan:

Resto de nekonataj vortoj en ordinara teksto	Lernitaj vortoj	
	Angla	Esperanto
16%	1400	550
10	2350	790
7	3000	965
3,2	4700	1400
1,0	7000	2000
0,25	10000	2800
0,15	?	3000

La ekzemplaj ciferoj estas elektitaj parte por povi kompari ne nur saman kvoton de kompreno, sed ankaŭ la efekton ĉe kono de sama vortrezoro.

La supre citita plej granda nekompreno (16%) signifas ja tute nekontentigan staton de kompreno: la legado de verko, kie ĉiu sesa vorto devas esti serĉata el vortaro, estas tro peza kaj malkuraĝiga eĉ por lernanto. Sed aliparte, montriĝis, ke eĉ tiel malgranda lingvoscio, se la konataj vortoj vere estas elektitaj el la plej ofte bezonataj, donas la eblecon interkompreniĝi en simplaj, ĉiutagaj temoj. Ĝuste ĉi tie la bezona vortrezoro angla kaj esperanta ne estas strikte kompareblaj, ĉar laŭ la esploroj de Thorndike jam la 850 plej oftaj anglaj vortoj havas sume pli ol 21.000 sencojn, dum la 550 bazaj vortoj de Esperanto estas praktike po unusencaj. Des pli okulfrapa estas la konstato, ke jam tiu vortnombro, 1400, kiu en angla lingvo sub certaj kondiĉoj donas la eblecon al apenaŭ kontentiga ĉiutaga babilado, en Esperanto sufiĉas por facila legado de ordinara teksto (3,2% da nekonataj vortoj, el kiuj la plej multaj estas tn. internaciaj kulturvortoj).

Se ni nun revenas al la referato de Thorén, la svedaj abiturientoj (versajne tiuj, kiuj bone progresis en la studo de angla lingvo) aktive posedas 3000 vortojn kaj kapablas laŭ la kunteksto diveni la sencon de pliaj 4000. Per tio ili atingas tion, ke la mankanta kompreno restas ĉe 7%, rezulto, kiu en Esperanto estas ricevebla per la kono de malpli ol mil vortoj. Se ni kuraĝas supozi, ke la plej intelektaj lernantoj pli-malpli posedas la 10.000 vortojn, kun ili povas en Esperanto konkuri lernanto, kiu konas 2800 vortojn. La rezulto, nekomprenata resto de 0,25% (2-3 vortoj el mil tekstvortoj), fakte jam signifas posedon de la lingvo. Sed se oni en la lernejo povas atingi la aktivan konon de 3000 anglaj vortoj apud la enkapigo de ĝia gramatiko (12424 formoj laŭ Thorndike) kaj vasta kolekto de fiksjaj dirmanieroj, kiom pli certe oni atingus la aktivan posedon de 2800 esperantaj radikvortoj, apud ĝia simpla gramatiko kaj vortofarado, sen la fiksjaj frazkonstruoj.

Ne estas necese en ĉi tiu okazo studi la rimedojn, per kiuj la efekto de Esperanto estas atingita. Sufiĉas al ni konstati, ke ĝi estas, baze de la vortaro sole, kelkdekoble pli granda ol la efekto de angla lingvo, kiu tamen ĝenerale estas konsiderata unu el la plej facilaj el la historie evoluintaj lingvoj.

La fakto, ke Zamenhof atingis tian rezultaton surbaze de intuicio, klare pruvas la genion de lia spirito.

Esperanto kaj la Teorio de Komunikado

de

Preston Davis, (Usono)

Ankoraŭ tre juna estas la Teorio de Komunikado aŭ Teorio de Informo. La grava artikolo de Claude Shannon, la ĉefa bazo de tiu teorio, publikigis en la jaro 1948. Tamen estas jam evidente, ke ĝi malfermas novajn horizontojn por la lingvistiko, kiel por multaj aliaj studoj, kaj eble precipe por la interlingvistiko.

Shannon estis dungito de la konata Bell Telephone Laboratories, kaj lia matematika teorio kreskis el longa studado de telegrafaj, telefonaj kaj similaj komunik-sistemoj. Sed ĝi estas tiom ĝenerala, ke al studantoj de lingvistiko, de semantiko, de psikologio, kaj al multaj aliaj ĝi ofertas novajn konceptojn. La prezo de tia gajno estas, ke la studanto lernu novan vidpunkton kaj novan metodon de analizo por sia scienco.

Laŭ tiu vidpunkto, ia ajn sistemo de komunikado konsistas el specifaj partoj. La *fonto* kreas informon; la *sendilo* elsendas ĝin; ĝi fluas per *kanalo*. Per la *ricevilo* ĝi fluas al la fina *ricevanto*. Plej ofte ankaŭ eniras *bruo* en la kanalon; ties rezulto estas, ke la ricevado de informo estas pli malpli neĝusta.

Kiajn sistemojn oni povas studi en tiu maniero? Ne nur telefonsistemojn, sed grandegan nombron da naturaj kaj artefaritaj komunikiloj. La sentorganoj, la nervoj kaj nervero, kaj la cerboj de animaloj kaj de homoj estas tiaj komunikiloj. Verkinto kaj leganto, direktanto kaj laboranto, ŝakludantoj, luktantoj — ĉiam ni komunikas, kaj niajn komunikojn oni povas analizi. Kaj el ĉiuj komunikiloj, eble la plej gravaj estas niaj lingvoj.

Tio, kion oni komunikas, estas informo; kaj informo estas la okazo de unu stato el la aro de okazeblaj statoj. Devas ekzisti almenaŭ du statoj, kiujn povas distingi la ricevilo. En simpla telegrafio, la cirkvito dum iu momento estas aŭ fermita aŭ malfermita. La du alternativajn statojn oni uzas laŭ aranĝitaj daŭroj kaj ordoj por komuniki informon. Simile ĉe la nervsistemo ĉiu nervero dum iu momento aŭ kondukas aŭ ne kondukas nerv-signalon.

La elekto de unu el du alternativoj devas esti la plej simpla unuo de informo. Oni nomas ĝin informero, aŭ per la angla vorto *bit*. Oni do povas kalkuli kvantojn da informo per la podua numerosistemo, laŭ kiu oni skribas du kiel 11, tri kiel 100, kvar kiel 101, ktp.; aŭ pli facile kiel logaritmo je la bazo du.

La parolanto de homa lingvo elektas siajn vortojn kaj frazojn ne el du alternativoj, sed el multaj vortmiloj. Tamen por lingvo-analizo oni povas redukti tiun sumon per variaj metodoj. La literoj de iu alfabeto aŭ la fonemoj de iu parolata lingvo ordinare havas nombron malpli grandan ol 50. Se alfabeto konsistas el 32 literoj, kaj se aŭtoro elektas unu el tiuj, lia ago egalas al kvin sinsekvaj elektoj du unu el du alternativoj. Komuniki tiun literon estas komuniki kvin informerojn.

Tia estas la situacio, se nia aŭtoro verkas ĉifraĵojn, kaj se la perdo de nur unu litero ja signifas perdon de informo. Sed la plejparto de aŭtoroj verkas en niaj ordinaraj lingvoj! Se nia aŭtoro skribas, "Estimata sinjorin—," ni estas preskaŭ certaj ke la venonta litero estos "o". Tiu litero "o" alportas al la leganto ne kvin informerojn sed malgrandan frakcion de informero. Ĝi estas plejparte superflua.

Sed supozu nun, ke envenas "bruo" en la sistemon. Eble, kiam ni legas la skribaĵojn, la papero estas makulita. Mankas kelkaj literoj, kaj la restantaj literoj povus esti parto de iu el kvar vortoj. Se ni nun vidas alian literon, kaj se tiu litero difinas por ni, kiu el la kvar vortoj estas skribita, ĝi donis al ni du informerojn.

Tamen oni devas ankaŭ rekoni la fakton, ke ordinare la kvar vortoj ne estas samofte uzataj. Eble unu el ili estas tiom ofte uzata, ke ties okazo estas tiom probabla, kiom la okazo de iu ajn el la aliaj. Difini tiun vorton do estas aldoni ne du sed nur unu informeron.

Laŭ tiaj analizmetodoj oni povas kompari laŭ multaj aspektoj variajn komuniksistemojn kaj lingvojn, ĉu skribatajn ĉu parolatajn. Oni apenaŭ komencis la taskon, kompari en tiu maniero la ĉefajn lingvojn de la mondo. Estas evidente, ke por ekzakta analizo ni devas havigi al ni almenaŭ provizorajn mezurojn de la relativaj oftecoj de la vortoj, la silaboj, kaj la literoj aŭ fonemoj en iu lingvo. Multsignifa parto de la granda tasko estas la kompara studado de Esperanto, la vivanta internacia lingvo. Nun oni povas plezure raporti, ke lastatempe aperis en *Scienca Revuo* bona komenco de tiu tasko de Profesoro Sadler.

Konsideru la superfluecon. Kiel ni notis ĉi-supre, nur ĉifro havas la plenan efikecon, kiun permesas la alfabeto aŭ signaro, kiun ni uzas. Per ĉifra skribsistemo ni povus plej rapide elsendi informon,

sen superflueco. Similas iom al ĉifroj la variaj, preskaŭ forgesitaj projektoj de "lingvo filozofia", kies silaboj aŭ literoj unuope portas la signiferojn de vorto.

Kial la homaj lingvoj, inkluzive de Esperanto, havas superfluecon? Unue ni devas demandi: Kiom rapide la homa ricevanto povas akcepti kaj uzi informon? Uzante nesuperfluan lingvon, oni devus paroli tre malrapide por esti komprenata.

Alia demando koncernas bruon. En ĉiujn agojn de komunikado povas eniri eraroj aŭ miskomprenoj. La aŭskultanto aŭ leganto de filozofia lingvo sendube ofte demandus: "Kion? Kion li diris?" Do ankaŭ tial la parolanto devus malrapidigi sin.

Internacia helplingvo devas esti uzata de ĉiaj personoj kaj de multaj, kiuj ne ankoraŭ bone komprenas ĝin. Do ĝi devus posedi pli ol ordinaran superfluecon. Ĝi devus esti malpli "efika" sistemo, ol la plejparto de la naciaj lingvoj. Precizajn ciferojn pri la superflueco de Esperanto oni ne ankoraŭ havas, sed verŝajne ĝi superas la superfluecon de iu nuntempa eŭropa lingvo.

Oni jam rimarkis, ke en cirkonstanco de granda bruo, Esperanto estas pli komprenebla ol aliaj lingvoj. Tiun rezulton oni povas antaŭdiri ne nur pro ĝia klara fonetiko sed ankaŭ pro la pligranda superflueco de Esperanto.

Kun sia preciza vortaro, Esperanto tre taŭgas por eksperimentoj. Ekzemple, la silabo *kon-* estas la komenca silabo de proksimume 130 vortoj; *ten-*, de proksimume 16. Iu, kiu aŭdas *ten-*, do havas pli da informo ol iu, kiu aŭdas *kon-*; precize, la diferenco estas tri informeroj. Ĉu tio aperus en empiria provo?

La samaj aspektoj de la Esperanta vortaro, inter aliaj faktoroj, taŭgigas ĝin por meĥanika tradukado per la grandaj elektraj kalkulmaŝinoj. Sciencistoj en Usono, Britujo, kaj Sovet-Unio serioze atakas tiun entreprenon dum la lastaj jaroj. Komence ili atentis la teorie ĝeneralajn problemojn de tradukado kaj la specialajn malfacilaĵojn de unu aŭ alia lingvoparo, ekzemple en la traduko el la rusa en la anglan lingvon. Sed lastatempe oni aŭdas, ke en la konata RAND-Korporacio oni maŝintradukas Esperanton. Ni devas nur momente konsideri la regulecon de Esperanto, ĝian simplegan gramatikon, ktp., por konstati la grandan avantaĝon, kiun ĝi prezentas al la meĥanika tradukado.

En meĥanikaj procedoj oni ne bezonas superfluecon, ĉar la brunivelo estas ordinare malalta. Verŝajne oni povas enĉifrigi Esperanton tiamaniere, ke ĝi estu ne nur preciza sed ankaŭ tre ŝparema komunikilo por samtempa telegrafado kaj traduko. Ankaŭ ŝajnas, ke la tradukado el nacia lingvo en Esperanton, kaj inverse, fariĝus multe pli facila ol la tradukado inter du naciaj lingvoj.

Tiel oni povas antaŭvidi la tagon, kiam maŝino en Romo ricevos itallingvan tekston, tradukos kaj elsendos ĝin en Esperanto-ĉifro per radio-ondoj. Maŝinoj en ĉiuj mondpartoj ricevos la signalojn kaj tuj maŝinskribos la tekston, ĉiu en sia hejma lingvo. En la kreado kaj uzado de tiaj maŝinoj, la teorio de komunikado estas tre grava.

Do la teorio de komunikado povas prezenti al la lingvo-sciencaj novajn konceptojn kaj novajn faktojn. Al la Internacia Lingvo ĝi povas alporti eĉ pli gravan rolon: eble ne nur niaj infanoj sed ankaŭ niaj maŝinoj baldaŭ parolos Esperanton!

El: La Vojo

(originala poemo de L. L. Zamenhof)

*Se longa sekeco aŭ ventoj subitaj
Velkantajn foliojn deŝiras,
Ni dankas la venton, kaj repurigataj,
Ni forton pli freŝan akiras.
Ne mortos jam nia bravega anaro,
Ĝin jam ne timigos la vento, nek staro,
Obstine ĝi paŝas, provita, hardita,
Al cel' unu fojon signita!*

*Nur rekte, kuraĝe kaj ne flankiĝante
Ni iru la vojon celitan!
Eĉ guto malgranda, konstante frapante,
Traboras la monton granitan.
L'espero, l'obstino kaj la pacienco, —
Jen estas la signoj, per kies potenco
Ni paŝo post paŝo, post longa laboro,
Atingos la celon en gloro.*

L. L. Zamenhof - Pionira Poeto

de

Marjorie Boulton, M.A., B. Litt. (Anglujo)

La fundamentaj, intimaj motivoj de poetoj estas, verŝajne, emociaj, kaj laŭ la ĝisnunaj psikologiaj esploroj pri poezikreado, tiuj motivoj kaŝiĝas, grandparte, vualitaj en la ombra regiono de la subkonscia menso. La poeto ordinare havas du plenkonsciajn motivojn: deziron esprimi ion belforme, malŝarĝi la psikon per komunikado de iu emocio, iu emocia konflikto, iu forta impresio, iu intelekta dilemo, kaj tiel plu; kaj deziron kvazaŭ ludi inter vortoj, bredi metaforojn, kunmeti interesajn sonojn, fari semantikajn eksperimentojn per pensasocio kaj aliaj rimedoj. Ĉiu granda poeto posedis forte individuecan personecon, plus fortan perceptemon pri la detalaj karakteroj de sonoj kaj vortoj.

Flankaj, aldonaj motivoj tamen ne mankas. Inter la ambicio al renomo, la deziro plaĉi al alia persono, la intenco servi al Dio aŭ al iu politika, etika aŭ religia celo, la venĝosento de la persona satiristo kaj la sorĉemo kiu, kvankam primitiva, eĉ hodiaŭ iom rilatigas aŭtentikan poezion kun magio, troviĝas la flankaj motivoj de lingva patriotismo. Tiun motivon pluraj gravaj poetoj konsciis plene, eĉ deklaris: ekzemple Milton kaj Dante verkis parte latine, kaj iliaj poemoj respektive anglaj kaj italaj konscie celis (kompreneble inter aliaj celoj) honori la nacian lingvon, ankoraŭ ne estimatan samnivele kiel estis la latina.

Cent jarojn post la naskiĝo de L. L. Zamenhof, aŭtoro de la Internacia Lingvo, Esperanto, kaj pli ol sepdek jarojn post la apero de Esperanto en la mondo, ni povas serioze konsideri la surprize estimindan kvanton de poemoj verkitaj originale en la Internacia Lingvo. La lingva motivo — kvankam pri lingvo ne nacia sed internacia — estis ekde la komenco, kaj ankoraŭ restas, aparte forta inter Esperantaj verkistoj.

Esperanto vivis, vivadas kaj estas nun uzata de multaj homoj same efike kaj tute same naturece kiel la naciaj lingvoj, ĉar la kreinto, Ludoviko L. Zamenhof, estis esence praktika homo, pelita al lingvaj esploroj per etikaj motivoj: la deziro interkomprenigi diversajn naciojn kaj tiel helpi al ilia pacigo. Li deziris, ekde la komenco, krei ne lingvan kuriozaĵon, ne teorie modelan, matematike ordigitan kabinetan lingvaĵon, sed veran lingvon vivkapablan, kiu faciligos ĉiusecan vortan komunikadon. Tial li ekprovis sian lingvon tuj; li tradukis el diverslingvaj klasikaĵoj, verkis specimenajn leterojn kaj eĉ submetigis la lingvon al la plej severa provo kiun oni povas uzi pri lingvo ankoraŭ ne parolata: li penis verki poemojn per ĝi.

Fakte la sola peceto de primitiva Esperanto — la pra-Esperanto de 1878, kiam Zamenhof estis ankoraŭ gimnaziano — kiu estas ĝenerale konata, kaj kiu multe malsimilas de la nuna lingvo, estas kvarversa strofo.

Post la apero de tiu pra-Esperanto, en privata rondeto, personaj cirkonstancoj, ofte tragikaj, silentigis Zamenhof dum naŭ jaroj. La unua libro pri Esperanto aperis en 1887. Ĝi estis ruslingva broŝureto kiu konsistis el klariga antaŭparolo, malgranda gramatiko, malgranda vortaro Esperanta-rusa... kaj ses specimenoj de la nova lingvo.

Tiuj specimenoj estis: *Patro Nia*; kelkaj versoj el *Genezo*; modela letero; kaj tri poemoj.

La apero de poemoj, eĉ se nur kiel specimenoj, en lingvo kiun, tiepoke, verŝajne nur unu homo en la tuta mondo perfekte scipovis, atestis grandan seriozecon kaj estis en si mem granda psikologia kaj lingva kuriozaĵo. Pli strange estis, ke kvankam unu el la tri poemoj estis traduko el Heine:

"En sonĝo princonon mi vidis..."

du el ili, *Mia penso* kaj *Ho, mia kor'*, estis originalaj poemoj de L. L. Zamenhof: originalaj pioniraj poemoj, verkitaj en tute esterordinara lingva soleco, de la kreinto de la lingvo mem. Kredeble tiuj poemoj estas unika literatura fenomeno.

Oni tre nature atendus, ke poemoj verkitaj en tiaj cirkonstancoj estus kabinetaj ekzercoj; ke, ne havante la ecojn de aŭtentika poezio, ili je la plej bona eblo nur montrus, ke per la nova lingvo oni povas fari skandebajn kaj rimantajn versaĵojn. Tute male. L. L. Zamenhof estis homo tre malegoisma; kiam li poste iĝis fama, li ĉiam kondutis ege modeste; lia prefero ne paroli pri si mem impresis liajn samepokanojn kiel sincera; sed tiuj du originalaj poemoj estas profunde personaj. Ili estas inter la tre malmultaj intimaj konfesoj de L. L. Zamenhof. Dum la jaroj de granda spirita soleco, suferanta junulo malpezigis sian koron per poemoj — en sia nova lingvo. *Mia Penso* estas kvarstrofa poemo en kvartrokeoj; ĝi fluas melodie, agrable; kaj se la rimoj (laŭ sistemo *abcdcd*) nuntempe ŝajnas iom banalaj, siatempe ili ne estis tiaj. La poemo estas multe pli ol sensanga kabineta ekzerco. Ĝi rakontas kiel junulo aŭdas amikinon kanti pri espero; kiel ŝi demandas pri lia silentemo: kaj en la tria strofo tiu junulo eksplodas amare:

"Mia penso kaj turmento,
Kaj doloroj kaj esperoj!
Kiom de mi en silento
Al vi iris jam oferoj!"

Kion havis mi plej karan —
La junecon — mi ploranta
Metis mem sur la altaron
De la devo ordonanta !”

Tiu oferadinta junulo certe estas la aŭtoro mem.
L. L. Zamenhof tre ŝatis dancadon kaj havis grandan kapablon ĝui societajn plezurojn; sed lia celo postulis eĉ de studento grandan sindediĉon :

”Fajron sentas mi interne,
Vivi ankaŭ mi deziras, —
Io pelas min eterne,
Se mi al gajuloj iras”

kaj tiu poemo finiĝas per sopiro al morto en espero, se la laboro ne povas sukcesi.

Tiu ĉi unua Esperanta poemo, kvankam teknike adekvata, ne estas granda poemo; ĝi gravas pli kiel pionira verko ol kiel artaĵo. La alia originala poemo en la unua libro estas teknike eĉ pli matura kaj kontentiga :

Ho, mia kor' ! Post longa laborado
Ĉu mi ne venkos en decida hor' !
Sufiĉe ! trankviliĝu de l'batado,
Ho, mia kor' !”

”Ho, mia kor', ne batu maltrankvile,
El mia brusto nun ne saltu for !
Jam teni min ne povas mi facile,
Ho, mia kor' !

La urĝaj kvinjamboj kaj la subite haltigitaj finaj dujamboj ja sufiĉe bone spegulas la fizikajn ritmojn de forta emocio. Kvankam la imago de korbato kiel simbolo de krizanta emocio estas stereotipa, tiu ĉi poemo eble ankaŭ portas iomete de la mistera profetemo, la organika sinkompreno, de la subkonscia menso : Zamenhof, dum granda parto de la vivo, multe suferis pro grava kormalsano.

Post la apero de la unua libro, la tuta restanta vivo de Zamenhof estis laborplena. Tiu malsana, modesta, malgranda viro faris laborprogramon preskaŭ superhoman : li tradukis, korespondis, organizis, kun heroa sindediĉo al sia etika celo, ĝis la morto. Li estis sendube homo kun granda krea talento kaj krea emo; la kreado de vivkapabla lingvo pruvas tion; sed la lingvokreado verŝajne preskaŭ elĉerpis la plej viglan kreaforton de la junaj jaroj :

”Kion havis mi plej karan” !

La kongresaj paroladoj de Zamenhof kelkloke montras la saman emocian energion, la saman personan psikan aŭtentikecon kiel la du pioniraj poemoj; sed lia literatura laboro konsistis plejparte el tradukoj (ĝenerale bonegaj) kaj traktaĵoj. Li verkis dum la restanta vivo nur sep aliajn poemojn.

La Espero estas poemo, tristrofa, okversa, kvin-troka, kun rimsistemo *ababcdcd* pri la interpaciga celo de Esperanto. Kun la simple impona melodio de Ménil, ĝi estas la tradicia Himno de la Esperanta Movado. Kiel himno ĝi tre bone taŭgas; kiel poemo ĝi havas la mankojn de preskaŭ ĉiuj naciaj himnoj, kvankam la ideoj estas morale pli estimindaj : poezio kaj sloganoj ne facile kunekzistadas.

La Vojo, ankaŭ ofte kantata, estas pli melodiana; ritme kaj forme ĝi estas pli subtila, kaj, kvankam la metaforoj estas banalaj, ili estas tiel lerte kunmetitaj ke la tuto ankoraŭ portas ian stimulan emocian urĝecon :

”Tra densa mallumo briletas la celo,
Al kiu kuraĝe ni iras.
Simile al stelo en nokta ĉielo,
Al ni la direkton ĝi diras.
Kaj nin ne timigas la noktaj fantomoj,
Nek batoj de l'sorto, nek moko de l'homoj,
Ĉar klara kaj rekta kaj tre difinita,
Ĝi estas, la voj' elektita”.

La regula akcento de Esperanto, sur la antaŭlasta silabo, kompreneble faciligas la uzon de trokeoj kaj amfibrakoj, same kiel la sama regulo de la pola lingvo. (Zamenhof estis rus-pola hebreo en la litova regiono de la tiama cara imperio. Lia gepatra lingvo plej probable estis la rusa, kies akcento estas varia; sed li perfekte scipovis la polan). Sed la uzo de amfibrakoj en tiu poemo estas tre viva kaj vigla. Emocio ĉeestas, kaj la fizikaj ritmoj de persista laboremo. La poemoj daŭras pri necesa penado kaj pri ”l'espero, l'obstino kaj la pacienco”. Ĝi estas, iasence, kuraĝiga poemo por iu ajn kiu laboras por celo ankoraŭ minoritata.

Zamenhof verŝajne ŝatis amfibrakojn, ĉar li uzis ilin duan fojon en sia poemo *Preĝo sub la verda standardo*, ideo lia plej profunda poemo. En tiu sesstrofa poemo Zamenhof esprimas siajn ideojn pri mondreligio, kaj preĝas al la Dio de la tuta homaro, petante pacon kaj la unuigon de la homaro, promesante labori pro tiu celo. Dum multaj jaroj amikoj devigis al Zamenhof ideo malfortigi la poemon, forigante la sesan strofon, laŭ kiu kristanoj, hebreoj kaj mahometanoj ĉiuj estas filoj de Dio; la kristanaj amikoj en Francujo timis, dum la Dreyfus-epoko, ke tiu koncepto kompromitos Esperanton en la okuloj de multaj.

Ankaŭ teknike tiu poemo estas inter la plej bonaj, kiujn Zamenhof verkis. La metriko estas pli interesa; uzante kvar, tri aŭ du amfibrakojn, li sukcesas doni urĝecan movadon al ĉiu strofo kaj fini ĉiun strofon per emfaza, kvazaŭ liturgia paŭzo. Denove ni sentas, tra la relativa banaleco de la imagoj, la sincerecon de tiu soleca, miskomprenita kaj humana spirito :

"Al Vi, ho potenca senkorpa mistero,
Fortego, la mondon reganta,
Al vi, granda fonto de l'amo kaj vero
Kaj fonto de vivo konstanta,
Al Vi, kiun ĉiuj malsame prezentas,
Sed ĉiuj egale en koro Vin sentas,
Al Vi, kiu kreas, al Vi, kiu reĝas,
Hodiaŭ ni preĝas".

El la kvar restantaj poemoj de tiu unike stranga poemaro, tri ne meritas multan komentadon. *Al la Fratoj*, kiu aperis en 1889, estas la plej longa poemo de Zamenhof; ĝi enhavas dekkvar kvarversajn strofojn. Zamenhof sendube verkis ĝin, eble rapide, por edifi kaj kuraĝigi siajn kolegojn dum la plej fruaj jaroj de la Esperanta Movado. Espereble ĝi tiel efikis, sed kompare kun liaj aliaj poemoj ĝi estas ĝene mallerta metrike kaj eĉ vortorde; tute kejlaj vortoj troviĝas en ĝi multfoje, dum la aliaj poemoj de Zamenhof estas klaraj, rektaj, koncizaj; la senduba sincereco de la kuraĝiganto estas sufokita en la malbona versfarado. *Al la Esperantisto* estas ideo kaj cele tre simila, sed teknike multe pli bona. Ĝi estas la sola originala poemo en kiu Zamenhof uzis jamban ritmon. *Saluto al Verda Radio* estas sesversa kuraĝigo al Esperanta eldoninto de nova libro, kaj gravas nur kiel unu inter multaj atestaĵoj pri la konstanta komplezemo de tre okupita, trolaboranta homo.

Tamen, la lasta konata poemo de Zamenhof estas io alia. Ĝi aperis unue dum 1909, kiam Esperanto jam disvastiĝis kaj per kelkaj internaciaj kongresoj jam plenpruvigis sian vivkapablon.

Pluvo

Pluvas kaj pluvas kaj pluvas kaj pluvas
Senĉese, senfine, senhalte,
El ĉiel' al la ter', el ĉiel' al la ter'
Are gutoj frapiĝas resalte.

Tra la sonoj de l'pluvo al mia orelo
Murmurado penetras mistera,
Mi revante aŭskultas, mi volus kompreni,
Kion diras la voĉo aera.

Kvazaŭ ia sopir' en la voĉo kaŝiĝas
Kaj aŭdiĝas en ĝi rememoro...
Kaj per sento plej stranga, malĝoja kaj ĝoja,
En mi batas konfuze la koro.

Ĉu la nuboj pasintaj, jam ofte viditaj,
Rememore en mi reviviĝis,
Aŭ mi revas pri l'sun', kiu baldaŭ aperos,
Kvankam ĝi en la nuboj kaŝiĝis?

Mi ne volas esplori la senton misteran,
Mi nur revas, mi ĝuas, mi spiras;
Ion freŝan mi sentas, la freŝo min logas,
Al la freŝo la koro min tiras.

La unuaj poemoj de Zamenhof fontis el personaj emocioj; sekvis epoko de malfacila organizado kaj propagando, dum kiu la lingvokreinto ne havis tempon por poluri sian nepre ekzistantan, kvankam duarangan, poezian talenton; dum la malfruaj jaroj de plena kaj multrilate tragika vivo, nova poemo persona aperas, poemo tute ne, kiel la edifaj poemoj de la plej streĉaj streĉaj propagandaj jaroj, citebla dum publika kunveno por kuraĝigi; sed la plej poezie aŭtentika, la plej teknike matura, inter la naŭ poemoj de Zamenhof.

Objektiva aŭskultanto konfesos, ke la delikate variigita ritmo kaj la subtile insida uzo de *s* kaj *v*, la diskretaj aliteracioj, la intenca ŝvebado inter observemo pri konkreta fenomeno, kaj duone aludita spirita alegorio, prezentas poezion malsimilan al la pioniraj poemoj. Zamenhof, granda geniulo sur la kampo de lingvo, tre granda homo laŭ moralaj kriterioj, ne estis granda poeto laŭ iu ajn absoluta senco; sed tiu poemo en plenmatura Esperanto vekas senton de vera bedaŭro ke li ne verkis aliajn poemojn tiel personajn kaj artismajn. Sed li estis jam lacega, malsana; perfidoj de iamaj amikoj batis lin; malriĉeco longe muelis lin; cirkonstancoj postulis de li korespondan laboron apenaŭ kredeblan; kaj tiu "En mi batas konfuze la koro" ja ne estis nur literatura kliŝo. Ok jarojn poste, elĉerpita, frakasita per la tragedio de la unua mondmilito, Zamenhof mortis, oficiale kvindekjara, fizike kaj spirite multe pli aĝa, tute elĉerpita. Estas kortuŝe, ke lia lasta poemo esprimis dankemon pro momento de natura freŝeco. Estas bedaŭrinde, ke la nova promeso de tiu poemo neniam plenumiĝis.

Zamenhof, kreinto de la Internacia Lingvo kiu vere funkcias vive, havis kreaĵon genion; nur parteto de tiu krea genio estis libera por flui en versojn. La eksterordinareco mem de la cirkonstancoj, en kiuj la unuaj Esperantaj poemoj estis kreitaj, meritigus al L. L. Zamenhof malgrandan niĉon en la historio de la mondliteraturo. Ke homo verkis poemojn per lingvo tiam ankoraŭ ne parolita, kaj ke la lasta poemo montras imponan artisman evoluon, estas ja sufiĉe mirigaj faktoj.

Sed Zamenhof pioniris ne nur lingvon, sed literaturon. Mi havas antaŭ mi Esperantan libron ĵus eldonitan: *Esperanta Antologio — Poemoj 1887-1957*. Ĝi estas antologio nur: tio estas, ĝi celas reprezenti al la publiko la plej signifajn Esperantlingvajn poetojn, per iliaj plej bonaj poemoj. Kompreneble Zamenhof estas la unua en la libro. Sekvas lin aliaj pioniroj de la plej frua epoko: Grabowski, Devjatnin, Schulhof, Feliks Zamenhof (frato de la lingvokreinto) kaj aliaj. La poemoj de tiu frua epoko estas interesaj, ofte, pli historie ol vere poezie; sed en la sinsekvaj paĝoj de la Antologio la rapida evoluo de Esperanto al plena matureco por poezio klare evidentiĝas. La ampleksa volumo — 543 paĝoj de poemoj mem, se ni dekal-

kulas glosojn, klarigojn kaj biografiajn notojn — prezentas naŭdek seriozajn Esperantajn poetojn, per iom pli ol 350 poemoj. Difini el kiu lando venis kelkaj el tiuj poetoj estus malfacile, pro ekziloj, landlimŝanĝoj kaj apartaj cirkonstancaj anomalioj, sed oni povas certe diri ke tiu Antologio reprezentas almenaŭ 35 landojn. Kelkaj Esperantistaj poetoj jam indas je komparo al nacilingvaj poetoj: Kálmán Kalocsay, hungaro, plenmaturigis la lingvon teknike kaj montris multajn ne antaŭe komprenitajn esprimkapablojn de Esperanto per amaso da vere belegaj poemoj laŭ romantika tradicio, sed ofte kun tute aktuala komplikeco. Kalocsay ankaŭ verkis *La Arto Poetika* en Esperanto, kaj multaj postsekvantoj ŝuldas al li sian teknan scion kaj memkritikkapablon. Gyula Baghy, alia hungaro, kelkfoje verkis malforte, sloganece, sed ofte tre forte kaj individuece. Gravaj estas la rusoj Nikolai Hohlov kaj Eŭgeno Miĥalski; la hungaro Lajos Tárkony; la latvo Nikolai Kurzens, majstro pri koncizaj emociaj bildoj kiuj estas eble la plej facile parkereblaj inter ĉiuj Esperantaj poemoj, kaj Raymond Schwartz, franco, kiu iĝis la unua kompetenta bonhumorpoeto en Esperanto.

La reprezentantoj de la nuna epoko inkluzivas plurajn poetojn kies poemoj estas ne plu kompetentaj imitaĵoj — eĉ Kalocsay kaj Kurzens, fakte, estas ofte multe pli ol nuraj imitantoj — sed veraj originalaĵoj laŭ ĉiuj kriterioj. La skoto William Auld, influita ne nur per la britaj tradicioj sed per la eksperimentoj de T. S. Eliot kaj Ezra Pound, verkis metafizikajn poemojn profundajn kaj tre individuecajn; la svisdevena skoto Reto Rossetti,

la ĉeĥo Karolo Piĉ, la anglo Arthur Foote, la brazilano Geraldo Mattos, la ĉeĥo Jiří Kořinek, la islandano Baldur Ragnarsson, la sudafrikano Edwin De Kock, ekzemple, vere verkas por kulture matura publiko, per rimedoj neniel arkaikaj aŭ stereotipaj. La poezio de la juna sed vigle vivanta lingvo jam meritas seriozan atenton.

Esperanto estas, fakte, lingvo kiu multtrilate tre taŭgas por la poezio. Pro la ekstrema simpleco de la gramatiko, kaj precipe ĉar iu ajn radiko povas alpreni iun ajn gramatikan finaĵon kiu donas sencan. (Ekzemple, verbo substantiviĝas, adjektivo aŭ eĉ prepozicio verbiĝas). Esperanto estas lingvo eksterordinare fleksebla, kun mirindaj kapabloj por esprimriĉega koncizeco. Ĝia vortaro, kiu nature ŝajnis iom malriĉa dum la frua epoko, estas nun preskaŭ adekvata por esprimi ĉion, kion menso povas koncepti. Ĝi kapablas ĉerpi imagojn kaj aludojn ne el nacia, sed el monda kulturo.

Multaj oponentoj de la Internacia Lingvo, diras, ke ne estas eble verki poemojn per tia lingvo. Nuntempe ili nur montras sian mankon de informoj, dirante tion. Sed la maturaj Esperantistaj poetoj devas danki, pro la poeziaj ebloj de la lingvo, al la soleca pioniro, L. L. Zamenhof, kiu, dum la procezo mem de lingvokreado, provis sian lingvon per poemetoj, kaj lasis post si tiujn strangajn atestaĵojn de sia nobla koro, de sia lingva genio, kaj de ebla granda poeto, kies krea genio elĉerpigis tro frue per lingvokreado kaj rutina laborego. Esperanto mem estis la ĉefa poemo de mondpoeto Zamenhof.

Saluto al Zamenhof

*Al ĉiuj popoloj benatan donacon
Vi faris trafante la vojon plej bonan:
En korojn de l' homoj eksemis vi pacon,
Sur lipojn semante la lingvon belsonan.*

*Nun kreskas en mondo spirito homara
Kaj iom el via inspiro anima
Per ĉiu parolo de lingvo la kara
En koroj ekfloras al vivo senlima.*

Edmond Privat

(El juneca verkaro)

Integro kaj latentoj en la verko de Zamenhof

de

John Francis, Skotlando

Talenta esperanta poeto iam diris: „Zamenhof neniam malpermesis; ĉiuj liaj reguloj estas permesoj”. Tio estas esence vera, kaj la motivo por la serena fidemo, kiun ĝi implicas en la prudenta kaj realisma Zamenhof, meritas atenton. Fakte, trovinte ĝin oni trovas, kial la Internacia Lingvo dum 70 jaroj daŭre progresis laŭ la vojoj, kiujn Zamenhof prognozis, longe post ĉeso de iu gvidado lia.

En 1887 la Amerika Filozofia Societo en Filadelfio esplorige la demandon, ĉu internacia lingvo estas necesa, kreebla, kaj kia ĝi devas esti, konkludis jese pri la unuaj du punktoj, kaj pri la tria decidis, ke lingvo internacia devas havi plej simplan kaj naturan formon de gramatiko, ortografio kaj fonetiko; ĝia vortprovizo devas esti plimalpli rekonebla por la plej gravaj civilizitaj popoloj, kaj agrabla por la orelo; kaj ĝi devas esti la frukto de la laboroj ne de unu persono, sed de la tuta instruita mondo.

En la sekvinta jaro d-ro Zamenhof atentigis, ke la A.F.S. tiel atingis tute sendepende ĝuste la konkludojn, kiujn li mem aplikis praktike en la kreo de la Lingvo Internacia; kaj fakte la Societo poste esploris lian verkon, kaj konfirmis, ke ĝi ĉiurilate respondecas al la postuloj indikitaj.

Tiuj postuloj solaj tamen estas fakte nesufiĉaj por la kreo de internacia lingvo, kaj en du rilatoj ili estas jam nekontentigaj. Unue, kiujn naciojn aludis la Societo per „la plej gravaj civilizitaj popoloj”? Ĉu la ĉefajn eŭropajn kulturojn, aŭ ĉu efektive ĉiujn naciojn en la mondo kun granda kultura heredaĵo? Se la Societo ja pensis pri la dua alternativo, kiel ĝi agordas siajn principojn entutajn al tiu ĉi specifa postulo? La dua ĉikano rilatas al la aspiro pri lingvo ellaborita de la instruita mondo anstataŭ de unu persono. Ĉar la esplorigoj ne indikis kontraŭe, oni ne povas eviti la teruran suspekton, ke ili fakte rekomendas specon de komitato: kompromison mortigan al la kreo de lingvo ĉiurilate konsekvenca. Ili tamen meritas laŭdon pro tio, ke se ili mem ne konstatis la praktikajn problemojn starigitajn, ili almenaŭ ŝajne agnoskis la geniecon de la zamenhofa solvo.

La vero estas, ke Zamenhof ne nur anticipis praktike la teoriojn de la Societo, sed li ankaŭ venkis problemojn neantaŭviditajn de tiu. Estas signife, ke malgraŭ la aprobo, kiu li esprimis por la konkludoj, kiujn la Societo publikigis en la fino de 1887, lia propra verko, „Lingvo Internacia. Antaŭparolo kaj Plena Lernolibro”, aperinta pli frue en la jaro, menciis en la antaŭparolo la tri

problemojn, kiujn li opiniis ĉefe gravaj por la sukceso de la disvastigo de la lingvo, kaj ke el la du punktoj koncernantaj lingvon mem unu trovas nenion paralelon inter la konsiloj de la Societo, ĉar tiu punkto tuŝas problemon, pri kiu la Societo evidente eĉ ne pensis, kvankam ĝusto lia solvo de tiu problemo ĉefe kontribuis al la sukceso de Esperanto en la sekvontaj 70 jaroj, kaj certigas ankoraŭ neantaŭvideblan evoluon en la jaroj venontaj.

La koncerna punkto emfazis la neceson, ke „la lingvo jam de la komenco mem kaj dank’ al sia propra konstruo povu servi kiel efektiva rimedo por internaciaj komunikadoj”. El ĉiuj teoriaj atributoj de funkcia lingvo internacia tiu estas la plej malfacile atingebla, sed solvite ĝi plene kompensis la laboron, kiun ĝi kostis; ĉar tiu laboro pro sia naturo alportis al la lingvo pli ol la origina postulo mencias. Ĝia plej evidenta rezultato praktika estas la konata ŝlosilo, kiu ebligas plenan, kaj eĉ subjektivan, komprenon pri iu esperanta komunikado al adresito neesperantista. Tio estas ebla nur pro la logiko, konsekvenco kaj fundamenta simplego de la lingvo, kiuj permesas komunikadon neembarasitan de lingvistikaj balastoj inter animoj, kies pensmanieroj estas influitaj de tute malsimilaj semantikaj tradicioj. Tio estas, la baza strukturo de la lingvo estas tiel rafinita, ke ĉiu homo estas virtuala esperantisto.

Tiel Zamenhof kreis fundamenton, kiu adaptiĝas tuj al iu logika pensado, kontraste al tia kodo, kian la A.F.S. ŝajne aludis, kiu rekoneblus pro la simileco de siaj elementoj al tiuj de elektita lingvogrupo. La diferenco estas gravega. Ekzemple, ĉiu edukita eŭropano povas deĉifri frazon, kia „Que es la element principal en un lengua de internacional util?” kvankam la aŭtoro ĵus elpensis ĝin dum la skribado, kaj multaj homoj povus laŭ sama metodo elpensi seriojn da rekoneblaj vortoj konvene al preskaŭ ĉiu temo; sed tiu rekoneblo ne signifas la kreon de lingvo kun gramatika kaj semantika strukturo, kiujn povas asimili kaj utiligi homoj el ĉiuj lingvogrupoj, kaj — pli grave — eĉ se oni kreus por tia projekto gramatikajn regulojn, kiuj konservus en ĉiu okazo la similecon de ĝiaj elementoj al iliaj nacilingvaj radikoj, kaj samtempe permesus ioman liberecon de vortordo, eĉ tiam oni ne ebligus sendependan evoluon, faktoron fundamentan en ĉiu vivanta lingvo; ĉar ĉiun ŝanĝeton oni devus akomodi al la postuloj de simileco kun la parencaj idiomoj.

Zamenhof, post eksperimentoj kun pure arbitraj formoj, ja decidis ĉerpi sian radikaron el ekzist-

antaj lingvoj, sed lia motivo ne estis nur liveri vortojn tuj rekoneblajn. La konata formo de multaj vortoj certe povas helpi dum lernado, sed asimilo de vortaro estas la plej facila parto de lingvo-lernado, kaj multe pli grava estas la fakto, ke vortoj tiel elektitaj jam konvenas al siaj signifoj, dum arbitraj terminoj alprenas siajn signifojn hazarde. Tiu ĉi konekso inter sono kaj signifo estas precipe evidenta en la vortoj onomatopeaj kaj familiaraj, sed ĝi ankaŭ ekzistas, kvankam pli subtile, en la aliaj, precipe ĉiutagaj, vortoj, kaj oni ofte renkontas kun plezuro en fremda lingvo vorton, kiu iel plaĉegas, kaj ŝajnas unike konvena al sia signifo, kvankam oni ne povas ligi ĝin kun iu konata radiko, kaj eĉ oni ĝojas pro ĝia ekzoteco. Ne estas surprize do, ke vortoj, kiaj „spitas”, „akra”, „mole”, retenas siajn individuecajn signifojn en la memoro de homo eĉ ekster la hindeŭropa lingvogrupo pli nature ol, ni diru, „ab”, „ac”, „ad”. Ĉu la fundamenta vortaro estas el la hindeŭropa, aŭ ĉu el alia grupego, estas cetere bagatelo, ĉar necesas lerni nur kelkcent radikojn por koni la fundamenton de la lingvo, kaj ekspluatante ties fleksian kaj aglutinan karakteron multoblige la kelkcent radikojn en dekojn da miloj da esprimoj.

Hodiaŭ la Plena Vortaro de Esperanto enhavas preskaŭ 500 paĝojn kaj la Plena Gramatiko estas analoge ampleksa, kvankam okazis neniu rompo en la lingva tradicio; ĉar la lingvo, kiel Zamenhof antaŭvidis, mem rifuzante fiksi ĉiujn terminojn novajn en la fruaj tagoj, „devas vivi, kreski kaj progresi laŭ la samaj leĝoj laŭ kiuj estas ellaboritaj ĉiuj vivantaj lingvoj”, kaj la menciitaj verkoj nur registras la uzojn rezultintajn el tia kresko kaj ĝermantaj jam en la plej frua formo de la lingvo; ili nenie proponas novaĵojn aŭ modifojn. La vera atingo de Zamenhof estis, ke li kristaligis la varian kaj senordan riĉon de granda kaj ampleksa lingvogrupo en esencan formon, kaj lasis tion al la naturaj influoj de la uzado sciante, ke kresko okazos sen iu tordo aŭ misformigo, ĉar la malimplikita lingvo „dank’ al ĝia konstruo” jam permesas senfinan variadon de ĝiaj elementoj, kaj same nature asimilas aldonojn sen perturboj internaj. La lingvo estis jam integra je sia nasko, sed ĝiaj latentaj daŭre manifestas sin; kaj, kiel Zamenhof antaŭvidis, la evoluo neniel influigas de la diversaj elementoj, kiuj kontribuis al la origino; ĉar, kiel kristalo sub konvenaj kondiĉoj kreskas neniam ŝanĝante la formon, tiel Esperanto kreskis responde al elementaj karakterizoj kaj eventualoj immanentaj en ĝi je la komenco. Alivorte, la Internacia Lingvo kreskis subtenate de propra tradicio, ne de fremdaj, ĉiam gvidate de la uzoj de siaj plej bonaj aŭtoroj, kiel Zamenhof deziris sciante, ke lingvoj anstataŭ disfali „emas perdi siajn dialektojn kaj unuigi antaŭ la fortiĝanta komuna literatura lingvo.”

Fakte, liaj ripetataj aludoj al la rolo de nekatenta literaturo dum lia konstanta rezistado kontraŭ postuloj por persona diktado montras, kiom li fidis

al la risortemo kaj sano de la lingvobazo, kiu pro lia liberemo devos eble travivi la fuŝojn de poetastroj eĉ dum ĝi gajnos je la manoj de kompetentuloj; kaj, kiam oni studas lian propran agadon sur la literatura kampo fariĝas evidente, ke lian persistan tajladon de la lingvostrukturo en kiom eble plej koncentrigitan sed ŝarĝitan esencon ne influis sole deziro liveri lertaĵon, kia la ŝlosilo. Male, lia verkado paralele kun lia lingva laboro sugestas la konstaton, ke ju pli oni elĵetas de la kruda materialo, des pli oni devas aldoni al la dinamiko de la restanta kerno kompensante amasajn forigojn per terminoj vere fundamentaj, kiuj des pli senembarase kreskegos estonte. Liaj verkoj neniam, ĉu per dekreto, ĉu per ekzemplo, difinas limojn, sed anstataŭe sufloras eblojn. ”La amaso amas, ke oni donu al ĝi leĝojn”, li notis, sed rifuzis komplezi al tiu tendenco, konstante kuraĝigante al la amaso mem trovi leĝojn bazitajn sur logiko, bongusto kaj lingvosento, kaj liaj verkoj, kiel modeloj, lasas kiom eble plej da libero.

Plej klare montras ĉi tiun atributon lia poezio originala. Lia pli ampleksa traduk-verkaro pruvas, ke li kapablis laboradi longe kaj konsciencie super versoj, ĉar lia renoma Hamlet-traduko mem enhavas pli da versoj ol troviĝas en lia tuta originala poezio. Unuavide ŝajnas strange do, ke homo kun evidenta ŝato pri la poezio limigis sin al la verkado de kelkaj liriko, kiuj mem demonstros fluon kaj eleganton, kiujn li povus utiligi por pli ambiciaj celoj, aŭ eĉ por verki didakte pri la lingvo. Necesas tamen kalkuli la avantaĝojn de lia elekto:

1) La liberforma liriko plej konvenas al emocia enhavo. Emocio ne estas la plej grava ingredienco de poezio, sed nur vere vivanta lingvo povas esprimi ĝin, kaj en la fruaj tagoj estis necese antaŭ ĉio pruvi la vivkapablon de la nova lingvo.

2) Laŭenhave liaj poemoj apelaciis al kiel eble plej ĝenerala publiko, al kiel eble plej komuna gusto — denove grava faktoro en nova lingvo celanta internacian akcepton.

3) Per uzo de la liriko oni povas indiki la riĉon de rimoj, aliteracioj, onomatopeo kaj aliaj teknikaj artifiko, ne embarasate, kaj foje limigite, de fiksfarmaj postuloj.

4) Ĉiu literaturo travivas diversajn poeziajn etapojn, la poezio mem origine kreskinte el iuspeca formaligo de prozo. Esperanto ne povis ignori la gajnojn de la naciaj lingvoj, intence kreante praan krudon, sed aliflanke ne povis kompromiti sin jam en naskiĝa periodo per elekto de tiu aŭ tiu aparta avantgardtendenco, aŭ rigora tradicio.

”La Vojo” taŭge demonstros la kontentigon de ĉiuj kvar punktoj: 1) Ĝi estas ja laŭkaraktere emocia, kaj la emocio prezentiĝas konvinke, sincere, ĉar la sento kaj ritmo ĉie harmonias, fandiĝas en tuton. 2) Mankas arkanajoj; mankas ekstrava-

gancoj, mankas ritmoj kaj tradicioj neplaĉaj al iuj apartaj nacioj. 3) Bona poeto ĉiam agordas la temprezenton kun la teknikaj postuloj de eĉ plej strikta formo; sed verkinde, ni diru, eĉ perfektan soneton, Zamenhof eble sugestus, ke li aparte sankcias tiun formon, dum tute liberaj versoj povus sugesti mankojn en lingvo tiel nova. La libera formo kun rimo kaj skando aliflanke pruvis, ke la lingvo ja adaptiĝos al la impeta inspiro eĉ sub la brido de poeziaj ornamoj, kaj Zamenhof emfazis tiun plastikecon. Krom la lerta utiligo de aliteracio kaj onomatopeo en tiu ĉi verko, ni ankaŭ notu, kiel ĉiu strofo komenciĝas pli-malpli trankvile per kvaramfibrakoj kun alternaj triamfibrakoj, kiujn ornamas alternaj rimoj:

„Tra densa mallumo briletas la celo,
Al kiu kuraĝe ni iras.
Simile al stelo en nokta ĉielo,
Al ni la direkton ĝi diras”.

kaj

„Nur rekte, kuraĝe kaj ne flankiĝante
Ni iru la vojon celitan.
Eĉ guto malgranda, kontante frapante
Traboras la monton granitan”. k.s.

sed ĝuste kiam la orelo ek-kutimiĝas al tiu harmonio, la aranĝo ŝanĝiĝas, ĉar la sesa verso etendas sin de la atendita tri ĝis kvar amfibrakoj, kaj surprize eĥas la antaŭan rimon anstataŭ enkonduki novan, kun ekzalta efekto analoge al la ekzalta leviĝo de la sensoj pro la kulminanta patoso:

„Kaj nin ne timigas la noktaj fantomoj,
Nek batoj de l' sorto, nek moko de l' homoj”

La sekvontaj du versoj tenas la paran rimon, sed dum la sepa ankaŭ tenadas la ekzaltiĝon, la oka reiras, denove neatendite, al tri amfibrakoj kun frape abrupta konkluda forto:

„Ĉar klara kaj rekta kaj tre difinita
Ĝi estas, la voj' elektita”.

La tuta efekto, malgraŭ la simpla temo, sugestas la intensan vivecon de la lingvo, kaj ĝian adaptoblon al poetikaj postuloj.

4) „La Vojo” ne kvazaŭ sankcias per ekzemplo iun apartan poezian medion, sed aliflanke ĝi montras, ke la fiksoformoj kun strikta skando kaj rimoj estos ja eblaj en la lingvo; ĉar en ĝi, kiel en ĉiuj liaj poemoj, Zamenhof ja fandas propran strofoformon, sed uzas tion konsekvence tra la tuta poemo.

La evoluo de la esperanta poezio pravigis la sintenon de Zamenhof. Dum la unuaj 30 jaroj ĝi kontentis establiĝi, daŭre aldonante verkojn kun malmultaj signoj de vera progreso, ĝis dum la tri-dekoj de la nuna jarcento la avangardemo, kiu jam manifestis sin, subite glorie burĝonis sub la gvido kaj ekzemplo de la dediĉita budapeŝta skolo,

kiu venkis ĉiun poemoformon de la japana utao ĝis la itala soneto, ĉu traduke, ĉu originale. Hodiaŭ ĉiu poeteto povas sen granda peno elverŝi sonetojn, baladojn, rondelojn, vilanelojn, k.t.p., malgraŭ tio, ke la kriterioj fariĝis pli rigoraj rilate „licencojn”, kiaj senmotivaj vortinversoj kaj uzo de adasismoj (t.e. sufiksrimoj, pronomrimoj, k.s.) rigardataj en kompetentaj rondoj kiel nepardoneble malfortaj rimedoj; dum neniu serioza tradukisto arogus entrepreni tradukon, kiu ne celas redoni formon kaj sencon, kontraste kun la kutimo ĉe iuj naciaj lingvoj kun grandaj literaturaj pretendoj, kies verkistoj preskaŭ tradicie prefacas siajn ”tradukojn” per klarigoj pri la neeblo redoni ambaŭ, kaj kiuj ofte preterkonfirmas sian aserton, donante nek tiun, nek la alian.

Plej signifa tamen estas la fakto, ke la tuto progreso de la poezio okazis sen rompo de kontinuo, sen bezono reorienti sin sub konstato de fundamenta malforto. Iuj epokoj malpli rapide progresis ol aliaj responde al la respektivaj postuloj de pionirado kaj establiĝo, sed ĉiu epoko tiris forton el la antaŭa, kaj ĉiuj finfine de Zamenhof, kies verkaro ne estas tiom plata bazo, kiom ĝermo jam decidinta la konturojn de la futuro eĉ dum ĝi kontentigis la bezonojn de la propra epoko. La nuna epoko kun sia vasta vario da formoj kaj tendencoj servos la estontajn poetojn, kiel de-saltejo pli larĝa, pli firma kaj pli varia, sed ne konstruita laŭ pli pravaj principoj.

Ankaŭ en prozo Zamenhof montris la tendencon liveri medion jam kompletan kaj kontentigan por ĉiuj celoj, kiu tamen estos la distilita esenco por sennombraj varioj estontaj; kaj, ĉar prozo estas la medio de ĝeneraloj, li ne devis okupi sin pri verkoformoj, kiel je la poezio, sed koncentrigis sian atenton sur stilon. Tiu stilo estas flua, glata, sen fantaziaj signifotordoj, kaj ĝia plej karakteriza trajto estas ĝia demonstrado de la principo de „sufiĉo kaj neceso”: principo, kiun neniu teoriecismado povus plene klarigi. Ĝia konscienca aplikado certigis stilon senornaman, en kiu ĉiu vorto devas ludi definitivan rolon, kaj kie la sintakso devas esti senmanka, por ke la lingvaĵo estu belsona, preciza kaj viva. En la fruaj tagoj liaj originaloj estis malpli gravaj el stilistika vidpunkto ol la traduko de la Malnova Testamento el la hebrea, kiu donis normon, kiun ĉiu homo povis kompari kun nacilingva ekvivalento por kontroli la ĝustecon de apartaj esprimoj en kunteksto; sed pli kaj pli la esperanta publiko, eksentante sin hejme en la nova idiomo, kapablis ensorbi signifojn kaj parolturnojn el la pure esperantaj tekstoj de la vasta zamenhofa verkaro. Poste verkistoj emis al pli individuaj stiloj konforme kun individuaj karakteroj kaj aspiroj, kaj tion ili povis facile fari surbaze de la stilo, kiun Zamenhof testamentis al ili, denove sen rompo de kontinuo; ĉar en la zamenhofa stilo ili trovis nenion eljetindan, nenion superfluan: ornamado eblas, pli drastaj uzoj eblas, novaj parolturnoj eblas nur devante konformi al

la logiko, sed la stilo de ĉiu bona verkisto konstruigis sur la framo de la zamenhofa. Kiel en la poezio, la sukcesaj eksperimentoj de la bonaj verkistoj enradikiĝis en la lingvo, la sensukcesaj preskaŭ nerimarkite abortis. Tiel la lingvo konstante riĉiĝis, kaj ĉiu nova riĉaĵo disradiis en ankoraŭ pli novajn; pli kaj pli abstraktaj kaj pli kaj pli kompleksaj ideoj cedadis al ĉiam pli trafikaj neto kaj koncizo; sed la stilo de Zamenhof restas hodiaŭ valida, ĉar studinte la senmankan sintakson, kiun la vortekonomio stimulis, la moderna verkisto aldonos ritmon kaj elanon al la avantaĝoj de la pli riĉa tradicio, kiun li nun disponas.

Fine Zamenhof faris ion trafe analogan al sia lingvistika kaj verka aspirado al kerna sed burĝononta minimumo: li kreis la Esperantan Proverbaron. Farinte tion li liveris fakte miniaturan krestomation, kie ĉiu homo povas vidi kaj facile parkeri precizan uzon de esperanta vorto en konvena kunteksto, nekonfuzite de nacilingvaj asocioj, kaj de kie ĉiuj povas ĉerpi indiĝenajn tropojn kaj tutajn aforismojn, per kiuj ili povas riĉigi la propran konversacion kaj verkaron.

Sed krom tio, aparte notinda estas la atentigo de Zamenhof, ke la plej elementa formo de iu literaturo estas la tradiciaj popoldiroj kaj sentencoj, kiuj grade pro konstanta uzado poluriĝas en

formojn plej konvenajn al koncizo kaj parkerado; ĉar tiu konstato rivelas lian aspiron, kiun li liveras pere de la Proverbaro, kiu enhavas sagacon kaj spriton plaĉajn al ĉiuj. Komprenoble li denove evitas pseŭdan prakrudon, kaj la proverboj estas plejparte epigramecaj, foje kun rimoj.

Sume, la prozo de Zamenhof, kiel la poezio kaj la konstruo de la lingvo mem konsistigas plene funkciantan medion, kiu tamen rivelas sin, pro sia elementeco, kiel deirpunkton. Neeblas regresi de ĝi: ĉiu ŝanĝiĝo, ĉiu aldono faritaj laŭ la eventualoj implicitaj en la fundamento devas esti progreso.

Ni povas konstati lian koncepton kiel, ideale, la meton de disfluema kompacto en vakuon. Inter tia idealo kaj la praktiko troviĝas amaso da malfaciloj, kaj la tuta energio de Zamenhof estis dediĉita al la solvo de tiuj. Tio signifas anticipan solvon de ĉiuj eventualoj, kaj ĉiu nova sukceso de la lingvo montras, kiom li devancis eĉ la plej fervoran admiranton de lia verko, kiel ĝi statis en 1887.

Inter la tempo kiam li unue kredis la lingvon preta, kaj ĝia efektiva publikigo etendis sin dekduo da jaroj dediĉitaj al eksperimentado, modifado kaj polurado; kaj post ĉiuj liaj grandaj laboroj lia ĉefa venko konsistis ne el tio, kion li prezentis, sed el tio, kion pro kompensa genio li povis ellasi.

Zamenhof

*La buŝoj brule kraĉis sangajn vortojn,
la mond' flamiĝis, veis vana plend',
kaj blinde serĉis vojon l' orfa homo,
en fulmobril' mi vagis sen defend'.
Ĉifonoj pendis de la korpoj homaj,
inundo bruas, tondris roko-rompo;
sed mi kredis, frato : flugis
al la ter' kolombo.*

*Rifuĝis plore flampurpuraj nuboj,
fantomamaso min minacis, — plej
terure tomboj vomis ostomilon,
ekiris sorĉe, ŝvele la marĉej'.
Kredparkoj, sortoj dronis en la nokton,
Demon' draŝadis, falis tondra bombo,
sed mi vidis, frato : flugis
al la ter' kolombo.*

*Ho, vane hom' blasfemojn diras al mi,
ho, vane streĉas sin la sklava krim',
ho, vane tentas min ĉiel', tertremo,
bombardo, nubo ne teruras min.
Ho, vane mi kirliĝas en kaoso,
ne murdas mi, ne servas mi por tombo;
diru kun mi, frato : — flugis
al la ter' kolombo !*

F. Szilagyi

La Internacia Lingvo kiel Belarta Tradukilo

de

William Auld, Skotlando

I.

La interkompreniĝo de la popoloj, neniam pli urĝe dezirinda ol en la nuntempa malgrandiĝanta mondo, devas okazi grandparte per la interŝanĝo kaj reciproka ekkono de la kulturaj valoroj kreitaj de tiuj popoloj. Kaj tamen tiu interŝanĝo estis ĝis nun grandparte nebla pro la lingva diverseco de la homaro. Pere de la literaturo de iu popolo, tiuj, kiuj kapablas ĝin legi, povas konstati ne nur la supraĵajn apartaĵojn de tiu popolo, sed ankaŭ, pli grave, ĝian fundamentan homecon kaj similecon al la aliaj popoloj. Ne pro sia grekeco Odiseo fariĝis universala simbolo, nek pro sia angleco Hamleto, nek pro sia hispaneco Don Kihoto, sed ĉiuj universaligis pro la fundamenta homeco de sia karaktero. Tamen nur malmulte ili fariĝis konataj tra la tuta mondo en sia nacilingva vestaĵo, sed ĉefe per transvestiĝo en alilingvajn tradukojn. Sen tia tradukado ili restus nekonataj al la pliparto de la mondo.

La sorto de la literaturaj kreaĵoj estas tiurilate hazardoplena: la tradukado en kaj el ĉiuj lingvoj okazas pli-malpli senplane; eĉ se iu verko meritas diskonigon tra la mondo, ĝi devas unue altiri la atenton de alilandaj kompetentuloj; eĉ se ĝin emas eldoni alilanda eldonisto, tiu devas trovi tradukiston, kiu sufiĉe bone regas la koncernan fremdan lingvon; eĉ tiam la originala aŭtoro estas plene en la manoj de la tradukisto — kaj la tradukarto estas unu el la plej malfacilaj. Ne estas nekonate, ke iu verko famiĝis en alilando pere de traduko, kiu funde aliformigis la originalaĵon.

Tiun ĉi problemon konscias ankaŭ Unesko:

”Se tiom da obstakloj kontraŭstaras la eldonon de franca verko en la angla lingvo, kiom pli malfacile estas, kiam temas pri libro originale verkita

en la urdua, la punjaba, la siama, la korea, la araba, la norvega, aŭ la portugala.....

”Kiom da eldonistoj en Anglujo aŭ Usono (aŭ, cetere, en Francujo, aŭ Germanujo, aŭ iu ajn el la ceteraj grandaj libro-eldonantaj landoj) havas tri profesiajn legistojn de la punjaba, por fari raporton pri manuskriptoj en tiu lingvo? Aŭ eĉ unu tian legiston? Evidente tre malmultaj. La ĉiujara eldonaĵo de Unesko, *Index Translationum*, montras, ke el la 21,667 tradukoj eldonitaj en la mondo dum 1954, 7,498 estis el la angla, 3,874 el la rusa, 2,870 el la franca — kaj *neniu* el la punjaba.

”Kaj tamen, kiel estas vere pri multaj el la lingvoj de Hindujo, kaj efektive pri multaj el la tiel-nomataj ’lingvoj malmulte disvastigitaj’ de la mondo, la punjaba lingvo posedas literaturon, kiu kapablas aldoni riĉojn al la komuna kulturtrezoro de la mondo, kaj tial meritas tradukadon en la pli vaste parolatajn lingvojn.....

”Unu el la taskoj de Unesko, en la kadro de ties pli larĝa celo diskonigadi inter ĉiuj aliaj landoj la kulturon de ĝiaj unuopaj Membro-Ŝtatoj, estas la klopodo trarompi la ’tradukan kurtenon’, kiu kaŭzas la preskaŭan nekonatecon pri la literaturo de tiel multaj landoj ekster ties naciaj landlimoj”. (1)

Trafe konstatinte la situacion, kiajn paŝojn entreprenis Unesko por ĝin ŝanĝi?

”Kiel parton de tiu entreprenaĵo, nomita ”la Programo de Tradukado de Reprezentaj Verkoj”, Unesko gvidas projekton pri la tradukado en la anglan kaj la francan de libroj originale verkita ne nur en la punjaba, sed ankaŭ en multaj aliaj ’lingvoj malmulte disvastigitaj’.” (2)

Laŭ tiu projekto, ĝis junio 1957, 8 tradukoj el 4 lingvoj estis eldonitaj en angla lingvo, kaj 24 tradukoj el 9 lingvoj (kun 1 antologio el 18 lingvoj) estis eldonitaj en franca lingvo. Estis plue preparataj ankoraŭ 20 libroj el 9 lingvoj en angla traduko kaj 39 libroj el 17 lingvoj en franca traduko. Krome, estis eldonitaj aŭ preparataj tradukoj el 5 okcidentaj lingvoj en la araban aŭ persan, kaj ankaŭ unusola traduko el la araba estas eldonita en hispana lingvo. Unuavide tio ŝajnas sufiĉe ampleksa kontribuo al la internacia interkonigo, kaj certe oni povas nur laŭdi la intencon de la projektintoj. Estas notinde, tamen, ke ”plenumigante la tradukprogramon, Unesko estas limigita, kiel de sia budĝeto, tiel ankaŭ de la manko de kompetentaj tradukistoj” (3). Simila manko, cetere, estas sentebla ankaŭ en aliaj kunteksto; ekzemple, la Internacia Asocio de Konferencaj Interpretistoj havas ”precize unu anon, kiu interpretas el la ĉina kaj neniun, kiu kapablas interpreti en ĝin” (4).

(1) The Unesco Courier, junio 1957, p. 5-6.

(2) loko cit. sub. (1).

(3) loko cit. sub (1).

(4) ”Tio, kion la plimultaj homoj jam delonge suspektis vera, nome ke la angla jam fariĝis ’la plej uzata’ lingvo en la hodiaŭa mondo, estas nun konfirmata de la ĝenerala asambleo de la Internacia Asocio de Konferencaj Interpretistoj, kiu loĝas en Genevo. Oni parolas, kompreneble, nur pri diplomacia interkomunikiĝo. Se oni komencus kalkuli la nombron da personoj, kiuj povas paroli nur la ĉinan, estas verŝajne, ke la taksado estus alia. Sed la ĉinoj ne multe interesiĝas pri la diplomatio, kio estas feliĉaĵo, ĉar (laŭ la sama raporto) la asocio havas precize unu anon, kiu interpretas el la ĉina kaj neniun, kiu kapablas interpreti en ĝin.” — The Glasgow Herald, 24.2.1958.

Se do ni objektivite rigardas la ĝeneralan mond-situacion, ni povas fari kelkajn bazajn konstatojn. Interkonigo de la kulturaj valoroj okazas pere de tradukado. Se ni rekonsideras la supre cititajn ciferojn el Index Translationum, ni trovas ke en 1954, 34.6% el ĉiuj tradukoj estis el la angla lingvo, 17.9% el la rusa, kaj 13.2% el la franca. Tio signifas, ke 65.7% el ĉiuj tradukoj estis el tiuj tri lingvoj, kaj sekve nur 34.3% estis el *ĉiuj aliaj lingvoj de la mondo kune*. Videble la aktuala situacio tre favoras tiujn verkistojn, kiuj kreas en la nomitaj tri lingvoj, kaj malfavoras tiujn, kiuj kreas en unu el la "lingvoj malmulte disvastigitaj". Tion, cetere, scias ĉiu verkisto de malgranda nacio, kaj tio kelkfoje influas lin elekti kiel sian esprimilon lingvon pli disvastigitan. Tiel, ekzemple, Kafka elektis la germanan prefere ol la ĉeĥan. Tiu ĉi malfavoro rilate al la malgrandaj lingvoj rezultigas, almenaŭ parte, el la manko de eksterlandaj scipovantoj de la koncernaj lingvoj, kaj el la eĉ pli sentebla manko de kompetentaj tradukistoj el tiuj lingvoj.

Unesko, kiel la ĉefa interŝtata kultura organizaĵo, rimarkas tiun ĉi malekvilibran situacion, kaj starigas projekton por diskonigi la kulturojn de la malpli disvastigitaj lingvoj. Tiucele ĝi tradukigas gravajn verkojn el aliaj lingvoj (ekzemple, la japana, la hispana kaj la itala) en la anglan aŭ en la francan. Ĉu oni povas objektivite diri, ke tio serioze plibonigas la situacion? Nu jes, kiam koncernas legantojn en Francujo, Britujo, Nordameriko kaj la respektivaj kolonioj; kaj tio jam estas io. Sed ĝi havas minimume du malfortajn flankojn. Unue, japana verko tradukita en la anglan neniom utilas al germano, finno aŭ italo, krom se li iom posedas la anglan lingvon — kaj eĉ tiuokaze li devas legi en fremda lingvo *kies plimultajn nuancojn li ne kapablos kapti*. Literaturaj verkoj estas valoraj grandparte ĝuste pro la lingvaj sugestio kaj nuanco, kiujn eĉ kompetentaj tradukistoj, perfekte konantaj la du lingvojn, trovas malfacile redoneblaj per traduko; kiom malpli percepteblaj ili fariĝas por leganto, kiu nur mezgrade posedas la fremdan lingvon, kiun li estas leganta! Kaj, malgraŭ kelkaj facilanimaj kontraŭaj asertoj, la nombro de ekzemple germanoj, finnoj aŭ italoj — por eĉ ne mencii rusojn, ĉinojn aŭ japanojn — kiuj eĉ mezgrade posedas la anglan aŭ la francan estas ridinde malgranda. Ke kelkaj *pretendas* posedi tiujn lingvojn, tio estas alia afero. Ekzistas, kompreneble, certa snobismo koncerne la t.n. "ĉefajn" lingvojn. La kutimo ĉe neesperantistaj internaciaj kongresoj kaj konferencoj, elekti unu aŭ plurajn el la "ĉefaj" lingvoj kiel "oficialajn" lingvojn donis avantaĝojn kaj prestiĝon al tiuj, kiuj posedas ilin. La ampleksa literatura tradukado el lingvoj "pli multe disvastigitaj" aldonis prestiĝon ankaŭ al tiuj lingvoj, kaj pro tiu kaj aliaj kaŭzoj la literaturoj de la malgrandaj nacioj estas plej ofte ignorataj, kvazaŭ neekzistantaj. Ekzemple, la detala "Historio de Okcidenta Literaturo" de J. M. Cohen (5) dediĉas precize tri liniojn al la hungara poezio, kio, kiel

scias ĉiu leginto de la esperanta "Hungara Antologio" (6) k.a., estas absurdaĵo. Kaj tamen, subkonscia supozo, ke ĉio grava kaj valora estas verkita en la pli disvastigitaj lingvoj, jam erarigas multajn alie sagacajn homojn. Oni legas, ekzemple:

"Bibliografio de libroj pri Baudelaire en la ĉefaj lingvoj estintus utila por plua studado" (7).

Tute certe tiu aŭtoro devis esprimi sian intencon jen: Bibliografio de la ĉefaj libroj pri Baudelaire (t.e., en iu ajn lingvo) estintus utila por plua studado. La tuta senco kaj signifo de la Unesko-projekto troviĝas precize en tio, ke NE ĉio kulture valora estas verkita en la plej vaste parolataj lingvoj!

Kaj tamen dua malfortaĵo de la uneska solvo estas tio, ke ĝi ne vere forigas la malekvilibron, sed kontraŭe ĝi eĉ pli sentigas ĝin; ĉar kion fakte ĝis nun faris Unesko per sia tradukprogramo estis tio, ke ĝi pliriĉigis la anglan kaj la francan je kosto de la aliaj lingvoj! Por esti konsekvenca (por ne diri: justa), Unesko devus tradukigi sian elektitan verkon el malgranda literaturo en *ĉiujn aliajn lingvojn*, ĉar nur tiel ĝi evitus favorigon de la jam favoritaj "grandaj" lingvoj kaj samtempe fakte diskonigus la literaturon al ĉiuj popoloj. Evidente tio estus — por Unesko — neebila; kaj tial ĝi elektis tiun alternativan vojon, kiun ĝi efektive sekvas. Tamen, de tempo al tempo io simila ja okazas: kelkfoje iu libro furoras, kaj per privata iniciato de individuaj eldonistoj aperas tradukite en eble kvindek lingvojn; tamen tio estas maloftaĵo, kaj, se ni estas sinceraj, eĉ pli malofte tio koncernas la kulture plej valorajn kaj eternecajn verkojn. Cetere, la pretigado de kvindek diversaj tradukoj (ofte ne el la originalo sed faritaj laŭ alilingvaj tradukoj) malŝparas multe da laboro kaj rezultigas tre diverskvalitajn tradukojn, tiel ke unu nacio estas bonŝanca kaj ricevas taŭgan tradukon, dum alia estas malbonŝanca kaj ricevas fuŝan. Ĉiuokaze, oni vidas, ke la situacio estas ĝenerale ĥaosa.

Konsiderante, ke Unesko elektis la anglan kiel unu el la du lingvoj en kiujn ĝi tradukigas la trezorojn de "malpli disvastigitaj" lingvoj, kaj konsiderante la grandan prestiĝon de tiu lingvo en la mondo — kion atestas interalie la fakto, ke 34.6% el ĉiuj tradukoj estis faritaj el tiu lingvo en unu jaro — oni emas supozi, ke la anglalingvanoj estas aparte favoritaj ankaŭ rilate la koneblecon de aliaj literaturoj pere de tiu lingvo. Ankaŭ tiurilate la realaĵo meritas iom da atento. Ni turnu nian atenton al periodo de du jaroj, kaj al Britujo. (Praktike, usonaj eldonaĵoj, kaj eldonaĵoj de aliaj angla-

(5) J. M. Cohen: A History of Western Literature.

(6) K. Kalocsay (red.): Hungara Antologio. Budapeŝto, 1933.

(7) K.R.C. Sturmer: Third Programme Esperanto. (The British Esperantist, 1957, p. 118).

lingvaj landoj, ne atingas la ĝeneralan publikon en Britujo). Laŭ Index Translationum, en unu dujara periodo (8) estis eldonitaj en Britujo sume 353 tradukoj de literaturaj verkoj en la anglan lingvon. El tiuj tradukoj, 153 estis el la franca; 65 el la germana; 24 el la itala; 17 el la rusa; 10½ el la greka (antikva kaj moderna); 9½ el la latina; po 9 el la dana kaj hispana; po 6 el la nederlanda, portugala kaj sveda; 5 el la norvega; 4 el la ĉina; po 3 el la finna kaj japana; po 2 el la ĉeĥa, la islanda, la jida, la pola kaj la ukraina; kaj po 1 el la bengala, la estona, la flandra, la hebrea, la hungara, la irlandia, la kimra, la kornvala, la persa, la rumana, la slovena, la turka kaj la urdua — entute 33 lingvoj. Ni rimarkas, do, ke 43.3% de la tradukoj estas el la franca lingvo. La franca kaj germana kune formas 61.8% de la tuto; sekve la 31 aliaj lingvoj kontentigas per 38.2% inter si, kaj ili inkluzivas ankaŭ plurajn "gravajn kulturlingvojn": la itala (6.8%), la rusa (4.8%), la hispana (2.6%) kaj la japana (0.8%). Oni ne povas diri, ke la brita leganto ricevas tre ekvilibran panoramon super la mondliteraturo! Kompreneble, multe kontribuas al tio ĝuste la fakto, ke la franca lingvo estas ĝenerale bone komprenata de edukitaj britoj, kaj ke sekve troveblas relative multaj tradukistoj por tiu lingvo.

La supraj konstatoj neniel enkalkulas la nivelon de la koncernaj tradukoj. Manko de taŭgaj tradukoj eĉ de multaj mondaj ĉefverkoj estas agnoskata de ĉiuj literaturistoj. Pro tio, ekzemple, Cohen (9) opinias, ke "la ideala formo de angla versio estas, laŭ mia opinio, tiu... (en kiu) la originalo estas trovebla apud, aŭ senpere super, la traduko. La leganto tiel povas trairi la verkon en la originala lingvo, tamen helpi al si de tempo al tempo per sinturno al la tradukinto, kies netrudiĝema devo tiam estas, prezenti la plej eble laŭvortan parafrazon". Kiel oni tuj vidas, tia metodo postulas ĉe la leganto sufiĉe altan gradon de kompreno de la originala lingvo, kaj estas senespere neebla en la granda plimulto de kazoj.

El ĉio ĉi sekvas, ke la sola racia solvo de urĝa kaj komplika problemo estas la tradukado de ĉiuj gravaj verkoj en unu lingvon, nacie neŭtralan kaj facile alproprigeblan de ĉiuj popoloj, t.e., en la internacian lingvon, Esperanton. Nur tiamaniere la malpli disvastigitaj lingvoj ĝuas kulturan egalecon kun la pli disvastigitaj. Rosbach trafas skizis la problemon kaj ĝian solvon:

"W. Somerset Maugham skribas ie: 'Se vi ne dediĉas vian tutan vivon al tio, vi neniam lernos paroli perfekte la lingvon de alia nacio; vi neniam konos intime ĝiajn popolon kaj literaturon. Ĉar ili, kaj la literaturo, kiu estas ilia esprimo, estas la rezulto ne nur de la agoj, kiujn ili faras kaj la vortoj, kiujn ili uzas, el kiuj neniu estas malfacilaj, sed de prapatraj instinktoj, nuancoj de sento, kiujn ili absorbis per sia patrina lakto, kaj naturaj kondutoj, kiujn povas la eksterlandano neniam tute kapti.'

"Ĉi tiuj vortoj de la granda angla aŭtoro... klare reliefigas la signifon de *Esperantaj* antologioj pri la diversaj nacilingvaj literaturoj. En tiaj antologioj homoj mem el la koncerna lando, kun la koncernaj ecoj menciitaj de Somerset Maugham, tradukas la literaturon, kiun ili tiel bone kaj kone komprenas, ne en alian nacian lingvon, kiun ili ne absorbis kun la patrina lakto, sed en la *simplan, flekseblan, belsonan* lingvon internacian." (10)

Jam sufiĉe multaj verkistoj komprenis la gravecon de Esperanto kiel peranto de literaturo. El abundaj diraĵoj necesas ĉi tie citi nur unu, specimene. Bulgara verkisto Vladimir Poljanov skribis:

"Mi opinias, ke Esperanto estas la plej bela eblaĵo (t.e. la plej bona rimedo) por malgrandaj popoloj, kiel la nia, popularigi siajn spiritajn valoraĵojn ĉe la manko de intereso al ilia gepatra lingvo flanke de la aliaj popoloj". (11)

Jam de pluraj jardekoj la esperanta solvo de la lingva ĥaoso, ankaŭ sur literatura kampo, perfekte funkcias. Multaj gravaj literaturaj verkoj el la plej diversaj lingvoj estas tradukitaj en Esperanton kaj tiel diskonigitaj tra la tuta mondo. La tradukoj, faritaj de kompetentuloj, kies gepatra lingvo estas la originala lingvo de la koncerna verko, estas legataj ofte en pli ol 80 landoj samtempe. Kiaj estas tiuj tradukoj, kaj kiaj estas la ecoj de Esperanto kiel literatura tradukilo?

II.

Tiel larĝa estas la kampo de belliteraturo, ke en la kadro de tiu ĉi mallonga studo mi limigos min al konsideroj rilate la tradukadon de poezio. Ĉiu konsentas, ke la tradukado de poezio estas la plej malfacila, kaj se Esperanto montriĝas taŭga por tiu tasko, tre certe neniu dubos, ke por la tradukado de prozaĵoj ĝi estas same taŭga. Tiel do limigante min al la poeziaj verkoj, mi aldonas sube tute mallongan liston el la esperantaj tradukoj, kiuj plene pravas la taŭgecon de Esperanto kiel traduklingvo. Eble necesas ĉi tie emfazi, ke la sola rimedo por konstati la taŭgecon aŭ netaŭgecon de Esperanto sur tiu ĉi kampo estas trovebla, ne en apriora teoriumado, sed en studado de reprezentaj verkoj en tiu lingvo. Estas nekredeble, ke oni devas pri tio atentigi, tamen multaj facilanimaj asertoj pri la rolo kaj atingoj de la internacia lingvo plene montras, ke la asertantoj eĉ ne ĵetis rigardon al la literaturo de tiu lingvo! Seriozaj kaj respondecaj

(8) Index Translationum, Vol. 8 (1957) kaj Vol. 9 (1958).

(9) loko cit. sub (5), p. 355.

(10) Johan Hammond Rosbach: *Norvega Esperantisto*, 1959, p. 30.

(11) *Literatura Mondo*, 1923, p. 165.

personoj estas invitataj studi el la sekvantaj verkoj en ilia esperanta traduko :

UNUOPAJ VERKOJ : *La floroj de l'malbono* de Baudelaire; *Peer Gynt* de Ibsen; *Infero* de Dante; *La bapto de Caro Vladimir* de Karel Havlíček Borovský; *Sinjoro Tadeo* de Mickiewicz; *Eŭgeno Onegin* de Puŝkin; *Tragedio de l'homo* de Madách; *Johano la brava* de Petöfi; *Romaj elegioj* de Goethe; *Poeziaĵoj* de Tuwim; *Socialismo* de Bezimenskij; *Per voĉo plena* de Majakovskij.

ANTOLOGIOJ, k.s. : *Hungara antologio*; *Angla antologio*; *Ĉeĥoslovaka antologio*; *Svisa antologio*; *Eterna bukedo*; *Sveda poemaro*; *El litova poezio*.

Ĉiuj ĉi verkoj, kaj multaj aliaj, brile atestas la taŭgecon de Esperanto kiel poezia tradukilo. La nombro kaj valoro de la ekzistantaj tradukoj estas vere konsternaj, kiam oni pripensas la aktualan situacion en iuj nacilingvaj literaturoj; sed, kiel montriĝos sube, Esperanto havas plurajn gravajn avantaĝojn por la tradukado.

En anglalingvaj rondoj ia konvencio ricevis larĝan disvastiĝon, ke la tradukado de poezio estas eĉ nebla :

"La tradukado de poezio, kiel konate, estas malfacila kaj finfine malebla." (12)

Alia aŭtoro klopodas pravigi tian aserton :

"Mi opinias, ke estas neeble traduki poezion, laŭ la senco de tradukado kiel mi provis ĝin difini. Komprenoble, estas relative facile, se oni havas iom da lerteco, la *Tesaŭron* de Roget, rimvortaron, kaj tion, kion mi aŭdacas nomi krucvortema menso, traduki versaĵojn, sed versaĵo ne estas poezio. Ne necesas, ke poezio havu signifon, poezio estas muziko, memsufiĉa, celo en si mem. Senkonsidere pri signifo aŭ eĉ gramatiko, vorto aŭ grupo de vortoj povas per la sono kaj misteraj asocioj krei unikan kunfandiĝon de sentuma kaj spirita spertoj, kiujn povas analizi eĉ ne la teĥnikoj de la psikologiaj kritikistoj. Ĉar la poeto uzas vortojn alie ol la prozverkisto; vortoj por li estas koloroj, eroj en sonmozaikoj, bruoj celantaj vekti dormetantan memoron je revivigo de aferoj supozeble mortintaj kaj forgesitaj. Tian aferon oni povas pritrakti nur laŭ ĝiaj propraj premisoj, kaj eble rezultiĝos *simila* mozaiko aŭ kanto, kiu eble havos similan efikon, sed ĝi ne estos traduko, same kiel muzikaĵo verkita por hobojo ne estas la sama kiam ludas ĝin klavceno, kvankam la notoĵ estas la samaj". (13)

Tiu ĉi mistikismo, estu permesite diri, estas grandparte sensencaĵo. Vere, ke la poezio (kiel ĉiuj lingvaj kreaĵoj) estas profunde subtila kaj posedas "misterajn" asociojn — kvankam tiuj ekzistas, ne en la poezio mem, sed en la mensoj de la homoj ĝin kreinta kaj leganta (sed malofte ĉe ambaŭ samtempe kaj samgrade), kio, kiel montriĝos sube, estas tute alia afero — sed aliflanke *neniu* traduko, ĉu proza ĉu poezia, povas esti alia ol similaĵo : temas nur pri la grado de simileco. Sufiĉe multaj sukcesaj poemtradukoj ekzistas por pruvi, ke la

grado povas esti ne malpli alta ĉe la poezio ol ĉe la prozo. (Cetere, mi defias la aŭtoron de la supra alineo menciit eĉ unu serioze taksindan poemon, kiu ne havas signifon !)

Tamen la atenta leganto tuj rimarkos, ke, se oni akceptas la neeblecon traduki poezion, el tio sekvas, ke ne valoras eĉ entrepreni ĝian tradukadon; ke sekve de tio oni kontentiĝas per proza parafrazo, kio multe malŝarĝas la dorson de la tradukanto; kaj ke, plifaciligante la celon, oni nepre malaltigas la kvaliton de la atingo. Deklarinte la neeblecon de fidela traduko, oni ne bezonas honti aŭ pardonpeti pri fuŝa ! Tiu sinteno povas foje konduki ĝis la plej absurdaj konkludoj :

"Sekve ne nur estas eble, sed kelkrilate pli dezirinde, transdoni Iliadon, Odiseon, aŭ Beŭvulfon proze, ol traduki ilin verse. VERSOJ, KIUJ NE ESTAS POEZIO, MALKLARIGAS LA RAKONTON, kaj sekve la poemon, ne donante adekvatan anstataŭaĵon por la stilo de la originalo." (Mia majuskligo, W.A.)

La aŭtoro ne klarigas, kiamaniere versoj, ĉu aŭ ne poeziaj, kondiĉe ke ili legiĝas flue, povas malklarigi la rakonton ! Oni devus konkludi, ke li ne legis la rakontojn de Chaucer (14), se tio ne estus evidenta absurdaĵo ! Sed parolante pri la poezia lingvaĵo de *Beŭvulfo*, la sama aŭtoro diras plue :

"Tiuj vortprovizo kaj esprimmaniero kreas la specialajn belon, riĉecon kaj komplikecon de la anglosaksa poezio Kaj ĝi kreas la ĉefan malfacilecon je kontentiga tradukado de iu anglosaksa poemo. Ezra Pound (15) sukcesis per sia mirinda kaj fama versio de la *Marvaginto*" (16)

Do, kvankam Pound jam pruvis, ke oni povas sukcese fari poezian tradukon de anglosaksa poemo, nia aŭtoro obstine elektas fari prozan version. Komprenoble, li ne estas poeto, kaj "ni devas akcepti la fakton, ke ne tre multaj laborantaj tradukistoj estas kreaĵartistoj; se ili estus tiaj, ili kreus originalajn artaĵojn kaj ne tradukus" (17). Malgraŭ la evidenta fakto, ke traduki poemon kapablas nur poeto, kaj la pruvita fakto, ke tradukoj far poetoj estas ofte altnivelaj, tio ne detenas

(12) The Times Literary Supplement, 24.7.1959, p. 436.

(13) L. W. Tancock : Style in translation from French. (Aspects of translation, Londono, 1958, p. 49).

(14) Geoffrey Chaucer (1340?-1400?) : granda angla poeto, kies ĉefverko estas la "Rakontoj de Canterbury".

(15) Ezra Pound : nuntempa usona poeto.

(16) David Wright : Beowulf. Londono, 1957. Enkonduko, p. 21-23.

(17) Leonard Forster : Translation, an introduction. (Aspects of translation, Londono, 1958, p. 24). La dua parto de nia citaĵo estas bela nekonsekvencaĵo : multaj kreaĵartistoj en multaj landoj ankaŭ tradukas; kaj la sperto de multaj el ili donas fortajn motivojn por la aserto, ke la tradukado estas bonega evoluigilo kaj ekzercilo, pri kiu devus de tempo al tempo okupiĝi ĉiu poeto.

la nepoetojn de tiaspeca tradukado, nek de la aplomba asertado, ke la tradukado de poezio ne eblas! Kiel refreŝige estas, legi trafan analizon pri la kaŭzoj de tiu ĉi bedaŭrinda situacio fare de alia angla aŭtoro!:

"La tradukado de poezio, precipe la antikva poezio, postulas lertecon treege similan al tiu de ĵonglisto. Per certa mano kaj ŝajna senpeno la koloraj pilkoj de signifo, aludo, formo, sono kaj ritmo devas esti ĵetataj kaj kaptataj. En Anglujo, kie oni ĉiam tre alte estimadis diletantojn, ekzistas tendenco forregali la lertaĵon kiel neeblan. Niaj tradukantoj elektas unu-du pilkojn, kies ekbrilo ekplaĉas al ili, kaj lasas la ceterajn foruliĝi al la planklumoj⁽¹⁸⁾, klarigante, ke ili retenis la sole gravajn."⁽¹⁹⁾

Li pravas. La decida faktoro en tradukado, la sola kondiĉo por ĝia "ebleco" aŭ "neebleco", estas la talento de la tradukanto. Anekdoto povas tion ilustrati: Amiko mia provis konvinki lernejestron pri la meritoj de Esperanto. "Bone", diris la lernejestro (konfesinde, iom stulte!), "se vi sukcesos traduki en Esperanton la vortludan versaĵon:

Ben Battle was a soldier bold,
And used to war's alarms;
But a cannon-ball took off his legs,
So he laid down his arms,

mi konsentos, ke la internacia lingvo estas taŭga traduklingvo. Nia franca profesoro jam certigis al mi, ke estas neeble traduki ĝin en la francan." Mia amiko trovis solvon, ne nur por Esperanto, sed ankaŭ por la franca! — ĉar, kiel li klarigis al la lernejestro, la traduko de vortludoj dependas, ne de la lingvo, sed de la sprito de la tradukanto. (Bedaŭrinde, tiuj efemeraj traduketoj jam delonge perdiĝis, sed mi memoras, ke la solvo en ambaŭ lingvoj dependis de la duobla signifo de la vorto "membro".) Tiel same, la tradukado de poezio dependas de la genio de la tradukanta poeto.

Kelkfoje oni aŭdas, ke iu lingvo, aŭ lingvo entute, "kapablas" aŭ "ne kapablas" fari tion aŭ alion. Tia aserto implicite ignoras la fakton, ke lingvo per si mem nenion signifas. Signifon donas al ĝi la homoj, kiuj ĝin uzas:

"La plimultaj vortoj uzataj eĉ de primitivuloj havas nenan rekoneblan similecon al tio, kion ili signas. Ili estas tute konvenciaj; tio estas; signifoj devas esti donitaj al ili artefarite per ia subkomprenata konsento inter anoj de la socio, kiu uzas ilin."⁽²⁰⁾

Tio ĉi fariĝas tute evidenta, kiam la ŝlosilo de la konvencioj perdiĝas, ekz-e: ĝis la retrovo de la Roseta-ŝtono, kiu ebligis ekvaciiĝon de konvenciaj signoj de unu lingvo kun tiuj de alia (t.e., tradukon), la lingvaĵo de la antikvaj egiptoj havis neniun signifon por la modernaj homoj. Kompreneble, ankaŭ la *sonoj* de fremda lingvo havas neniun signifon por la homoj ĝis ili ellernis la konvenciajn signifojn, pri kiuj interkonsentas la uzantoj de tiu lingvo. Lingvo, do, posedas nur tiom da signifo,

kiom al ĝi donas la homaj mensoj. Se mi uzas la anglan vorton *incarnadine*, la plimultaj "edukitaj" britoj tuj pensas pri unu fama verso de Sekspiro, kaj tiu vorto do havas por ili tiun "asociecon" (kvankam estas dubinde, ĉu tio multe aldonas al ilia kompreno de ĝia "signifo"); sed se mi diras ĝin al mia loka buĉisto, estas cent ŝancoj kontraŭ unu, ke li eĉ ne komprenos min, ĉar li ne "lernis" tiun vorton, kaj neniam legis Makbeton. Kaj eĉ en edukita rondo, se al iu ĉarma virino, kiu invitas min sidiĝi apud ŝi, mi respondas:

"Ordonu via donas tian ravon,
ke ĝin obei tuj jam ŝajnus tarde",⁽²¹⁾

estas tre versaĵne, ke eĉ en ŝia subkonscio ne vekigis rememoroj "mortintaj kaj forgesitaj" pri la kunteksto, kiun havas tiu versaro en la verko de Dante. Okazos certagrada paneo de interkomunikigo.

Sur la kampo de poezio, tio signifas, ke la "kunfandiĝo de sentuma kaj spirita spertoj" estas "mistera" nur pro tio, ke ĉiu homa menso estas altgrade unika, kaj ke la lingvaĵo de poezio, *kiam ĝi estas uzita por komuniki ion malprecizan*, estas mem tre malpreciza; tiel ke la grado de poezia komunikigo dependas ĉefe de la grado de simpatio inter la menso de la poeto kaj la menso de la koncerna leganto. La tuta tradicio, el kiu leviĝas la literaturo kaj al kiu ĝi aludas, ekzistas, kiel dinamisma forto, nur en la mensoj de la homoj hodiaŭ vivantaj, kaj ne en la lingvo mem: ambaŭ daŭre ŝanĝiĝadas. Kiam la poeto Gray skribis:

Fair Science frowned not on his humble birth,
And Melancholy marked him for her own,

la vortoj *science* kaj *melancholy* havis konvenciajn kaj asociajn signifojn ne tute samajn, kiel ili havas hodiaŭ; tiun fakton devas *lerni* ĉiu leganto, aŭ li sufiĉe grave miskomprenos la versojn.

Tamen tradicio ekzistas, kaj la lingvo ja posedas rekonatajn kaj rekoneblajn signifojn, subsignifojn kaj asociecojn. Kaj neniuj povas dubi, ke la sumon de tiuj pli plene konstatoj homo, kiu uzis la koncernan lingvon ekde la infanaĝo kaj vivis kaj edukigis en la medio de la koncerna lingvo, ol homo, kiu ĝin eklernis jam kiel kreskinto, kaj kiu pasigis la pliparton de sia vivo en alia lingva medio. Tiu ĉi senduba fakto donas al Esperanto unu el ĝiaj du gravaj avantaĝoj kiel traduklingvo. Nacilingvaj

(18) Kompreneble, teatra metaforo.

(19) Peter Green, en recenzo en "The Observer" (Londono) ĉirkaŭ decembro 1956, pri libro, kiu mem bele atestas la "eblecon" de poezia tradukado, nome *Translating Horace* de J. B. Leishman.

(20) Prof. V. Gordon Childe: *What happened in history*. Londono, 1942, represo de 1950, p. 11.

(21) Dante: *Infero*, II, 79-80.

tradukoj estas preskaŭ ĉiam farataj de homoj el la dua supra kategorio, t.e., de homoj, kiuj tradukas en la gepatran lingvon el lingvo malpli perfekte posedata. Tiu situacio estas tiel ĝenerala, ke ĝi estas implicita en ĉiu studo pri la tradukado, ekz-e: "la tradukanto devas decidi, kio estas la signifo de la frazo, kaj poste esprimi tion *en sia propra lingvo*" (mia kursivigo, W.A.). (22) La esperantaj tradukoj, male, estas ordinare farataj de homoj, kiuj denaske posedas la originalan lingvon kaj tradukas en lingvon, kiun, pro ĝia gramatika ordecio kaj semantika precizeco, ili povas regi same *perfekte kaj senmanke kiel sian denaskan lingvon*. Sekve tiuj tradukantoj scias, ĝis plejeble perfekta grado, almenaŭ la sumon de tio, kion ili devas redoni en la internacia lingvo. Tio estas jam granda avantaĝo: ili plejeble "sentas" la originalon.

Duan avantaĝon ĝuas Esperanto rilate la transdonon de asocioj kaj nuancoj. Forta esperanta tradicio, lingva kaj literatura, jam ekzistas; dum la periodo de unu normala homvivo kaj eĉ pli, la lingvo estas daŭre uzita, — praktike oni nun parolas pri la "tria generacio" de esperantistoj, — granda literaturo originala kaj tradukita estas kreita, kaj kompreneble la esperantaj vortoj jam posedas nuancojn kaj asociojn indiĝene esperanekzistantanta pezo de tradicio, kiu forte influas lian propran uzadon de la Internacia Lingvo. Tamen Esperanto ne estas, kaj ankoraŭ dum jarcentoj ne povos esti, tiel rigida kiel la naciaj lingvoj. Tradukante el nacia lingvo en alian nacian lingvon, oni trairas du stadiojn: oni studas la vorton aŭ frazon en la originala lingvo, konstatas ĝian precizan signifon kaj la asociojn, kiujn tiu vorto aŭ frazo kunportas; kaj poste oni klopodas trovi vorton aŭ frazon en la traduklingvo, kiu havas precize saman signifon kaj asociojn. Sed trovinte la plej taŭgan ekzistantan solvon, oni tro ofte konstatas, ne nur, ke mankas al la traduko kelkaj el la originalaj asocioj, sed ankaŭ, ke la tradukvorto aŭ frazo alportas kun si asociojn el sia propra medio, kiuj tute ne necesas aŭ taŭgas por traduko de la originalaĵo. Eĉ pli, oni ne malofte trovas, pro la noveco aŭ ekstrema fremdeco de la originala temo, ke la traduklingvo tutsimple ne posedas la rimedojn por ĝin esprimi:

"Eĉ en lingvoj havantaj riĉan tradicion tiurilate la formado de terminaro ofte troviĝas en la manoj de la tradukanto, kiu ne ĉiam kapablas plenumi sian respondecon tiurilate, kaj kiu ne ĉiam eĉ konscias pri ĝi." (23)

Ekzemplojn de tio prezentas en multaj lingvoj la terminaroj de psikologio, marksismo, k.a., kies terminoj eniris tiujn lingvojn pere de tradukoj.

Nu, kvankam la signifoj de la esperantaj radikoj estas ĝenerale klare kaj precizaj, kun tamen kelka algluiĝo de asocio, pro la gramatika strukturo de la lingvo la tradukanto povas *ĝuste pro tio* redoni kun altgrada precizo la nuancojn de origi-

nala teksto. La sistemo de sufiksoj kaj vortkunmetado ebligas atingi altan nuancecon. La vortkunmetado, kompreneble, ne okazas arbitre kaj kaprice, sed laŭ la spirito kaj kutimoj de la lingvo; tamen ĝi donas al la semantiko de la lingvo samtempe grandan elastecon kaj precizecon.

Estas notinde, ke eĉ en la plej simplaj, ĉiutagaj kuntekstoj Esperanto, pro sia relativa manko de antaŭkondiĉado, kapablas esti pli fidela ol tiu aŭ alia nacilingvo. (23a) En la simpla frazo:

"— Vi staru interne, muelistino! Ni tuj bezonos vin — ekkriis Emesiz." (24) por la vorto *muelistino* tute simple ne ekzistas ekvivalento en ekzemple la angla lingvo, nek ekzistas en tiu lingvo tradicia esprimo per kiu oni alparolas ĝuste muelistinon, tiel ke angla traduko devus ignori tiun nuancon.

Agrabla kaj utila rezulto de la altgrada fleksebleco, elastecon kaj precizecon de Esperanto estas tio, ke ĝi bonege adaptiĝas al la apartaj ecoj de la plej diversaj lingvoj. En rilato al la poezia stilo, tio multe helpas al tradukado fidela, kiel laŭ la senco, tiel ankaŭ laŭ la formo. Francajn aleksandrojn, ekzemple, oni kutime tradukas en angla lingvo per kvinjamboj, kaj inverse; Esperanto bonege akceptas ambaŭ versojn, tiel ke aleksandrojn oni tradukas per aleksandroj, kaj kvinjambojn per kvinjamboj, kaj en ambaŭ okazoj ne sentiĝas ia "fremdeco". Krom tio, la lingvo posedas multajn kvalitojn, kiuj altgrade taŭgigas ĝin kiel tradukilon, kaj, antaŭ ol transiri al konsiderado pri kelkaj konkretaj tradukekzemploj, estos utile ĵeti almenaŭ supraĵan rigardon al nur kelkaj el ili.

La akuzativa finaĵo *-n* certgrade liberigas la vortordon de Esperanto. Akuzativo ekzistas en ĉiuj lingvoj, sed ĝi povas esprimiĝi laŭ du manieroj: aŭ ĝi esprimas la objekton sen fonetika morfemo, per la nura pozicio de la vorto en la frazo; aŭ ĝi tion faras per iu fonetika morfemo, kiu povas esti

(22) Leonard Forster: Translation, an introduction. (Aspects of translation, Londono, 1958, p. 12).

(23) Verk. cit. sub (22), p. 9.

(23a) La subtilajn kaptilojn, kiuj embuskas la tradukanton, bele ekzemplas jeno: "En 1936 la sama Internacia Instituto de Intelektala Kooperado eldonis francan tradukon de hajkoj de la japana poeto Baŝo, faritan de Kuni Macuo kaj de Steinilber-Oberlin. Unu el ili, plej kortuŝa, tekstis:

*Au soleil, on sèche les kimonos.
Oh! la petite manche
de l'enfant mort!*

(Je la suno oni sekigas la kimonojn. Ho! la maniketo de la mortinta infano!). Estis rezervite al esperantisto, s-ro Teruo Mikami, kaj al la esperanta revuo 'Oomoto' (N-ro 217, Jul. 1958) riveli, ke tiuj tri versoj entenas kvar miskomprenojn: ĉar en la aludita tempo oni *aerumas* la kimonojn *en la ombro*, ĉar *kosode* signifas ne 'manikon', sed 'malvastmanikan kimonon', ĉar fine la *mortinta infano* estas efektive 'mortinta junulino.' (Prof. G. Waringhien, "Lingvo kaj Vivo", p. 418.)

(24) Ivan Vazov: Sub la jugo. Esperanta traduko de "Pod igoto", Sofio, 1959, p. 31.

deklinacia, prepozicia aŭ postpozicia ⁽²⁵⁾. Apartenante al la dua grupo, Esperanto ĝuas konsiderindan liberecon de la vortordo, kiu ebligas per ĝi reprodukti senperforte multajn stilajn apartaĵojn de la aliaj lingvoj, kio ne estas ebla por lingvo havanta pli rigidan vortordon. Plue, la akuzativo multe kontribuas al la klareco de Esperanto, kion povas mallonge pruvi unu-du ekzemploj:

Il insulta le président plus violemment encore que l'orateur précédent (ĉu tio signifas: li insultis la prezidanton eĉ pli krude, ol la antaŭa oratoro — aŭ — ol la antaŭan oratoron?); *je trouvais ce fruit délicieux au cours de mes longues promenades* (ĉu: mi trovis tiun frukton bongustan dum miaj longaj promenadoj — aŭ — mi trovis tiun frukton bongusta dum?); *il avait dans la terre une somme enfouie — La Fontaine* (ĉu: li havis monon enfositan en la tero — aŭ — li estis enfosinta monon en la tero?).

Estas utile, aldoni al tio ankaŭ jenon:

"Oni probable kontraŭdiros, ke se tiuj frazoj estas efektive dusencaj . . . tamen la ĉirkaŭteksto permesas ilin senerare kompreni. Tio estas ofte vera, sed ne ĉiam; kaj oni devas konfesi, unue, ke ĉiam ekzistas la risko, ke tiu ĉirkaŭteksto mankas aŭ mem ne estas sufiĉe preciza por eviti ĉian konfuzon; due, ke ekzistas aparte gravaj tekstoj — filozofiaj, juraj, sciencaj — ĉe kiuj subtilo de la penso nepre postulas, ke ĉia eĉ plej malprobabla dubo estu sisteme eliminata." ⁽²⁶⁾

Al la stila fleksebleco de Esperanto kontribuas ankaŭ la akordiĝo, laŭ nombro kaj kazo, de adjektivoj kun siaj substantivoj. Tio ebligas multajn stilajn apartaĵojn kaj koncizaĵojn, tre efikajn precipe en poezio. Tri mallongaj ekzemploj devas ĉi tie sufiĉi; sed se oni imagas la adjektivojn sen akordiĝo, oni komprenos la esencan gravecon de la afero:

(i) Mi sidis riverborde kaj, mizera,
Stelecajn lampojn sur la pont' rigardis;

(ii) Lampgutoj falis al la frunt' malvarma:
Ŝi viŝis ilin per la haroj, larma.

(iii) La robon blankan ruĝa bend' trastriis.

La precizeco kaj klareco de la internacia lingvo rezultigas de multaj faktoroj. Bedaŭrinde oni povas ĉi tie doni nur malgrandan listigon de ankoraŭ kelkaj el ili:

(a) La ebleco senpere verbigi substantivojn kaj adjektivojn, adjektivigi substantivojn kaj verbojn, k.s.

(b) La vasta uzado de la adverbo. La supra ekzemplo (i) liveras belan ekzemplon per la vorto *riverborde*.

(c) La sistemo de sufiksoj. Vidu, ekzemple, la distingon inter *soleca* kaj *solema*.

(d) La refleksiva pronomo *si*. Ekzemple: *Him Kleon bandaged with strips torn from his tunic* (ĉu: Lin Kleon bandaĝis per strioj ŝiritaj de lia tuniko — aŭ — de sia tuniko?).

Fine, la formfidelan tradukadon de poeziaj verkoj multe plifaciligas la altgrada rimriĉo de Esperanto. La rimeblecoj varias de lingvo al lingvo, ekz-e:

"Jen kelkaj vortoj pri la specialaj problemoj de tradukado el la ĉeĥa en la anglan. Kun escepto eble de la litova, la ĉeĥa estas hodiaŭ la plej altgrade fleksia lingvo de Eŭropo, eĉ pli ol la rusa. La angla, aliflanke, estas la malplej fleksia eŭropa lingvo. En la ĉeĥa, sekve, vortoj kiuj ne rimas en nominativo eble rimas en aliaj kazoj; similaj aŭ identaj sufiksoj povas okazigi rimojn, k.t.p. mallonge, rimebloj estas senfine pli multnombraj en la ĉeĥa ol en la angla." ⁽²⁷⁾

Esperanto estas tre riĉa je rimoj ⁽²⁸⁾ — oni povas diri, ke neniu esperanta vorto estas nura balasto en la rimvortaro, kaj cetere la rimeblecoj estas tre variaj — kaj tio kompreneble ebligas reprodukti eĉ komplikajn originalajn rimskemojn, kiel ekz-e de sonetoj, spenseraĵoj, tercinoj, k.t.p.

Ankaŭ unu plian necesajon ĝuas Esperanto: ĝi allogis al si multnombro poetojn geniajn kaj talentajn, kiuj dediĉis sin interalie al la tradukado en la internacian lingvon de poemoj el siaj plej variaj nacilingvoj.

Ĉio ĉi certigis, ke Esperanto estas neniel malsupera al la naciaj lingvoj kiel belarta tradukilo. ^(28a)

III

Mi nun aldonos komparajn specimenojn de poemtradukado. La limoj de tiu ĉi studo ne ebligas doni amason da tiaj specimenoj, sed per detala studado de kelkaj ekzemploj oni povas ricevi utilajn ĝeneralajn impresojn. Iuj skeptikuloj eble opinios, ke mi tre zorge elektis miajn specimenojn

(25) Vd. Prof. G. Waringhien: La akuzativo en Esperanto, (Esperantologio, vol. I, p. 33-52), el kiu mi ĉerpis miajn ekzemplojn pri tiu temo.

(26) verk. cit. sub (25), p. 41.

(27) E. Osers kaj J. K. Montgomery: Modern Czech Poetry. Londono, 1943, p. 11.

(28) Pri la rimriĉo de Esperanto vidu: Malgranda Revuo, 1951, n-ro 1, p. 14-15, kaj 1952, n-ro 1, p. 21-22.

(28a) En la franca beletra revuo *La Nouvelle Revue Française* de la 1-a de novembro 1958 aperis kelkaj "Quatrains d'Omar Khayam", tradukitaj de Armand Robin. En la enkonduko li skribis: "Ekzistas kelkaj centoj da tradukoj de l' *Quatrains* en la diversaj lingvoj de la planedo. . . . La plej ekzakta, kiun mi konas, estas tiu en Esperanto publikigita de Gaston Waringhien ĉe Parizo en 1953" (p. 933).

kun la celo, doni kiel eble plej favoran impreson pri la esperanta teksto en komparo kun la naci-lingvaj tekstoj, sed tion mi ne faris. La rezultoj de mia elekto estas tiurilate hazardaj; efektive, mi definitive elektis miajn specimenojn antaŭ ol fari iun ajn pli profundan analizon de la diversaj tradukoj. Kompreneble, la elekto ne povis esti tute hazarda. Tri kriterioj gvidis min al la subaj specimenoj:

(i) La originalo devis esti poemo kun rekonata literatura graveco kaj valoro;

(ii) Devis esti troveblaj tradukoj en du aliaj lingvoj; tiuj tradukoj mem devis havi altgradan estetikan valoron ⁽²⁹⁾, por ke la diskuto, laŭ la celoj de la komparo, povu ignori tiun aspekton de la tradukoj kaj koncentriĝi je la senca fideleco; per malbonaj tradukoj oni povus nenion pruvi krom la nekompetenteco de la tradukintoj, sed se la tradukoj jam atingas certan nivelon oni rajtas fari konstatojn ankaŭ pri la lingvoj uzitaj;

(iii) La specimenoj devis esti relative mallongaj; estintus tre interese analizi pli longajn ĉerpajojn el ekzemple *Peer Gynt* kaj *Infero*, sed tion la spaco ne permesis.

Aparte grava estis la p-to (ii). Se poemtraduko mem ne donas poeziecan impreson, ĝi donas nenion. Fundamente, mi konsentas kun Peter Green:

„Poemo... estas nedividebla tutaĵo: la tradukanto ne rajtas arbitre koncentriĝi je la formo je kosto de la signifo, aŭ inverse”. ⁽³⁰⁾

Formoj kaj signifo egale kontribuas al la poezieco: eventuale oni rajtas rezigni pri la originala formo, kvankam kun domaĝo, kondiĉe ke la traduko havu propran poeziecan formon: tio evidente ekskludas prozajn „tradukojn” de poeziaj verkoj. Ĉu Homero estas giganta pro siaj rakontoj? — ne, li ne estas. Li estas giganta pro la formo (ritmo, esprimaro, ekzalta lingvaĵo), per kiu li prezentis siajn rakontojn.

Ni transiru do al niaj konkretaj specimenoj. (Uzitaj mallongigoj: A.: angla; E.: esperanta; F.: franca; R.: rusa.)

SPECIMENO A:

L'ALBATROS

de Charles Baudelaire
Franclingva originalo

Souvent, pour s'amuser, les hommes d'équipage
Prennent des albatros, vastes oiseaux des mers,
Qui suivent, indolents compagnons de voyage,
Le navire glissant sur les gouffres amers.

A peine les ont-ils déposés sur les planches,
Que ces rois de l'azur, maladroits et honteux,
Laissent piteusement leurs grandes ailes blanches
Comme des avirons traîner à côté d'eux.

Ce voyageur ailé, comme il est gauche et veule!
Lui, naguère si beau, qu'il est comique et laid!
L'un agace son bec avec un brûle-gueule,
L'autre mime, en boitant, l'infirme qui volait!

Le Poète est semblable au prince des nuées
Qui hante la tempête et se rit de l'archer;
Exilé sur le sol au milieu des huées,
Ses ailes de géant l'empêchent de marcher.

Formo :

La F. aleksandrojn tradukas E. per aleksandroj, A. per kvinjamboj. Diferenco inter F. kaj E. aleksandroj estas ĉefe tio, ke la unua havas viran cezuron, la dua inan, konforme kun la ĝenerale ina formo de la vortaro. Tamen E. reproduktas la sinsekvon de inaj kaj viraj rimvortoj de F., kion A. ne faras. Generale, do, E. estas laŭforme pli proksima al la originalo.

Titolo :

Koincido de terminoj ebligis al ambaŭ tradukintoj reeĥi la originalan titolon.

Komentaro :

v.1. Nek E. nek A. precize tradukas la signifon de F. *souvent*, sed ambaŭ iom mildigas ĝin. A. retenas la s-aliteracion; E. sonakordiĝas per *foje* kaj *amuzo* al F. *-vent* kaj *s'amuser*. Kvankam A. *loafing* bonege respondas al la etoso de la originalo, ne ekzistas por ĝi pravigo en la F.

v. 2. A. *snare* pli poeziecas ol E. *kapt-akiras*, kaj eĉ ol la F. *prennent*. Iom perdiĝas la sento de F. *vastes*, kvankam E. provas redoni tiun senton kaj sonon per aldono de la alie ne motivita *vent-*. E. *mar'* akordiĝas kun F. *mers*. Mankas la varianto F. *albatros-oiseaux* en A.

(29) Nadiron de la tradukarto eble prezentas libro "Burns in other tongues" (Burns en aliaj lingvoj), en kiu estas kolektitaj tradukoj de poemoj de la skota poeto Robert Burns en proks. 50 aliajn lingvojn. Aliflanke, Maršak en la rusa kaj Rossetti en Esperanto pruvis,

ke altgradaj fideleco kaj poezieco en traduko el Burns estas atingeblaj se la tradukanto havas la necesan genion.

(30) lok. cit. sub (19).

LA ALBATRO

de Charles Baudelaire

Esperanta traduko de K. Kalocsay (21)

Kelkfoje, por amuzo, ŝipanoj kapt-akiras
Albatrojn, ĉi grandegajn ventbirdojn de la mar',
Kiu, indiferentaj vojaĝkunuloj, iras
Post ŝip' glitanta super amara abismar'.

Apenaŭ ili estas metitaj ŝipoplanke,
Ĉi reĝoj de l' lazuro, mallerte kaj kun ĝen',
Grandajn flugilojn blankajn jen trenas ambaŭflanke,
Kiel remilojn pezajn, kun kompatinda pen'.

Ĉi vojaĝant' flugila inerte nun hezitas.
Jus nura bel', kaj nune: malbel' komika jam.
Jen, iu ĝian bekon per kurba pip' incitas,
Alia ĝin, fluginton, imitas dum la lam'.

Similas la poeto al tiu princ' de l' nuboj,
Kiu la ŝtormon ĝuas, kaj ridas je l' pafant',
Kaj kiun, tere, sube, ĉe mokrideg' de buboj,
Malhelpas iri ĝiaj flugiloj de gigant'.

THE ALBATROSS

by Charles Baudelaire

Angla traduko de Roy Campbell (22)

Sometimes for sport the men of loafing crews
Snare the great albatrosses of the deep,
The indolent companions of their cruise
As through the bitter vastitudes they sweep.

Scarce have they fished aboard these airy kings
When helpless on such unaccustomed floors
They piteously droop their huge white wings
And trail them at their sides like drifting oars.

How comical, how ugly, and how meek
Appears this soarer of celestial snows!
One, with his pipe, teases the golden beak,
One, limping, mocks the cripple as he goes.

The Poet, like this monarch of the clouds,
Despising archers, rides the storm elate.
But, stranded on the earth to jeering crowds,
The great wings of the giant baulk his gait.

Ĝenerala konkludo pri Specimeno A: La esperanta traduko estas forme kaj vorte pli proksima al la originalo kaj sukcesas reprodukti ties ideojn kaj

v. 3. F. *suivent*, E. *iras post*, mankas en A. Estas dubinde, ĉu A. *indolent* sence respondas al F. *indolents* en tiu ĉi kunteksto; E. *indiferentaj* ŝajnas tiurilate pli trafa.

v. 4. A. *through the vastitudes* tute ŝanĝas la sencecon de F. *sur les gouffres*, kiun precize redonas E. *super abismar'*. F. *glissant*, E. *glitanta*, — A. *sweep*, kvankam sence iom alia, tamen eble ne malbona (preciza A. traduko estus *glide*). F. *amers* sonakordiĝas kun E. *-mar'*.

v. 5. La aktiva F. *les ont-ils déposés* fariĝas pasiva en E. *ili estas metitaj*; kvankam A. redonas la aktivecon kaj la inversion de F., tamen la bildo estas iom alia: *have they fished aboard*. F. *sur les planches*, E. *ŝipoplanke* troviĝas nur en la posta verso kiel A. *floors*, vorto tamen iom nekonvena rilate ŝipon!

v. 6. E. tre proksime reproduktas la F. sonojn de tiu ĉi verso. F. *de l'azur* fariĝas A. *airy*. F. *maladroits* adverbiĝas en E. *mallerte*; sed A. *helpless* ne precize redonas la signifon. F. *honteux* kaj E. *kun ĝen'* sence tute samas; tiun ĉi nuancon A. redonas nur sugestie pere de *unaccustomed*, kiu tamen jam rilatas al substantivo *floors* kaj ne kiel en F. *honteux* al *rois* (A. *kings*).

v. 7. F. *laissent traîner* perdas iom da potenco en E. *trenas*; A. *droop and trail* estas pli trafa kaj ankaŭ pli esprimiva. F. *piteusement*, A. *piteously*, reaperas nur poste kiel iomete pli malforta E. *kun kompatinda pen'*.

v. 8. Al F. *avirons* ambaŭ tradukintoj sentis bezonon aldoni adjektivon: E. *pezajn*, A. *drifting*; la E. pli taŭgas al la originala komparo kun flugiloj de albatro.

v. 9-10. F. *ailé*, E. *flugila*, reeñas F. *ailles*, E. *flugilojn* en v. 7; tiun eĉion ne donas A. *soarer* (*wings* en v. 7). La kvar adjektivoj F. *gauche*, *veule*, *comique* kaj *laid* donis malfacilaĵojn al ambaŭ tradukintoj; A. sukcesas redoni tri el ili: *meek*, *comical*, *ugly*; E. redonas ĉiujn kvar nuancojn, sed unu per verbo *hezitas*, unu per adverbo *inerte*, unu per substantivo *malbel'*, kaj nur unu per adjektivo *komika*. A. *how*..... reproduktas la esprimmanieron F. *comme*....., kiun ignoras la E. Sed A. tute ellasas F. *naguère si beau*, E. *ĵus nura bel'*, kaj enkondukas la frazon *of celestial snows*, kiu nenie aperas en la F. Pli ol aliloke evidentiĝas en tiu ĉi versduo la troa kurteco de la A. kvinjambo por traduki la F. aleksandron.

v. 11. A. aldonas la adjektivon *golden*, ne en la F.; F. *brûle-gueule* tute ne estas (E.) *kurba*; la A. ne distingas la pipspecon.

v. 12. F. *en boitant*, A. *limping*, iom lame fariĝas E. *dum la lam'*! En A. mankas redono de F. *qui volait*, E. *fluginton*.

v. 13. F. *prince*, E. *princ'*, A. *monarch*.

v. 14. E. *ĝuas* iomete libere tradukas F. *hante*, sed tion faras ankaŭ A. *rides elate*; iom lerte A. sugestas F. *se rit* per similaspekta sed signife tute alia *rides*.

v. 15. E. *buboj* ne troviĝas en la F., nek A. *crowds*; ambaŭ tamen bone akordiĝas kun la bildo.

(31) Ch. Baudelaire : La floroj de l' malbono. La Laguna, 1957, p. 62.

(32) Roy Campbell : Poems of Baudelaire. Londono, 1952, p. 6.

Ĝenerala konkludo pri Specimeno A: La esperanta traduko estas forme kaj vorte pli proksima al la originalo kaj sukcesas reprodukti ties ideojn kaj

bildojn, preskaŭ nenion propran aldonante. La angla traduko en du-tri lokoj iom grave ŝanĝas la sencon, aŭ aldonas konceptojn ne en la originalo, aŭ iun esprimon ellasas.

SPECIMENO B:

THE TIGER

by William Blake
Anglalingva originalo

Tiger! Tiger! burning bright
In the forests of the night,
What immortal hand or eye
Could frame thy fearful symmetry?
In what distant deeps or skies
Burnt the fire of thine eyes?
On what wings dare he aspire?
What the hand dare seize the fire?

And what shoulder, and what art,
Could twist the sinews of thy heart?
And when thy heart began to beat,
What dread hand? and what dread feet?

What the hammer? what the chain?
In what furnace was thy brain?
What the anvil? what dread grasp
Dare its deadly terrors clasp?

When the stars threw down their spears,
And water'd heaven with their tears,
Did he smile his work to see?
Did he who made the Lamb make thee?

Tiger! Tiger! burning bright
In the forests of the night,
What immortal hand or eye
Dare frame thy fearful symmetry?

LA TIGRO

de William Blake

Esperanta traduko de William Auld (33)

Tigro, tigro, brile brula
En arbaro nokt-obskura,
Forĝis kia man' eterna
Vin je simetri' konsterna?

En kia fundo aŭ ĉielo
Ardis via okulhelo?
Kia lin flugil' subtenis?
Kia man' la fajron prenis?

Per kiaj ŝultro kaj kompreno
Por vi tordiĝis kortendeno?
Kaj kiam pulsas batoj koraj,
Kiaj pied' kaj mano gloraj?

Kia martelo? Ĉeno kia?
Kia forn' por cerbo via?
Riskis kia fort' kolosa
Spiti al terur' ambosa?

Formo:

La originalo estas verkita laŭ kvartroŝeaj versoj, kiuj foje permesas al si ricevi aldonitan silabon ĉe la verskomenco. Tiun ĉi formon fidele reproduktas la E. La F. aliflanke tradukas sesfoje per kvin piedoj anstataŭ kvar, kio abrupte lezas la ritmoglatecon. Kiel la originalo, tiel ankaŭ la E. rimas aabb; la F. diversmaniere. Entute la formon ne redonas F., jes redonas E.

Titolo:

Koincido de terminoj permesis al ambaŭ tradukintoj reeĉi la originalon.

Komentaro:

v. 1. E. redonas la aliteracion de A.

v. 2. F. redonas precizan signifon kaj ankaŭ la sonojn de A. E. aldonas la nocion *obskura*. E. *arbaro* singularas kompare kun pluralaj A. *forests* kaj F. *forêts*, sed klopodas redoni ĝeneralecon per ellaso de la artikolo.

v. 3. E. redonas A. *hand*, sed ne A. *eye*; F. redonas neniun el ambaŭ, anstataŭigante ilin per la malpli konkreta *pouvoir*. F. *immortel* precize eĥas A. *immortal*, sed superflue aldonas ankaŭ *inouï*. E. *eterna* praktike samsignifas kiel A. *immortal*.

v. 4. La kondicionalon de A. *could frame* reproduktas nek E. *forĝis* nek F. *forma*. F. *parfaite terreur* ne respondas al A. *fearful symmetry*, E. *simetri' konsterna*; A. adjektivon *fearful* tradukas F. substantivo *terreur*, A. substantivon *symmetry* tradukas F. adjektivo *parfaite* — domaĝa renversiĝo de l'signifo. Nuanceco de E. *je* estas subtila sed ne domaĝas la sencon.

v. 5. Nek E. nek F. tradukas A. *distant*. E. *fundo* kaj ĉielo singularigas pluralajn A. *deeps* kaj *skies*.

v. 6. E. *helo* ne precize samsignifas kiel A. *fire*. F. *regard* malpli konkreta ol A. *eyes*.

v. 7. E. redonas nek A. *dare* nek *aspire*. F. *osa* egalas al A. *dare*, sed substantiva F. *le vouloir* ne tute kaptas la potencon de verba A. *aspire*. E. *flugil'* denove estas singulara kompare kun plurala A. *wings*.

v. 8. Nek E. nek F. tradukas A. *dare*.

v. 9. F. *puissance* ne tradukas A. *shoulder*, E. *ŝultro*. F. *art* reeĥas A. *art*, sed oni povas trafegi la E. tradukon *kompreno* en tiu ĉi kunteksto.

v. 10. Nek E. nek F. redonas A. *could*. F. *nouèrent* iom ŝanĝas la sencon de A. *twist*. E. esprimo en v. 9-10 estas iom elipsa, malpli rekta, ol A. kaj F. E. *tendeno* denove singularigas pluralan A. *sinews*.

(33) Angla Antologio I. Roterdamo, 1957, p. 174.

Kiam steloj sin malarmis
 Kaj sur la ĉielon larmis,
 Ĉu la verko al li karis?
 Ĉu vin Ŝafid-farinto faris?
 Tigro, tigro, brile brula
 En arbaro nokt-obskura,
 Forĝus kia man' eterna
 Vin je simetri' konsterna?

LE TIGRE

par William Blake

Franca traduko de Félix Rose ⁽³⁴⁾

Tigre, tigre flamboyant d'ardeur
 Dans les forêts de la nuit;
 Quel pouvoir immortel, inouï,
 Forma ta parfaite terreur?

Dans quels cieux, quelles profondeurs
 Brûlait le feu de ton regard?
 Quel vol osa donc le vouloir?
 Et quelle main saisit ce feu?

Et quelle puissance et quel art
 Nouèrent les ligaments de ton coeur?
 Dès ses premiers battements,
 Quels pieds et griffes effrayant?

Quelle chaîne? Quel marteau?
 Dans quelle fournaise était ton cerveau?
 Quelle enclume? Quel poing effarant
 Put gripper tes mortelles transes?

Quand les astres jetant leurs lances
 Arrosèrent le ciel de pleurs,
 Sourit-Il en te contemplant,
 Lui qui fit l'agneau de douceur?

Tigre, tigre flamboyant d'ardeur
 Dans les forêts de la nuit;
 Quel pouvoir immortel, inouï,
 Osa former ta parfaite terreur?

Ĝenerala konkludo pri Specimeno B: La franca traduko estas pli laŭvorte proksima al la originalo,

SPECIMENO C:

ANĈAR

de A. S. Puŝkin ⁽³⁵⁾

Ruslingva originalo

V pustyne ĉahloj i skupoj,
 Na počve, znojem raskaljonnoj,
 Anĉar, kak groznyj časovoj,
 Stoit — odin vo vsej vselennoj.

Priroda jaŝduŝĉih stepej,
 Ego v den' gneva porodila
 I zelen' mertvujvu vetvej
 I korni jadom napoila.

v. 11. F. ne ripetas A. *heart*. En E. manka nuanco de A. *began*. E. iom pleonasme al *pulsi* aldonas *batoj*.

v. 12. F. *griffes* pravas, ke la tradukinto mis komprenis la originalon tie; la A. *hand* kaj *fee* ne apartenas al la tigro, sed al la mistera, terura: Io aŭ Iu la tigron kreinta. E. *gloraj* mistradukas la A. *dread*. Denove per E. *pie'd'* la tradukinto singularigis pluralan A. *feet*.

v. 15-16. A. *dare* estas tradukita de E. *riski: spiti*; F. *put* estas malpli forta. F. *mortelles* ne redonas la sencon de A. *deadly*; E. tiun nuancor ne redonas. E. *fort'* ne estas tiel preciza, kie A. *grasp*, F. *poing*. En E. tute mankas la grava nuanco A. *clasp*. La senco de A. *dread*, F. *effarant*, ŝanĝigas al E. *kolosa*.

v. 17. E. *malarmis* ne precizigas, ke temis ĝuste pri A. *spears*, F. *lances*; ĝi estas ankaŭ iom malpli definitive rezigna ol A. *threw down*. F. partcipiligas per *jetant*.

v. 19. E. per *karis* parafrasas la originalon. La nuanco de A. *work*, E. *verko*, mankas en la F.

v. 20. F. fakte ne tradukas tiun ĉi verson; la tuta nuanceco mankas. F. *de douceur* ne estas motivita de la originalo.

v. 21-24. Tiu ĉi strofo ripetas la unuan strofon, kun unu grava kaj subtila diferenco: A. *could frame* apud *dare frame*; la duan redonas F. *osa former* per aldono de tuta piedo; E. donas similan sed ne saman subtilan distingon per *forĝis* apud *forĝus*.

je grava kosto de la formfidelo. Al la esperanta traduko mankas pluraj gravaj nuancoj.

Formo:

Por A. mi povis elekti inter du tradukoj: tiu de Nabokov ⁽³⁵⁾ kaj tiu de Morison. Nabokov redonas la formon de la originalo, kaj reproduktas la rimskemon abab; tamen laŭsence lia traduko estas iom tro libera. Tial mi elektis tiun de Morison, kvankam la formon li tute ŝanĝis: anstataŭ la kvarjamba verso de la originalo, li

(34) Felix Rose: Les 50 meilleurs poèmes anglais. Glasgovo, 1956, p. 35.

(35) Pushkin, Lermontov, Tyutchev: Poems. Trad. Vladimir Nabokov. Londono, 1947, p. 10-11.

Jad kaplet skvoz' ego koru,
K poludnju rastopjas' ot znoju,
I zastyvajet vveĉeru
Gustoj prozračnoju smoloju.

K nemu i ptica ne letit,
I tigr nejdet — liš' vihor' ĉornyj
Na drevo smerti nabejit
I mĉitsja proĉ' uje tletvornyj.

I jesli tuĉa orosit,
Blujdaja, list ego dremuĉij,
S ego vetvej uĵ jadovit
Stekajet dojd v pesok gorjuĉij.

No ĉeloveka ĉelovek
Poslal k anĉaru vlastnym vzgljadom,
I tot poslušno v put' potjok
I k utru vozvratilsja s jadom.

Prinjos on smertnuju smolu
Da vetv' s uvjadšimi listami,
I pot po blednomu ĉelu
Struilsja hladnymi ruĉjami;

Prinjos — i oslabel i log
Pod svodom ŝalaša na lyki,
I umer bednyj rab u nog
Nepobedimogo vладыki.

A knjaz' tem jadom napital
Svoji poslušljivyye strely
I s njimi gibel' razoslal
K sosedom v ĉuĵdyje predely.

ANĈARO

de A. S. Puŝkin

Esperanta traduko de K. Kalocsay (36)

En la dezert' sterile nuda,
El grund' bakita de sun-ardo
Anĉar' elĝermis, staras muta.
Ne kreskis en proksim' eĉ kardo.

Ĝin naskis la soifa tero
En furiozo mondmalbena,
Kaj per veneno de kolero
Saturis ĉiun fibron plena.

Venen' filtriĝas tra la krusto
En la tagmeza varmo suna,
Ce l' vento de vesperkrepusko
Koaglas je rezino bruna.

Proksimon ĝian bird' evitas
Kaj timas tigro. Se la sibla
Venteg' la branĉojn ekagitas,
Tuj plu ĝi flugas, venenkribra.

Kaj se la nuboj de l' ĉielo
Pluverojn sur anĉaron ŝutas,
De la folioj kaj de l' ŝelo
Venene tiuj teren gutas.

uzas triakcentan version amfibraĥan-troĥean; krom tio, li rimas nur abcb; la alternajn virajn kaj inajn versfinaĵojn de la originalo li ja redonas, sed inverse, laŭ la pli kutima angla maniero. Sed laŭsignife lia traduko estas tre proksima al la originalo. La E. traduko reproduktas la formon de la originalo, kun escepto de tio, ke la rimoj estas ĉiuj inaj.

Titolo :

Morison transliterigas la rusan vorton, sed devas ĝin klarigi per subtitolo. (Nabokov trovis la precizan anglan tradukon: *The Upas tree*.) La E. vorto koincidas kun la R., sed pro malofteco bezonis glosion, kiam la traduko aperis.

Komentaro :

v. 1. La adjektivoj donis kelkan malfacilaĵon al ambaŭ tradukintoj; A. *unyielding* certagrade rekreas la personigan nuancon de R. *skupoj*; A. *pale* estas iom malforta kompare kun R. *ĉahloj*, tamen ne malbona; E. *sterile nuda* estas preskaŭ parafrazo.

v. 2. Mankas al ambaŭ tradukoj la nuanco de R. *znojem*. A. *curse* estas tre malforta parafrazo.

v. 3. E. *muta* tute mistradukas R. *groznyj*. Al E. mankas ekvivalento de R. *ĉasovoj*. La originalo ne motivas E. *elĝermis*.

v. 4. E. traduko estas tro libera.

v. 5. A. *sun-tortured* ne troviĝas en la originalo. E. *tero* estas malpli preciza ol R. *stepej*, A. *steppe-land*.

v. 6. E. *mondmalbena* estas superflua kaj iom troiga.

v. 7-8. A. *dull* estas iom malforta kompare kun R. *mertvuju*. A. *broth* ne troviĝas en la originalo; A. *poisoned broth* estas malpli preciza ol *jadom* — samon oni povas diri pri E. *veneno de kolero*. Anstataŭ R. *vetvej* kaj *korni* (A. *leafage* kaj *roots*), E. iom strange donas *fibron*, kiu estas mistraduko.

v. 9. A. aldonas la adjektivon *thick*.

v. 10. Ambaŭ tradukoj ellasas R. *ot znoju*.

(36) Revuo Esperanto. Roterdamo, 1956, p. 118.

Hom' homon tamen por aliro
 Komandis per rigard' rigora.
 Fidele iris tiu viro,
 Revenis kun la suk' horora.
 Portante krom rezin' fatala
 Velkintan branĉon en tornistro,
 Kun ŝvit' malvarma sur la pala
 Vizaĝ' sin trenis la servisto.
 Li falis tie tuj en sveno,
 Pro elĉerpiĝ' de l' lasta forto.
 Ĉe l' trono de la suvereno
 La sklavon tiel trafis morto.
 La princo ĉiujn sagojn suki
 Ordonis per venen' anĉara,
 Per arkoj tiel sendis flugi
 La morton al popol' najbara.

ANCHAR (THE POISON TREE)

by A. S. Puŝkin

Angla traduko de Walter Morison (37)

In the pale, unyielding desert,
 On soil that the sunrays curse,
 Anchár like a dreadful sentry
 Stands — sole in the universe.
 The sun-tortured, thirst-racked steppeland
 Gave it birth in a day of wrath
 And fed the dull green of its leafage
 And its roots with a poisoned broth.
 Through its bark thick poison oozes
 And, melting when midday comes,
 Congeals again in the evening
 In smooth, transparent gums.
 No bird ever lights in its branches,
 No tiger approaches the tree:
 Alone, the black storm-winds brush it
 And, venom-infected, flee.
 If a wandering rain-cloud moistens
 Its dense and unstirring leaves,
 The burning sand from its branches
 A poisonous dew receives.
 But one man to the tree sends another
 With a glance that, imperious, burns,
 And the poor slave sets out on his journey
 And at dawn with the poison returns.
 He brings with him poisonous resin
 And a branch with a few faded leaves,
 And the sweat on his pallid forehead
 In thick streams trickles and cleaves.
 The poison he brings, and fainting
 At the feet of his dread lord lies
 On the bast that the tent-floor covers.
 He utters no word, and dies.
 But the king, in that poison steeping
 His arrows with secret art,
 To his enemies sends destruction
 And death on each poisoned dart.

(37) Pushkin's poems. Trad. Walter Morison. Londono, 1945, p. 46-47.

v. 11. E. *ĉe l' vento* ne troviĝas en la originalo.

v. 12. Nek A. *smooth* nek E. *bruna* estas precize sama kiel R. *gustoj*. R. *prozračnoju*, A. *transparent*, ne troviĝas en E.

v. 14-16. R. *čornyj*, A. *black*, fariĝas en E. *sibla*, kiu estas mistraduko. Nek A. nek E. tradukas R. *smerti*.

v. 17-18. A. aldonas adjektivon ne en la originalo: *dense*. E. redonas nek *blujdaja* nek *dremuĉij*.

v. 19-20. R. netransitiva *stekajet dojd v pesok* fariĝas A. transitiva *the sand a dew receives* — tiel la bildo ion perdas. Ripetiĝo de R. *vetvej* en v. 7 kaj v. 19 ne reproduktiĝas en la tradukoj. E. *teren* perdas la esprimivon kaj precizon de R. *v pesok gorjuĉij*.

v. 21. A. *one man... another tute* ne sukcesas reprodukti la trafan apozicion de R. *ĉeloveka ĉelovek*, kiun ja atingas E. *hom' homon*.

v. 22. A. *that burns* estas pleonasma.

v. 24. R. *k utru* mankas en E.

v. 25-28. E. aldonas *en tornistro*, ne en la originalo. A. *trickles and cleaves* estas iom troiga traduko de R. *struilsja*.

v. 29-32. A. *dread* estas iom malforta traduko de R. *nepobedimogo*; E. *ĝin* ne tradukas. A. aldonas *he utters no word*, kiun ne motivas la originalo. E. *ĉe l' trono* estas tre malforta anstataŭaĵo de R. *pod svodom ŝalaŝa na lyki*; la A. *on the bast that the tentfloor covers*, kvankam pli pitoreska kaj proksima, tamen estas mistraduko kaj cetere ambigua.

v. 34. A. *with secret art* ne troviĝas en la originalo. Neniu el ambaŭ tradukoj donas ekvivalenton de R. *poslušjivyyje*.

v. 36. A. *to his enemies* estas multe tro kurta, kaj cetere senkolora kaj maltrafa, parafrazo de R. *k sosedam v ĉujdyje predely*.

Generala konkludo pri Specimeno C: Bela ekzemplo de kompensoj: se nur la angla traduko repro-

duktus la formon de la originalo, se nur la esperanta traduko estus pli preciza, malpli parafraza!



Precipe Specimeno C atentigas, ke kritikoj laŭ kriterioj de maksimuma laŭvorta fideleco ne povas forpreni de la valoro de tradukoj, kiuj redonas la larĝan sencon de la originalo *kaj mem legiĝas poeziece!* Tiaj tradukoj estas pli valoraj ol tradukoj laŭvorte fidelaj, kiuj legiĝas plate kaj prozece. Kaj estas notinde, ke miaj komentarioj ĉifoje estis tute

kritikaj; ne estis mia celo elnombri la belaĵojn de la diversaj kaj diverslingvaj tradukoj — cetere, ilin rimarkos mem la atenta leganto-poeziamanto. Mia celo estis, indiki la gravan rolon, kiun Esperanto jam komencis ludi, kaj iom post iom pli amplekse ludos, kiel pontlingvo, kaj tute speciale kiel literatura pontlingvo, inter la popoloj de la mondo.

Pensoj de Zamenhof:

Pri Literaturo, Teatro, Gazeto

„La batalantoj por nia ideo jam longe konvinkigis, ke ĉiu nova grava verko, kiun ni povas montri al la publiko, efikas sur ĝin pli, ol ĉiaj plej lertaj teoriaj paroloj... Sed kiam la konstanta kreskado de nia literaturo (kun ĝi ankaŭ la kreskanta elasteco de la lingvo) iom post iom silentigos niajn nudavortajn malamikojn kaj malaperigos ĉian dubon pri la vivipoveco de nia lingvo, tiam vole-nevole, post 1 aŭ post 10 aŭ post 25 jaroj, la registaroj devos aliĝi al ni, kaj tiam „lingvo tutmonda” fariĝos fakto plenumita... Agadi per lernolibroj, anoncoj k.t.p. estas tre bone kaj necese; sed tio ĉi devas havi lokon *apud* la literaturo kaj ne *anstataŭ* la literaturo”. (*Originala Verkaro*, p. 206.)

„Sed la plej efika maniero de propagando estus, se oni povus aranĝi migrantan *teatran trupon* Esperantan (mi pensas, ke en Parizo estus tre facile trovi impresarion, kiu aranĝus tiun trupon). Tia trupo, migrante tra ĉiuj plej gravaj urboj de Eŭro-

po kaj Ameriko kaj donante ĉie teatran prezentadon de iaj dramoj en Esperanto, aŭ almenaŭ dialogojn kaj kantojn en tiu ĉi lingvo, farus ĉie grandan bruon kaj alportus al nia afero riĉegajn fruktojn, ĉar nenia teoria parolado *pri* Esperanto povas tiel bonege efiki, kiel ludado de dramoj aŭ almenaŭ kantado *en* Esperanto”. (*Leteroj de L. L. Zamenhof*, I, p. 47.)

„Nia nuna gazeto ne aperas kiel io nova, partia, kiel kelkaj en la komenco pensis; ĝi estas — kvankam sub alia redakcio — pura daŭrigo de la gazeto antaŭa; ĝi prezentas nian komunan, tre bone redaktatan centran organon, kaj mi varmege rekomendas ĝin kiel unuan kaj plej necesan objekton por niaj amikoj. Ĉion alian niaj amikoj povas fari aŭ ne fari; sed kiu ne abonas nian standardon, la „Lingvon Internacian”, tiu ne estas esperantisto”.

(*Originala Verkaro*, p. 215.)

La plej juna literaturo en la mondo

de

D-rino Clelia Conterno Guglielminetti (Italujo)

Kiam naskiĝas literaturo? Kiel ĝi naskiĝas? Ni konas la respondojn; kaj nenion novan mi diras atentigante, ke literaturo naskiĝas kiam juna lingvo, eliranta el la stadio de dialekto parolata de primitiv-civiliza popolo kaj ankoraŭ varianta laŭ vilaĝoj, aŭ regionoj, aŭ popol-tavoloj, estas jam tiel disvastigita, ke multaj homoj povas kompreni ĝin, kaj kiam tiuj homoj kontaktas kun aliaj pli progresintaj civilizoj, jam konantaj literaturan verk-eblecon. Tiel, la plimulto de antikvaj kaj modernaj literaturoj naskiĝas kiel popol-esprimo nuancata per diverseco de dialektoj; tuj poste tiu sincera esprimo lasas lokon por pli kleraj formoj, kaj aperas imita, ne el koro sed el cerbo, literaturo, floranta en kulturaj rondoj. Fine, la juna lingvo akiras sendependon, kaj ĝia literaturo iĝas nova konkero de homa penso.

Tian disvolviĝon de literatura fenomeno ni vidas ĉe la greka, ĉe la latina lingvoj, kaj ankoraŭ pli klare ĉe la modernaj idiomoj. Nur unu prezentas ian diversecon, ian deflankiĝon el la tri stadioj: popola — imita — krea. Ĝi estas la plej juna literaturo en la mondo, kaj, kiel ĉiuj plej modernaj aktivecoj, ĝia evoluo el nenio ĝis literatura digneco okazis en rapidega tempo: sepdek jaroj. Temas pri literaturo de l'Internacia Lingvo.

Tiu ĉi lingvo, kies bela nomo, Esperanto, ŝajnas promeso de bona espero al la homa raso, ne naskiĝis kiel izola fenomeno. La historio de l' serĉado de solvo por la problemo de internacia komunikado sur neŭtrala bazo ampleksas multajn jarcentojn. Sed tiu ĉi solvo ŝajnas nun atingita per tiu ĉi moderna, praktike jam funkcianta kaj vaste uzata ilo, kiun ellaboris pola sciencisto, d-ro Lazaro Ludoviko Zamenhof, kies naskiĝan datrevenon oni festas en tiu ĉi jaro. Jam en multaj kongresoj internaciaj, la lingvo Esperanto anstataŭas la koston kaj netaŭgan sistemon de samtempa traduko, kaj okazadas kongresoj kie ĝi estas la sola oficiala lingvo. Ne mirinde, ke per ĝi (kiu ne estas seka kodekso, sed vera, belsona, fleksebla lingvo) la homoj esprimis kaj esprimas ne nur sciencajn konceptojn, sed ankaŭ siajn sentojn. Do, nova literaturo naskiĝis. Kiel dirite, ĝia daŭro ne ampleksas pli ol la homa vivo-daŭro, ĝis hodiaŭ. El ĝiaj iniciatintoj, ankoraŭ certa nombro vivas kaj produktas. La diferenco inter ĝi kaj la aliaj pli malnovaj literaturoj kuŝas en la fakto, ke ĝian naskiĝon ĉeestis ne popolo malklera (kiel ĉe, ekzemple, latina aŭ itala aŭ germana...), kaj ne eĉ moderna, jam kulturita, perfekte civiliza popolo (kiel ĉe, ekzemple, norvega literaturo): sed nur

unu homo, la kreinto mem de la lingvo. Nuntempaj disvastiĝ-rimedo kaj kritiko mallongigis la spert-periodon; sed, krom la aludita diferenco, ĝiaj komenco-formoj entute similas la formojn de aliaj literaturoj; nur, ne popolo, sed unuopa individuo estas la komencinto.

Kiel aspektas la unuaj provoj de nova literaturo? Oni scias, ke ĝenerale temas pri rigida, malriĉa, malfacile komprenebla duopo, kvaropo da versoj. Ni memoru la italan "*Li mille cento trentacenne nato / fo questo tempio a San Zorpio donato / da Guilelmo ciptadin per so onore / e na fo l'opra Nicolao sculptore*", aŭ la germanan kanton de Hildebrando "*Welaga nu, waltant got, wewurt skihit!*" Ankaŭ Esperanto prezentas tiujn kvar versetojn, en praformo, kiel ĉiuj sinrespektemaj literaturoj. Unua formo de projekto pri ĝi, farita de la juna Zamenhof, donis ĉi tiun "floron": "*Malamikete de las nacjes, /kadd, kadd, jam temp' està! / La tot'homoze in familje / Konunigare se debà*". Kio, en nuna Esperanto, sonoras: "*Malamikeco de la nacioj, / falu, falu, jam temp' estas! / La tuta homaro en familio / kunigi sin devos*".

Ĉu rideti pri tiu "mezepoka Esperanto"? Sed ni haltu momenton por konsideri kun kia kortuŝo, kun kia anim-tremo la juna Zamenhof surpaperigis, la 5-an de decembro 1878 (naŭ jarojn antaŭ la prezento al la publiko, en sia difinita formo nuna, de la Internacia Lingvo), tiujn versetojn. Kaj, en tiu kvarversaĵo, li enfermis la temon preskaŭ ekskluzivan de sia posta poezio; ni diru plie, de sia tuta agado, de unika celo kaj strebo de sia vivo. Kunigi la homaron! Ne temas nur pri lingvo. Ne temas pri literaturo. Ne temas eĉ pri politika programo. Lia intelekto ne kreis filozofion; ni prefere emus diri, ke lia animo formis al si religion, ĉar liajn impulsojn karakterizis fido kaj memofero, varmo kaj transcendo super ĉiuj ebloj kaj materiaj spertoj kaj situacioj: la necesaj ecoj de religio. Kaj esence religia, arda kaj sindona estis la animo de la kreinto de nova lingvo kaj de nova literaturo. Li ne estis granda poeto — tion rekonas nuntempa kritikistaro esperantista —, sed la grandaj poetoj ne troviĝas ĉe l'unuaj provoj de novaj literaturoj. Necesis, ke estiĝu homo, kiu kuraĝos riski sian gloron, sian aktivecon kaj sian personecon sur tiun malfortan ludkarton kiu estis, ankoraŭ kvardekon da jaroj antaŭ nun, la lingvo Esperanto.

Tiu homo aperis, kaj li estas la hungara verkisto: Kálmán Kalocsay. Per li komenciĝas nova

periodo en tiu ĉi juna literaturo. Ni rajtas paroli pri "periodoj" ĉar, kiel mi klarigis, la evoluo de la Esperanta literaturo enradikiĝinta en grundo de nia plej moderna tempo, estis komplete, kvankam rapidega, kaj ĉar jam oni proponis dividon de tiu ĉi evoluo flanke de esperantista skota poeto kaj kritikisto, W. Auld (enkonduko al "Esperanta Antologio", La Laguna 1958, eld. Stafeto), kun aparta alrigardo al poezio, en "primitiva romantismo", "polurita romantismo" (ja per Kalocsay malfermita), "metafizika periodo". La poetoj de primitiva romantismo, kiel Grabowski, Devjatnin, Schulhof, la juna Privat, Miĥalski, eldiris simplajn sentojn per simplaj formoj kaj imitis elsiaj propraj naciaj literaturaj; Kalocsay, krom prilaborado de tuta metrika sistemaro, frontis novajn altegajn temojn, kaj fariĝis eterna voĉo de l'homo eta antaŭ la ĉielo kaj "la tragika muteco de l'ŝtonoj" (jen ekzemplo de verso en kiu resumiĝas momento de la homa penso, tiel ke, tradukata en iun ajn lingvon, ĝi ne perdas sian statuan belecon: "*das tragische Steineschweigen*", aŭ "*le tragique silence des pierres*", aŭ "*il tragico mutismo delle pietre*").

La prozistoj de primitiva periodo estis plejofte tradukistoj: kia pli streĉa imito ol traduko? La romanistoj ne tre multe valoras: Vallienne, Bein . . Sed, dum la dua, "polurita" periodo, jen ĉe Kalocsay aperas valora prozisto, kiu ankaŭ estis, kaj estas, poeto: Julio Baghy, hungara artisto. Ambaŭ transpasis la duan periodon, kaj ankoraŭ verkas: ĉiam plialtiĝas la poezio de Kalocsay, ĉiam

ampleksiĝas la produktado de Baghy, kiu, lastatempe, povis doni al Esperanta literaturo poezian dramon ombrantan la eternan tragedion de la homaro, de Adamo kaj Eva ĝis nun kaj post nun ("Songe sub pomarbo", eld. Stafeto, La Laguna 1958). Kaj humoristo ne mankas, kun franca verovo kiu fariĝis stilo: Raymond Schwartz, fondinto de humora revuo kaj mem romanisto kaj novelisto tre fekunda.

Sed kompletan dignecon de plene floranta literaturo akiris la esperantista literaturo nur post la dua mondmilito. Apud la aluditaj nomoj, troviĝas, plej ofte grupiĝintaj en skoloj, novaj poetoj kaj prozistoj. Al la hungara skolo, ankaŭ pro eksteraj politikaj kaŭzoj, substituas sin la skota skolo (Dinwoodie, Francis, Rossetti, Foote). Kaj du aliaj elstaraj talentoj, pri kiuj oni povas diri, ke ili apartenas ne al tiu ĉi juna literaturo, kies kronikon ni estas skizantaj, sed al la monda historio de la homa penso kaj arto, montriĝis kaj daŭre produktas: William Auld kaj Marjorie Boulton. Ĉi lasta estas virino, kaj inter la poetinoj de ĉiuj literaturoj mi persone ne trovus facile verkistinojn, kiu povus esti komparata al M. Boulton.

Pruvo de vigleco kaj de valoro de la Esperanta literaturo estas la fakto, ke jam el ĝi oni komencis traduki en naciajn lingvojn kelkajn produktaĵojn: tiel, la plej juna filino de la homaj penso kaj koro ariĝas flanke de la pli aĝaj, pli ampleksaj fratinoj. Kaj ni asertas, ke valoras la penon fordoni la dekdekdu horojn, kiujn postulas la lernado de la Internacia Lingvo por havi la eblecon proksimiĝi al tiu ĉi eta, sed valora trezoro.

El: Proverbaro Esperanta

de

L. L. Zamenhof

Kiu ne estis kaporalo, ne estos generalo.

Per pacienco venas scienco. Post sufero venas prospero.

Kiu regalas per ŝtonoj, tiun oni dankas per bastonoj. Kia ago, tia pago.

Inter la blinduloj reĝas la strabuloj. Se forestas la suno, sufiĉas la luno.

Danĝera estas bovo antaŭe, ĉevalo malantaŭe, kaj malsaĝulo de ĉiuj flankoj.

Tablon ornamas ne tuko, sed kuko. Ne karesu per mano, sed karesu per pano.

Granda nubo, malgranda pluvo. Monto gravediĝis, muso naskiĝis. Granda telero, malplena kulero.

Barbo potenca, sed kapo sensenca.

En buŝo Biblio, en koro malpio. Vizaĝo de Kationo, sed virto de fripono. Lango miela, sed koro kruela.

Ne timu tranĉilon, timu babilon.

Bojas hundo sen puno eĉ kontraŭ la suno. Hundo bojas, homo vojnas.

Kiu supren kraĉon ĵetas, sian barbon al ĝi submetas.

„LANDO” de Libereco, Egaleco kaj Frateco

de

J. Régulo-Pérez (Kanariaj Insuloj)

Ciu periodo de la homhistorio havis siajn parazitojn, kies ĉefa intereso estis ĉiam la malhelpo de la ĝenerala progreso pro profiti plu la momentan situacion. Inter tiuj parazitoj, profitantoj de la internaciaj antagonismoj, ĝuste nun pli abundas tiuj, kies intereso estas la konservado de la babela ĥaoso kaj kiuj sekve ne ĉesas ripeti siajn malicajn argumentojn, tute malverajn kaj kontraŭraciajn, ke lingvo kia Esperanto ne povas esti taŭga kulturilo.

Esperanto, jes, iam estis lingvo-projekto. Sed en la daŭro de 70 jaroj ĝi kreis al si vere unikan tradicion, eble la sola tradicio, kiu iam ajn neglektis landlimojn kaj evoluis unuece *tra la tuta mondo*. Jus, en la fino de 1958, aperis impona atestilo de tiu kultura tradicio, sub la formo de *Esperanta Antologio. Poemoj 1887—1957*. Temas pri 658-paĝa volumo kun ĉirkaŭ 360 poemoj originale verkitaj en Esperanto de 90 poetoj apartenantaj al 35 landoj el ĉiuj kontinentoj, de Islando ĝis Nov-Zelando, de Sud-Afriko ĝis Ĥinuĵo, de Brazilo ĝis Sovetio ktp. Studentoj de la esperanta literaturo disponas en tiu libro objektivan instrumenton, per kiu ili povas orientiĝi pri la spiritodona faktoro, kiu el simpla lingvo-projekto faris vivantan lingvon. Nun Esperanto-laikaj beletristoj kaj lingvistoj per malmulte da peno povas konstati, ke la esperanta literaturo fakte prezentas *propran*, konstante pli kaj pli kristaliĝantan *kulturon internacian*, kies karakterizaj trajtoj estas humanisma strebado al homa solidareco kaj kreado de komuna kulturfronto por epoko, nun ekaŭroranta, en kiu la homa genio, minutigante la horojn, havas kiel arenon la tutan mondon.

Al tiu bela ekzemplo sur la beletra tereno, oni povas aldoni alian ne malpli frapan el la scienca kampo. Komence de tiu sama jaro 1958, okaze de la 50-jara ekzisto de Internacia Scienca Asocio Esperantista, aperis jubilea volumo, *Sciencaj Studoj*, kun entute 36 originalaj artikoloj de sciencistoj-esperantistoj, bazitaj sur originalaj esploroj kaj observoj kaj originale verkitaj en Esperanto. La volumon enkondukas historia skizo pri la 50 jaroj de la eldoninta Asocio, inter kies prezidintoj troviĝas la Nobel-premiito Prof. D-ro J. J. Thomson. Nu, se oni konsideras, ke la 36 aŭtoroj vivas en Eŭropo, Azio, Afriko, ambaŭ Amerikoj kaj Nov-Zelando, en 19 landoj kun 16 malsamaj naci-lingvoj, apenaŭ oni povus trovi pli eminentan elmontron de fakte universaleca kulturo. Kaj ĝin ebligis nur la ekfloranta enradikiĝado de Esperanto en ĉiuj fakoj de la natur- kaj homscienco.

Fine de 1957 aperis, por la unua fojo, kompleta poemaro de granda poeto tradukita en Esperanton. Temas pri *La floroj de l' malbono* (kaj aliaj poe-

moj) de Charles Baudelaire, sur 400-paĝa volumo, por kies esperantigo kolektiveto da spertaj esperantistoj-literaturistoj laboris dum dek jaroj, sub la gvido de franca profesoro-lingvisto koncerne la sencofidelecon, kaj de hungara lingvisto-beletristo koncerne la formon. Probable la plej grava juĝo pri tiu traduko troviĝas en la prestiĝa hispana beletra revuo „*Papeles de Son Armadans*” (sub la gvido de la akademiano kaj romanisto C. J. Cela), kiu, iam proklaminte la neebulon redoni poezie la poemojn de Baudelaire per fremdaj lingvoj, laŭ la sperto de la ĝisdataj fiaskintaj hispanlingvaj provoj, ĉe recenzo de la Esperanta traduko noble reprenis siajn vortojn kaj mire proklamis, ke ĝuste Esperanto sukcesis same formale, kiel enhave kaj etose, plenumi la miraklon.

Ni povus ankoraŭ citi aliajn eminentajn ekzemplojn de Esperanto kiel kulturilo laŭ tutmonda skalo, de bibliotekologio ĝis medicino, de juro ĝis botaniko, de lingvoscienco, de poetiko, de politiko, de parolarto... ĝis geografio, historio, etnologio, plantpatologio ktp., en zorge ellaboritaj monografioj, originale verkitaj en Esperanto de homoj el ĉiuj mondpartoj. Sed ni devas rezigni citadon de titoloj kaj aŭtoroj.

Nunjare la mondo celebras la 100-jaran datrevenon de la naskiĝo de D-ro L. L. Zamenhof, aŭtoro de la lingvo Esperanto. Se, kiel supre dirite, la lingvo fariĝis el simpla projekto vivanta socia fakto, tio ŝuldiĝas al la genio de Zamenhof, kiu ekde la unua momento ĝin traktis kiel tian kaj laŭe ekpisis ĝin. Per tiu faro Zamenhof iniciatis nekonkureble unikan lingvon. Tiu nekonkurebla unikeco konsistas en tio, ke homoj el ĉiuj nacioj, el ĉiuj medioj, povas same ĝin ellerni kaj plene posedi. Kiam diversaj naciaj lingvoj titolas sin „internaciaj” kaj montras al sia literaturo, ili sofisme preterglitas la fakton, ke tiu literaturo estas *nacia*, sed ne internacia: ĝi estas nome kontribuo preskaŭ senescepte de indiĝenoj, kaj la internacia literaturo de tiuj lingvoj fakte ne ekzistas. Dume en Esperanto ni havas la grandiozan fenomenon de *tutmonda* literaturo demokrate kreita kaj kreata de suverenaj verkistoj de ĉiu lando, el kiu nur sin anoncas la talento.

La Esperanta mondo estas ĝis nun la sola „lando”, kie fakte ne plu estas utopia la fama devizo „libereco, egaleco, frateco” sen rasaj, naciaj aŭ alispecaj eksterajoj. Kaj ĉar ja estas tre bele ankoraŭ postmorte daŭre vivi en plukreskanta nobla verko, ni do diskonige honoras, en tiu ĉi 100-a datreveno de lia naskiĝo, la memoron kaj postvivon de D-ro L. L. Zamenhof, iniciatinto de tiu komuna kulturfronto de la tuta homaro.

La uzado de Internacia Lingvo sur la scienca kampo*)

de

Prof. D-ro Giorgio Canuto (Italujo)

Satataj geaŭskultantoj!

Se vi eniras la korton de la Torina Universitato, vi povas vidi memortabulon, sur kiu oni legas ke via samurbano Erasmo, la mondkonata Erasmo el Roterdamo, en la jaro 1506, en la Universitato de Torino doktoriĝis pri Teologio.

Tio povis okazi ĉar en tiu tempo ĉiuj Universitatoj uzis la saman kaj nuran lingvon, la latinan, kaj tiam la nederlandano Erasmo, kaj la profesoroj, el kiuj ajn landoj ili estus, povis interkompreniĝi kiel samlandanoj.

Tiu uzado de la latina lingvo inter la kleruloj de la mezepoko estas al ĉiu konata, kaj ofte oni citas ĝin kiel enviindan staton. Sed ne ĉiuj scias kiel tia ĝenerala uzado de la latina lingvo malaperis, por lasi sian lokon al la naciaj lingvoj.

Sajnas ke la unua kiu interrompis la tradicion estis *Bombast von Hohenheim*, kromnomita *Paracelsus*, kiu komencis en siaj lecionoj uzi la germanan lingvon. Certe unu el la unuaj, kiuj skribe uzis nacian lingvon, estis la tre fama italo *Galileo Galilei*, certe ne pro nescio, ĉar li skribis en 1510 ankoraŭ en la latina lingvo, sed ĉar li estis vere konvinkita, ke la malnova lingvo ne plu taŭgis por la modernaj ideoj.

La latina lingvo vivis dum la mezepoko, tute specialan ne naturan vivon, kiel ilo de tiu kulturtrezoro literatura filozofia, religia, kiu disvastiĝis tra la tuta Eŭropo post la falo de la Romia Imperio, kvankam ĝi ne plu estis vivanta lingvo ligita al ĉiutaga uzado de popolo. Sed kiam la homaro havis ion novan por diri, por aldoni al tiu antaŭa kulturtrezoro, jen ke la malnova lingvo plu ne sufiĉis. Kaj tio fakte komencis precize en la plej novaj kampoj de la kulturo, la sciencaj branĉoj de la matematiko kaj de la fiziko.

Kaj tio restas unu el la plej gravaj motivoj pro kiuj tute absurda estas la ideo, de tempo al tempo reponita, ke la latina lingvo povus ankoraŭ esti uzata en la scienca kampo kiel internacia lingvo.

Cetere oni povas pridubi ke la latina lingvo havis rolon de internacia lingvo ĝenerala, tutmonda, kian oni nun bezonus kaj kian nun oni atendas.

Sufiĉas pensi, ke kiam Erasmo doktoriĝis en Torino, Ameriko ankoraŭ ne estis Ameriko, sed nova kontinento malkovrita nur de post 14 jaroj, tute nekonata estis la plej granda parto de Afriko kaj en la Mediteraneo mem, dum longa tempo regis la influo de la greka lingvo kaj de la araba, precipe en la plej modernaj kampoj de kemio kaj medicino. Kaj kion diri pri la malproksima oriento, pri la granda influkampo de la miljara kulturo Ĉina?

Se ni do bone objektive konsideras la aferon, ni

vidas fakte, ke ĝis nun *neniam en la mondo ekzistis vera komuna lingvo por ĉiuj kleruloj*.

La latina lingvo estis la kultura lingvo, dum kelke da tempo, de la limigita teritorio, kie disvastiĝis la kristana religio.

Kio okazis post la forlaso de la uzado de la latina lingvo en la tempoj al ni pli proksimaj, estas ĝenerale konate.

Dum komence ludis grandan rolon la franca lingvo, poste en multaj kampoj superregis la germana, kaj nun en la lastaj tempoj ŝajnas pligrandiĝi la graveco de la angla, precipe pro la influo de Ameriko.

Tiel proksimume antaŭ 50 jaroj, antaŭ la unua granda milito, mia patro povis diri al mi: "Kara filo, se vi volas havi en la manoj la necesajn ilojn, por vin dediĉi al superaj studoj, vi devas eniri en la Universitaton scipovante tralegi, rapide kaj flue, tekstojn en franca kaj germana kaj angla lingvoj". Se oni aldonas ke ni italoj senpene povas kompreni tekstojn en hispana kaj portugala lingvoj, vi vidas kiel la konsilita studado donis fakte al mi bonan ilaron, por povi rekte preni la informojn necesajn en la ĉefaj revuoj kaj lernolibroj de la mondo, kio estas unu el la unuaj necesoj de la lingva uzado en la scienca kampo.

Tamen ankaŭ per tiu sufiĉe vasta kono, (kiun mi nuntempe malofte konstatas inter la junuloj studentaj en Universitato, eble pro la amaso de konoj, kiujn ili devas studi por la aliaj fakoj, kiuj intertempe multe kreskis) restis ĉiam granda kvanto da verkoj tute ne esloreblaj: en la nord-eŭropaj lingvoj, en la slavaj, inter kiuj nun estas precipe grava la rusa, kaj ankaŭ en la aliaj orientaj lingvoj de la turka ĝis la japana.

La situacio do fariĝis ĉiam pli kaosa kaj malfacila. Krome en la scienca aplikado de lingvoj ne estas nur necese scii legi la tekstojn, kiuj utilas por la informado, sed de tago al tago, ĉiam pli oni bezonas lingvojn por la rekta persona kontakto inter la sciencistoj, ĉar ili tute simple kunvenas en kongresoj por kune diskuti la problemojn, ĉar ili vojaĝas de unu lando al la alia por prelegi pri siaj eltrovoj aŭ por lerni en fremdaj Universitatoj.

Kaj ni povas konstati ĉe ni mem, kaj ĉe ĉiuj niaj kolegoj, ke tute alia afero estas scipovi lingvon laŭ lego-kapableco, aŭ scipovi lingvon por ĝin paroli, por fari per ĝi paroladon pri iu teknika temo kaj ne nur pri la simplaj bagatelaĵoj de la komuna vivo.

De tio venas la malfacilaĵoj, kiujn oni renkontas en ĉiuj internaciaj kongresoj kiam oni devas antaŭe

*) Parolado farita en Rotterdam, la 6-an de aprilo 1959.

pridiskuti, pri la uzotaj lingvoj. Mi scias pri kongresoj kiuj devis esti prokrastitaj pro la manko de tiu fundamenta interkonsento.

Kaj poste, dum la kunveno mem venas la turtri, kiel stulta estas la duobla kaj triobla eldonaĵo de ĉiuj publikaĵoj de la kongreso, kun evidenta malŝparo en la kostoj de la presado.

Kaj poste, kiam la lingvoj estas elektitaj (du, mento de la temporaba tradukado, ofte malbona.

Mi memoras kongreson pri infanpsikologio, en Milano, en kiu dum la unua tago oni tradukis ĉion en la tri lingvojn oficialajn: italan, francan, anglan.

La duan tagon oni diris: por ŝparo de tempo, ni faros nur la tradukadon en francan kaj italan, ĉar oni konstatis ke la ĉeestantaj angloparolantoj pli malpli komprenas ankaŭ la francan.

La trian tagon tamen, ĉiam pli mankis la tempo, kaj oni decidis ne plu fari tradukadojn. Oni anoncis, ke ili estas sendotaj hejmen al la kongresanoj. Ĉu ili ne estus povintaj tuj resti hejme kaj ŝpari la vojaĝelspezojn?

Ne pli bonan rezulton donas la tiel dirita *samtempa tradukado*, pere de la telefonaparatoj kaj de la tradukistoj kaŝitaj en kabinoj. Ili ĝenerale postulas havi antaŭe la tekston tradukotan.

Sed la vera viva intereso por la sciencaj kongresoj konsistas en la rekta diskutado farita el kritikoj, el petoj de klarigoj, el taŭgaj respondoj, kiuj certe ne povas esti antaŭe skribitaj por la tradukistoj.

Kaj tiam la samtempa tradukado fariĝas ofte tre ridinda afero pro la eraroj.

Mi memoras kongreson, en kiu la franca parolanto diris ke li metis por eksperimento ian substanceton en "pots de terre" (tio estas en argilajn vazojn). Sed la tradukisto komprenis "pommes de terre", kaj kompreneble, tradukis *terpomoj*, tiel ke la aŭskultantoj plu nenion komprenis de la priskribita eksperimento.

Ne restas do alia solvo, krom la samtempa uzado flanke de ĉiuj de la sama lingvo, tiel ke ĉiu povu per si mem rekte kompreni la oratoron, kaj rekte sin komprenigi. Sed kiun lingvon elekti?

Ĝis nun tian interkonsenton oni ne atingis, sed eĉ se oni morgaŭ ĝin atingos, rilate al unu lingvo, ekzemple la angla, restos ĉiam granda malfacilaĵo.

Kiom da homoj studas jam nun en la lernejo tiun lingvon dum diversaj jaroj? Kaj kiom da ili ĝin sukcesas posedi tiel bone, kiel sian gepatran lingvon?

Malfacile estas atingi plenan kapablecon en la parolado de fremda lingvo, alie oni ne taksus kiel tre malfacilan profesion, tiun de la interpretisto.

Je la foriro por vojaĝi ĉi tien mi aĉetis vesperan gazeton: en ĝi estas prezentita kiel granda malofaĵo, kaj kun la portreto, juna sinjorino kiu ĵus venkis konkurson kiel interpretistino ĉe ONU, pri angla, itala, germana lingvoj. Kaj ŝi estas denaske germana, edziniĝis kun italo kaj vivis kelkjarajn en Usono.....

Kaj prezentante ŝin kiel malofaĵojn, oni aldonas, ke tre malfacila estas la kariero de la interpretistoj, kaj ke ili atingas pagojn, kiuj povas esti je pli ol 25.000 liroj potage, tio estas pli ol 150 guldenoj.

Ĉu ni do pretendu, ke la sciencistoj, krom la tempo por studi sian fakajn materiojn, superu ankaŭ tiujn malfacilaĵojn? Certe ne. Kaj ni havus en la mondo du kategoriojn da sciencistoj: tiujn kiuj libere povus paroli en la kongresoj kaj tiujn, kiuj nur pli malpli povus balbuti ion, kaj ion kompreni.....

Do la solvo ne povas esti nur la elekto de unu komuna lingvo, sed devas esti ankaŭ, ke tiu lingvo estu facile plene lernebla, por ĉiuj, sen granda perdo da tempo.

Tiu lingvo, facile lernebla de la homoj de ĉiuj popoloj, kaj facile akirebla, ne nur surface, sed funde, kiel la propra lingvo, ekzistas: *ĝi estas Esperanto*.

Mi ne havas nun tempon por montri al vi, kial Esperanto estas facila, pro sia logikeco, pro sia simpla strukturo, pro la genia sistemo de la deveno de la vortoj el malmultaj radikoj, k.t.p.

Estas tamen nun tuta aro da konkretaj spertoj faritaj dum pli ol 70 jaroj da ekzistado de la lingvo, kaj tiuj asertoj ne estas fantaziaĵoj, sed estas faktoj, kiujn oni povas konstati ĉe ĉiuj niaj kursoj, kiuj okazas en la tuta mondo, ĉe la plej diversaj popoloj.

Jam antaŭ la milito la fama Pedagogia Instituto *Jean Jacques Rousseau* en Genevo, per precizaj psikoteknikaj esploroj, faritaj kun lernantoj de pli ol 80 kursoj okazantaj en diversaj landoj, povis konstati, ke la facileco de la lernado de Esperanto estas preskaŭ egala por ĉiuj popoloj, kaj ke la rezultoj, kiujn oni atingas en komparo kun la lernado de aliaj lingvoj, estas meze ses fojojn pli grandaj.

Foje estis en Torino iu japana profesoro de fiziologio de la Universitato de Tiba, prof. Suzuki, kiu intervjuita de la ĵurnalistoj deklaris: mi studis dum jaroj kun granda klopodo la anglan kaj la germanan lingvojn, kaj tamen uzante tiujn lingvojn, mi sentas min ĉiam neegala al la denaske parolantoj. Anstataŭ mi studis Esperanton preskaŭ ludante, nur kelkajn monatojn, kaj mi ĝin uzas kun la sama libereco, per kiu mi min esprimas en mia propra lingvo.

Similan sperton faris cetere mi mem, faris ĉiuj kiuj lernis Esperanton kaj aliajn lingvojn. Do kial ne uzi tiun facilan lingvon ankaŭ en la scienco?

Jam de la komenco la aŭtoro mem, D-ro Zamenhof, donis ekzemplojn de tradukado de sciencaj studoj, precipe medicinaj.

Tuj de la komenco sciencistoj estis allogitaj de la simpleco de Esperanto kaj fariĝis ĝiaj pioniroj.

Klerfamaj sciencistoj kiel Naville, Sébert, Bourlet, Bertelot, membroj de la Scienca Franca Akademio, la fiziologo Richet, Nobelpremiito, Bujwid fama kunlaboranto de la plej fama Pasteur,

kaj multaj aliaj scienculoj, profesoroj kaj Rektoroj de Universitatoj estis kaj estas Esperantistoj.

Jam de la komenco de la disvastiĝo de Esperanto fondiĝis la *Tutmonda Kuracista Asocio*, kaj la *Internacia Scienca Asocio*, kiuj eldonis fakajn revuojn. Ili estis la *lulilo* de la lingvo por sciencaj celoj.

Ĉar oni devas tamen pripensi, ke multe pli simpla kaj facila estas la uzado de la lingvo por la komunaj celoj kaj ankaŭ por la literaturaj, ol por la sciencaj, por kiuj oni bezonas aron da tute specialaj kaj precizaj teknikaj vortoj.

Kaj fakte la granda problemo, kiu nun estas bone solvita, estis tiu de la *teknikaj vortaroj*.

Sed ankaŭ tiuflanke Esperanto estas hodiaŭ perfekte preta por la enkonduko en la praktikan uzadon.

Jam aperis pli ol 110 fakterminaroj pri 44 diversaj sciencaj kaj teknikaj branĉoj. Inter ili menciindaj speciale estas la fakterminaroj pri *Anatomio = Arkitekturo = Aviado = Botaniko = Kemio = Elektrotekniko = Edukado = Juro = Medicino Ĝenerala = Muziko = Matematiko = Farmacio = Navigacio = Filozofio = Fiziko = Radio = Psikologio = Zoologio = Statistiko = Maŝintekniko = Fervojoj = Scienco Ĝenerale*.

Nun estas preparitaj novaj fakvortaroj pri *Radiotekniko* kaj *Aeronaŭtiko*. La Japana Esperanto Instituto kompilis ĝeneralan scienca terminaron kun la lastaj plej modernaj terminoj, kiuj intertempe aperis.

Tiuj vortaroj ne estas nur ellaborado teoria de specialaj komisionoj zorgantaj la kreadon de la necesaj novaj vortoj, sed kiel por la cetero de la lingvo Esperanto, la akiro de novaj vortoj okazis tute spontane, pere de daŭra verkado.

Ĉar ne nur ekzistas specialaj teknikaj Esperanto Revuoj, inter kiuj tre menciindaj la *Scienca Revuo* kaj la *Medicina Revuo*, sed estis ankaŭ eldonitaj libroj sciencaj en Esperanto, en la kampo de *Medicino*, de *Antropologio*, de *Botaniko* kaj de *Radiotekniko*.

Inter ili estas speciale menciindaj, la libro de *Ajsberg*, *Fine mi komprenis la radion*, kiu, eldonita unue en Esperanto, estis tradukita poste en 16 lingvojn, kaj la libro de la dano Paŭlo *Neergaard*, *Pri la vivo de la plantoj*, vere tiel interesa, ke nun ĝi estas tradukata en plurajn aliajn lingvojn. Se la homoj ne estus tiel plenaj de antaŭjuĝoj kontraŭ Esperanto, se en la tuta mondo la homoj dediĉus nur unujaran studadon al tiu lingvo, jen ke tiuj verkoj estus tuj kompreneblaj en la tuta mondo sen bezono de tradukoj.

Alia grava fonto de la scienca lingvo Esperanta estas la Esperantaj resumoj kiuj ĉiam pli multnombraj aperas en diversaj sciencaj naciaj revuoj, precipe en la revuoj medicinaj.

Ni citis plurfoje la laboron de la japanaj sciencistoj. Vere ni devas diri, ke tiurilate ili estas pioniroj. Ili estas tiuj, kiuj plejnombro publikigis tutajn sciencajn artikolojn en Esperanto, eldonis

fakajn Esperantajn bultenojn k.t.p. Inter ili ni povas memori la Bultenon de la Medicina Instituto de Nagasaki, de mia kolego jurmedicinisto *Asime Azada*, kaj la Bultenon de la *Astronomia Instituto de la Insulo Tateno*.

La longaj militoj, al kiuj devis partopreni la japanoj, certe interrompis tiun grandan aktivecon sed jam post la milito pli ol 85 famaj sciencistoj japanaj, inter kiuj 68 universitataj profesoroj, subskribis la promeson ĉiujare eldoni almenaŭ unu disertacion en Esperanto, kaj aldoni Esperantajn resumojn al aliaj siaj verkoj.

Sed la granda avantaĝo, kiun Esperanto devas alporti en la scienca kampon, estas la rekta buŝa uzado de la lingvo.

Por konvinkiĝi pri ĝia speciala taŭgeco en tiu kampo estas sufiĉe partopreni dum Universala Kongreso de Esperanto al la tiel nomata *Somera Universitato*. En ĝi vere oni vidas revivi la miraklon de la tiel diritaj "*clerici vagantes*" de la mezepoko, nome de la tiamaj studentoj de Universitatoj, kiuj sen zorgoj pri la diverseco de la naciaj lingvoj, iris viziti la kursojn de unu Universitato al alia.

Kaj jen dum la Somera Universitato, Profesoroj de la plej diversaj nacioj, francoj, germanoj, italoj, angloj, danoj, jugoslavo k.t.p., povas prezenti siajn lecionojn al aŭskultantoj apartenantaj al 25-30 diversaj nacioj, kaj ili povas ĉiuj flue paroli pri siaj temoj, kaj esti rekte komprenataj sen helpo (aŭ ni diru sen malhelpo !) de tradukistoj.

Ĉu renoviĝo de la Pentekosta miraklo ?

Ne, sed simpla bonvolo flanke de homoj, kiuj dediĉis 40-60 horojn de sia vivo, por la studado de tiu simpla, logika, facila lingvo, kiu estas Esperanto, kaj kiuj kuraĝis rompi la rutinon, per kiu ordinare oni daŭre preferas barakti inter la malfacilaĵoj de la plurlingveco, pro kiu en la sciencaj kongresoj la realaj aŭskultantoj de la paroladoj estas ĉiam malmultaj, pro kiu grandparto de la verkoj de la sciencistoj restas preskaŭ nekonataj al la plejmulto de la aliaj.

Do la ilo, kiu reprezentas la solvon de la problemo estas preta. Aro da sciencistoj jam ĝin uzas kun profito. Ili certe scios, iom post iom, altiri la atenton de la aliaj kaj ilin konvinki. Pri tio mi estas certa.

La germana filozofo Nietzsche, jam en la jaro 1866-a, en sia verko skribis, ke certe venos la tempo en kiu la homaro havos unu komunan lingvon, kiel certe venos la tempo en kiu la homo vojaĝos tra la aero.

Ni jam vidas la duan parton de la antaŭvido de la filozofo. Mi estas certa, ke ankaŭ la unua efektiviĝos, kaj ke ĝi ne estos per malfacila nacia lingvo, sed per la simpla, bela, klara, fleksebla Esperanto.

Kaj en la estontaj jarcentoj, kiam la uzado de Internacia Lingvo estos ordinara ĉiutaga afero, oni certe estos mirigita, pripensante kiom da kontraŭstaroj, kiom da antaŭjuĝoj oni devis venki por atingi tiun simplan kaj logikan rezulton.

Kial mi fariĝis Esperantisto?

La Lingva problemo en la sciencaj rondoj de Japanujo

de

Prof. D-ro Seiho Nishi (Japanujo)

Mi naskiĝis en Tokio en 1885, 2 jarojn antaŭ la naskiĝo de la Internacia Lingvo, pasigis mian lernejan vivon en Tokio kaj finis la medicinan kurson en la Ŝtata Tokio-Universitato en 1908. De 1912 ĝis 1915 mi restadis unue en Heidelberg, poste en Zŭrich, por speciale studi la anatomion. Reveninte al la hejmlando mi estis enoficigita en la Ŝtata Tohoku-Universitato en Sendai kiel profesoro de anatomio. En 1922 mi estis invitita al mia *Alma Mater*, kie mi plenumis mian oficon ĝis 1945.

Kompreneble la scienco faris en moderna Japanujo de post la revolucio en 1868 mirindan progreson sub la gvido de eŭropaj kaj usonaj sciencistoj, kaj tiuj, kiuj tiam volis sinoferi al la scienco, devis sekve antaŭ ĉio sufiĉe majstri almenaŭ unu fremdan kulturlingvon. Jam en mezlernejoj konsiderinde multaj horoj estis de tiam devige dediĉataj al la lernado de la angla lingvo, kaj en gimnazioj, krome, al tiu de la germana aŭ la franca. La cirkonstancoj ne estas aliaj eĉ nun post la milito. Ĉar la medicinaj sciencoj estis tiam instruataj kaj studataj ekskluzive laŭ la germana modelo, tiuj kiuj volis fariĝi kuracistoj aŭ medicinistoj devis kiel kondiĉo nepre ellerni la germanan lingvon. En medicinaj kolegioj la studentoj uzis tiam nur germanajn lernolibrojn, la lekcioj estis kutime farataj per stranga lingvosalato el japanaj kaj germanaj vortoj. Medicinistoj volonte parolis germanajn fakvortojn kaj publikigis siajn traktatojn ofte per la germana lingvo; ili devis ankaŭ pasigi kelkajn jarojn en Eŭropo, precipe en Germanujo, se ili volis distingiĝi en sia fako, precipe se ili celis fariĝi universitataj profesoroj. Ankaŭ mi tiamaniere estis sendita de la registaro por kelkaj jaroj al Germanujo, kie mi restadis ĝis la eksplodo de la unua mondmilito en 1914, nenion konsiderante pri la fremdlingva problemo.

Kiam tamen la milito finiĝis per la kompleta malvenko de Germanujo, granda konfuzo okazis ankaŭ en nia medicina rondo. Multaj medicinistoj bojkotis la "malamikan" lingvon, kaj komencis nove eklerni la anglan. En tiaj cirkonstancoj mi la unuan fojon komencis serioze pripensi pri la lingva problemo en la scienco kaj post longa meditado mi fine venis al konkludo, ke la scienca lingvo estu nur neŭtrala kaj sennacieca, sendependa de iuj ajn internaciaj konfliktoj. Mi povis ankaŭ bone kompreni, kial oni en la mezepoko utiligis la

latinan lingvon kiel la sciencan spite de diversaj maloportunecoj. Nur Esperanto estu de nun la sola internacia scienca lingvo, mi diris al mi mem, kaj kun firma konvinko mi komencis memlerni ĝin per malgranda lernolibro, tute sola, ne ektrovante eĉ unu samopiniulon, kaj plue nenion sciante pri la Esperanto-movado en tiama Japanujo.

La unua esperantisto en Japanujo estis verŝajne Asajiŝiro Oka, fama zoologo, kiu jam en 1891 memlernis la lingvon en Freiburg i. Br. (Germanujo). Li mem estis ellaborinta projekton de internacia lingvo, kiun li nomis Zilengo (nia lingvo), sed eksciinte pri la supereco de Esperanto li senhezite forĵetis ĝin kaj restis vivlonge fidela esperantisto. Liaj du filoj estas hodiaŭ eminentaj biologoj kaj samtempe lertaj esperantistoj. Kiel pionirojn de Esperanto en la japanaj sciencaj rondoj mi volas ĉi tie mencii tri eminentulojn inter multaj aliaj: Husakiĉi Oomori, geofizikisto, Kijo'o Nakamura kaj Ŭasaburo Ooiŝi, ambaŭ meteorologoj. Ili jam en la komenco de nia jarcento publikigis fakajn traktatojn en Esperanto. Mi ankaŭ ne povas preterlasi la nomojn de tri pliaj agantoj en la unuaj tagoj de la Esperanto-Movado, al kiuj ni estas por ĉiam dankemaj. George Edward Gauntlett el Kimrujo, kiu kiel instruisto de la angla lingvo en la ŝtata gimnazio en Okajama provis jam en 1905 instruadon de Esperanto per korespondado; Kacumi Kuroita, kiu tiam kiel juna profesoro de la japana historio en la Ŝtata Tokio-Universitato energie klopodis por la organizo de la Japana Esperanto Asocio fondita en 1906; Kenĵi Ossaka, fervoja inĝeniero, kiu kiel unu el la plej malnovaj kaj meritoplenaj esperantistoj jubileis la pasintan jaron sian 70-an naskiĝtagon.

Reveninte al mia hejmurbo en 1922 mi por la unua fojo havis ŝancon kontaktiĝi kun la Esperanto-movado en Japanujo, en kies centro staras la Japana Esperanto Instituto ekde sia fondiĝo en 1919. En 1923 ni organizis malgrandan societeton nomatan unue Hipokratida Klubo, poste Eskulapida Klubo, konsistanta el kelke da medicinaj studentoj kaj profesoroj en nia kolegio, pli poste la Japanan Esperantistan Medicinistan Asocion en pli vasta amplekso, kaj komencis agi por la Internacia Lingvo en la sciencaj medioj. En la 6-a Orienta Kongreso por Tropika Medicino okazigita en 1925 en Tokio ni sukcesis enkonduki Esperanton kiel oficiale aprobitan lingvon krom la angla kaj la franca. Mia unua traktato skribita en Esperanto:

Pri la ĝenerala diferencigo de la trunkmuskolaro ĉe amfibioj, reptilioj kaj mamuloj estis publikigita la saman jaron en la Vol. 3 de *Folia Anatomica Japonica*, kies redaktoro Keiji Okajima, mia samfakano, iniciate akceptis mian Esperantan artikolon.

Kune kun la restarigo de la germana medicino post la milito la germana lingvo pli kaj pli regajnis sian iaman influon en la medicinaj sciencaj medioj de Japanujo kaj preskaŭ anstataŭis la anglan. Tio daŭris ĝis la fino de la dua mondomilito (1945), en kiu la Berlin-Tokia Akso estis ĝisfunde detruita. Post la milito la tuta Japanujo estis abrupte kaj rapide "usonigata". Tokio aspektas nun kvazaŭ kolonia urbo de Usono. Nia medicino ankaŭ ne faras escepton. Medicinistoj prefere vizitadas nun Usonon anstataŭ Germanujon; parto de ili publikigas fremdlingvajn traktatojn plejparte en la angla lingvo, kvankam ili eĉ nun volonte uzas germanajn (ne japanajn, nek anglajn!) fakvortojn en siaj interparoladoj kaj prelegoj! Kiom longe daŭros tia oportunistama aŭ "potenculadora" sintenado, mi

ne scias. Mi tamen des pli firme kredas, ke ne nur ni japanaj sciencistoj, kies nacilingvo ne estas "internacia", sed ankaŭ ĉiuj sciencistoj, tute egale ĉu iliaj lingvoj estas "grandaj" aŭ ne, devu nepre posedi interkomunikilon sennaciecan, publikigilon tute liberan de ĉiuj internaciaj cirkonstancoj. La respondo estas memkomprenebla.

La ŝtala kurteno de lingvoj staras eĉ nun antaŭ ni sciencistoj, kio kompreneble ege malhelpas la progreson de sciencoj, kaj kion oni fakte spertis ĉe la Internacia Kongreso por Heredaj Sciencoj, okazigita en 1957 en nia lando. Tie la angla lingvo estis la sola oficiale aprobita kaj tre multaj japanaj partoprenintoj devis kunsidi tute aŭ preskaŭ tute surde kaj mute. Tian maljustecon ni devas forigi per ĉiuj fortoj. Aliflanke ni ja staras sur la sojlo de Nova Epoko, kiel D-ro Ivo Lapenna iam prave diris. Per niaj senlacaĵoj kaj nur per ili ni povos transpaŝi la sojlon, disŝirante la lingvan kurtenon.

Prologo

50-jara Jubileo de Internacia Scienca Asocio Esperantista Kopenhago 7-8-1956

*Pasis duona jarcento decida —
Staras scienco kaj lingvo planita
ambaŭ ĉe grava instanco :
Ĉu ruiniĝo aŭ renesanco ?
Antaŭ defio
vokas racio
ambaŭ nun por alianco.*

*Luktis scienco en ĉiu epoko
kontraŭ ignoro, malhelpo kaj moko.
Sed Galileo kaj Fulton
pruvis, ke eblas divenki la stulton.
Al pioniroj
ofte martiroj,
sentu hodiaŭ la ŝuldon.*

*Preter progresoj kvalitaj kaj kvantaj
pasis scienco per paŝoj gigantaj.
Kreskis la sano kaj aĝo,
krevis la nuboj de kriza domaĝo.
Kun konsekvenco
gvidas scienco
voje al sato kaj saĝo.*

*Ritmo distingas sin ĝis la kresĉendo
tra la perturboj de l'nuna jarcento :
Beno kaj bruo teknika,
vivo facila — sed esto komplika.
La teorio
per energio
iĝas realo unika.*

*Homo racia facile konkludas :
Ĝuste nun lingva problemo akutas !
Tamen al indiferento,
rido, rutino ĝis nuna momento
lukti necesas,
ĝis ni sukcesas
veli science en vento.*

*Lingvo tutmonda ekestis pro revo —
Ne nur militoj minacis per krevo.
Premis nin longe kateno :
La izoleco, sed venkis la peno
antaŭ UNESKO.
Venas nun kresko
en pli sekura haveno.*

*Ĉar Esperanto, helpilo teknika,
montris por arto sin plene efika.
Floris ĝi en la izolo,
fajnas nun kiel matura grapolo.
Tempo obskura
tenis ĝin pura
sub humanisma kontrolo.*

*Tia kontrolo estas esenca
lingve, sed eĉ pli al vero scienca :
Vero neniam por vendo.
— Sorĉo-disĉiploj de l' nuna momento !
Fortojn vi veku,
sed ankaŭ regu
gloro al inteligento !*

Poul Thorsen

Lingvaj spertoj en la praktiko de la scienco

de

Prof. D-ro Hugo Sirk (Aŭstrujo) †

Dum mia longa universitata kariero kolektigis ĉe mi observoj kaj spertoj pri la nuna lingva situacio en sciencaj institucioj. Jam kiam mi komencis studi en Aŭstrio ĉe la Universitato de Graz komence de tiu ĉi jarcento, mi rimarkis, ke la oficiala instrulingvo, la germana, ne sufiĉas por la bezonoj de tiu aŭstria universitato. Kelkaj profesoroj sentis sin devigataj koncedi al la italaj studentoj respondi ĉe la ekzamenoj itale.

Post Graz mi translokiĝis al la Universitatoj de Göttingen kaj Berlin. Tie mi trovis pli da negermanaj studentoj ol da germanaj. Nur relative malmulte la negermanaj povis sekvi la prelegojn.

Sed ankaŭ inverse kelkaj el la plej famaj profesoroj havis malfacilaĵon kun la germana lingvo. Karakterizan epizodon mi rememoras el la prelego de van 't Hoff. Naskiĝinta nederlandano li ĵus estis transpreninta en Berlino katedron de fizika kemio por li kreitan. Li publikigis siajn antaŭajn esplorojn ĉefe france. Lia germana lingvo ne estis perfekta. Unufoje ekzemple li diris en la prelego: "Dann verbindet sich das mit das". Li do erare uzis post la prepozicio "mit" la nominativon anstataŭ la dativon. Kiam mi rakontis tion al amerika studento, li rimarkis, ke tio estas manko de la germana lingvo.

Tiu rimarko kaj similaĵoj denove atentigis min ĉiam pli kaj pli pri la neceso de simpla kaj logika internacia lingvo por la scienco. Ankaŭ la paroloj de alia fama kaj tre populara Berlina sciencisto Emil Dubois-Reymond (1818-1896) resonas ankoraŭ en mi. Li asertis rememorante la tempon ĝis la fino de la 17-a jarcento: "Kiam ĉiuj universitatoj parolis nur *unu* lingvon, estis inter ili liberaj interrilatoj tiaj, kiaj nun interligas nur la germanajn, germanaŭstriaajn kaj svisajn universitatojn. Junuloj el ĉiaj landoj frekventis la universitatojn de Francujo kaj Italujo...." Plie Dubois-Reymond diras en la sama parolado: "Se la natursciencistoj kaj kuracistoj daŭre estus skribintaj latine, por iliaj internaciaj celoj la latino estus restinta kapabla servi al ili kiel ĝenerala sciencula lingvo sekvante iom post iom la progresojn de la scienco. La iompostioma adaptiĝo al novaj pensoj farus el la latino de Cicerono kaj Cezaro la lingvon de Neŭtono, Lineo kaj Haller: Sed certe la idearo de Neŭtono, Lineo kaj Haller multe pli diferencigis de la idearo de Cezaro kaj Cicerono ol de la nia." Menciinte la avantaĝojn, kiujn prezentus ankaŭ nun la uzo de la latino por sciencaj celoj, li fine devas rimarki: "Sed tio estas vanaj songoj. Internacia sciencula lingvo ne plu revenos kaj la naturscienco daŭrigos havi literaturojn francan, anglan, italian,

nederlandan, svedan, danan kaj germanan. Tio longe daŭros kaj ankaŭ la publikaĵoj aperontaj en diversaj aliaj lingvoj ne plu rajtos esti neglektataj." Tion li diris en 1872 dekkvin jarojn antaŭ la apero de Esperanto.

Tiun maleblon de la adapto de la latino por la moderna vivo menciitan de Dubois Reymond mi jam observis kiel gimnazia studento en Graz. Tie ni uzis libron kun poemoj de Horacio, por kiu la eldoninto Prof. Petschenig skribis latinan antaŭparolon, en kiu li menciis la aŭstrian instruminterion. Li nomis ĝin: "Illi, ad quos summa totius disciplinae in Austria pertinet...." Klasike senriproĉa, sed ne tre praktika!

Pli poste mi vidis en Vieno la latinan surskribon sur la monumento por la aŭstrian Ressel: "Josepho Ressel patria austriaco qui omnium prior rotam cochlidem pyroscaphis propellendis aplicvit anno MDCCCXXVII munumentum posit MDCCCLXII." Tio sciigas, ke li inventis la "pelŝraŭbon" por ŝipoj.

Influata de la konvinko pri la maleblo de la latino por modernaj celoj kaj de la multaj jam menciitaj spertoj, mi decidis en la jaro 1907 lerni Esperanton en Berlino, en la tiam gravega internacia centro de la sciencoj. En Aŭgusto 1908 mi partoprenis la Universalan Esperanto-Kongreson en Dresdeno. Ĝi estis la kvara el tiaj kongresoj kaj nombris 1500 partoprenantojn el la plej diversaj nacioj. Dum tiu kongreso en Dresdeno mi povis konvinkiĝi pri la kapablo de Esperanto por la buŝa interkompreno inter la plej diversaj nacioj. Eĉ la laŭ lingva vidpunkto plej malfacila tasko, la Esperanta prezentado de Ifigenio de Goethe en la teatro, tre bone sukcesis. La lego de la malmultaj tiam ekzistantaj artikoloj Esperantaj pri sciencaj temoj kaj la malmultaj sciencaj verkoj kiel la Matematika Terminaro de Bricard konvinkis min, ke la adapto de Esperanto por sciencaj celoj estas ebla.

Reveninte Aŭstrion mi komencis prelegi kiel privatdocento en Vieno. Mi havis tie multajn disĉiplojn, kiuj samtempe kun la fiziko devis lerni la germanan pro manko de scio pri tiu instrulingvo.

Intertempe mi rimarkis la daŭran kreskon de la sciencaj aplikoj de Esperanto. En la Esperante redaktata Internacia Scienca Revuo fondita en 1904, aperis referatoj, tradukoj kaj originalaj esploroj kiel tiu de svisa entomologo Forel pri nova genro kaj speco de formikoj kaj la studo pri geometrio folietara de la matematikisto René de Saussure. La grundo estis preparita en la Franca Akademio de la Sciencoj, kies membroj la svisa filozofo Naville kaj la balistikisto Sébert atentigis la Akademion pri la utileco de internacia lingvo.

Sébert ankaŭ fondis en 1906 la Internacian Sciencon Asocion Esperantistan, kiu seninterrompe funkciis ĝis la unua mondmilito. Inter ĝiaj prezidintoj ni trovas famajn scienculojn kiel la nobelpremiiton J. J. Thomsen kaj la prezidanton de la Franca Akademio de la Sciencoj Aimé Cotton.

Tiun brilan evoluon trafis kiel fulmo la unua mondmilito. La Internacia Scienca Asocio Esperantista devis ĉesigi sian agadon kaj la esperantistaj scienculoj restis dum la milito sen internaciaj rilatoj kaj interliganta gazeto. Ili povis nur reviviĝi kelkajn jarojn post la fino de la milito. Denove Sébert preparis la grundon por tiu revivigo. En la jaro 1924 li pledis en la Franca Akademio de la Sciencoj per rezolucio akceptita de 40 Akademianoj por utiligo de Esperanto en la scienco. La Internacia Scienca Asocio Esperantista reviviĝis direktata de la pola bakteriologo Odo Bujwid, profesoro en la universitato de Krakovo, kaj ricevis en la jaro 1926 denove organon en formo de Bulteno, kiu estis redaktata de Generalo Inĝeniero Rollet de l'Isle. Poste aperis ankaŭ kuracista faka gazeto, la Internacia Medicina Revuo eldonata de la Tutmonda Esperantista Kuracista Asocio.

Dum tiu mirinda renaskiĝo de la Esperanta scienca movado mi havis ankaŭ drastan okazon pliriĉigi miajn personajn spertojn pri la neceso de Esperanto por la sciencoj. En la jaro 1928 mi akceptis alvokon al la katedro de fiziko en la universitato de Ljubljana en Jugoslavio. Ĉar tie oni instruas per la slovena lingvo, mi devis unue lerni ĝin, sed ankaŭ poste miaj lingvaj eraroj ofte ĝenis la studentaron.

Post ses jaroj mi denove revenis al la Viena Universitato kaj prelegis denove germane. Nun rekomencis la lingvaj malfacilaĵoj en miaj prelegoj por la multaj negermanaj studentoj, kiuj tiam multnombre frekventis la aŭstriajn universitatojn.

En la jaro 1940 aperis miaj prelegoj sub la titolo: *Mathematik für Naturwissenschaftler und Chemiker*. Krom la matematikaj formuloj ĝi ne estas uzebla por nekonantoj de la germana lingvo. Tial aperis en 1943 hispana traduko sub la titolo: *Matemáticas superiores aplicadas a la Química y a la Física* kaj nun mi mem povas legi nur la formulojn en la libro verkita de mi. Kaj se iu scias nek la germanan nek la hispanan lingvon, li tute ne povas legi la libron. Se mi ne antaŭe estus kompreninta la neceson de Esperanto por la scienco, mi estus ĝin kompreninta per tiu sperto.

La mondokatastrofo de la dua mondmilito, kiu tute lamigis la Esperanto-movadon, ruinigis ankaŭ ĝian aplikon en la sciencoj. Nur post militfino komenciĝis la restarigo de la Esperanto-movado kaj de ĝia apliko en la sciencoj. Ekde 1947 la konata norvega zoologo Støp-Bowitz reorganizis kiel prezidanto la Internacian Sciencon Asocion Esperantistan, ekde 1949 aperis ĝia organo la Scienca Revuo kun artikoloj populare sciencaj, ĝis

nun entute dek volumoj. Ĝi publikigas ankaŭ la prelegojn faritajn en la Internacia Somera Universitato, kiu funkcias ekde 1948 regule dum la Universalaj Kongresoj de Esperanto. En tiu institucio universitataj profesoroj faras en Esperanto popularajn prelegojn el sia fako por la partoprenantoj de la kongreso. Ekde 1948 okazis ĝis nun (1959) dekdu tiaj sesioj de la Internacia Somera Universitato, la lasta dum la Kongreso en Varsovio. Elekto el ili estas publikigita en libroformo. Mi jam havis naŭfoje la honoron prelegi en tiu internacia universitato pri temoj el la fiziko kaj sentis min ĉe tio libera de lingvaj baroj. Mi ne devis timi ne esti bone komprenata de la negermanoj kiel dum miaj germanaj prelegoj, nek esti nebone komprenata de slovenoj pro miaj eraroj en la slovena lingvo. Sekve prelegante mi havis la senton de justeco kaj egaleco.

Fine mi atentigas, ke pasintjare eldonis la Internacia Scienca Asocio Esperantista Esperantan libron sub la titolo *Sciencaj Studoj* enhavantan 37 studojn, el kiuj 15 apartenas al la humanismaj kaj 22 al la matematikaj kaj natursciencaj fakoj. La aŭtoroj apartenas al 20 diversaj nacioj, inter ili la angla, rusa, ĉina, bulgara, nederlanda.

Drastan kontraŭon de tia bela lingva unueco mi spertis je la fino de mia universitata kariero ĉe promocio solenaĵo. La 27-an de septembro 1950 estis promociotaj honoraj doktoroj de la Viena Universitato la franca generalo Béthouart kaj la usona alta komisaro Keyes. Dum la promocio, kiun partoprenis kiel honoraj gastoj la prezidanto de la respubliko kaj aliaj eminentuloj, la rektoro Prof. Gabriel priparolis la meritojn de ambaŭ doktoroj en germana parolado. La promociinto Prof. Verdross-Drossberg, fakulo pri internacia juro, uzis la latinan lingvon, Generalo Béthouart dankis per franca, la alta komisaro Keyes per angla parolado. Do entute estis uzataj kvar lingvoj!

Ĉiuj tiuj miaj travivaĵoj pensigas min pri Zamenhof, la aŭtoro de Esperanto, kies centan naskiĝtagon oni nun solenas en la tuta mondo. Li ne prikonsideris unuavice la aplikon de Esperanto por la sciencoj, sed estis instigata per la spertoj, kiujn li faris en sia hejmurbo Bjalistoko jam kiel infano, kiam li vidis la kruelan malpacon inter la diversaj grupoj de la enloĝantoj kaŭzitan pro manko de reciproka interkomprenilo. Tiam li komencis sian laboron kaj nur, kiam li estis 28-jara, li publikigis Esperanton. Liaj publikigaĵoj en Esperanto estis direktitaj je la porpaca agado kaj plejparte je la literaturo beletra, kie li interalie faris tradukojn de klasikaj verkoj en Esperanton. Sed li komprenis ankaŭ la gravecon de Esperanto por la sciencoj. Li tradukis jam en la jaro 1903 fragmenton el la lernolibro de sia instruisto Fuchs, la konata viena okulkuracisto, en Esperanton. Tio estis unu el la unuaj sciencaj traktatoj en Esperanto.

Lingvaj problemoj en natursciencoj

de

C. Støp-Bowitz (Norvegujo)

Scienco estas esence internacia, ĝi estas kampo, sur kiu la internacia homa kunlaborado spertas siajn eble plej grandajn triumfojn. Tio validas en pli malpli alta grado por ĉiuj specoj kaj branĉoj de scienco, sed aparte en la natursciencoj (en plej vasta senco), kiuj tiom grave kontribuas al la formiĝo de la tuta strukturo de nia hodiaŭa socio kaj kulturo.

En la antikva tempo ĉiu edukita homo en la latina mondo regis la latinan lingvon, kaj ne ekzistas lingva baro por eventuala internacia kunlaboro scienca. Sed efika baro estis la manko de taŭgaj komunikiloj. Tiel estis ĝis la tempo de niaj avoj. Estas preskaŭ paradokso ke kiam la teĥnikaj komunikiloj komencis rapide evolui, ĝuste tiam la mortinta latino montriĝis ne plu kapabla kontentigi la bezonojn de la rapide evoluanta socio. Tiu koincido sendube ne estas nura hazardo, sed ni ne analizu ĉi tie tiun demandon.

Kiam do serioze komenciĝis la ekspansio de la „modernaj” natursciencaj branĉoj, kiel atomfiziko, evolucia biologio, heredoscenico, oleogeologio ktp., tuj anoncis sin la bezono pri intima kontakto inter kologoj ĉiulandaj. Oni ne plu povis kontentigi nur legante presitajn laborrezultatojn de la kolegoj, necesis korespondado, vizitado, studvojaĝoj kaj kongresoj. Poŝto, fervojo, ŝipoj, aŭtomobiloj, kaj poste ankaŭ aviadiloj, jam ebligis tian kontakton. Sed jen aperis kun plena forto la baro de la lingvodiverseco. Estas preskaŭ kurioze ke dum moderna teĥniko solvis la problemojn pri rekta kontakto tra longaj distancoj per telefono, telgrafo, radio, kaj la homaro akceptis tiujn solvojn, la solvon de la problemoj pri la lingvo, per kiu okazu tiu kontakto, oni ĝis nun malmulte atentis, kvankam ankaŭ la solvo de tiu problemoj tute preta prezentiĝas.

Sed eĉ se oni malmulte atentis la solvon, neniu scienculo evitis la problemon mem de la lingvodiverseco. Oni povas konstati ke dum la 19a jarcento ankoraŭ ofte ekz. italaj, skandinaviaj k.a. scienculoj verkis siajn traktaĵojn en siaj naciaj lingvoj, kelkaj ankoraŭ verkis latine, sed fariĝis ĉiam pli kutime verki en unu el la 3 ĉefaj eŭropaj lingvoj, t.e. la franca, angla kaj germana. Dum la unua duono de nia jarcento la koncentriĝo pri tiuj tri ĉefaj lingvoj estis preskaŭ kompleta. Post la dua mondmilito oni konstatas ke la germana kaj franca perdas terenon favore al la angla-usona sed aliflanke vekiga nacia sento kaj politika prestiĝo kaŭzas ke aliaj popoloj komencas publikigi siajn sciencajn verkojn en siaj naciaj lingvoj, rusoj, hispanlingvanoj ktp. En sciencistaj kongresoj oni spertas la samon: la malgrandaj popoloj de la nordokcidenta Eŭropo humile submetiĝas al la angla

lingvo, dum aliaj, precipe francoj kaj rusoj, kun apogo de respektive la sud- kaj orient-eŭropaj popoloj, obstine postulas rekonon ankaŭ de siaj lingvoj, prave pretendante ke tiuj lingvoj estas same taŭgaj kiel la angla.

Estas ankaŭ atentinde ke UNESKO havas 8 t.n. oficialajn lingvojn, el kiuj 4, la angla, hispana, rusa kaj la franca, estas laborlingvoj. Antaŭ kelkaj jaroj la hispanlingvaj landoj, kun apogo de la arabaj, sukcesis aldoni la hispanan inter la laboraj lingvoj de UNESKO, eble kontraŭ promeso pri apogo flanke de la hispanlingva mondo al poste aperonta propono pri aldono ankaŭ de la araba!

Se sciencisto hodiaŭ volas vere sekvi la evoluon de sia scienco, li devas unue lerni, almenaŭ ĝis kompreno, minimume 6—7 lingvojn, kio estas por la plimulto tro temporaba preparo al la sciencista kariero kaj tro granda neproduktiva balasto por la cerbo. Sekve li devas rezigni pri kompreno de publikaĵoj aperantaj en kelkaj eĉ en la pli gravaj lingvoj, aŭ li devas pagi multekostajn tradukojn. Por forigi ĝis ia grado ĉi tiun malfacilaĵon kelkaj scienculoj kutime aldonas al siaj publikaĵoj resumon en alia lingvo, plej ofte la angla, franca aŭ germana. Tio povas helpi al tiuj, kiuj regas almenaŭ la resumlingvon. Sed mi vidis ankaŭ ĥinlingvan traktaĵon kun resumo ruslingva, kio apenaŭ multe helpas al kompreno en Okcidenta Eŭropo aŭ en Ameriko!

Kiam temas pri publikigo de traktaĵoj aŭ laborrezultatoj, scienculoj, kies nacia lingvo estas la angla, franca aŭ germana, ne renkontas malfacilaĵojn: ili simple verkas en siaj gepatraj lingvoj. Kelkfoje ili aldonas resumon en iu el la aliaj lingvoj; sed por skandinaviaj, finnoj, nederlandanoj, japanoj k.a. aperas la problemoj ke ili devas aŭ verki en fremda lingvo, aŭ pagi tradukon se ili deziras ke iliaj publikaĵoj estus komprenataj ankaŭ ekster ilia patrujo. Kaj eĉ tiuj, kiuj sufiĉe facile parolas kaj skribas en la fremda lingvo, devas zorgi pri kompetenta lingva revizio de la manuskripto antaŭ presigo, ĉar neniu vere perfekte regas fremdan nacian lingvon. Tiu ĉi fakto kaŭzas al la sciencisto el malgranda lando regulajn tempo-perdon, ekstran streĉon kaj elspezon nekonatajn al lia kolego el lando kun favorata lingvo, kaj sekve ankaŭ proporcie reduktas la kvanton de valora scienca laboro, kiun li povas fari dum sia vivo, entute lian konkurenccpovon internacie.

Fine la situacio fariĝis tiel prema, ke ĝi trovis sian esprimon per raportoj, artikoloj kaj diskutoj en diversaj prisciencaj periodaĵoj dum la lastaj 3—4 jaroj. Ekz. la revuo „Science” (vol. 124, p. 974, 1956) konstatas ke: „Multaj publikigaĵoj ne povas

esti legataj de tiuj, kiuj konas la 3 oficialajn lingvojn, ĉar ili estas verkitaj en aliaj lingvoj. Multe da forto kaj mono individuoj, institucioj kaj organizaĵoj elspezas por traduko de la plej gravaj artikoloj."

Tre grava estas raporto de UNESKO pri rezultato de enketo inter sciencistoj el 21 landoj, publikigita en la volumo „Tradukado de sciencaj kaj teknikaj verkoj kaj aliaj aspektoj de prilingva problemoj” („Scientific and technical translating and other aspects of the language problem”). Ĝi montras ke 60 % de la sciencaj verkoj estas skribitaj en la angla lingvo, dum nur 30 % de sciencistoj komprenas la anglan. Po 10 % de la scienca literaturo aperis en la germana, rusa kaj franca, la germanan komprenas 20 %, la rusan kaj francan po 13 % de la sciencistoj. Precipe en Okcidenta Eŭropo, kie oni ĝenerala vivas sub la falsa impresoj ke la angla lingvo estas ĉie komprenata, oni devus iom atenti tiun raporton!

En la revuo „Scienco kaj Socio” („Wetenschap en Samenleving”), organo de la Asocio de Sciencaj Esploristoj en Nederlando (Verbond van Wetenschappelijke Onderzoekers) okazis vigla debato pri la problemoj tra pluraj numeroj, fakto, kiu atestas pri la intereso, kiun fine la sciencista mondo komencas dediĉi al tiu ĉi demando.

La „naŭa raporto de la konsila komitato pri scienca politiko” (1955—1956), eldonita de la Registara Librejo en Britujo, konstata la malagraban fakton ke la lingva ekipeco de la edukitaj klasoj ne plu sufiĉas por sekvi la progresojn de modernaj scienco kaj tekniko. Oni cerbumas pri solvo de la demando kaj konkludas ke la „unua paŝo farota estas akceli la instruon de la rusa lingvo kiel moderna lingvo en la lernejoj kaj universitatoj”.

Kaj fine la scienca revuo „Endeavour”, eldonata de la granda brita firmao „Imperial Chemical Industries Ltd.” paralele en 5 lingvoj (angla, germana, franca, itala, hispana) kaj disdonata senpage al eminentaj scienculoj, natursciencaj institutoj kaj bibliotekoj en la tuta mondo, en sia numero 68 (vol. 17, p. 171, oktobro 1958) okupiĝas pri la temo „lingva problemoj en la naturscienco”. La artikolo faras konstataĵon similan al tiu de UNESKO (ĝi asertas tamen ke nur 44% de la scienca literaturo aperas en la angla lingvo kaj resp. 14 %, 13 % kaj 8 % en la germana, franca kaj rusa) kaj atentigas ke la proporcioj kredeble rapide ŝanĝiĝos, precipe estas atendeble ke la procentaĵo de publikigaĵoj en la rusa lingvo rapide pliiĝos. Ankaŭ tiu artikolo okupiĝas pri la demando kiel solvi la problemon. Oni konstata ke senlima etendado de la tradukoj servoj ne estas dezirinda; ili foruzas tempon, monon kaj natursciencan laborpotencon, estigas prokrastojn kaj povas konduki al miskomprenoj. Kiel alcelindan solvon la verkinto rigardas la elekton de unu monda lingvo por natursciencaj publikigaĵoj. Tia interkonsento prezentus la avantaĝon ke ĉiu bezonus nur unu fremdan lingvon krom sia gepatra. Ĉiuj natursciencistoj devus kapabli ne nur legi en tiu lingvo (kio estas atingebla), sed ankaŭ

verki en ĝi (kio estas malpli facila). Sed evidente la akcepto de iu nacia lingvo renkontos la konatajn politikajn kaj naciajn kontraŭstarojn. Tial la verkinto de la artikolo daŭrigas sian cerbumadon, pripensante ĉu ne utilis allasi 2 aŭ 3 naciajn lingvojn en la naturscienco, per kio li efektive detruas sian principan ideon. Fine li rekomendas ke la natursciencistoj prenu la iniciaton, aliaj sekvos.

Neniu el la menciitaj artikoloj proponas veran solvon, kvankam la problemoj sin altrudas kun ĉiam kreskanta forto.

Prezentas sin efektive 4 eblaj solvoj de ĉi tiu lingva demando:

1. Plifirmigo de la trilingva sistemo (angla, franca, germana);
2. Pluevoluado de akcesoraj helpiloj (tradukistoj, korektistoj, samtempa tradukado tra kap-telefonoj);
3. Akcepto de la angla lingvo kiel sola oficiala lingvo, pro ĝia vasta uzateco;
4. Akcepto de Esperanto kiel la sola oficiala lingvo, pro ĝiaj kvalitoj kaj adapteblecoj al ĉiuj sektoroj de la homa vivo.

Kontraŭ la unua propono parolas 4 faktoj: a) 3 lingvoj estas tro multaj por efika interŝanĝado de ideoj; franca kaj germana ŝajnas malmulte konataj inter anglalingvaj sciencistoj, se oni juĝu laŭ iliaj bibliografiaj indeksoj, kaj saltado de lingvo al lingvo estas laciga, kaj nur malmultaj kapablas fari tion. b) La 3 aktualaj lingvoj estas tro malfacilaj por permesi ĝustan uzadon flanke de alilingvanoj. c) Homoj povas havi psikologian kontraŭstaron kontraŭ la uzado de fremda lingvo, ĉar ĝi ofendas ilian nacian senton; tio povas fariĝi grava kiam alpreni aŭ forĵeti por oficiala uzo estos diskutata. d) Studado de lingvoj en diversaj landoj ne estas adekvata al la sciencaj bezonoj de lingvo-uzo; cetere lingvoinstruado ofte atentigas komercajn kaj politikajn motivojn pli ol sciencajn.

La dua propono tute ne estas solvo, ĉar la individuo restas dependa de helpo de aliaj personoj aŭ de apartoj, kaj ĝi postulas multo da tempo, fortostreĉo kaj elspezoj.

Ni ekzameni iom pli detale la 3an kaj 4an proponojn.

La prononco de la angla lingvo varias sufiĉe multe inter la anglalingvaj landoj Usono, Britujo, Nov-Zelando, Sud-Afriko, la vokaloj estas nedistingaj kaj facile kaŭzas misaŭdon. La diferenco inter ortografio kaj prononco estas tre granda; prononco de internaciaj sciencaj terminoj estas en la angla lingvo tre diferenca de tiu en ĉiuj aliaj lingvoj kaj en parolo ili tial estas malfacile kompreneblaj de alilingvanoj. En Esperanto, kontraŭe, la prononco tre malmulte varias de lando al lando kaj klare tendencas al ĉiam pli granda unueciĝo. La lingvo havas nur 5 klarajn vokalojn, neniam misaŭdeblajn, kaj la ortografio estas fonetika. En la

angla svarmas homonimoj, kiuj facile kaŭzas malklarecon, en Esperanto homonimoj estas tre malmultaj. La angla estas neregula, ne tiom laŭ gramatiko, sed des pli laŭ sintakso. Esperanto estas tute regula, la gramatiko reduktita al la necesa minimumo, sen esceptoj; la reguleco etendiĝas eĉ al la vortfarado, kiu okazas per serio de afiksoj, ĉiu ku difinita senco. Ĝuste ĉi tiu karaktero faras Esperanton ekstreme uzebla en praktiko, ĉar skribante aŭ parolante en ĝi oni ne bezonas atenti la gramatikajn neregulaĵojn, sed povas koncentriĝi pri la temo. Sekve flua uzado de la internacia lingvo estas rapide akirata de la studentoj. Pro la sama kaŭzo la lernado de la angla lingvo postulas pluroble tiom da tempo, kiom la lernado de Esperanto.

La supraj konsideroj ĉiuj parolas kontraŭ akcepto de la angla lingvo por Esperanto. Por akcepto de la angla parolas la hodiaŭa tendenco al pli vasta uzado de tiu lingvo en scienco. Sed tendenco estas rezulto kaj ne kaŭzo, kaj sekve ĝi ne malhelpas akcepton de Esperanto. La sola argumento kontraŭ Esperanto povus esti psikologia kontraŭstaro kon-

traŭ lingvo, kiu estas nenies nacia lingvo. Sed tio ĉi estas bazita sur la aprioria opinio ke tia lingvo ne povas funkcii kiel vivanta lingvo; tiu ideo tamen estas komplete kontraŭpruvita per la faktoj, pri kio ĉiu povas konvinkiĝi per propra apliko de Esperanto en la praktiko.

Kaj efektive ankaŭ Esperanto estas jam uzata en scienco, kvankam ankoraŭ nur en modesta grado. Plej vastan aplikon la lingvo trovis inter japanaj sciencistoj, sed ankaŭ kreskanta nombro de sciencistoj en Eŭropo kaj Ameriko publikigas scienctemajn artikolojn kaj laborrezultatojn en Esperanto.

Hodiaŭ la sciencistoj en landoj kun „neoficialaj” lingvoj dediĉas multe da tempo kaj forto al lernado de fremdaj lingvoj. Ĉi tiu stato devas esti ŝanĝata tiel ke ĉiu sciencisto kontribuas sian parton al la atingo de ĝenerala interkompreno. Tia estis la stato, kiam Latino estis la internacia lingvo de scienco. Tiam regis lingva demokratio, ne okazis lingva diskriminacio. Tiun staton oni povas denove atingi nur per la adopto de Esperanto, la internacia lingvo de D-ro L. L. Zamenhof.

Rezolucioj de sciencistoj pri la uzo de Esperanto

La 28-an de aprilo 1950 la Japana Scienca Konsilantaro akceptis gravan rezolucion en kiu, interalie, estis dirite :

”La sciencistoj deziras, ke iliaj studoj estu konataj egale en ĉiuj partoj de la mondo kaj, same tiel, ke la studoj faritaj en ĉiuj partoj de la mondo estu konigitaj al ili. Sen tio ni ne povas atendi veran evoluon de la scienco.”

Post tio, ĝis aŭgusto de la sama jaro, 85 japanaj sciencistoj subskribis specialan promeson, laŭ kiu ili devigas sin publikigi en Esperanto almenaŭ unu el la disertacioj, kiujn ili verkos en ĉiu jaro, kaj aldoni Esperantlingvan resumon al ĉiu traktatverkita en alia lingvo.

En la ”promeso” la subskribintoj akcentas :

”La sciencaj esploroj devas ne esti izolitaj al unuopaj landoj kaj iliaj rezultatoj devas ne esti akaparitaj de unuj laboratorioj aŭ individuaj esplorantoj. Scienco estas komuna klop-

podo de la homoj por fari sin estuloj vere meritaj de la nomo *homo sapiens* La subskribintoj agnoskas, ke la enkonduko de Esperanto kiel komuna lingvo por internacia publikigo de sciencaj laboroj estas tre efika rimedo por plisolidarigo de la internacia kunlaboro de la sciencistoj.”

En majo 1951 aperis ankaŭ rezolucio de ĉinaj sciencistoj, subskribita de 20 universitataj profesoroj en kiu, interalie, estis dirite :

”La sciencistoj, kiuj malfeliĉe parolas aliajn lingvojn kaj kiuj deziras tamen ion krei en siaj propraj sferoj, devas eluzi pli ol duonon de sia vivtempo por ellerni 4 aŭ 5 fremdajn lingvojn, ĉar alie ili ne povas digesti la konojn jam ekzistantajn, des malpli fari ian indan kontribuon. Tia tro-konsumo de tempo kaj de energio estas vere nekompensebla perdedo de la scienco. Ni volas adopti la simplan, facile lerneblan Lingvon Internacian, Esperanto, kiel la scienca lingvon por internacia uzado kaj por publikigi niajn verkojn en ĝi.”

Zamenhof en la evoluo de la komunikado

de

D-do G. F. Makkink (Nederlando)

Komunikado ekzistas tiom longe kiom la universo ekzistas. La pli vasta signifo de la vorto komuniki ja estas: transdoni. En la universo la ardaĵoj disĵetadas materierojn kaj disradias elektromagnetan energion en la vastan spacon. Parto el ili estas komunikataj al aliaj astroj kaj planedoj. La komunikado okazas senintence laŭ la "leĝoj" de la naturo kaj tendencas al la stato de la plej granda verŝajneco, de la plej multa homogeneco, de la plej multa entropio. En tiu finfina stato la ekvilibro estas plej perfekta.

Kiam antaŭ tri miliardoj da jaroj la tero ekestis, la materia kaj energia komunikado okazis ankaŭ sur ĝi. Vulkanoj erupcie komunikis siajn fajrajn substancojn al la ĉirkaŭejo, fontoj komunikis akvon al malaltaj lokoj, per la sunradiaĵo la akvoj komunikis vaporon disen, nuboj komunikis sian pluvon kaj neĝon al montdeklivoj.

Longegaj eraoj pasis antaŭ ol la vivo aperis kaj daŭrigis sian ekzistadon en sia akva naskiĝejo. Jam la plej simplaj estaĵoj aplikis novan manieron de komunikado: ili komunikis parton de si mem al la ĉirkaŭejo, de tempo al tempo duonigante sin je egalaj individuoj. Neniu scias kiam okazis la unua vera celita reciproka komunikado, la unua konversacio. Ĝi estas interŝanĝo de bone difinitaj korpuskloj de unu individuo al alia. Tiu ĉi substancia konversacio ankoraŭ ekzistas nun kaj rolas kiel unu el la plej principaj vivofenomenoj en la tuta viva naturo: la interŝanĝo de kromosomoj ĉe la seksa kuniĝo, konversacio kies vortoj estas la eroj portantaj la vivkapablojn. Dank'al tiu interkomunikado la evoluo povis liveradi neimageble riĉan abundon da plej diversaj kaj eĉ neverŝajnaj estaĵoj.

La akvaj estaĵoj disvolvas novajn kromajn manierojn de komunikado, ĉe kiuj korpa kontakto ne estas necesa kiel ĉe la interŝanĝo de kromosomoj. Okazas disigo de kemiaj substancoj kiuj povas esti ricevataj de aliaj individuoj. Tiuj substancoj, specialigitaj por certaj taskoj, trapasas pli aŭ malpli grandajn distancojn. Ili estas eroj de la konversacio per gustaĵoj kaj odoroj. Ĉe multaj bestoj tiu metodo ebligas distingi la samspecanon kaj renkonti la aliseksulon. Vermoj, krustuloj, fiŝoj kaj amfibioj sin servas de tiu grava komunikmaniero. Ĉe tiuj la dua, pli speciala signifo de la vorto komuniki aperas: konigi. La diskonigataj vortoj estas la kemiaj molekuloj, troviĝantaj en la sekrecio de specialaj glandoj. Ili stimulas trans distancoj specialajn sentilojn de la samspecano, kiu tiel ekkonas vivogran signon, temantan pri sekso, seksavido, timo, gardemo, ktp. Tiel kemia kodaro reguligas la vivadon.

Plue disvolviĝas interkomunikado per la lumo, kio fine rezultigas signadon per movoj, gestoj, koloroj, kolorŝanĝoj ktp. kaj perceptadon per diversaj specoj de okuloj.

Diversaj bestotipoj sukcesis disvolvi adaptaĵojn kiuj ebligis al ili eliri la akvon. Krustuloj, limakoj, fiŝoj kaj amfibioj komencis pioniri sur la tero. Speciale la lastaj antaŭ proksimume 350 milionoj da jaroj komencis evoludirekton, kiu evidentiĝis sukcesplena. En la nova medio, la aero, evoluis nova maniero de komunikado, kiu povas transiri pli grandajn distancojn per tre malmulte da korpa energio. La vibrado de la aero estas uzata ne nur de la posteuloj de la praamfibioj, sed ankaŭ de insektoj kiaj akridoj kaj cikadoj. Disvolviĝas vibriloj kaj aŭdiloj, konstruitaj por speciala serio de ondlongoj.

Niaj prauloj, la praamfibioj, disvolvis por la vivado sur la tero spirorganojn, ĉe kiuj muskoloj generas en aparta organo la aervibrojn. La skeleto de la kapo paŝon post paŝo evoluas tiel, ke kelkaj ostoj, ne plu necesaj por aliaj funkcioj, formas aparaton kiu povas ricevi aertremojn. Ĉi tiu iniciato de la praamfibioj estis fruktodona: tipo post tipo disbranĉiĝis de la genealogia trunko. Ranoj, rampuloj, birdoj kaj mamuloj, ili ĉiuj posedas pli aŭ malpli specialigitajn kaj perfektajn sonricevilojn kaj multajn ankaŭ organon por produkti kriojn, eĉ melodiojn. Nur fakuloj scias kiom komplikaj estas iliaj aŭdiloj: mirigaĵoj el ostoj, muskoloj, membranoj, fibroj, sentoĉeloj, nervoj kaj sangtubetoj kunordige laboras por ricevi la komunikajojn; simile la spirorganoj kunlaboras kun la sonorganoj por produkti la signojn de komunikado.

Kaj fine antaŭ pli ol duona jarmiliono en ia simieca besto la cerbo disvolvis tiom da sulkoj kaj griza substanco, ke novaj cerbaj kapabloj povis ekfunkcii. La povo memore konservi memfaritajn sonsignojn por nelimigita nombro da objektoj, fenomenoj kaj spertoj, kaj la povo elmemore reprodukti la sonojn, reprezentas la bazon de vera lingvo. Pro tio la besto fariĝas homo. Ĝis nun la bestoj nur posedis vokaron: serio de sonsignoj kiuj karakterizas specialan animstaton, emocion, inklinon kaj humoron: sonoj de timo, ĝojo, simpatio, algrupemo, seksavido ktp. La uzo de tiu vokaro estas instinkte reguligita kaj heredita de unu generacio al la sekvanta. Same kiel organo la vokaro estas pli malpli unuforma tra la tuta loĝregiono de la speco. Ĉiu besto posedas universalan vokaron.

Ĉe la homo nur malmulte restas de la hereda

vokaro. Anstataŭigas ĝin la memfarita sonaro: la lingvo. La lingvo baziĝas sur konvencioj kiuj estas interkonsentitaj por la bezonoj de la vivo. La lingvo devas esti transdonata de unu generacio al la sekvanta, ĉar ĝi ne estas korpe ligita. Ĝi estas limigita al la vivmaniero de la tribo, de societo, en unu insulo, valo aŭ difinita regiono. Kun la instinkta bazo de la komunikilo la homo perdis ĝian universalecon. Kun la kapablo indiki kaj difini sian ĉirkaŭejon li akiris la povon de la lingvolernado kaj la emon al parolado. En la historio de la homa gento miloj da lingvoj disvolviĝis, paralele kun la miloj da vivejoj.

La konversacio inter bestoj per la vokaro bone helpas garantii la ekzistadon: ĝi servas al la generado kaj ĉe la sociaj bestoj ankaŭ al la sinutrado.

La akiro de la homa lingvo kreis grandegajn perspektivojn: oni povas interkomuniki pri ĉio, almenaŭ pri ĉio pri kio oni perceptas aŭ pensas. Ĝi efike povas faciligi la kunvivadon. Sed oni ankaŭ povas malutile uzi la lingvon: por kvereli, ofendi, mensogi, inciti, insulti kaj verdikti. Tio povas plifortigi la solidarecon en la propra tribo kontraste al fremdaj kaj povas konduki al detruo de ili. Sed same tio povas difekti la harmonion en la propra societo.

Krom ĉio necesa por interkomunikiĝi sone, la homo ankaŭ heredis de siaj simiecaj prapatroj la brakojn kun ilia movebla polekso. Tiu organo ebligis al li manipuli aĵojn per kiu li povas grati strekojn en la rokon aŭ ŝmiri koton sur la grotvandon. La desegna kapablo ne limigis sin al farado de bildoj laŭ la naturo aŭ imago: ĝi uzis la bildojn por eternigi komunikon sur vando, sur osto, sur argilo aŭ sur papero. La eltrovaĵo de la bildskribo tiel ebligis al la homo paroli trans pli granda distanco ol lia voĉo povis atingi. Per la skribaĵo li eĉ povis transponti la tempon. Tiu arto evidentiĝis malpli lokdependa ol la arto de la parolo. Kiel la buŝa lingvo ankaŭ la skribo devis esti lernata kaj instruata kaj tiom longe, kiom la signaro restis bildsignaro, ĝi konservis certan limigitan universalecon, malgraŭ la fakto ke la sonlingvo ŝanĝiĝis de unu loko al alia.

Sed ankaŭ tiu parta universaleco, ankoraŭ nun ekzistanta en la ĉina signaro, en multaj skriboj perdiĝis. Proksimume 1700 jarojn antaŭ Kristo oni faris la eltrovon, ke malmultaj signoj, po unu por la apartaj sonoj, sufiĉas por redoni en tre simpla maniero la plej komplikajn komunikon. Efektive granda atingo, sed ĝin akompanis la perdo de universaleco kiun la bildskribo ankoraŭ iukvante posedis. De nun ankaŭ la skriba lingvo iĝis loka.

Jam en la tempo de Hamurabi (1700 antaŭ Kristo) la multlingveco de la homo estis sentata kiel ĝeno, eĉ kiel Dia puno, laŭ la biblia rakonto pri Babelo. Kompreneble la lingvodiverseco malhelpis la komercan trafikon, florantan tiam inter Mezopotamio, Egiptio kaj la bordoj de Medite-

raneo. Oni malmulton scias pri la klopodoj forigi la ĝenojn de la tiama lingvomulteco. Sed la ordigon, kiun Panini aranĝis en la Vedaj lingvoj de Hindio, kreante la Sanskriton pr. 500 jarojn antaŭ Kristo, oni rajtas nomi serioza atingo en la kampo de la interlingvistiko kaj lingvonormigo.

Ni ankaŭ malmulton scias pri la fruaj klopodoj kunmeti lingvon por superi la malfacilaĵojn de lingvodiverseco kaj por regajni la transdialektan kompreneblecon de la iama bildskribo. En la Mezepoko ili jam estis faritaj de Folengo (1491-1544).

Kelkaj lingvofarantoj surpaŝis misvojon, serĉante la solvon per signolingvo (pasigrafio) kiu nur taŭgas por skriba komunikado. Aliaj eniris alian misvojon, penante fari aprioran lingvon (sisteman kodlingvon). Kelkaj el tiaj projektoj estas elparoleblaj (ekz. Solresol), sed preskaŭ ne memoreblaj.

La eltrovintoj de pasigrafioj neglektis la bezonon de la buŝa konversacio, la eltrovintoj de aprioraj projektoj neglektis la limigitan memorkapablon de la homo. Nur tiuj, kiuj agnoskis la prilingvajn bezonojn kaj la homajn kapablojn, rajtis atendi sukceson de siaj klopodoj. La unua estis Panini, kies kreaĵo ankoraŭ nun ekzistas. Schleyer, kiu ankaŭ ĉerpis el ekzistantaj lingvoj la materialon por la vortaro kaj gramatiko de sia Volapük, parte sukcesis, parte fiaskis. Kial post li Zamenhof plene sukcesis, valoras analizon. Speciale en komparo kun tiuj el liaj sekvantoj, kiuj juĝis necese fari "pli bonan" lingvon sen la asertitaj "mankoj" de Esperanto. Kial Zamenhof sukcesis, kaj la projektintoj de aliaj lingvoprojektoj, inter kiuj profesiaj lingvistoj, malsukcesis?

Zamenhof unualoke estis homo, kiu konscie praktikadis sian Homecon, kaj nur dualoke li estis lingvoŝatanto. La aliaj unualoke okupis sin pri lingvoj kaj lingvofarado, neglektante la homajn bezonojn.

Zamenhof estis dum sia tuta vivo solidara kun la malfeliĉuloj, kun la suferanta homaro, ĉu suferanta pro malsanoj, ĉu pro miskompreniĝo, ĉu pro senrajtigo. Lia rimedo Esperanto estis konforma al tio: adaptita al la bezonoj de ĉiuj homoj, ĉu ordinaraj, aŭ altinstruitaj.

Zamenhof kiel ŝatanto de lingvoj, konjekte aprezis ilian esprimriĉon, ilian sonan kaj bildigan ĉarmojn pli ol iliajn etimologiajn meritojn. La unuaj proprecoj ja konstante kontribuas al la lingva uzado, la etimologia karaktero nur parte.

Kaj plue Zamenhof estis saĝulo. Li sciis ke perfektigemo kondukas al malstabileco. Li sciis ke persona aŭtoritato elvokas ĵaluzon kaj konkuremon. Li fine konsciis, ke ĉiu uzata lingvo vivas kaj evoluas, perfektigante por sia tasko. Tial Zamenhof kreis la kondiĉojn por daŭraj ekzistado kaj evoluo: li rezignis pri personaj rajtoj kaj aŭtoritato, insistis pri netuŝebla Fundamento kaj starigis la 16-an regulon de la gramatiko, kiu garantias la lingvan evoluon.

Kvankam la verko de Zamenhof fakte ne estis io plene nova, nek iu revelacio, nek vera "eltro-

vajo", lia produkto tamen estas elstara pro la kombino de lingvaj kvalitoj kaj homama fono.

Kio estas la nova akiraĵo per kio Esperanto distingas sin de la aliaj lingvoj de la tero? Pro la neŭtraleco kaj la simpleco, Esperanto estas la unua lingvo en kiu ĉiu uzanto povos plenkonvinke diri: mi parolas mian lingvon. Ĝis tiam oni nur povis diri en fremda lingvo: mi parolas vian aŭ lian lingvon. Esperanto estas la unua lingvo en kiu ĉiuj homoj povos diri: ni parolas nian komunan lingvon.

La respekto al la popoloj kaj la estimo al la homoj estas instruataj kune kun la lingvo Esperanto. Tial ĝia lernado havas nobligan influon, kiu mankas al la instruado de aliaj lingvoj. Estas tio kio reprezentas unu el la grandaj kulturaj valoroj de Esperanto.

Zamenhof enkorpigis en Esperanton ion spiritan: la humanisman etoson. Kaj estas precize tio kio estas necesa por paca kunvivado.

Dum la evoluado de la bestoj, ĉiu speco klopodis disvastigi sin sur pli granda parto de la tersurfaco. Dum tiu disvastigado disvolviĝis lokaj karakteroj, distingantaj la geografiajn rasojn. Militoj inter tiuj rasoj geografie sin ekskluzivantaj, estas esceptoj. Ĝenerale najbaraj rasoj rekonas unu la alian, ĉar la vokaj kaj gestaj komunikiloj ne aŭ tiom malmulte diferencas, ke interpariĝo estas ebla. Cetere la nutrokonkurenco decidas pri la reciproka disvastiĝo de la rasoj. La homaj rasoj renkontas sin reciproke je multe pli granda skalo ol la bestaj, speciale en la moderna tempo kun ĝia trafikiloj. Ili ekkonas multajn diferencojn ĉe la alia raso, ne nur sekve de la mensa distingo-kapablo, sed ankaŭ pro la diverĝa specialiĝo sekve de la malsamaj lokaj vivkondiĉoj, malsamaj tradicioj kaj malsamaj lingvoj. Tiuj diferencoj malkaŝas la specan egalecon kaj rekte stimulis al bataloj kaj militoj.

Esperanton oni povas konsideri frukto de la intelektaj kapabloj de la homo, per kiu la lingvo-diverseco estas superebla. Per ĝia homrespekta etoso ankaŭ la diferencoj en moroj, vivstilo, haŭtkoloro kaj aspekto povas esti venkataj. Per lingva kompreno la diversaj diferencoj perdas sian malmamikigan efikon.

Al kio kondukos la ĝenerala uzo de Esperanto? Ĝis nun Esperanto estas uzata pli malpli kiel luksaĵo, kiel ornamajo de la homa socio, kiel plibeligilo de la kultura vivo de relative malmultaj. Sistema aplikado ankoraŭ mankas. Tamen oni povas profeti ke la cirkonstancoj necesigos tion. Pli kaj pli la nunaj trafikebloj kaj la hodiaŭaj cirkonstancoj kondukas al situacioj kie la interhoma rilatado nur estas efika aŭ eĉ ebla per Esperanto.

La intermikso de minlaboristoj diversnaciaj sekve de loka manko de laboristoj, kreis lokan situacion kun lingvaj malfacilaĵoj. Tie oni enkonduku Esperanton. La kunvenado de atomspecialistoj en internaciaj laborcentroj kreas la bezonon pri Esperanto, se ne inter la sciencistoj mem, tiam ĉe la personaro kun kiu ili devas rilati kaj ĉe iliaj familioj kiuj sin renkontadas. La organizado de internaciaj armeoj kaj polictrupoj de la Unuiĝintaj Nacioj kondukas al homkolektiĝoj kie Esperanto estas nepre necesa. En ĉiuj tiuj medioj oni prezentu Esperanton, ĉar oni bezonas ĝin.

Ankaŭ la sekureco de la aertrafiko postulas simplan, nemisaŭdeblan internacian lingvon. Esperanto kontentigas la bezonon.

Kvankam oni povas atendi, ke sub premo de la cirkonstancoj Esperanto estos akceptata kiel la taŭga kuracilo, ankaŭ la kutima vojo de la penetro de Esperanto fare de la Esperanto-movado restu aplikata. Sur tiu vojo Esperanto estas lernata kaj uzata, ne nur sub premo de la cirkonstancoj, sed ankaŭ pro allogo pro ĝiaj intelekta kaj humanisma ĉarmoj.

Kiel kromrezulto de la Esperanto-kongresoj kaj aliaj renkontiĝoj sin fondis kaj fondos familioj kie Esperanto ekfunkcias kiel hejmlingvo kaj gepatra lingvo. Jen Esperanto eniras la gentan tradicion, en era maniero verdire, sed tamen. Tiu fenomeno havas gravegan intereson, ĉar ĝi reprezentas progresan paŝon en la evoluo de la komunikado.

Mi klopodis loki la Zamenhofan komunikilon en la evoluo de la komunikado ĝenerale. Mi montris ke la komunikado en la komenco estis nur sekvo de la materia kaj energia strebado al la plej granda homogeneco, ekvilibro, entropio. Ni vidis ke la vivo komence nur aplikis substancan interkomunikadon. Unue per korpaj partoj kaj eroj, poste per kemiaĵoj kaj per lumo. Kiam la vivo konkeris la teron, la aervibroj ekestis la bazo de nova komunikilo. Vokaroj aperis ĉe la bestoj kaj fine la lingvoj ĉe la homoj. Post kiam Zamenhof donacis Esperanton kiel superlingvon, estas la tasko prezenti ĝin por ekuzo, ĉie kie troviĝas premaj cirkonstancoj.

Per lingvoj oni povas paroli, sed ankaŭ kalumni, suspektigi, malprave kulpigi, ofendi ktp. Ni rezignu pri tia misuzo de la Internacia Lingvo kaj uzu ĝin por disvastigi la veron, la juston kaj la belon. Post miliardoj da jaroj aperis rimedo por intence atingi homogenecon, ekvilibron kaj harmonion. Nun inter la homoj, kies ĉies posedaĵo ĝi estu, per kiu ĉiu povas kaj fieras diri rekte al alia: mi estas homo, same kiel vi kaj tial ni vivu en harmonio kaj havu pacon. La vera misio de Esperanto ja estas akceli pacon.

Esperanto - Heredaĵo al la infanoj de la mondo

de

David Kennedy (Britujo)

Supozeble kiam Zamenhof donis al la mondo sian verkon, la internacian lingvon, Esperanto, li pripensis precipe ĝian efikon al plenkreskuloj. Efektive, la efiko al granda nombro de tiuj, kiuj lernis la lingvon, efiko, kiu kondukas al pli simpatia pensmaniero pri la enloĝantoj de aliaj landoj, estas jam evidenta kaj kreskanta. Sed la verko de Zamenhof estas ankaŭ heredaĵo al la infanoj de la mondo, kaj kiam oni donos al la junularo la eblecon partopreni tiun heredaĵon, oni povas antaŭvidi fortan antaŭenpuŝon al la aspiroj pri interfratiĝo kaj mondopaco. Ĉiu edukisto komprenas kiel gravaj estas la fruaj jaroj de la infano, kiam ĝi ensorbas la diversajn ideojn kaj idealojn, kiuj regas en ĝia socio, ĉu hejma, lerneja aŭ alia. Laŭ kalkulo, en la mondo troviĝas 500 milionoj da infanoj, la plej multaj el kiuj lernas iom pri la historio de sia popolo. Sed la historio kaj la vero ne ĉiam estas sinonimaj. Povas esti, ke la infanoj lernas pri aliaj popoloj en la mondo, kontraŭ kiuj ilia propra devis defendi sin, aŭ eĉ kontraŭbatali en la pasinteco. Ofte la sugestio estas, ke tiuj aliaj ne estas tiel bonaj, justaj kaj bonkoraj kiel la propra, kaj per tio povas naskiĝi nacia fiereco. Eĉ povas esti ke la spirita kaj psikologia preparado al milito foje fontas el tiu partia informado. Bona antidoto al tia insida inokulo estas la instruado de Esperanto, kun la idealoj de ĝia aŭtoro, Zamenhof. Se, dum tiuj fruaj jaroj, la infanoj komencas rigardi la infanojn de aliaj landoj kiel anojn de la homa familio, ne plu fremdaj kaj nekonataj, ĉar kontakteblaj pere de la Internacia Lingvo, la posta rikolto de tia instruado alportos al la mondo nur bonon kaj benon.

Estas frapanta penso ke, se oni instruas Esperanton en la lernejoj de la mondo, post unu generacio la lingvaj bariloj kiuj apartigas la naciojn, plejparte malaperus. Al tiu ideala dulingvismo, tio estas, nacia lingvo plus Esperanto, la Esperantomovado nun strebas. Tio estas minimuma bezono, kvankam ĉiam restos neceso ke kelkaj, pro diversaj celoj, devas esti lingvistoj. Sed ĉu tia dulingveco estas ebla por infanoj? Ĉu tio ne tro streĉos iliajn mensojn kaj kapablon? Pripensu kio okazas hodiaŭ en multaj grandaj urboj. Sur la strato, foje en la hejmo la infanoj uzas unu lingvon, sed en la lernejo ili devas praktiki la pli puran nacian lingvon. Kompreneble, tiuj lingvoj estas ofte tre parencaj. Sed ekzistas pluraj regionoj en la mondo, ne nur landoj sed ankaŭ limregionoj, kie la junaj infanoj parolas du lingvojn, kiuj tute ne estas parencaj. Ŝajne, do, ne estas ekster la kapablo de normala infano lerni du lingvojn samtempe. Se tiu dulingveco konsistus el nacia lingvo plus Esperanto, la

rezulto sendube estus pli da amikaj interrilatoj ne kun infanoj de nur unu kaj apuda regiono, sed kun infanoj en ĉiuj partoj de la mondo, kie ekzistas tia dulingveco.

Ju pli frue infano eklernas lingvon, des pli funde li majstros ĝin. Konsciente pri tiu fakto, kaj kredante je dulingveco, pluraj Esperantistaj gepatroj jam instruas al siaj idoj nacian lingvon kaj ankaŭ Esperanton. Je la nuna tempo tio okazas ĉe proksimume 100 familioj, kaj koncernas ĉirkaŭ 200 infanojn. Tio estas, provizore, malgranda provo, sed kiam la centoj fariĝos milionoj, tiam ni kredas ke la rezulto mirigos la mondon, ĉar okazos nova sunleviĝo por la homa raso, alportanta pli helajn tagojn de paco, konkordo kaj amikeco.

Tutevidente la progreso de la idealo pere de Esperantistaj familioj ne estas sufiĉe rapida, kaj ni devas alvoki la helpon de la lernejoj. En tiu direkto oni jam faris konsiderindajn paŝojn. Ekzemple, esploro farita en 1951 montris ke la Internacia Lingvo estas instruata en 131 lernejoj, de 17 diversaj landoj. Dua esploro en la jaro 1955 montris, ke tiuj ciferoj kreskis ĝis 148 kaj 23 respektive, kaj tiu progreso ankoraŭ daŭras. En kelkaj lernejoj la instruado estas oficiala kaj deviga, en aliaj ĝi estas tute laŭvola. La spertoj de multaj instruistoj, kiuj jam instruas Esperanton al siaj lernantoj, montras ke, por la plejmulto, ĝi estas alloga lerneja objekto, eble ĉar tiuj lernantoj trovas, ke ili faras pli da progreso lernante Esperanton ol lernante nacian fremdan lingvon. Lastatempe kelkaj knabinoj en gimnazio en Nordanglujo studis la francan lingvon dum tri jaroj, sed ilia progreso estis preskaŭ nulo. La direktorino de la gimnazio decidis fari eksperimenton pere de Esperanto, kiun la knabinoj studis dum la du sekvantaj jaroj. Je la fino de tiu dujara studado restis nur ok knabinoj en la grupo; la aliaj intertempe forlasis la lernejon pro aĝo, ktp. Tiuj ok provis ekzamenon, pri kiu la Societo de Britaj Esperantistaj Instruistoj respondecis, kaj ĉiuj knabinoj sukcesis, du kun honora mencio. Unu malhelpo en multaj gimnazioj estas ke, ĝis nun, ne ekzistas oficiala ŝtat-ekzameno pri la lingvo, kiu valorus por atesto pri kapablo je la fino de la lerneja studado. Pro tio la pli lertaj studentoj devas dediĉi sian tempon al „ekzamen-eblaj” temoj. Sed la supra rezulto pensigas, ĉu progreso en la lernado de la franca lingvo ne estus estinta pli kontentiga, se tiuj knabinoj unue estus studintaj Esperanton. Spertaj instruistoj jam deklaris, ke la antaŭa studado de la Internacia Lingvo estas bona bazo por la posta studado de fremdaj naciaj lingvoj.

Al la infanoj en la lernejoj la studado de Esper-

anto povas alporti avantaĝojn. Kiam lerneĵano ek-lernas Esperanton, unu el liaj unuaj deziroj estas korespondi kun lernantoj en aliaj landoj. Tiamaniere li baldaŭ kolektas kartojn kun bildoj de la aliaj landoj. Sed la interŝanĝo ofte ne limiĝas al karto: diversaj aĵoj kiel desegnaĵoj, fotoj, k.c. aldoniĝas al la kolekto, ĝis fine lerneja grupo disponas pri interesa materialo el la eksterlando, kaj ĉi tiu kolekto povas poste formi la bazon de lerneja ekspozicio, foje sufiĉe impona por altiri la atenton de gepatroj kaj oficialaj rondoj. Tia utiligo de Esperanto sendube aldonas al la intereso pri lernejaj objektoj, precipe pri la studado de geografio kaj historio, ĉar la infanoj mem trovis kontaktojn kun la mondo ekster la propra lando.

Per ankaŭ alia metodo oni provas provizi kontaktojn inter lerneĵanoj, kiuj pligrandigos la reciprokajn interesiĝojn kaj amikiĝojn. Ĝi funkcias sub la nomo „Graĵnoj en Vento”, kies centro estas en Svislando. Unue la svisa gvidanto de ĉi tiu metodo aranĝis rondojn de lernejoj, en kiuj oni instruas Esperanton. Ĉiu rondo enhavas 12 lernejojn el 12 diversaj landoj, kaj ĉiu rondo respondecas, sub rondogvidanto, pri materialo por sia komuna lerneja gazeto, kiu aperas trifoje dum la jaro. Tio signifas ke ĉiu lernejo en la rondo devas kontribui verkojn de siaj lernantoj, ekzemple rakontojn, anekdotojn, infandeseĝnaĵojn kun Esperanta teksto, k.t.p. Komprenoble ĉio estas kontribuita de la infanoj mem. Eble la rezulto ne estas altnivela literaturo, sed ĝi estas alte ŝatata de ĉiuj lernantoj en la rondo. Oni sendas ĉi tiun materialon, multobligitan, al la rondogvidanto, kiu kunfiksas ĝin tiel ke ĉiu lernejo en la rondo fine ricevos ekzempleron de la komuna gazeto. La ideo pri lerneja gazeto tute ne estas nova, sed ĉi-speco estas unika, ĉar ĝi ne apartenas al unu lernejo en unu lando, sed al 12 lernejoj en 12 diversaj landoj. La ideo ŝajne allogas lerneĵanojn, ĉar nun ekzistas pluraj tiaj rondoj kun siaj komunaj kunmetitaj gazetoj.

En la jaro 1954 Heibonsja eldona firmo en Tokio trovis novan kaj praktikan metodon por la utiligo de Esperanto en la edukado de la japana junularo. La firmo eldonis serion da volumoj sub titolo „Infanoj de la Mondo”. Tiuj volumoj, entute 15, konsistas el verkoj de lerneĵanoj el ĉiuj anguloj de la mondo. Por havigi la materialon la japana firmo sin turnis al la instruista flanko de la Esperantomovado, kun peto pri kunlaborado. La celo de la serio estas prezenti al japanaj infanoj la ĉiutagan vivmanieron en aliaj landoj, kaj precipe la vivmanieron, ludojn, okupojn, k.c. de la infanoj en tiuj landoj. La koncernaj lerneĵanoj verkis la artikolojn en sia nacia lingvo, kaj poste oni tradukis la tekstojn en Esperanton, antaŭ ol forsendi ilin al Tokio. Tie la lokaj japanaj Esperantistoj tradukis la senditajn tekstojn en la japanan lingvon. La rezulto de tiu grandioza laboro estas la jam menciitaj 15 volumoj, kiuj prezentas al la japana junularo bildon pri aliaj landoj de la mondo, kun iliaj kutimoj, ĉiutaga vivo kaj laboro, viditan tra la okuloj de infanoj, kiuj loĝas en tiuj landoj, la plej

multaj tre malproksime de Japanujo. Oni rajtas esperi ke tiu peresperanta laboro bone influos la junan generacion en Japanujo, kaj donos al ĝi pli simpatian rigardon al la aliaj nacioj de la mondo.

Lastatempa evoluo en la progreso de la Internacia Lingvo inter la junularo estas la okazigo de Infan-kongreso en la kadro de la ĉiujaraj universalsalaj kongresoj de Esperanto. La junaj kongresanoj, aĝoj 5—14, devas havi la kapablon paroli Esperanton ĝis la grado kiun oni rajtas atendi de infanoj de tia aĝo, tio estas, la kapablon babiladi kun la aliaj junaj membroj dum ludoj, ekskursoj kaj manĝoj, facila afero por la denaskaj Esperantistaj infanoj. La junuloj loĝas kune en aparta konstruaĵo, kutime domego dediĉita al simila socia celo por enlandaj infanoj dum la restaĵo de la jaro. La taga programo inkluzivas ludojn en la ĝardeno aŭ apuda kampo, vizitojn al interesaj lokoj en la kongresurbo kaj ĉirkaŭaĵo, ekskursojn, filmprezentadojn kaj komprenoble manĝojn. La personoj kiuj tage kaj nokte prizorgas tiujn infanojn dum la sep tagoj de la kongreso estas spertaj homoj, ĉefe profesiaj instruistoj kaj komprenoble ankaŭ kompetentaj Esperantistoj. Ĉi tiu eksperimento, ankoraŭ en siaj fruaj etapoj (ĝi komenciĝis en 1954) estas ĝis nun tre sukcesa kaj promesplena.

Kelkaj lernejoj estas jam sufiĉe entreprenemaj en la utiligo de la Internacia Lingvo. Lernejo en Manchester, Anglujo, kie dum jaroj oni instruas Esperanton, ankaŭ dum tiuj jaroj aranĝis sian propran aŭtobusan ekskurson al la kontinento dum la somera ferio. Por fari la aranĝojn kaj dum la ekskurso, la lernejo utiligas la servojn de delegitoj de la Universala Esperanto-Asocio. Citinda estas parto de raporto de la estro de tiu lernejo, mem sperta Esperantisto, post unu tia kontinenta vizito. „Ni ĵus faris 2.000 mejlan aŭtobusan ekskurson tra Francujo, Belgujo, Nederlando kaj Germanujo survoje al Danlando, kie ni pasigis treege ĝuindan semajnon kun junuloj el Norvegujo, Svedlando, Danlando, Germanujo, Nederlando, Francujo, Svislando kaj Jugoslavio. Je ĉiu etapo de la vojaĝo la lernantoj kaj mi povis babiladi Esperante kun la multnombraj amikoj, kiuj renkontis nin.” Oni ne povas tro alte taksi la efikon de tia vojaĝo kaj tiaj spertoj sur la karakteroj kaj pensoj de la junaj partoprenantoj.

Se ni deziras ke la infanoj de la mondo lernu la Internacian Lingvon, ni devas provizi instruistojn por ili. Ĉu la necesa nombro da instruistoj ekzistas je la nuna tempo? Oni devas memori ke jam nun 2.000 instruistoj el multaj landoj estas membroj de la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj. Se oni subite decidus enkonduki Esperanton en la lernejojn, tiu nombro certe ne sufiĉus; sed pri tia subita decido ne estas ebleco, ĉar nur grade oni progresas. Tamen, tiel relative simpla estas Esperanto por kleraj homoj, ke kelkmonata kurso sufiĉus por la preparado de la bezonataj instruistoj. Tiun aserton subtenas la sperto dum lastatempa edukada eksperimento en Skotlando, por kiu necesis pluraj instruistoj, kiuj scipovus Esperanton.

La solvo troviĝis en sesmonata vespera kurso por volontuloj, kiuj deziras partopreni la eksperimenton. Sed jam nun la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj ludas gravan rolon. Ĝi posedas monatan profesion gazeton en Esperanto, renkontiĝas ĉiujare dum la Universala Kongreso por diskuti profesiajn temojn kaj problemojn, kaj krome, dum la jaro ĝiaj individuaj membroj vigle partoprenas en la instruado de la lingvo. Eĉ Unesko nun agnoskas tiun Asocion kiel neregistaran organizaĵon, kun kiu ĝi havas regulajn interrilatojn pri aferoj komune interesaj.

Per rezolucio de 1954 en Montevideo, Unesko

deklaris sian interesiĝon pri la progreso de Esperanto en edukado kaj en la lernejoj. Sed interesiĝo ne sufiĉas; agado necesas. Hodiaŭ internacia lingvo estas eĉ pli urĝa ol kiam Zamenhof donis sian verkon al la mondo. Nun ekzistas pli da homaj kontaktoj, pli da amaturismo, pli da mondkonferencoj, sed spite tion, ankoraŭ restas tiuj ĝenaj lingvaj bariloj. Ĉar ĉi tiu estas la centjara datreveno de la naskiĝo de Zamenhof, la kreinto de la Internacia Lingvo Esperanto, ĝi estas ankaŭ tre konvena jaro, en kiu transdoni al la infanoj de la mondo pli grandan porcion de tiu heredaĵo, kiun Zamenhof donacis al ili.

Al Josephine Baker

Patrino de kvin diversgentaj orfoj : franca, hinda, indiana, japana kaj juda. *)

*Ŝi iras tra la mondo
ne nur por verve distri,
ŝi venas por registri
en nia koro
la gradon de la honto
aŭ de honoro.*

*El ŝia korpo nana
pasio disradias,
kaj flame erupcias
en elokvento
apologi' vulkana
por ŝia gento.*

*Penetras ĝismedole
la vipo de la vero.
Sed lukte por tolero
ŝi tre humile
mem donas apostole
ekzemplon brile :*

*Sen iu rasa baro
diverskolora kvino
ŝin nomas la patrino
kaj tiel diras,
ke rajtoj de l'homaro
ankoraŭ spiras.*

*Saluton, fratineto,
kaj dankon pro kuraĝo !
Vi portas sur vizaĝo
nobelan signon :
Konfirmas via kredo
la homan dignon.*

Poul Thorsen

*) Momente Josephine Baker estas patrino de dekunu infanoj el jenaj gentoj krom la nomitaj : araba, finna, hungara, korea, negra.

La Internacia Lingvo kiel familia lingvo

de

Rev. F. Moravec, Germanujo

Ke nacia lingvo estas uzata ne nur ĉe interrilatoj inter homoj ĉe la diversaj okazoj de kunesto kaj kunagado kiel komunikilo, sed ankaŭ en la kadro de la familio inter la familianoj plenkreskaj kaj infanaĝaj, ĉe la edukado de la idoj, ĉe la interparoladoj de la infanoj unu kun la alia, tio estas ĉiekonata afero.

Jam ekde jardekoj ekzistas la Internacia Lingvo. Leviĝas la demando, ĉu tiu internacia lingvo, kiu servas kelkloke inter homoj de diversaj nacioj, ĉu ĝi povas kaj kapablas esti uzata ankaŭ en la familio kiel familia lingvo kun ĉiuj aplikebloj de edukperilo, de interkomprenilo inter gepatroj kaj gefiloj, de lingvo inter la infanoj mem, sur kampo de la ĉiutaga vivo por ĉiuj necesoj kaj bezonoj, sur kampo de ludoj ĝis eĉ sur la kampo de la arto, en la medio de la familio?

Unuflanke neesperantistoj, seriozuloj, kiuj ne konas ion aŭ iom pri la Internacia Lingvo, neas tiun eblon, neas la lingvon kaj kun ĝi ĉiun komunik-eblon per ĝi. Estas facila afero por ili informiĝi kaj esplori, ke almenaŭ ekster la familio ĉe rilatoj videblaj kaj aŭdeblaj de multaj la Internacia Lingvo funkcias. Tio por seriozuloj ne plu estas demando, sed ĉu oni povas paroli, ĉu oni parolas Esperanton ankaŭ en la familio?

Aliflanke ankaŭ disĉiploj de la Internacia Lingvo asertas, ke tiu lingvo estas nur por internaciaj interrilatoj, neniam por naciaj rilatoj, kaj neniel por la kontakto inter samnacionoj. Ankaŭ pro aliaj kaŭzoj — laŭdire — ne eblas, ke dua lingvo estas aŭ eĉ povas esti uzata en la kadro de la familio. Infana cerbo laŭdire ne kapablas posedi du lingvojn. Do ŝajnas, ke Esperanto ne povas esti por la kontaktoj en la familio.

Du demandoj stariĝas: ĉu Esperanto estas lingvo kun la samaj ecoj kiel ĉiu alia lingvo aŭ diferencoj inter ili estas gravaj kaj konsiderindaj; kaj due, ĉu dulingveco eblas jam por infanoj.

Ĝenerale, ankaŭ ĉi-loke, oni devas diri, ke homoj, kiuj ne konas iun alian lingvon ol la propran, ne povas prijuĝi, ĉu tiu alia lingvo taŭgas aŭ ne. Tion pro la spertoj kapablas diri nur homoj, kiuj konas tiun alian lingvon. La samo validas por Esperanto. Ĉar ĉiu teorio aŭ nevalidiĝas aŭ pruviga, kiam la praktiko montras la faktojn, la realon, kaj nur la praktikanto povas raporti pri tio.

Pri la Internacia Lingvo la spertintoj povas diri, ke Esperanto estas lingvo kiel alia lingvo. Tion komencas kompreni ankaŭ lingvo-fakuloj. La naciaj lingvoj havas siajn ecojn, oni devas lerni ilin kun iliaj ecoj kaj ismoj kaj specialaĵoj, oni devas alkitimiĝi, kaj per la aplikado oni ricevas lingvo-

senton kaj la opinion, eĉ konvinkon, ke en tiu lingvo nur tiele eblas diri tion aŭ tion. Same oni devas lerni Esperanton kaj alkitimiĝi al ĝiaj ecoj, ismoj, formoj kaj specialaĵoj. En ĝi oni povas kaj kapablas ĉion esprimi same kiel en la aliaj lingvoj. Ĉi-rilate ne estas diferenco. Kondiĉo nature estas — mi petas pardonon pro la ripeto —, ke oni regas la lingvon, ke oni ĝin ellernis. Tutsama afero, kiel ĉe naciaj lingvoj.

Sed ĉu vere ne estas diferencoj? Certe jes! La disvastiĝo estas alia. La esperantistoj hodiaŭ ne loĝas kune kiel la anoj de naciaj lingvoj. Tial hodiaŭ malestas ankoraŭ la kutima uzo de la lingvo ĉe la vendisto, ĉe la bakisto, en la trafiko, inter la najbaroj, inter la kolegoj. Krom tio la ĉiutaga informado per gazetoj ankoraŭ ne okazas en Esperanto. La lernevizito kaj la profesistudado ne postulas la aplikon de Esperanto. Tio donas diferencigan econ al la lingvo, hodiaŭ. Oni povas tion rimarki en la ĝenerala vortprovizo Esperanta de hodiaŭ. Sed tiu stato estos eterna, kaj la lingvo mem povas facile akiri kvaliĝadon laŭ bezono.

Alia diferenco estas la akirado de la lingvo kaj ĝia transdono de unu homo al la alia. Ĉe la naciaj lingvoj la normala vojo estas la hereda transdono. La patro aŭ la patrino transdonas la lingvon. En la familio la infanoj lernas la lingvon ĝis fluparolo kaj en la lernejoj oni aldonas gramatikajn kaj stilajn korektojn kaj plilarĝigas la lingvoscion. Tio en Esperantujo ankoraŭ ne okazas, almenaŭ ne en tiu grado. Ĝenerale — ĝis nun — plenkreskaj homoj aŭ junaj homoj post la unuaj aŭ pluraj lernejjaroj ekstudas Esperanton kaj havigas ĝin al si, sed ne plu kiel infanoj. Tio ankaŭ donas al la lingvo specialan econ, kvankam ankaŭ ne eternan, ĉar ĉe ŝanĝo de la strukturo de la aplikantoj tiu kvaliĝadotupo ankaŭ laŭe ŝanĝiĝos.

Resumante oni povas prave diri, ke la Internacia Lingvo posedas la samajn kvalitojn, kiuj konsistigas lingvon, kiujn ankaŭ la naciaj lingvoj posedas.

La gradiferencoj ne povas malhelpi la agnoskon, ke Esperanto samrajtas kun la aliaj lingvoj. Tio validas por ĉiu aplikokampo de la lingvo, do ankaŭ por la aplikado kiel familia lingvo.

La dua demando estas la dulingveco. Ankaŭ tie ĉi oni ne povas lasi la juĝon al homoj neinformitaj aŭ nespertaj. Ne estas riproĉo, se oni konstatas, ke ŝtatanoj aŭ nacionoj, kiuj loĝas en la centro de sia regiono, ne sentas iun ajn bezonon regi alian lingvon. Oni vivas bone laŭ kutima maniero kaj uzas de la naskiĝo ĝis la morto tiun unu nacian gepatran lingvon. Ne estas bezono por io alia. Eĉ la fremdaj sciigoj alvenas bone kaj kompreneble

tradukitaj. La profesiaj interrilatistoj lernu pro profesio duan aŭ plian lingvon. Kaj eĉ se iam necesus, la lingvo de la koro — aŭ de la malamo — aŭ almenaŭ de la gestoj povos — espereble — helpi. Nenia riproĉo pro tia mensstato. Sed la homoj, kiuj vivas en la limaj regionoj, la homoj kiuj kontaktas kun la "aliaj" aŭ komerce, aŭ pro scienco, pro scio, aŭ pro plezuro, kutime havigas al si alian lingvon, sen malhelpi al si. Kaj pro spertoj ofte spertitaj ili zorgas, ke ankaŭ iliaj idoj lernu duan lingvon, jam en infanaĝo, ju pli frue, des pli bone. En la limregionoj, en la regionoj de diversnacia frekventado, en la familioj de la riĉuloj, de la diplomatoj kaj regantoj, la infanoj laŭeble denaske lernas duan lingvon. Alcelinda por progresanta homo estas la dulingveco. La evoluo de la tekniko kaj la malpligrandiĝo de la mondo per ĝi sampostulas. Internacia interkompreniĝo necesas, kaj pro tio dulingvismo, laŭeble denaska!

La plej oportuna solvo de la demando, kiun duan lingvon la infano lernu, estas nepre Esperanto. La ĉiedisvastiĝo, la simpleco estas gravaj argumentoj por tiu ĉi decido. Per Esperanto la infano kaj la juna homo povas en ĉiu direkto kontaktiĝi, la homo kun unu fremdlingvo alia ol Esperanto nur en tiu unu direkto de la elektita lingvo destinita. La prefero de unu nacia lingvo por la sola uzo hejme aŭ por la dulingvismo povas havi siajn kaŭzojn personajn, kiujn oni povas agnoski laŭ la persono. Sed por la homaro ne indas tiu troa naciismo, kiu pro malĝusta opinio pri la "mi", pri la "ŝtato" kaj "popolo" postulas preferadon de nacia lingvo. Por tiu ĉi celo de la homara interkompreno sole indas neŭtrala lingvo Esperanto. Moderna dulingvismo nur povas esti nacia lingvo plus Esperanto.

Tiu postulo, ne plu konstato de eblo, validas ankaŭ por la lingvo en la familio, se oni aliras al dulingveco.

La ĝisnunaj konsideroj estis plejparte teoriaj. Laŭteorie eblas, ke la Internacia Lingvo estiĝu ankaŭ familia. Kion nun pri la praktiko?

En la komenco ne eblis sin turni al infanoj junaj, por ke ili lernu Esperanton, por ke ili apliku ĝin. Kun kiu ili parolu? La natura vojo estis, ke la plenkreskuloj komencas, ke ili formas tiun generacion, kiu povos transdoni la lingvon al la idoj. Tio daŭris sian tempon. Tamen jam ĉirkaŭ 1920 komenciĝis la praktikado de Esperanto en la familio. La anglo M. C. Butler simple kaj nature parolis Esperanton hejme kun siaj tri gefiloj ekde ilia naskiĝo. Ankaŭ aliloke tiaj provoj okazis. Ili sukcesis, se oni tute nature aplikis la lingvon, sen specialaj kursoj aŭ faradoj. Tutsame kiel oni "instruas" nacian gepatran lingvon al infanoj en la familio. Oni simple uzas la lingvon. Antaŭ la Dua Mondmilito jam ekzistis speciala organizo, kiu kunigis la infanojn ankaŭ-Esperanton-parolantajn. Sinjoro Robertson, ankaŭ anglo, estis fondinto de la "Denaska Esperantistaro".

La mondmilito kiel konsekvenco de la jam nomita troa naciismo haltigis tiun agadon, sed post

la milito, eble pro la pripensoj kaj pro la spertoj, la movado de la "ankaŭ-esperantlingva eduko" konsiderinde vigliĝis kaj kreskis kaj vastiĝis. Centro de tiuj klopodoj estas la "Bulteno Gepatra", sendependa revuo por dulingva eduko, eldonita de Esperanto-Press en Oakville, Ontario, Kanado.

En la januara numero 1957 de tiu bulteno publikiĝis listo de proks. 60 infanoj, kiuj dulingve (Esperanto plus nacia lingvo) edukigis, kaj listo de pluaĵ 25 familioj, kie oni praktikas tiun dulingvismon, do parolas Esperanton en la familio. Plua enketo de finna fraŭlino Sirkku Koivu, komisiite de CED, laŭ Bult. Gepatra 1957/4 kolektis materialon pri 154 infanoj el 19 landoj ankaŭ ekster-eŭropaj.

El tio evidentiĝas, ke la teorio de la dulingva edukado, de la aplikado de la Internacia Lingvo en la familio realiĝis, ke la teorio iĝis fakto, praktiko.

Ĉar tiu kampo estas ankoraŭ bone superriĝardebla kaj explorebla, la observoj estas ege interesaj. Krom la kresko de la lingvoscio kaj de la lingvokapablo ĝenerala kaj speciala, krom la kresko de la unuopaj vortprovizoj de la etuloj oni povas vidi, kiel, sub kiuj kondiĉoj, kiamaniere, kiel rapide la lingvo enkondukiĝas. Oni povas bone studi, ĉu la lingvo emas forigi la nacian aŭ ĉu ambaŭ harmonie trovas aplikeblojn en la familio, oni povas bone observi la influon de unu lingvo al la alia, kaj oni povas studi la bonan influon de la dulingveco praktika al la juna homo.

Du ekkonojn necesas menciigi pli detale. La infanoj, kiuj denaske lernas Esperanton apud la landa lingvo, ne montras malpli bonajn sciojn ol aliaj infanoj. Ilia cerbo ne difektiĝis. En la lernejo ili sambone aŭ sammalbone sukcesas kiel la aliaj infanoj. Sed iliaj scioj pri la mondo estas pli grandaj. Antaŭ ĉio, pro la kontakto kun homoj el aliaj landoj ili estas multe pli proksimaj al internacia interkompreniĝo kaj al paco ol aliaj infanoj, kiuj iris tra nur nacia eduko.

La dua observindaĵo estas la kvalitoj de la gepatroj, kiuj enkondukas tiun indan kaj praktikan dulingvismon. Kompare al unulingvaj familioj iliaj klopodoj estas multe pli grandaj. Ĉar la lingvo ankoraŭ ne estas tiel dense disvastigita, ili devas multe pli zorgi, ke la infano havu tiun necesan ĉirkaŭon, tiun necesan lingvan medion, en kiu oni povas aŭdi kaj paroli Esperanton.

Oni devas agnoski la fortojn de ili. Tiuj egalas al la klopodoj de ekzilitaj popoloj, kiuj konservis la hejman lingvon, apud la alprenon de la lingvo de la gastlando, aŭ ĉe aliaj popoloj venkitaj, kiuj tamen konservis la propran lingvon kontraŭ la alprenon de fremda lingvo de venkinto. Sed milit-cirkonstancoj ĉe Esperanto ne estas. La superigenda malhelpo venas ne ĉiam nur de ekstere, de la najbaroj. Ankaŭ en la familio, ĉe la anoj de la malmoderna pasinta epoko troviĝas malhelpemo. Kontraŭ ĉiuj baroj la gepatroj, aŭ kelkfoje eĉ nur unu el ili, venkas per pacienco kaj persisto.

Ke li aŭ ili mem devas lerni regi la lingvon, ne necesas speciale mencii. La infanoj kiel akraj kaj veremaj kritikantoj postulas kompletan lingvon kaj perfektan modelon. Memstudo kaj memperfektiĝo, kaj transdono de la lingvo spite al obstakloj diversaj, tio estas la plenumita tasko de la esperantistaj gepatroj.

Per tio respondiĝas la titola demando, ĉu eblas, ĉu povas la Internacia Lingvo esti ankaŭ familia lingvo.

Nun, ĉe la fino rekomendiĝas ankoraŭ paŝo plua, nome la demando, ĉu necesas tia apliko?

Neceso dependas de la celo. Se alceliĝas, ke Esperanto estu plenperfekta lingvo, kies kampo ankaŭ inkluzivas la familian vivon, tiam necesas apliki la lingvon inter familianoj. Se alceliĝas bona flua lingvoscio kontraŭ nura balbutado kaj deklaro, ke ion aŭ tion ne eblas diri en Esperanto, tiam necesas laŭeble plej frua komenco de la apliko de Esperanto, t.e. denaske.

Kaj ĉefe se oni alcelas veran interkompreniĝon tutmondan, kiu estas kondiĉita per la neŭtrala lingvo Esperanto, tiam oni devas zorgi, ke ĝi aplikiĝu vastskale, ankaŭ en la familio, samrajte apud

la naciaj lingvoj. Se oni vere volas efektiviĝi pli bonan mondon de morgaŭ kaj prepari niajn infanojn por ĝi, tiam necesas apliki la neŭtralan lingvon ankaŭ hejme. Jam la ideo, ke oni iam devos paroli la Internacian Lingvon, postulas, ke oni ekzercu la homojn kaj tie ĉi la infanojn, por ke ili bone alproprigu al si la lingvon; tial ĝi estu ankaŭ familia lingvo en sama proporcio al la landa. Dulingvismo estu realigota ankaŭ en la familio, por ke ĝi funkciiu aliloke.

Temas pri la ekzistrajto de Esperanto. Temas pri tio, ĉu Esperanto vivu aŭ ĉu ĝi estu facile forigebla aŭ malpermesebla vortlisto plimalpli internacia? Al tiu demando mi metas la respondon de D-ro Zamenhof:

"Lingvo internacia fortikiĝos por ĉiam nur en tia okazo, se ekzistos ia grupo da homoj, kiu akceptas ĝin kiel sian lingvon familian, heredan. Cento da tiaj homoj estas por la ideo de lingvo neŭtrala multege pli grava ol milionoj da aliaj homoj. Hereda lingvo de la plej malgranda kaj sensignifa popolo havas vivon multege pli garantiitan kaj neestingeban, ol senpopola lingvo, kiun uzas eĉ milionoj da homoj".

Ĉarmaj rimoj por infanoj

Genurajdanto

Hop, hop, hop,
Galop, galop, galop!
Peĉjo rajdas sur ĉevalo
Tra kamparo al arbaro
De la monto al la valo!
Hop, hop, hop,
Galop, galop, galop!

Unu, du - mia ŝu',
tri, kvar, kvin - serĉu min,
ses, sep, ok - blanka kok',
naŭ kaj dek - kapro faras mek-mek-mek.

Eta saĝulo

Ha, etulo, vi devas manĝi,
palajn vangojn je ruĝaj ŝanĝi!
Diras ankaŭ la spegulo:
'Jes, vi estas malsanulo!'
Ĝia diro ja tute vana;
mi min sentas ja tute sana!
Kara panjo, ke mi manĝu:
supon per kuketo ŝanĝu!

Horloĝo

Tik-tak! diras la horloĝo,
Klare sonas ĝia voĉo!
Sonas ĝia voĉ' admona:
'Knabo, estu ĉiam bona!
Ĉar forflugas ĉiu horo
Pli rapide ol vaporo.

Ĉemizulo, malpurulo,
ne lavita, ne kombita,
ne sin lavas, ne sin vestas
akvotima Geo estas!

(El: "Bulteno Gepatra")

Unu Mondo - Unu Lingvo

de

Julia Isbrucker (Nederlando)

Nur frateco povos savi la liberecon. (El parolado de Victor Hugo en Parizo-1870).

Ni vivas en treege interesa tempo, en la atom-epoko ! Estas kvazaŭ ni sidus en rapidvagonaro sen bremsa, sen kontrolisto, sen haltejo, sed . . . signaloj ekzistas, ruĝaj, daŭre ruĝaj kaj ŝajne neniu movas eĉ unu fingron por haltigi ĝin.

La nuntempa tekniko donis al ni, apud siaj benoj, ankaŭ detruiblecojn, per kiuj la homaro povas ludi kiel infanoj kun alumetoj.

Kiam sinjoro Lester Pearson ricevis la Nobel-premion por la paco, li diris : "Ni devas detrui niajn atom-armilojn aŭ ili detruos nin". En la brila kaj nobla libro de la fama aŭtoro Nevil Shute, titolita "On the Beach" (Sur la Marbordo), en franca traduko "Les Derniers Jours" (La Lastaj Tagoj), oni povas kvazaŭ en filmo travivi la tempon, kiam la tuta mondo escepte de malgranda parto en Aŭstralio, jam estas venenigita de la radio-aktiva pluvo. Kaj tiu estontebildo ne estas pure fantazia, sed minaca ĥimero. Ĝi falos egale sur amikojn kaj malamikojn, infanojn kaj plenkreskulojn.

Kiu aŭ kiuj devos bremsi la vagonaron ? Estas facile ŝovi la tutan kulpon sur la ŝultrojn de niaj politikistoj. Ili estas nur malmultaj, pelataj de la cirkonstancoj; estas la tasko de la amasoj, ne nur krei, ke ni kuras al katastrofo, sed meti la halt-signalon.

Same kiel la mondo de la tempo, kiam ankoraŭ homo batalis kontraŭ homo, evoluis al ordigitaj ŝtatoj, nun tiuj samaj ŝtatoj devos unuigi sub unu registaro, por ke neniu aparta ŝtato povu preni armilojn kontraŭ alia ŝtato. La tasko de la ŝtato estas protekti siajn anojn. Tuj, kiam ĝi ne plu povas plenumi tiun taskon, ĝi perdis sian ekzist-raĵon. Eĉ la antaŭaj hommanĝantoj, la Tuparioj, pri kiuj skribis la mondvojaĝanto Tibor Sekelj, decidis antaŭ kelkaj jaroj fini la hommanĝadon, ne pro etikaj motivoj, sed ĉar ilia prudento diktis, ke baldaŭ ili mem estos la viktimoj. Ĉu nia civilizita mondo ne povas esti same saĝa ?

Oni ofte argumentas, ke unue la homo mem devas ŝanĝiĝi kaj anime evolui. Certe, se ĉiuj homoj sentus nur iom da amo al sia proksimulo, la tuta problemo estus solvita, sed . . . ĉu ni havas sufiĉan tempon atendi je tio ? La nombro da atombomboj kreskas !

Se oni ne baldaŭ starigos mondparlamenton kaj efektive funkciigos ĝin, la estonteco de la tuta homaro estos malluma kaj duba. (Sir Winston Churchill.)

La ideo de unuiginta Eŭropo, almenaŭ kion oni nomas Eŭropo, jam trovis multajn adeptojn, sed tiu de unuiginta mondo ankoraŭ renkontas grandan skeptikon. Tamen la kernarmiloj malfermis la okulojn ankaŭ de tiuj, kiuj "staras kun ambaŭ piedoj sur la tero". Pli kaj pli oni komprenas, ke ĉiuj nuntempaj problemoj estas mondproblemoj, ekzemple la helpo al la malpli evoluintaj landoj kaj la internacia polica forto. Estas evidente, ke la venontaj problemoj kiel tiuj pri la marjuro, la spacdivido, la estrado de la polusoj, eble la posedo de la luno, neniam povos esti solvataj sur la bazo de suverenaj ŝtatoj.

La ofte aŭdata argumento kontraŭ iu speco de mondfederacio estas, ke "oni perdas sian liberecon". Tio estas grandega eraro. Jam nun la plena suvereneco de ŝtatoj ne plu ekzistas; ĉiu kontrakto inter du aŭ pli da ŝtatoj forprenas parton de la suvereneco de la koncernaj ŝtatoj. Estus jam tute sufiĉe provizore, se oni forprenus de ĉiu ŝtato la rajton deklari militon al alia ŝtato kaj do ankaŭ la rajton posedi propran armeon. El tio sekvas kompleta malarmado de ĉiuj kaj la starigo de tutmonda polica forto. Jes, la ŝtatoj perdus denove parton de sia suvereneco, sed la homo, la individuo gajnu sian trankvilecon kaj certecon povi vivi kaj labori en paco.

La organizaĵo de la Unuigintaj Nacioj estas jam grandega paŝo en la ĝusta direkto kaj ĝiaj specialaj organizaĵoj, kiuj faras grandiozajn bonfarojn, indikas la vojon al unuiginta mondo. La "World Association of World Federalists" (Mondmovado de Mondfederalistoj) kaj la "World Parliament Association" (Asocio de Parlamentanoj por Mondparlamento) esperas efektiviĝi tiun celon per la plifortigo de UN kaj per kelkaj ŝanĝoj en la ĉarto, kiuj ebligas la starigon de mondparlamento kun plenuma potenco, internacia juĝejo kaj tutmonda polica forto.

Ankaŭ la Universala Ligo laboras en tiu direkto, sed ne sur politika tereno. La Ligo havas kulturan kaj edukan taskon kaj ĝi klopodas atingi sian celon per la eldono de organo, redaktata en Esperanto, en kiu regule aperas tiucelaj artikoloj kun ilustraĵoj, informoj pri la mondfederaciaj movadoj kaj korespond-adresoj.

Ke ankaŭ UN komprenis, ke la bazo de ĉiu homa unuiĝo devas esti reciproka respekto kaj bonvolo, evidentiĝas el la dua punkto de la unua artikolo de la ĉarto de tiu organizaĵo : evoluigi la amikecon inter la popoloj. Diversmaniere UN klopodas akceli tion, sed unu el la plej gravaj faktoroj por la interamikiĝo ankoraŭ ne estas sufiĉe akcentata. Kio plej multe disigas unu homon de la alia? La diverseco de la lingvoj! Kiel oni povas amikiĝi kun homo, kies lingvon oni ne komprenas? Jen unu el la plej grandaj problemoj de nia nuna moderna tempo. Ni ĉi tie ne volas klarigi la grandegan monperdon pro la uzo de pluraj lingvoj en la internacia vivo, ĉar tio estas tro evidenta. Estas honto por la nuna civilizita mondo, ke la plej granda parto de la homoj estas internacie surdmuta.

Ne estas hazardo aŭ kaprico, ke jam de la 17-a jarcento, noblaj kaj kleraj homoj serĉadis solvi tiun problemon. Pli ol 400 projektoj de internacia lingvo estas jam faritaj. Nur unu el ili povis evolui de teoria projekto sur papero (kiel ĉiuj aliaj estas kaj restas) al vere vivanta, parolata lingvo. Estas tiu de D-ro L. L. Zamenhof, pola kuracisto, naskiĝinta en 1859; ĝi estas parolata kaj ĉiumaniere uzata de centmiloj da homoj en la tuta mondo. La pseŭdonimo, sub kiu Zamenhof eldonis sian unuan broŝuron en 1887: "Doktoro Esperanto", transiris al la lingvo mem: Esperanto. Zamenhof estis tiam dudekokjara. Jam je deknaŭjara aĝo li finis sian laboron, kiun li komencis kiel lernanto de la gimnazio, sed li estis sufiĉe saĝa atendi kun la publikigo ĝis li mem ĉiuflanke elprovis la novan lingvon. Dum tiuj naŭ jaroj li korespondis kun amikoj, al kiuj li instruis sian lingvon, li tradukis librojn, kaj tiamaniere li povis fari la necesajn plibonigojn. Tial estas klare, ke, kiam li eldonis la unuan broŝuron pri la lingvo, aperis verko, kiu

laŭ homaj mezuroj, estas perfekta. Pli ol 70-jara praktika uzado de Esperanto konfirmis tion plene. Kun admiro, respekto kaj simpatio por la genia, ĉiam modesta homo, kia estis D-ro Zamenhof, la kultura homaro memoras danke la centjaran datrevenon de lia naskiĝo.

Nuntempe homoj, kleraj kaj simplaj, de ĉiuj rasoj, koloroj kaj religioj, interkorespondas, renkontiĝas ĉiujare en kongresoj, interamikiĝas kaj jam nun formas supernacian popolon. Ni povas citi ĉi tie la grandan Profesoron A. Meillet: "Toute discussion théorique est vaine, l'Espéranto a fonctionné" (Ĉiu teoria diskuto estas vana, Esperanto funkciis). Kaj ni volas aldoni: kaj daŭre funkciadas!

Estas grava fakto, ke UNESKO komprenis la mondiskalan utilon de Esperanto, kio montriĝis dum ĝia oka konferenco en 1954 en Montevideo, per rezolucio, en kiu UNESKO agnoskas la grandan valoron de Esperanto por la interaciaj kontaktoj, kaj ankaŭ la fakton, ke Universala Esperanto-Asocio havas parte la samajn idealojn kiel UNESKO mem.

Nepre ne estas la intenco krei homaron sampensantan, senkoloran. Ne, ĉiu popolo devas konservi sian propran lingvon, sian propran kulturon, sed la ekkono de kulturoj kaj kutimoj de aliaj popoloj riĉigas la homan spiriton kaj plilarĝigas lian horizonton.

Ke ni komprenu, ke ni vivas en ŝanĝita mondo kaj ke ŝanĝita mondo postulas novajn vojojn. Estas la granda merito de D-ro Zamenhof, ke li antaŭvidis kaj esprimis tion klare en la komencaj vortoj de la Esperanto-himno: "En la mondon venis nova sento...". Li ne nur prikantis la interfratiĝon de la tuta homaro, sed donis la konkretan ilon por efektiviĝi tion. Ke la homaro tion komprenu!

Pensoj de Zamenhof:

Pri egalrajteco

"... en nia kunveno ne ekzistas nacioj fortaj kaj malfortaj, privilegiitaj kaj senprivilegiaj, neniu humiliĝas, neniu sin ĝenas; ni ĉiuj staras sur fundamento neŭtrala, ni ĉiuj estas plene egalrajtaj; ni ĉiuj sentas nin kiel membroj de unu nacio, kiel membroj de unu familio, kaj la unuan fojon en la homa historio ni, membroj de la plej malsamaj popoloj, staras unu apud alia ne kiel fremduloj, ne kiel konkurantoj, sed kiel fratoj, kiuj, ne altrud-

ante unu al alia sian lingvon, komprenas sin reciproke, ne suspektas unu alian pro mallumo ilin dividanta, amas sin reciproke kaj premas al si reciproke la manojn ne hipokrite, kiel alinaciano al alinaciano, sed sincere, kiel homo al homo. Ni konsciu bone la tutan gravecon de la hodiaŭa tago, ĉar hodiaŭ inter la gastamaj muroj de Bulonjo-sur-Marco kunvenis ne francoj kun angloj, ne rusoj kun poloj, sed homoj kun homoj."

(El la Unua Kongresparolado)

Zamenhof kaj la Movado^{*)}

de

G. C. Fighiera (Italujo)

Sinjoro Prezidanto, karaj gekunvenintoj !

En mi animiĝas kune sentoj de persona feliĉo, admiro kaj honoro pro la privilegiaj cirkonstancoj, kiuj kondukis min al Varsovio. En tiu ĉi mirinda lando — kiu kontribuis al la tutmonda kulturo per siaj noblaj verkistoj, poetoj kaj komponistoj — meze de ĉi kuraĝa popolo, — kiun sklavigado, turmentoj kaj tiraneco igis pli kaj pli spirite kohera —, inter la muroj de tiu ĉi Urbo — eterna, ĉar ĝi postvivis sian propran morton — mi ne pasas kiel rapidema vizitanto, sed tie ĉi mi vivas kaj laboras, kvazaŭ civitano inter civitanoj. En miaj pli fruaj jaroj mi neniam aŭdacus revii, ke iam en mia vivo mi havos okazon koni ĝis identiĝo kun ĝi la landon, kiu naskis la aŭtoron de la Internacia Lingvo. Kvankam Esperanto estas frukto de unu granda intelekto, tamen ĝi neniam estus naskiĝinta, se Pollando ne estus doninta ne nur la Homon, sed ankaŭ la historiajn kondiĉojn, kiuj inspiris lin.

Vi scias, ke jam dum la vivo de Zamenhof oni klopodis kaŝi lian gentan originon : kvazaŭ abdiko al la regno de antaŭjuĝoj licus al homoj, kiuj predikas fratecon. Ni rajtas fieri, ke Zamenhof apartenis al tiu malfeliĉa gento, kiun jarcentaj humiligoj kaj senlimaj turmentoj silente nobligrigis. Ni rajtas fieri, ĉar lia hebreeco, la Kalvario de la hebrea popolo en la geto, estas la fundamenta inspiro, kiun Zamenhof sublimigis, per granda humilo de protesto kontraŭ la homa kondiĉo, je himno al humana frateco.

Du tendencoj

Por kompreni la personecon de Zamenhof, oni devas distingi en lia karaktero du kontraŭajn tendencojn, kiuj daŭre bataladis inter si. De unu flanko lin pelis al altaj faroj granda idealismo kaj profunda kredo je la bono de la homa koro. De alia flanko fera malvarma racio kaj neŝanceliĝebla logiko kontrolis kaj modifis ĉiun lian impulson, tiel ke hodiaŭ ni ne trovas agon en lia tuta vivo, nek vorton en lia plena verkaro, kiu ne estis atente pesata kaj kribrita tra prudenta analizo. Nur homo kun granda morala supereco povis ne esti disŝirita de tiaj diverĝaj tendencoj, sed male superregi kaj harmoniigi ilin.

Kiel idealisto, Zamenhof ekde la junaĝo estis profunde impresita de la batalado inter popoloj de diversaj nacioj. Li supozis, ke du estas la kaŭzoj

de la konfliktoj inter la homoj: lingvoj kaj religioj. Li ne povis stati inerta antaŭ spektaklo de sanganta homaro kaj ellaboris du planojn, kiuj — tamen respektante la lingvojn kaj religiojn — donu al la homoj la eblecon renkontiĝi kaj toleri sin reciproke sur neŭtrala tereno. La unua plano nomiĝis Esperanto kaj rapide disvastiĝis tra la tuta terglobo. La dua nomiĝis "homaranismo" aŭ "hilelismo" kaj ne sukcesis kolekti adeptojn. Al tiuj du idealoj, kiuj en lia menso kompletigis unu la alian, sed kiujn en la publika aktivado li nete dividis unu de la alia, Zamenhof dediĉis sian vivon.

Idealisto estis Zamenhof kaj samtempe malpasia aganto, kiu neniam sekvis sian instinkton aŭ emociion, sed nur obeis al sia logika inteligenteco. Ni ĉiuj scias, ke malgraŭ la interna impeto doni al la homaro solvon de la lingva problemo, li atendis naŭ jarojn antaŭ ol publikigi sian verkon kaj ke en tiuj naŭ jaroj li pacience elprovis plurajn formojn de Esperanto, korektadis kaj fundamente refaris ilin ĝis eltrovo de la definitiva. Tiu lia fera logika inteligenteco pli ol unu fojon savis Esperanton de la pereco, al kiu gvidus ĝin la fanatikuloj. La adorado, per kiu la unuaj esperantistoj ĉirkaŭis lin, neniam tuŝetis lian saĝecon. Li tuj komprenis, ke lingvo ne povas esti ligata al unu homo, sed nur al ĝiaj utiligantoj : tial, malgraŭ ĉiu malaprobo, tuj en la komenco li klopodis senpersonigi la Internacian Lingvon : li forĵetis por ĉiam ĉiajn rajtojn kaj rifuzadis esti leĝofaranto de la lingvo kaj gvidanto de la Movado. Kun karakteriza demokrata sento, li volis Lingvan Komitaton (nuntempe Akademio), kiu konstatu la naturan evoluon de la lingvo, kaj kies decidoj estu devigaj por ĉiuj. Konscia pri la neceso gardi la unuecon de la lingvo, li kreis la Fundamenton, sed samtempe, zorgema ne sufoki la maturiĝon de Esperanto, li akceptis kaj mem vaste praktikis la metodon de neologismoj, nome de paralelaj formoj flanke de la fundamentaj. Zamenhof frue komprenis, ke Esperanto estas akceptebla de la tuta homaro nur kiel lingvo kaj ne kiel nova speco de mistiko. Tial, li mem verkis la faman Deklaracion de 1905, kiun la unua Kongreso en Boulogne-sur-Mer alprenis kaj kiu restis kiel dua Fundamento, ne por la lingvo, sed por la Movado, ĝis hodiaŭ. Eĉ pli reliefigas lia racia konduto en la lukto kontraŭ la reformistoj.

*) Prelego farita en Varsovio okaze de la Zamenhof-festo en decembro 1958.

Zamenhof daŭre agnoskis, ke Esperanto ne estas perfekta, sed ke reformoj povus ĝin ruinigi: projektoj de reformoj dependas de la preferoj de unuopaj personoj kaj komencante la reformadon ni neniam povos kontentigi ĉies postulojn kaj devos senĉese aldoni reformojn al reformoj. Kiam eksplodis la Ido-krizo, en la tiama Movado ĉiuj perdis la sinkontrolon escepte de Zamenhof. Boirac volis forlasi la prezidantecon de la Lingva Komitato, Sébert esperis je abstraktaj kompromisoj, la esperantistoj ĉie akre kverelis unu kontraŭ la alia. Sed en Varsovio jam en la unuaj krizaj tagoj Zamenhof en plej granda trankvilo skribas kun preciza antaŭvido, ke Ido estas mortnaskito, kontraŭ kiu ne valoras lukti, ĉar "la ruza konstruaĵo baldaŭ falos". Li precize preparis la kontraŭagajn planojn kaj liaj antaŭvidoj tute plenumiĝis.

Graveco de organizo

Sed, ne ĉiam la bolantaj esperantistoj de la unuaj tempoj sekvis lin. Plurfoje kaj vane li proponas la fondon de neŭtrala komuna asocio tutmonda: unue en "La Esperantisto", jam en 1889, sub la nomo Tutmonda Ligo de Esperantistoj kaj poste en 1905. La reciproka malkonfido de la tiutempaj francaj gvidantoj kaŭzis, ke lia projekto eĉ ne estis diskutata en la Kongreso. Pasos tri jaroj ĝis kiam Hodler fondos U.E.A.; Zamenhof antaŭvidis kaj proponis tion 19 jarojn pli frue!

Estas signo de vera grandeco ne aparteni al unu epoko, sed al ĉiuj epokoj, resti aktuala trans la jardekoj kaj la jarcentoj. Ni lasu momenton Zamenhof kaj pririgardu la nuntempajn problemojn de la Internacia Lingvo de li kreita kaj klopodu apliki al ili iom da Zamenhofa disciplino.

La transiro de la nuntempa polilingvisma haoso en la internaciaj rilatoj al monolingvismo — kio ja estas la alprenado de Esperanto — signifas formorton de jarcentaj rutinoj kaj privilegioj. En tiu senco Esperanto povas esti konsiderata lingvo-revolucio. Estas normale, ke kontraŭ ĝi koalicias ĉiuj malnovaj interesoj, kiuj akurate plektas ĉirkaŭ ĝi la komploton de silento. Ĉiuj revolucioj estas unue faritaj ne de la larĝaj amasoj, sed de elitoj gvidataj de intelektuloj. Esperanto ne estas kaj ne povas esti movado de amasoj. Ĝia socia portanto estas malplimulta avangardo. Tiu avangarda elito — la nuntempa esperantistaro — havas la funkcion maturigi la cirkonstancojn, en kiuj la Internacia Lingvo atingos la finan celon.

Fundamentan gravecon havas la demando ĉu la Esperanto-Movado efektive plenumas la supre skizitan rolon.

En la nuna stadio, kiam niaj tezoj ankoraŭ ne estas popularaj kaj ni ne disponas pri la rimedoj de amasinformado, la disvastigo de la Internacia Lingvo dependas grandparte de persona propagando. Kaj ĉar la publiko ne distingas — eble prave — la ideon disde la homoj, la esperantistoj, volenevole, fariĝis prototipoj, laŭ kiuj estas juĝata la ideo de komuna lingvo. La tre delikata situacio

donas al ĉiu el ni pezan respondecon. Ni povas adekvate plenumi ĝin, se ni enkondukos en nian Movadon tri internajn elitecojn: socia eliteco, kultura eliteco kaj eliteco de metodoj.

Kondiĉoj de progreso

Estis tempo, kiam la Movado konsistis grandparte el sciencistoj kaj plej gravaj Akademianoj. Estis la ora franca periodo. Kaj estis tempo, antaŭ kaj post la lasta milito, kiam esperantismo fariĝis sinonimo de malgranda sekto, kun adeptoj praktikantaj strangajn kultojn. Ni hodiaŭ ne volas esti Asocio nur por altaj tavoloj, nek disdonejo de etaj vivĝoj al vivmalfeliĉuloj. Movadano rajtas esti ĉiu esperantisto, el kiu ajn socia ŝtupo, el kiu ajn raso, el kiu ajn religia, filozofia kaj politika konvinko. Sed, ni ne volas en niaj aktivaj vicoj homojn, kiuj en la ordinara vivo estas konsiderataj fuŝuloj, fantaziuloj kaj sentaŭguloj. Nur tiu, kiu en sia ĉiutago estas serioze respektata, povas sukcese disradii siajn ideojn kaj influi la ĉirkaŭan medion. Bona aŭ malbona socia konsisto de nia Movado estas ekzisto-demando por la Internacia Lingvo.

Kial la Esperanto-Movado bezonas altan kulturen nivelon? Ĉar esperantismo, kiel lingvomovado, havas esence kulturen karakteron. Altiĝante la kulturen nivelon de la Movado, ni kreas la kondiĉojn, en kiuj ni regajnas al niaj celoj la simpation de la intelektularo. Sen ili Esperanto ne havas esperon venki sian batalon. Tiu simpatio penetros ĉiujn tavolojn de la publika opinio, ĝis kiam la registaroj estos devigataj agnoski la Internacian Lingvon kiel fakton.

Kiam ni parolas pri Movado, ni ne celas senkorpan abstraktaĵon, sed konkretan unuigon de individuoj. Tial, kiam mi parolas pri kultura nivelo de la Movado, ni scias, ke ĝi estas proksimume suma rezulto de la kultura nivelo de ĉiu unuopa membro. Ĉiu el ni devas kontribui levi la kulturen nivelon de la Esperanto-Movado per senĉesa ampleksigo de nia propra klereco. Malofte devo estas pli agraba tasko ol en la nuna okazo. Nia spirito postulas ĉiutagan nutradon: la scio estas senlima, se ĝiajn ĝuojn ne bremsas horizonto. Same kiel la Imperiestro Marko Aurelio je la fino de la tago ne estis kontenta, se li ne estis farinta bonan agon, tiel ĉiu movadano je la fino de la tago ne devus esti kontenta, se li ne plivastigis sian propran kulturon. Zamenhof mem, dronanto en peza kaj zorgoplena vivo, ne postlasis unu tagon ĝis sia morto sen labori intelekte. En la nokto, kiam Varsovio ripozis, Zamenhof kreis por ni senmortajn tradukojn, paroladojn, leteraron, li ellaboris la doktrinon de hilelismo kaj verkis — eble kiel la unua — plenan gramatikon de *yiddish*, hodiaŭ konservata en Muzeo en Jeruzalemo. Zamenhof mem konfesis, ke li konis 12 lingvojn: plurajn el ili li flegis ĝis la lastaj tagoj. Kie ni trovu pli taŭgan ekzemplon?

Eliteco de metodoj signifas unue klaran diferencon inter, unuflanke, la lasta celo kaj la afero mem kaj, aliflanke ties rimedoj kaj la simboloj. Nia strebado estas difinita en la Deklaracio de Boulogne-sur-Mer: "disvastigi en la tuta mondo la uzadon de lingvo neŭtrale homa, kiu ne enrudante sin en la internan vivon de la popoloj kaj neniom celante elpuŝi la ekzistantajn lingvojn naciajn, donos al la homoj de malsamaj nacioj la eblon interkompreniĝadi inter si". La enkonduko de Esperanto en ĉiujn internaciajn rilatojn estas la fina celo. La Esperanto-organizaĵoj — lokaj, regionaj, landaj kaj internaciaj — estas nepre havindaj, sed nur provizoraj rimedoj. Ilia potencigo estas necesa por la bono de la Internacia Lingvo. Sed, nia rigardo ne povas halti ĉe la limoj de niaj societoj: ni ne povas luli nin en blinda kontenteco de partaj atingoj. La taksado de nia laboro devas esti multe pli alta kaj objektiva: ni devas percepti la pulsadon de la Internacia Lingvo kaj la progresojn de ĝia popularigo ne interne de ni, sed tie ĉe la publika opinio. En Mainz Prof. Lapenna parolis pri la tempo, kiam la Esperanto-organizaĵoj ne plu estos necesaj. Niaj strebadoj per la Esperanto-organizaĵoj celas al tiu tempo.

Simboloj kaj esenco

Hodiaŭ oni plu ne diskutas pri la du famaj vojoj, kiuj kondukis Esperanton al ĝenerala akcepto: nome pri leĝfarado de supre — flanke de oficialaj instancoj — kaj pri la iompostioma ĝeneraligo de malsupre, flanke de la popolo. Ni superis tiun demandon, ĉar hodiaŭ ni laboras samtempe laŭ ambaŭ principoj. Hodiaŭ ni konscias, ke ambaŭ vojoj estas nedisigeblaj, ke agnosko de supre kuraĝigas plian disvastigon de la lingvo malsupre, ke, inverse, pli vasta aplikado malsupre trenas oficialajn rekonon de supre. Sed, ankoraŭ en niaj tempoj, kelkaj adoras la simbolojn kaj kredas servi la aferon mem. Eksteraj simboloj — flagoj, insignoj, himnoj — estas nur pontoj por konvencie kaj sin-teze prezenti nian veron. Tiuj rekoniloj estas respektindaj kaj tradiciaj, sed ni devas preteriri la simbolon kaj posedi la esencon. Ne tiu, kiu — sincere aŭ demagogie — multe krias "samideano, samideano" vere ion faras por la Internacia Lingvo, sed tiu, kiu pozitive utiligas ĝin kaj kreas per ĝi.

Eliteco de metodoj signifas, krome, aplikadon de informadaj principoj, kiuj bone koheras kun la jarcento. Jam delonge pasis la tempo de romanti-

kismo. Esti romantikaj en epoko de atomismo signifas esti dekadencaj. Homoj vivantaj en tempoj de rapideco kaj de mondproblemoj ne plu atentigas sentimentalajn argumentojn. Ili konvinkiĝas nur, se oni proponas avantaĝojn. Esperanto ne proponas al la mondo pliajn idealojn, sed simple solvon de la lingva ĥaoso, kun sekva nekalkulebla ekonomio de tempo, gajno de ekzakteco kaj defendo de la naciaj lingvoj kontraŭ lingvaj diskriminacioj. Kiel jam konstatis UNESKO, Esperanto grave kontribuas al disvastigo de scienco kaj kulturo. Ĝi, do, ne plu estas projekto — kiel en la pioniraj tempoj de esperantismo — sed vivanta lingvo, kiu jam nun estas praktike uzata tra la tuta mondo por ĉiaj internaciaj interŝanĝoj. Ĝi, fine, alportas al la homaro fundamentan bazon, sur kiu eblas efektivigi solidarecon kaj moralan unuecon inter la popoloj. Elitaj metodoj signifas prezenti al la homoj la palpeblajn faktojn pri Esperanto, alvoki kaj konfidi al ties racio prefere ol al malfirmaj emocioj. En nia laboro por Esperanto ni ne rajtas forgesi, ke Esperanto estas lingvo kaj nenio alia ol lingvo; ke ĝi evoluas laŭ la leĝoj de ĉiuj aliaj lingvoj, nome per alprenado de necesaj neologismoj kaj forlaso de nenecesaj arkaismoj.

"Esperantisto estas nomata ĉiu persono, kiu scias kaj uzas la lingvon Esperanto, tute egale por kiaj celoj li ĝin uzas. Apartenado al ia aktiva societo esperantista por ĉiu esperantisto estas rekomendinda, sed ne deviga". Per tiuj vortoj la citita Deklaracio de 1905, la fondoŝtono de nia Asocio, difinas nin. Ĉiu alia ideo, eĉ interna, kiun ĉiu el ni ligas al Esperanto estas pure privata afero, pri kiu Esperantismo ne respondecas. En la sama Deklaracio Zamenhof mem ĝisdetale fiksas, ke ankaŭ liaj opinioj kaj verkoj havas privatan karakteron kaj estas por neniu devigaj.

Dum sia tuta vivo, Zamenhof mem, oferis siajn flankajn idealojn — kaj ni scias kiom fortaj kaj turmentaj ili estis — al la bono de Esperanto. Li ne nur verkis kaj akceptigis la Deklaracion, sed poste li plurfoje konfirmis ĝin. Plej solene tio okazis dum la malferma parolado pri la fondiĝo de U.E.A. en Barcelono en 1908.

Ni hodiaŭ kunvenis por honori D-ron Zamenhof en la tago de la datreveno de lia naskiĝo. La plej taŭga honorigo, pli ol teksti laŭdojn al lia nomo, estas firma sekvado de lia ekzemplo, utiligado de lia verko kaj laborado por ĝi, ĝis atingado de la lasta celo.

Prologo

Deklamita de la aŭtoro okaze de la granda Zamenhoffesto en Kopenhago la 15-an de decembro 1959.

Hodiaŭ
en moment' solena,
en lingvo Zamenhofa, pura, plena,
facile fluas vortoj, varme, verse
karesi noblan nomon kvazaŭ per Alta Kanto :
Doktoro Esperanto.

Hodiaŭ
ritmo, rimoj kun dolĉo dance festas
pro verko, kiu mem poemo estas.

Hezite
iras nia penso
al tempo, kiam juna, arda menso
solene ĵuris homojn unuigi.
Batali iris sola, senglava kaj senŝilda
la okulisto milda,
hezite,
eĉ miope sub sia tasko granda
kaj tamen pli ol ĉiuj klarvidanta.

Humila,
saĝa, preskaŭ sola
li luktis por la lingvo senpopola,
ĝis muroj de Bulonjo krake falis.
De tiam li kun daŭre kreskanta akompano
fariĝis tutmondano.

Humila,
ne venkinta, sed ankaŭ ne venkita,
li montris vojon tra la mont' granita.

Hardita
kontraŭ falsaj frazoj
li semis toleremon inter rasoj.
"La naciismo naskas la militon,
la homo estu homo, egale kiulanda!"
La homarano granda,
hardita
pro malvarmo de cerboj kaj de koroj
rezignis pri havaĵo kaj honoroj.

Hodiaŭ
en moment' solena
jam tempo estas por rekono plena.
La nepoj de l' modesta SEMOKORTO
centmiloj tra Tutmondo persiste venis, venas,
konstante semis, semas.

Hodiaŭ
estas tempo, honora kaj hereda -
per vi la verko venkos, estu preta !

Poul Thorsen

Resuma trarigardo pri la celebrado de la Zamenhof-Jaro

Venas la momento por superrigardi la celebradon kaj ĝian efikon tra la tuta mondo. Antaŭ ĉio oni povas konstati ke la Baza Programo starigita de I.O.K. jam en 1958 estas kontentige realigita.

La multflankajn aktivecojn de la centraj organoj de la Movado ebligis la "Fondaĵo Zamenhof", al kiu malavare donacadis la tutmonda esperantistaro. En la momento de ekspreso de tiuj ĉi linioj estas kontribuita al tiu fondaĵo entute la sumo de 18.294,33 ned. gld. (73.177,32 steloj). Al ĉiuj donacintoj, kies nomoj estis regule publikigataj en la revuo "Esperanto", ĉi tie estu esprimita tutkora danko.

La Baza Dokumento aperis en aro da naciaj lingvoj kaj estis larĝe diskonigita. La verko "Vivo de Zamenhof" de Prof. Privat aperis en la angla kaj norvega, dum aliaj biografioj pri Zamenhof aperis de Marjorie Boulton en la angla kaj de Maria Ziółkowska en la pola kaj franca, krom en Esperanto. C.E.D. eldonis grandan serion de artikoloj verkitaj de ĝiaj kunlaborantoj en plej diversaj landoj. Preskaŭ ĉiuj aperis en angla lingvo kaj pere de la Informa Fako nombro da ili aperis en diversaj nacilingvaj gazetoj. Ĉio ĉi larĝe diskonigis la verkon kaj personecon de Zamenhof. La sama materialo multfoje servis ankaŭ al radio-elsendoj.

La unuan kulminon atingis la celebradoj en aŭgusto, dum la 44-a Universala Kongreso de Esperanto en Varsovio. Unu kongresa tago estis plene dediĉita al la solenaĵoj. Impresplena estis la omaĝa programo en la teatra salonego de la kon-

gresejo. Dum la sama tago okazis malkovro de memortabulo sur la domo kie iam troviĝis la loĝejo de Zamenhof en la strato Dzika — nun strato Zamenhof — fare de la vicurbestro de Varsovio. Parolis je tiu okazo reprezentantoj de ĉiuj kvin kontinentoj. Tre impona estis silenta solenaĵo ĉe la tombo de D-ro Zamenhof. Dum la kongresa ĵaŭdo okazis pilgrima vizito al Bjalistoko, kie dum alia granda omaĝa aranĝo estis metita de la Prezidanto de U.E.A. Prof. G. Canuto la unua ŝtono de nova monumento honore al D-ro Zamenhof en ĉeesto de la Prezidanto de la Urba Popolkonsilantaro kaj pluraj aliaj aŭtoritatuloj.

La revuo "Esperanto" dum la tuta jaro publikigis artikolojn dediĉitajn al la memoro de D-ro Zamenhof kaj regule donis raportojn pri ĉio farata en diversaj landoj en la kadro de la memorigoj. Ĝia decembra numero, aperinta jam meze de novembro, 24-paĝa kaj tute dediĉita al la centjara datreveno, enhavis abundon de artikoloj kaj aliaj materialoj, poste uzitaj por la decembraj numeroj de diversaj naciaj Esperanto-organoj. Pluraj tiaj gazetoj publikigis sian decembran numeron en nacia lingvo kaj larĝe utiligis ĝin por informaj celoj.

Celebradoj okazis tra la mondo en plej diversaj landoj kaj lokoj, kiel montras la ĉisuba raportaro. Generale la organizantoj utiligis la konsilojn kaj sugestojn donitajn de U.E.A. kaj C.E.D. kaj faris altnivelajn aranĝojn, ne nur en Esperanto-medioj, sed ankaŭ por pli larĝa publiko.

Jubileajn poŝtmarkojn eldonis Brazilo, Bulgario kaj Pollando. Memorigaj glumarkoj estis el-

donitaj kaj utiligataj de la tutmonda movado en 300.000 ekzempleroj, fotokarto kun portreto de Zamenhof en 8000 ekzempleroj kaj grandformata bildo laŭ linoleuma gravuraĵo de Reto Rossetti en 1000 ekzempleroj. Kelkdekoj da stratoj kaj placoj ricevis la nomon de Zamenhof aŭ Esperanto. Dokumenta filmo pri la vivo de Zamenhof estas ankoraŭ en preparo ĉe pola ŝtata filmfarejo. Ankaŭ la kompleta bibliografio, jam parte preta, estas nun finpreparata.

Al eksterordinara aktiveco inspiris la Zamenhof-Jaro la eldonejon "Stafeto" kies meritplena estro J. Régulo Pérez riĉigis la Esperanto-literaturon per serio de elstaraj verkoj. La Universala Ligo — internacia organizaĵo por mondfederalismo, kies oficiala lingvo estas Esperanto — decidis en 1959 eldoni la internacian monon, la "stelon", ĝis nun ekzistantan nur en formo de kuponoj, ankaŭ en formo de moneroj.

Entute oni povas diri ke post tiu ĉi jaro ne plu estas homoj en la civilizita mondo, kiuj ne povus esti aŭdintaj kaj legintaj pri Zamenhof kaj Esperanto.

En la fotopaĝoj de tiu ĉi libro oni trovas fotojn de aranĝoj en plej diversaj partoj de la mondo. Tiu fotomaterialo neniel povas doni kompletan bildon pri la festoj. Ĝi celas doni nur impreson pri ĉio okazinta.

Pri la diverslandaj aranĝoj estas ricevitaj la sekvantaj informoj :

Argentino

Estis nomita en I.O.K. D-ro Jorge Sato, Prezidanto de la Argentina Esperanto-Ligo. La Baza Dokumentoj estis eldonita en nacia lingvo en bela formo, ampleksigita per eldiroj de grandaj homoj, informoj pri la lingvo kaj movado, la Rezolucio de UNESKO kaj kelkaj ilustraĵoj.

En la lando estis faritaj 22 publikaj paroladoj pri Zamenhof kaj Esperanto, okaze de la centjara datreveno. Plue, laŭ decido de la Edukministerio de la provinco Santa Fé, la 15-an de decembro en la elementaj lernejoj estis dediĉita unu leciono al la Internacia Lingvo kaj ĝia aŭtoro kaj tio okazos estonte ĉiujare.

Estis organizita sukcesa konkurso de afiŝoj en kunligo kun la Zamenhof-Jaro.

Aŭstralio

La landa asocio nomis kiel membron de la I.O.K. S-ron Ralph Harry. En tiu kvalito, speciale komisiite, S-ro Harry laŭplane organizis kaj dum la tuta jaro firme gvidis la agadon, daŭre atentante la sugestojn kaj direktivojn de la centraj organoj de la Movado. Krom Prof. Sir Mark Oliphant, laŭ lia invito akceptis Patronecon ankaŭ la Ministro pri Eksterlandaj Aferoj, S-ro R. G. Casey. Li havis personan kaj skriban kontaktojn kun la nacia Unesko-Komisiono pri la honorigo de Zamenhof flanke de Unesko kaj sendis al ĉiuj membroj de la Komisiono informan materialon, i.a. la anglalingvan eldonon de "Vivo de Zamenhof". La menciita verketo, cetere, estis sendita al 72 eminentuloj kaj bibliotekoj en Aŭstralio.

Plue, bela nacilingva eldono de la nacia Esperanto-organo en kiu aperis artikoloj de deko da elstaraj aŭstraliaj esperantistoj, estis dum la tuta jaro uzata kiel informa materialo, post prelegoj, por ĵurnalistoj ktp. Por la sama celo estis uzata ankaŭ anglalingva eldono de la Baza Dokumentoj, ambaŭ eldonaĵoj en po 5000 ekz. Plue estis utiligita la artikolo de Prof. Waringhien. Okazis 4 radio-prelegoj (en Sydney, Melbourne, Perth, Mackay) kaj 20 prelegoj en neesperantistaj medioj (rotariaj, kulturaj, junulaj k.a. kluboj) i.a. en Sydney, Melbourne, Brisbane,

Canberra, Malvern. Aperis 30 nacilingvaj artikoloj, grandparte en gravaj gazetoj kaj revuoj. Rimarkinda estis tulpaga artikolo en pola gazeto aperanta en Aŭstralio. Okazis en lernejoj traktaĵkonkurso en du grupoj, pri Zamenhof kaj pri la bezono de internacia lingvo, kio havis sukceson precipe en Hobart. En la sama urbo la lernejaj instancoj decidis meti Esperanton en la regulan programon de la Kvakera Lernejo.

Altnivela publika solenaĵo kun koncerto kaj festparolado de S-ro Harry okazis la 15-an de decembro en Melbourne. En Hobart la festo okazis en la kadro de la Tutaŭstralia Kongreso. Ankaŭ en aliaj urboj Zamenhof-festoj estis aranĝitaj. La Aŭstralia Esperanto-Asocio starigis jubilean fonduson en formo de Esperanto-Domo kun biblioteko kaj legejo. En la jarfino kolektita jam estis sumo de £ 700.--.

Rezulte de la tutjara agado la Movado en Aŭstralio staras sur pli firma bazo por povi entrepreni agadon al nova celo en la venonta jaro.

Aŭstrujo

Reprezentis la landon en I.P.K. la Prezidanto de la Parlamento D-ro Felix Hurdes, la Ĉefministro Inĝ. Julius Raab, la Ministro pri Eksterlandaj Aferoj Inĝ. D-ro h. c. Figl, la antaŭa Ministro D-ro Hans Frenzel, la Urbestro de Vieno Franz Jonas, kiel ankaŭ la skulptisto Prof. Gustinus Ambrosi kaj S-ino Lola Solar, Prezidantino de la Eŭropa Asocio de Kristan-Demokratiaj Virinoj.

Prof. Hugo Sirk kaj Kort. Konsilisto Hugo Steiner estis por Aŭstrujo nomitaj en I.O.K.

Granda tritaga jubilea festo okazis de la 3-a ĝis la 5-a de oktobro en Graz. Dum Internacia Esperanto-Renkonto kun 220 ĉeestantoj el 5 landoj en la konstruaĵo de la Laborista Ĉambro, apude al la Esperanto-Placo, evoluis kultura kaj arta programo sub prezido de S-ro Karl Friedl. Festparoladon faris S-ro Hans Bauer. Oficiala akcepto okazis ĉe la urbestro Prof. D-ro Eduard Speck.

En Klagenfurt, Karintio, okazis je la 12-a de decembro granda digna Zamenhof-festo en la luksa Koncert-Domo, kun bela programo de muziko kaj deklamado. Festparoladon faris S-ro Leonhard Schmid. Tri raportoj kaj unu artikolo aperis en la ĉefaj lokaj gazetoj. Plue instruista gazeto publikigis artikolon kaj Radio-Klagenfurt aŭdigis intervjuon kun S-ro Schmid je 15/12-'59. Wiener-Neustadt inaŭguris en sia Esperanto-Parko memortabulon pri Zamenhof je 18/5 en ĉeesto de 150 personoj de 17 nacioj. Malkovris la tabulon la dua urbestro, S-ro Franz Brand. Ĉiuj lokaj gazetoj detale raportis. En Vieno laŭ iniciato de S-ro Hugo Steiner nova memortabulo estis fiksita sur hotelo, kie Zamenhof dufoje loĝis. Paroladis la urbestro S-ro Franz Jonas kaj la distriktestro S-ro Bartl. En Linz la urba magistrato decidis ke nove konstruata strato ricevos la nomon de Zamenhof.

La eldonaĵo "Esperanto-Letero el Karintio" aperis kun bone prizorgita jubilea numero, en kiu estis utiligita ankaŭ materialo disponigita de U.E.A.

Belgujo

El Belgujo eniris la I.P.K. S-ro Camille Huysmans, prezidanto de la Ĉambro de Deputitoj kaj S-ro Gaston Eyskens, ĉefministro, dum laboris en I.O.K. S-ro M. Jaumotte kaj Paroĥestro A. Beckers. Flandra Ligo Esperantista eldonis la Bazan Dokumenton en nacia lingvo, kiu estis vaste utiligata. "Flandra Esperantisto" aperis kun speciala nacilingva numero. En katolika nacilingva revuo aperis dum monatoj polemiko pri Esperanto.

Je 4/11 okazis speciala kunveno de la universitata grupo, en kiu prelegis P. Beckers. Zamenhof-Festoj estis aranĝitaj je la 2, 3 kaj 4-a de decembro en Bruĝo, Antverpeno kaj Bruselo, en kiuj faris paroladon Prof. D-ro Lapenna el Londono. Multaj lokaj gazetoj raportis. En Charleroi okazis dum du semajnoj en novembro grava ekspozicio, kiu kaŭzis grandan interesiĝon ĉe la publiko.

Brazilo

La prezidanto de la Brazila Respubliko, D-ro Juscelino Kubitschek de Oliveira akceptis esti membro de la I.P.K., en kiu Komitato li estis la sola regnestro.

Krome, inter la Patronoj estis la Ministroj D-ro Francisco Negrão de Lima kaj Prof. D-ro Clovis Salgado, la eks-Ministroj D-ro José Carlos de Macedo Soares kaj Prof. D-ro Mauricio de Medeiros, la Urbestro de São Paulo D-ro Ademar Pereira de Barros, la Ĉefepiskopo de Rio de Janeiro Kardinalo Don Jayme de Barros Câmara, la Rektoro de la Brazila Universitato Prof. D-ro Pedro Calmon, kiel ankaŭ Prof. D-ro Milton Campos, D-ro Alexandre José Barbosa Lima Sobrinho, Fernando Ferrari, Gen. Francisco Jaguaribe Gomes de Matos, Prof. D-ro Octávio Mangabeira kaj D-ro Herbert Moses, ĉiuj elstaraj reprezentantoj de la publika kaj kultura vivo brazila.

Prof. D-ro C. Domingues estis nomita en la I.O.K. kaj estis unu el ĝiaj vic-prezidantoj. Kun lia helpo Brazila Esperanto-Ligo realigis ampleksan programon. Lukse presita invitilo al la aranĝoj menciis 9 diversajn okazaĵojn en la lasta kvaronjaro de 1959. La Baza Dokumentoj estis en portugala lingvo eldonita en 2000 ekz. Speciala numero de "Brazila Esperantisto" estis eldonita. Ĝia ĉefa artikolo estis radio-prelego de la Ministro pri Edukado kaj Kulturo, farita je 15/12-'59 kaj elsendita de ĉiuj radiostacioj en la lando. Estis eldonita en 5000 ekz. portugallingva traduko de biografio "Zamenhof-Iniciatinto de Esperanto", el hispana originalo de A. Lopez Luna. Same estis eldonita nacilingve "70 Jaroj de Esperanto", dokumento de C.E.D., verkita de D-ro Lapenna. Aperis ĉ. 1500 gazetartikoloj en ĉiuj gravaj lokaj kaj landaj gazetoj. Okazis ĉ. 1700 radio-elsendoj en nacia lingvo kaj 100 en Esperanto. Kelkaj stacioj elsendis teatraĵojn "La Vivo de Zamenhof", ludata de famaj artistoj.

Grava evento estis la Brazila Esperanto-Kongreso en Salvador. Solenaĵoj, paroladoj de universitata rektoro kaj ĵurnala direktoro, bankedo, ekspozicio, teatraĵo de fama poeto; ĉ. 2000 ĉeestintoj. En Rio de Janeiro okazis 10 artfestoj kun entute ĉ. 5000 ĉeestantoj, i.a. koncerto, prelegoj, inaŭguro de Biblioteko "Zamenhof", folkloraj prezentadoj ktp. En esperantista kadro okazis en la tuta lando 15 solenaĵoj kun entute ĉ. 1800 personoj. En Maceio okazis ekspozicio en ĉefa librejo.

La Nacia Unesko-Komisiono proponis enmeti Zamenhof en la kalendaron de "Grandaj Homoj". Deputito W. Pires honorigis Zamenhof per parolado en la Stata Parlamento de Minas Gerais. En la Kongreso de Komunumoj unuanime estis akceptita propono ke la komunumoj dediĉu straton al Zamenhof aŭ Esperanto. Dum la Zamenhof-Jaro stratoj estis inaŭguritaj en la urboj Nilopolis, Soledade, Sorocaba kaj Campinas. Antaŭe jam estis 24 stratoj nomitaj laŭ Zamenhof aŭ Esperanto en Brazilo. La urbestro de Rio de Janeiro konstruigis monumenton al Zamenhof sur placo en la centro, nomota Esperanto-placo. Inaŭguro baldaŭ okazos.

Jubilea Zamenhof-poŝtmarko estis eldonita en valoro de 6.50 kruz. Plue la P.T.T.-departemento Rio de Janeiro uzis specialan memorigan poŝtstampon.

Ĉiuj materialoj disponigitaj de U.E.A. kaj de C.E.D. estis larĝe utiligitaj dum la jaro, precipe ankaŭ la serio de artikoloj de elstaraj esperantistoj. En Volta Redonda oni aparte eldonis la artikolon de Prof. Canuto. La tutjara agado multe influis la ĝeneralan pozicion de Esperanto en la lando.

Britujo

Reprezentis Britujon en la Internacia Patrona Komitato la fama nobelpremiito por paco, Lordo Boyd-Orr kaj Lordo Pakenham, estinta transportministro. En I.O.K. funkciis Prof. D-ro W. E. Collinson (vic-prezidanto), S-ro Norman R. Smith B.Sc. (help-sekretario), S-ro H. W. Holmes O.B.E. kaj S-ro Maurice Lewin.

Pluraj centoj da artikoloj aperis dum la jaro en la brita gazetararo, kelkaj el ili en la plej elstaraj gazetoj. Okazis tri prelegoj en radio. En la Parlamentejo je 22/7-'59 Lordo Dowding varme pledis por komuna lingvo en U.N. kaj rekomendis kiel tian Esperanton.

Speciala solenaĵo okazis en la kadro de la nacia kongreso. Plue, ĉ. 50 publikaj aranĝoj okazis tra la lando. En Londono okazis publika diskutado pri Esperanto. En ĉiuj 64 federacioj okazis celebraĵoj en esperantista medio.

La Junularo Esperantista Brita organizis specialan semajnfinojn en decembro. En 10 lokoj ekspozicioj estis aranĝitaj (en Manchester kun 3000 vizitantoj), dum en tri lokoj artaj florbedoj beligis publikajn ĝardenojn. En Bournemouth en bela parko estis inaŭgurita de la urbestro benko kun enĉizita dediĉo. La materialo de U.E.A. kaj de C.E.D. estis uzata laŭ la eblecoj.

Bulgarujo

La kulturala kaj publika vivo de Bulgarujo reprezentis en la I.P.K. la Vicministro pri Instruado kaj Kulturo Marin Geškov, kiel ankaŭ la Akademianoj kaj verkistoj Prof. Petar Dinekov, Vladimir Georgiev, Georgi Karaslavov, Prof. Aladár Mód, Georgi Naĝakov, Prof. Belco Nikolov. S-ro Violin Oljanov estis membro de la I.O.K. Speciala nomita Zamenhof-Komitato organizis la celebraĵojn en la lando.

Aparta Zamenhof-numero de la nacia Esp. gazeto estis eldonita en 11.000 ekz. Loka grupo Kombinumo eldonis alian en 800 ekz. Reproduktaĵo de pentrita portreto de Zamenhof estis eldonita en 5000 ekz. Okazis 96 radio-elsendoj, 54 ekspozicioj en vitrinoj kaj montrofenestroj kaj 3 grandaj ekspozicioj kun entute ĉ. 3000 vizitantoj. Aperis 91 artikoloj kaj informoj, el kiuj proks. la duono en ĉiuj grandaj ĉefurbaj ĵurnaloj.

En Sofia okazis kune kun neesperantistaj organizaĵoj granda solenaĵo, en kiu faris paroladon la sekretario de la bulgaraj sindikatoj. Ĉeestis 600 personoj. Krome okazis en la ĉefurbo 3 aliaj Zamenhof-kunveno. Entute okazis en la lando 63 Zamenhof-kunvenoj en esp. kaj neesperantistaj medioj, kun entute preskaŭ 9000 vizitantoj. Ĉie la programo enhavis festparoladon kaj belartajn prezentadojn. Elstaris la aranĝo en Sevliev kun 1000 ĉeestantoj.

Bulgarujo eldonis memorigan poŝtmarkon en 100.000 pecoj. Dum la jaro stratoj, placoj aŭ aliaj lokoj ricevis la nomon de Zamenhof aŭ Esperanto en Jambol, Kazanlâk, Kubrat, Rozino, Sevliev, Sofia.

Cejlono

Por Cejlono akceptis membrecon en la I.P.K. la Ministroj Jayaweera Kuruppu kaj W. Dahanayaka, kiel ankaŭ Prof. D-ro G. P. Malalasekera, Ambasadoro kaj S. F. de Silva, Direktoro de Edukado. En la I.O.K. estis nomita Cejlona Sanghana Njanasatta Thero. Grava Cejlona gazeto aperigis la artikolon de Prof. Privat. Aliaj grandaj artikoloj aperis en 10 revuoj de Cejlono, Hindujo, Birmo, Siamo kaj Malajo.

Je 15.12.'59, anoncita per dulingve presitaj invitiloj, okazis granda solenaĵo al ĝenerala publiko en angla kaj sinhala lingvoj de C. Njanasatta Thero, larĝe raportita. Por la artikoloj estis utiligitaj la materialoj de U.E.A. kaj de C.E.D.

Ĉeĥoslovakio

En I.O.K. funkciis D-ro Jaromir Jermáf. Okazis tutlanda solena kunsido kaj 56 lokaj Zamenhof-aranĝoj tra la lando, inter kiuj elstaris koncertoj en Brno kaj Znojmo. Du gravaj radio-paroladoj de po 25 min. okazis je la 14-a kaj 15-a de decembro. La Baza Dokumentoj pri la Zamenhof-Jaro estis sendita al ĉiuj gravaj ĵurnaloj. Krome, aperis 10 artikoloj en naciaj gazetoj pri la centjara datreveno.

En la banloko Lázně Bělohrad estis inaŭgurita Zamenhof-aleo en ĉeesto de la urbestro.

Ĉilio

Envenis malmultaj informoj, sed ĉiukaze aperis kelkaj artikoloj en gazetoj.

Ĉinujo

En I.O.K. funkciis S-ro S. Hujucz. Okaze de la centjara datreveno aperis 2 artikoloj, unu en "Popola Ĵurnalo" kaj unu en "La Lumo", ambaŭ apartenantaj al la plej grandaj ĵurnaloj de Ĉinujo.

Je la 13-a de decembro okazis en Pekino granda memor-kunveno organizita de Ĉina Esp. Ligo kaj la Asocio por amikeco inter Ĉinujo kaj Pollando. Parolis reprezentanto

de la pola ambasadejo kaj profesoro de la Pekina universitato, dum ĉeestis ankaŭ la pola kultura ataseo.

En la Zamenhof-Jaro la Cina Esp. Ligo ekpreparis eldonon de Cina Antologio, baldaŭ aperonta. Plue, ĝi eldonis novan vortaron Esperanto-Cinan, 333-paĝan en 5000 ekzempleroj.

Danlando

El Danlando eniris la I.P.K. la ministro de Enlandaj Aferoj Søren Olesen, la ministro de Edukado Jørgen Jørgensen kaj D-ro Anton F. Bruun, direktoro de la Galathea-ekspedicio. En I.O.K. funkciis Prof. P. Neergaard.

La Baza Dokumento aperis en dana lingvo en 250 ekzempleroj. Aperis ĉ. 100 artikoloj kaj same multaj mallongaj informoj, i.a. en la grandaj gazetoj *Berlingske Tidende*, *Politiken*, *Dagens Nyheder*, *Berlingske Aftenavis* ktp.

Je la 14-a de decembro okazis duonhora diskuto en radio inter universitata profesoro kaj estrarano de Centra Dana Esperantista Ligo. Krome okazis du mallongaj mencioj kaj 25-minuta elsendo pri la Zamenhof-festo en Kopenhago. Tiu festo estis elstara publika aranĝo en luksa ejo, kiun ĉeestis du ministroj, du ambasadoroj, du parlamentanoj, multaj reprezentantoj de ambasadorejoj kaj aliaj aŭtoritatuloj, entute 200 personoj. Ĉefaj parolantoj estis la ĝenerala sekretario de U.E.A. kaj la prezidantoj de la dana kaj sveda landaj asocioj. Altnivela kultura programo estis prezentita. Sekvis bankedo kaj balo. Ĉiuj gazetoj raportis.

En la Pentekosta landa kongreso en Fåborg prelegis Ing. Ludoviko Zamenhof, la nepo de la aŭtoro de Esperanto.

En la biblioteko de Silkeborg okazis unusemajna ekspozicio.

Etiopio

Kvankam apenaŭ estas movado en tiu lando, aperis du gazetartikoloj pri Zamenhof.

Finnlando

Ĉefaj plej elstaraj aŭtoritatuloj el la politika, scienca kaj kultura vivo, inter kiuj ambasadoro, akademianoj, nobelpremiito ktp. reprezentis Finnlandon en la I.P.K., nome Prof. Väino Aaltonen, Prof. Martti Hela, Ing. Heikki Herlin, S-ino Tyyna Leivo-Larsson, R. H. Oittinen, Prof. Aarni Penttilä, Prof. Paavo Ravila, F. E. Sillanpää, Prof. Kalle Väisälä, Prof. Yrjö Väisälä.

La Baza Dokumento aperis en 5000 ekzempleroj kaj estis dissendita al aŭtoritatuloj, altaj oficistoj, universitataj profesoroj ktp. Aperis 240 artikoloj, pluraj en la plej grandaj ĵurnaloj. Deklaracio de 12 finnaj eminentuloj, inter kiuj ĉiuj finnaj membroj de I.P.K., aperis en 30 gazetoj.

Publikaj Zamenhof-festoj okazis en Turku, Tampere kaj Helsinko. Ilin ĉeestis aŭtoritatuloj pri instruado kaj pluraj membroj de I.P.K.; prelegis Prof. Bj. Collinder el Uppsala kaj Prof. Paavo Ravila el Helsinko. Okazis tri radio-elsendoj de Stacio-Turku. Ekspozicioj estis aranĝitaj en Tampere kaj Helsinko. Koncertoj de miksitaj Esperanto-floro okazis en Tampere, Turku kaj Kokemäki. Internaj festoj okazis en Helsinko kaj 12-15 aliaj kluboj. Prelegvojaĝoj estis aranĝitaj por S-roj Itoo (Japanujo), Sekelj (Jugoslavio) kaj Setälä (Finnlando), kiu lasta, kiel membro de I.O.K. havis grandan parton en la organizado de la celebradoj.

Sur instrua kampo estis granda kaj fruktodona aktiveco. Nova lernolibro "Privilegia Vojo al Lingvoscio" estis eldonita kaj 1000 ekz. estis rapide venditaj. Tra la lando okazis 25-30 novaj kursoj. Nova studplano en la mezlernejo en Somero inkluzivis Esperanton. Al tri kandidatoj por la abiturienta ekzameno estis permesite ekzameniĝi en Esperanto anstataŭ en Latino. Entute la agado dum la Zamenhof-Jaro tre forte influis la interesigon pri Esperanto en la lando.

Franco

Gravegaj personecoj kiel la iama respublika Prezidanto Vincent Auriol kaj la antaŭa Ĉefministro Guy

Mollet akceptis patronecon, kiel ankaŭ la akademianoj Prof. R. M. Fréchet, Maurice Génévoix, la akademiana rektoro Prof. Emile Delage kaj la verkisto Jules Romains. En I.O.K. funkciis S-ro Llech-Walter kaj Gen. L. Bastien.

La Baza Dokumento aperis en la franca lingvo kaj estis sendita al ĉiuj eminentuloj tra la mondo. Pri Zamenhof kaj Esperanto aperis 21 artikoloj en gazetoj de Marseille. En Dijon, Perpignan kaj Marseille okazis solenaĵoj kaj publikaj festoj kiujn ĉeestis multaj aŭtoritatuloj. Aparta publika prelego okazis en Marseille, ilustrita per diskoj kaj poemoj. Komuna aranĝo estis farita kun folkloraj asocioj. Trisemajna ekspozicio kun ĉiusemajnaj franc-lingvaj prelegoj de lokaj personecoj el instruaj medioj okazis en Marseille. Zamenhof-Strato estis inaŭgurita en Bourg-de-Peage.

Radio Marseille-Provence elsendis duonhoran teatraĵon "La vivo de D-ro Zamenhof" verkitan de F. Clery, prezentitan de la teatra grupo de tiu stacio. Ankaŭ en aliaj partoj de la lando okazis manifestacioj. La materialo disponigita de U.E.A. estis multe uzata.

Germanujo

La ministroj Ernst Lemmer kaj D-ro Ing. Hans Christoph Seeborn kiel ankaŭ S-roj Erich Ollenhauer, Martin Niemöller kaj ĉefurbestro Franz Stein reprezentis la publikan vivon de Germanujo en la I.P.K. En I.O.K. estis nomita D-ro W. Herrmann.

La landa asocio publikigis kaj distribuis la Bazan Dokumenton en nacia lingvo en 12.000 ekz. inter parlamentanoj kaj kulturaj, sciencaj kaj instruaj aŭtoritatuloj. Aperis ĉ. 500 gazetartikoloj. Elstara aranĝo okazis pentekoste en Essen dum la landa kongreso. Prelegis Prof. Waringhien. Publikaj manifestacioj okazis en 20 aliaj lokoj, inter kiuj elstaris tiuj de München kaj Hamburg en kiuj faris festparoladon la estraranoj de U.E.A., resp. D-ro Herrmann kaj Prof. Lapenna. La lokaj gazetoj favore raportis. Okazis 5 radio-prelegoj kaj 2 intervjuoj. Pri novaj stratoj kun nomo Zamenhof aŭ Esperanto estis decidite en Nürnberg, Troisdorf, Rüsselheim kaj Stockum. Unusemajna ekspozicio estis aranĝita en Berlin-Neukölln. La materialoj disponigitaj de U.E.A. estis multe uzataj.

Gvatemalo

Reprezentis Gvatemalon en I.P.K. du ministroj, nome Kolonelo Marco Aurelio Mérida kaj Lic. Jesús Unda Murillo, krome universitatoj D-ro Carlos Martínez Durán, Lic. José Mata Gavidia, Unesko-representanto Adolfo Molina Orantes kaj la verkisto Rafael Arevalo Martínez. Estis nomita en I.O.K. Ing. Hektor Sanchez-Latour. Pri la manifestacioj aperis minimume 7 artikoloj. Pliaj detaloj mankas.

Hindujo

Elstara publika manifestacio okazis en Bombaj, kie precipe aktivis la membro de I.O.K., D-ro R. Hegde. Funkciis krome en I.O.K. Lekt. L. Sinha. Prezidis festaranĝon la rektoro de la Universitato, S-ro Parikh, kiu tre favore esprimis sin pri la Internacia Lingvo. Dekminutan radio-paroladon pri Zamenhof kaj Esperanto iniciatis la stacio mem. Unusemajna ekspozicio en la sama loko allogis multajn vizitantojn, ĉar en la samaj tagoj aperis 12 grandaj artikoloj en 8 diversaj gazetoj. La aranĝoj multe influis la publikan opinion pri Esperanto en Bombaj. Nova kurso estis malfermita. En New Delhi okazis du festaranĝoj organizitaj kun la helpo de S-ino Haudebine kaj S-ro Sekelj, la komisiito por A.P.O., kiu lasta alvenis en la lando mallonge antaŭ la festoj. Ankaŭ tie nova kurso estis malfermita. Poste S-ro Sekelj vojaĝis al Allahabad kaj Kalkatta kaj ankaŭ tie li sukcesis vekti intereson kaj starigi kursojn. Entute, dum la Zamenhof-Jaro, dank' al la A.P.O.-agado la movado en Hindujo multe stabiligis. Eminentan gravecon havas la fakto, ke post renkontigo kun la aŭstralia esperantisto S-ro Matasin, ellernis la lingvon la fama gvidanto Vinoba Bhave per speciale dummarŝada instruado de S-ro Sekelj.

Hispanujo

Akceptis patronecon Prof. Ramón Menéndez Pidal,

Prezidanto de la hispana Akademio de la Lingvo. Estis grandaj aktivecoj tra la lando. En Sabadell aperis la artikolo de Prof. Privat en nacia lingvo. Aperis tie ankaŭ glumarkoj, poŝtkartoj kaj Zamenhof-busto. Aperis 155 artikoloj kaj okazis 45 radio-elsendoj, inter kiuj speciale menciinda estas 30-minuta el La Laguna. Okazis 42 publikaj solenaĵoj, inter kiuj elstaris tiuj en Zaragoza, Valencia, Sabadell, La Laguna kaj Moyá. Aŭtoritatuloj el lernejoj kaj kulturaj medioj ĉie montris interesigon. Okazis plue 15 internaj memorigoj. Eksterlandaj prelegantoj estis F-ino Joŝiko Kajino (Japanujo), S-ino J. Vincent (Francujo), H. de Caspary (Norvegujo). Inter aliaj festparolantoj estis gravaj enlandaj funkciuloj de la Movado, eminentaj esperantistoj kaj membroj de I.O.K. kiel D-ro R. Herrero, D-ro S. Izquierdo, D-ro M. Sola, S-ro D. Dalmau, Adv. R. Gaston k.a.

Zamenhof-stratoj estis inaŭguritaj aŭ estis pri ili decidite en Cheste, Fuentes de Ebro, Moyá, Sabadell, Tarrasa, Valencia, Vilafranca del Panades. Originalan agadon oni entreprenis en Sabadell, kie oni disjetis aviadile 10.000 kolorajn flugfoliojn anoncantajn la novajn kursojn. La aviadilon disponigis la urbestro. Entute la agado en tiu ĉi loko estis aparte energia kaj multflanka.

Hungarujo

Reprezentis la landon en I.P.K. la ministroj D-ro Ferenc Nezvál kaj István Kossa, la vic-prezidantino de la Parlamento Istvánné Vass, la prezidanto de la Akademio Prof. D-ro István Rusznyák kaj la akademiano Aladár Mód, kiel ankaŭ la sciencistoj kaj verkistoj Prof. D-ro Gyula Ortutay, Arpád Szakasits kaj József Darvas. En I.O.K. funkciis S-ro Lajos Marton. La celebradoj kulminis en Zamenhof-festo en la urbodomo en Budapeŝt, sub prezido de la fama Esperanto-verkisto Julio Baghy. Fari la festparoladon S. Harmati, sekretario de la Popolfronto, en ĉeesto de 500 personoj. En Miskolc okazis solena senvualigo de memortabulo sur grava placo, kiu antaŭ du jaroj, okaze de la 70-jara jubileo de la Internacia Lingvo, ricevis la nomon "Esperanto-Placo". En la sama loko la Fremdultrafrika Oficejo reeldonis prospekton kun mapo pri la hungarlandaj Esperanto-organizaĵoj, dum ĝia radio-stacio komencis en oktobro regulajn ĉiumonatajn elsendojn sub titolo "Esperanto-Heroldo". La 15-an de decembro la hungara radio elsendis specialan paroladon. Fari prelegvojaĝon tra la lando la konata verkistino Marjorie Boulton (Britujo). Akceptis ŝin la ministro de Trafiko, István Kossa. En ses urboj specialaj vesperoj estis aranĝitaj. La gazetoj favore raportis. Novaj kursoj estis starigitaj, precipe en Miskolc.

Indonezio

Akceptis patronecon la Sekretario de la Indonezia Universitato, Prof. D-ro Sutarmanto. Gvidis la agadon precipe S-ino Ch. Sj. Datu Tumenggung, membro de I.O.K. La movado estas ankoraŭ juna, sed tamen sukcesis atingi kiel kulminan punkton en la celebradoj gravan konferencon kiun ĉeestis reprezentantoj de la aŭstralia, bulgara, ĉina, franca kaj pola ambasadorejoj, kiel ankaŭ delegitoj de la ministroj pri Eksterlandaj Aferoj kaj pri Instruado. Paroladojn faris S-ino Tumenggung, S-ro Pramudija kaj S-ro Yaziz. Krome okazis aranĝoj en Padang, Bandung kaj Jokjakarto. Aperis 6 grandaj artikoloj en la plej gravaj ĵurnaloj, inter kiuj *Pedoman*, *Sin Po* kaj *Abadi*. Okazis radioprelego en nacia lingvo. Aperis speciala nacilingva numero de la gazeto "Voĉo de Indonezio" en 1000 ekzempleroj, en kiu troviĝas i.a. la artikolo de Prof. Privat.

Islando

Aperis speciala Zamenhof-numero de "Voĉo de Islando".

Israelo

Granda festa aranĝo okazis la 15-an de decembro kun elstaraj parolantoj kaj riĉa kultura programo. Preskaŭ ĉiuj gazetoj aperigis artikolojn kaj en la radioprogramo "Voĉo de Israelo" (*Kol Israel*) plurfoje estis elsendoj favoraj al Esperanto. Nova sidejo de la landa asocio estis starigita kaj pluraj rondoj fonditaj. Dulingva koverto kun

la portreto de Zamenhof estis eldonita de la landa asocio. Entute la populareco de la lingvo multe kreskis en la lando. Pluraj novaj kursoj estis starigitaj. Cetere, en Israelo la Zamenhof-Jaro ne finiĝis en decembro '59, ĉar laŭ la hebrea datsistemo Zamenhof naskiĝis en 5620 kaj la jaro 5720 finiĝos nur en oktobro 1960. Pliaj aranĝoj estas ankoraŭ planataj.

Italujo

Akceptis patronecon la estinta Prezidanto de la itala registaro, Prof. Antonio Segni kaj la Ministro de Justico Prof. Guido Gonella. Granda aktiveco okazis tra la tuta lando en esperantistaj kaj neesperantistaj medioj, grandparte dank' al la personeco de la prezidanto de la landa asocio, samtempe prezidanto ankaŭ de U.E.A. kaj I.O.K., kiel ankaŭ dank' al la energia gvidanto de la itala Informa Fako S-ro R. Pennazio.

Speciala numero de la nacia Esp. gazeto estis eldonita en 3000 ekz. laŭ la teksto de la Baza Dokumenta. La presagentejo *Notiziario Internazionale* dediĉis sian decembran numeron al Zamenhof (2.000 ekz.). Aperis ĉ. 1180 artikoloj en la tutlanda gazetaro, el kiuj minimume 320 parolis speciale pri la Zamenhof-Jaro. Dum la jaro parolis pri Esperanto multaj radioelsendoj. El ili 15 detale pritraktis la Zamenhof-Jaron, same kiel unu televida elsendo. Radio-Roma krome plurfoje traktis la temon en Esperanto.

En la ŝtataj universitatoj de Torino, Parma kaj Bologna okazis prelegoj de Prof. Canuto kaj Kav. Bagnulo. Elegantaj invitiloj estis dissenditaj por tiuj eventoj. La Instrumministro petis telegrame memori Zamenhof en ĉiuj duagradaj lernejoj de la tuta lando. Sekve de tio okazis miloj da prelegoj en lernejoj. Rememorigoj okazis plue en la Popoluniversitatoj de Roma, Siena, Genova, Padova kaj Firenze, dum tiu de Torino publikigis artikolon de C.E.D. en itala kaj en Esperanto en sia organo. La lokaj societoj de la Mondfederalista movado en Milano, Torino, Bologna, Venezia, Roma, Reggio Calabria, Piacenza kaj Firenze okazigis manifestaciojn pri la centjara datreveno. Tiel okazis ankaŭ en organizaĵoj de laboristoj.

Publikaj prelegoj, artaj prezentadoj, bankedoj kaj baloj okazis en dekoj da italaj urboj. Same en pure esperantistaj medioj tra la lando. Prelegvojaĝon faris F-ino Joŝiko Kajino, kiu vizitis ĉ. 20 urbojn. Speciala solenaĵo okazis dum la nacia kongreso en Firenze.

Okazis multaj ekspozicioj, el kiuj la plej menciindaj estis en Firenze, Bologna, Udine kaj Varese. En 5 urboj oni donis la nomon de Zamenhof aŭ Esperanto al stratoj, nome en Roma, Alessandria, Ragusa, Mirandola, Reggio Emilia. La efiko de la agado kaj celebradoj estis tre forta. Komenciĝis novaj kursoj eĉ en lokoj kie antaŭe entute ne estis esperantistoj, ekz. en Asti, Carmignano Brenta, Feltre, Ascoli Piceno k.a. Larĝe estis utiligitaj la artikoloj kaj informoj disponigitaj de U.E.A. kaj C.E.D., la glumarkoj kaj fotokartoj. En multaj gazetoj, kun la artikoloj estis publikigita foto de Zamenhof. Entute la rezultoj de la agado larĝe preterpasis la antaŭvidojn.

Japanujo

Membroj de la I.P.K. estis Prof. D-ro Seiji Kaya, Rektoro de la Universitato de Tokio kaj la Nobelpremiito Prof. D-ro Hideki Yukawa.

La landa Esp. organo eldonis specialan nacilingvan numeron en 10.000 ekzempleroj. Aperis 82 artikoloj, i.a. en la grandaj ĵurnaloj *Asahi* kaj *Yomiuri* kun eldonkvantoj de resp. 4 kaj 3 milionoj da ekzempleroj. Okazis unu televida elsendo kaj 7 radioelsendoj en japana lingvo, inter kiuj intervjuo kun Prof. I. Shinmura, fama filologo kaj malnova esperantisto. Krome unu radioparolado de Prof. H. Yagi, membro de I.O.K., en germana kaj alia elsendo en la angla.

Elstara aranĝo estis granda bankedo kun neesperantistaj gastoj. Parolis Prof. Nishi, Rektoro de la Gunma Universitato kaj membro de I.O.K., D-ro T. Ichihara, Profesoro pri franca literaturo de la Tokio-Universitato kaj D-ro S. Azuma, Dekano de la Jura Fakultato de la Nihon-Universitato. Publikaj kunvenoj okazis en Kioto dum la nacia Kongreso, kie parolis Prof. Yukawa, membro de I.P.K. kaj, sub aŭspicioj de neesperantistaj societoj, en

Osaka kaj Tokio. En esperantista medio okazis, krom en la landa kongreso, solenaĵoj en 6 diversaj lokoj.

Migra Ekspozicio de Esperanto-libroj estis aranĝita en 10 lokoj kun entute 3000 vizitantoj. Okazis speciala honoro al veteranoj. Okaze de la nacia kongreso estis farita speciala poŝtstampo. La Baza Dokumentoj kaj aliaj materialoj de U.E.A. kaj C.E.D. estis multe uzataj.

Jugoslavio

En la I.P.K. prenis lokon Krste Crvenkovski, Membro de la Federacia Ekzekutiva Konsilantaro kaj Sekretario de la Konsilantaro por la Kulturo kaj Edukado. La celebradoj tra la lando estis grandskalaj kaj vekis multan intereson. Funkciis en I.O.K. S-ro Peter Zlatnar.

Aperis pri Zamenhof kaj Esperanto 440 artikoloj en la naciaj lingvoj serba, kroata, slovena, makedona, hungara, ĉeĥa kaj ŝiptara. Kiel kutime, Radio-Zagreb havis siajn ĉiusemajnajn Esperanto-elsendojn, sed krom tio, la stacioj Sarajevo, Zagreb, Ljubljana, Beograd, Novi Sad, Split kaj Rijeka faris entute 13 elsendojn pri Zamenhof kaj la datreveno en nacia lingvo, en kiuj parolis eminentaj enlandaj esperantistoj kiel Prof. D-roj Popović kaj Pancer, Akademiano Rotkvić, Prezidanto Zlatnar de J.E.F. k.a. Okazis 20 publikaj solenaĵoj inter kiuj elstaris bonege aranĝitaj festivaloj, dum aparte menciindaj estas operkoncerto en Novi Sad kun 400 ĉeestantoj kaj koncerto en Split, kiun vizitis 300 personoj. Krome okazis 70 lokaj solenaĵoj kun entute ĉ. 4000 ĉeestantoj. Inter ili brilis tiuj de Beograd, Zagreb, Ljubljana, Maribor, Zemun, Sarajevo, Kranj, Bjelovar, Slav. Brod, Ptuj ktp. Plue, en pluraj lokoj okazis nacilingvaj prelegoj en gimnazioj kaj aliaj lernejoj.

Okazis 8 imponaj ekspozicioj, precipe gravaj en Novi Sad, Vrac, Slav. Brod kaj Pula. Estis krome aranĝitaj pluraj malgrandaj ekspozicioj. Du gazetoj — en Novi Sad kaj Zagreb — aperigis Esperanto-kurson. La Slovenia Esp. Ligo aperigis honore al la Zamenhof-Jaro la verkon "Tempesto super Akonkagvo" de T. Sekelj. Kroata porinfana Krestomatio *Knjiga Radosti* dediĉis ĉefartikolon al Zamenhof. Entute la celebradoj multe influis la disvastigon de la lingvo en la tuta lando.

Kanado

Kanadon reprezentis en I.P.K. Camille E. Pouliot, Provinca Ministro, Marius Barbeau, Litt. F.R.S.C., Direktoro de Nacia Muzeo, Herbert A. Mowat, publicisto kaj Frank G. Hanson Redaktoro de *The Commonwealth*. En I.O.K. estis nomita S-ro David J. M. Jenkins. La Baza Dokumentoj estis eldonita en 900 ekzempleroj en la angla. Aperis tra la lando pluraj artikoloj pri la datreveno, sed la landa asocio ne havis precizan kontrolon pri ili. Ĉiukaze aperis artikolo en la gazeto *The Globe Magazine* kaj en *Canadian World Government News* aperis la artikolo de Prof. Privat. Krome aperis 8 artikoloj en kunligo kun la malfermo de la Esperanto-Kulturdomo. Rememorigo okazis en Montreal en la kadro de la unua Kanada Kongreso kaj en Toronto solenaĵo estis aranĝita kune kun la klubo de Oakville. Esperanto-strato estis nomita en Trois Rivières. La materialoj de U.E.A. kaj C.E.D. estis kiel eble plej bone uzataj, sed ĉar la landa asocio nur ĵus stariĝis kaj startis al laboro, ankoraŭ la agado estis modesta. Speciale agema estis la energia gvidanto de *Esperanto-Press*, S-ro R. Eichholz, kiel ankoraŭ S-ro Leif Heilberg.

Kongolando

Reprezentis la landon en I.P.K. la Guberniestro de la provinco Katanga Jean Paelinck, la Urbestro de Elisabethville Emile Delaruelle, la Universitata Rektoro Jean Hiernaux kaj la Rektoro de la Reĝa Ateneo Armand Van Roy. En I.O.K. funkciis S-ro Pierre Paulus.

La agado okazis ĉefe per gazetartikoloj, ĉar ne estis eble organizi celebradojn en kunvenoj. Okazis tamen po unu prelego en la *Union Rationaliste* kaj en *Club Lever*. Aperis minimume dek artikoloj en gravaj gazetoj, precipe en Stanleyville kaj Katanga, por kiuj estis utiligitaj i.a. la Baza Dokumentoj kaj la artikoloj kaj materialoj de C.E.D. *Le Stanleyvillois* publikigis grandan frontpaĝan artikolon, *Echo du Katanga* enpresigis la artikolon de

Françoise Niederhausen. La publikajoj certe influis la interesigon pri la lingvo en tiu ĉi lando, kie apenaŭ estis movado ĝis nun.

Koreo Norda

Je la 15-a de decembro okazis Zamenhof-Festo, kun pli ol 700 partoprenantoj. Ĉeestis la Vicĉefministro kaj la Prezidanto de la Korea Akademio de Sciencoj. Faris festparoladon la Financ-Ministro Song-Bong-ug. La radio raportis pri la okazaĵo.

Koreo Suda

La 5-a Korea Kongreso de Esperanto okazinta meze de novembro en Taegu, estis speciale dediĉita al Zamenhof. Belaj invitilo kaj grandformata programo kun bildo de Zamenhof estis presitaj. La celebroy okazis en la Chunggu Universitato en Taegu kaj en la Haein Templo, Hapchon.

Maroko

En I.O.K. funkciis S-ro Charles Thollet. La Baza Dokumentoj en franca lingvo estis disdonita al plej altaj eminentuloj kaj multaj gravaj personecoj en la lando. Aperis minimume 15 artikoloj en tagjurnaloj. Speciala celebrado estis aranĝita en oktobro. Okazis publika prelego en la salono de la *Syndicat du tourisme* en Kenitra, kun 120 partoprenantoj. Ĉeestis la urbestro kaj pluraj reprezentantoj de kulturaj kaj sciencaj medioj. Granda festo okazis la 15-an de decembro kun kultura kaj arta programo, paroladoj kaj balo. La dokumentoj de C.E.D. estis uzataj laŭ la eblecoj, dum ankoraŭ la seslingva flugfolio estis disdonita. Rezultoj de la agado estis bone rimarkeblaj i.a. laŭ la partopreno en tri novaj kursoj.

Meksikio

Troviĝis en I.P.K. la Prezidanto de la Lingva Akademio kaj verkisto D-ro Alfonso Reyes, la Direktoro de Nacia Altlernejo D-ro Jorge G. Quintana kaj la Direktorino de la Nacia Instituto de Geografio Mag. Rita Lopez De Llergo. En I.O.K. estis nomita Prof. D-ro Juan de Oyarzabal. En oko da artikoloj en la gazetaro oni raportis pri Zamenhof-memorigoj en Meksiko-urbo kaj Monterrey.

Mozambiko

Diversaj artikoloj pri la Zamenhof-Jaro aperis en la plej grava tagjurnalo "Noticias", i.a. artikolo el la Baza Dokumentoj. Okazis ekspozicio en Lourenço Marques, kiun aranĝis la solaj kvin esperantistoj troviĝantaj en la ĉefurbo. Malfermis la ekspozicion la Vicdirektoro de Liceo Salazar, D-ro Rosa Pinto en ĉeesto de reprezentanto de la urbestro.

Raportis krom la gazetoj ankoraŭ la radio. Dum la jaro ankoraŭ la informoj de I.G.S. estis publikigataj en Noticias. La gazetartikoloj kaj raportoj tiris la atenton al Esperanto, ĝis nun malmulte konata en la lando.

Nederlando

Reprezentis la landon en I.P.K. D-ro W. Drees, longjara ĉefministro, nun Honorministro. En I.O.K. funkciis Ing. J. R. G. Isbrucker (vicprezidanto) kaj S-ro H. A. de Hoog.

La Baza Dokumentoj en nederlanda lingvo estis presita en 5000 ekz. kaj sendita al parlamentanoj, universitataj profesoroj kaj aliaj aŭtoritatoj. La decembra numero de la landa organo aperis en nacia lingvo en 6000 ekzempleroj. En popolkleriga broŝurserio A.O. pri aktualaj temoj estis eldonita aparta numero 16-paĝa, kun fotoj, en 20.000 ekzempleroj. Verkis ĝin S-ro A. M. D. Korff. Aperis 221 artikoloj kaj komunikoj en gazetoj i.a. en la grandaj ĵurnaloj *Algemeen Handelsblad*, *Haarlems Dagblad*, *Het Vrije Volk*, *Het Parool*, *Vrij Nederland* k.a.

Dum demandludo en kvar televido-elsendoj Esperanto estis dum kvaronhoro la preferata temo de la mandato S-ro B. van der Wal. Okazis kvar radioparoladoj, inter kiuj de la Prezidanto de la Akademio. Dum dutaga studkonferenco en aprilo por neesperantistoj prelegis gravaj personecoj el kultura kaj scienca medioj kiel Prof. J. Prins kaj D-ro C. P. Gunning. Ĉeestis 200 personoj. En la sama monato en Rotterdam okazis publika aranĝo

dum kiu parolis (kun traduko) Prof. G. Canuto kaj Prof. I. Lapenna, kaj poresperantista vespero kun la tuta Estraro de U.E.A. En septembro dutaga Zamenhof-Kongreso kun 200 partoprenantoj aŭdis longan tre favoran paroladon de la membro de I.P.K. D-ro Drees kaj alian de F-ino C. M. Burger, Direktorino de la oficejo "Esperanto en la Instruado", kiun ĉeestis multaj reprezentantoj el instruistaj medioj. Dum honorigo en la Beneluksa Kongreso en Haarlem faris festparoladon S-ro M. Jaumotte el Antwerpen. En la suda limregiono apud Belgujo kaj Germanujo okazis tri Trilandaj Renkontiĝoj kun diversaj solenaĵoj. Dekoj da internaj memorigaj aranĝoj okazis en decembro, inter kiuj elstaris Hago kaj Arnhem kun paroladoj de Prof. Lapenna.

La menciitaj televidaj elsendoj kaŭzis gazetkurson en Hago kun 1500 partoprenantoj. Laŭ ĝia ekzemplo sekvis gazetkursoj en kvar aliaj lokoj kun entute ĉ. 2200 lernantoj. La Universala Ekspozicio de C.E.D. estis elmontrita en salono de la Parlamentejo, en kunligo kun peticio al la Registaro pri ebligado de Esperanto-instruado. Montrofenestraj ekspozicioj okazis kvar en Rotterdam kaj unu en Hago. Pri novaj stratoj aŭ placoj estis decidite en Dordrecht, Hoogezaand, Leeuwarden, Krommenie, Vlissingen kaj Zwolle.

Norvegujo

En I.P.K. troviĝis du Ministroj S-ro Halvard Lange kaj Birger Bergersen, la estinta ĝenerala sekretario de U.N. Trygve Lie, la verkisto Thor Heyerdahl, Sigurd Hoel kaj D-ro Johan Falkberget, kiel ankaŭ la Prezidanto de la enlanda Mondfederalista Asocio S-ro Odd Nansen. Estis nomita en I.O.K. S-ro J. Selbekk.

La enhavo de la Baza Dokumento aperis nacilingva parte en informgazeto *Esperanto-Nytt* (10.000 ekz.) kaj parte en nacilingva numero de *Norvega Esperantisto*, eldonita en 800 ekzempleroj. En 140 gazetoj kaj revuoj aperis 576 komunikoj pri Esperanto kaj Zamenhof, inter kiuj 120 pli longaj artikoloj i.a. en la grandaj ĵurnaloj *Aftenposten*, *Arbeidersbladet*, *Morgenbladet*, *Bergens Arbeidersblad*. La tutlanda radio elsendis 15-minutan prelegon.

Estis eldonita en 2.000 ekz. la verko de Prof. Privat "Vivo de Zamenhof" en nacilingva traduko de Trygve Raimar.

Dum la jarkunveno de la landa asocio okazis solenaĵo dum kiu parolis Adv. Sakowicz el Pollando. La plej impona solenaĵo okazis en Oslo en la Universitata Aŭlo en ĉeesto de 700 personoj, inter kiuj multaj aŭtoritatoj. Salutparolis la Urbestro Rolf Stranger, la Prezidanto de la Vojaĝtrafika Asocio, la finna kaj jugoslavia ambasadoroj, kiel ankaŭ S-ro Eizoo Ito el Japanujo kaj la konata gvidanto de A.P.O., Tibor Sekelj. Pluraj norvegaj membroj de I.P.K. sendis salutojn. Altnivela arta programo estis prezentita. Pri Zamenhof parolis S-ro C. Stop-Bowitz. La festparoladon (kun traduko) faris S-ro Ivo Rotkvič el Zagreb. Antaŭe okazis granda gazetkonferenco. Pri la solenaĵo larĝe raportis ĉiuj ĵurnaloj de Oslo kaj multaj aliaj tra la lando.

Pluraj lokaj aranĝoj okazis tra la lando. Ekspozicio de Esperanto-literaturo estis aranĝita en la publika biblioteko de Bergen. Pluraj artikoloj el la materialoj de C.E.D. estis utiligitaj. La celebradoj sendube influis la publikan interesiĝon pri Esperanto.

Nov-Zelando

Akceptis patronecon la Ĉefministro Rt.Hon. Walter Nash, dum en la I.O.K. funkciis D-ro fil. C. J. Adcock. La Deklaracio de I.O.K. kaj artikolo de la Baza Dokumento estis disdonitaj en angla lingvo. Aperis 23 artikoloj kaj okazis 2 radioelsendoj. Speciala solenaĵo okazis dum la 25-a landa kongreso. Festparoladon faris D-ro Adcock. Krome parolis S-roj Watkin kaj Potts. Plue estis aranĝitaj en la lando tri aliaj publikaj kaj tri internaj memorigoj.

En Papatoetoe estis nomita Esperanto-strato. En 8 publikaj kaj universitataj bibliotekoj okazis ekspozicioj, dum ankaŭ en ĉiuj kluboj elmontradoj de libroj estis aranĝitaj. Sendube la memorigoj influis la diskonigon de la lingvo.

Pollando

Akceptis patronecon la Marŝalo de la Parlamento Czesław Wycech, la Ĉefministro Józef Cyrankiewicz, la Ministroj Prof. Stefan Żółkiewski, Władysław Bienkowski, Prof. Tadeusz Galinski kaj la Prezidanto de Varsovio Zygmunt Dworakowski, kiel ankaŭ Prof. D-ro Tadeusz Kotarbinski, Prezidanto de la Akademio de Sciencoj, Prof. Stanisław Turski, Rektoro de la Varsovia Universitato kaj Stanisław Kulczynski, Prezidanto de la Tutpola Pac-Komitato kaj de la Pola Demokrata Partio. En I.O.K. funkciis Ing. Edm. Fethke (vicprezidanto) kaj Ing. L. Zaleski-Zamenhof. En tiu ĉi lando, kie vivis, laboris kaj mortis Zamenhof, la celebradoj estis tre multnombraj kaj imponaj, precipe ankaŭ pro la jubilea Kongreso en Varsovio.

Aperis 554 publikaĵoj en gazetoj, el kiuj 124 pli longaj artikoloj, kun entute 121 ilustraĵoj, i.a. en *Trybuna Ludu*, *Trybuna Robotnicza*, *Głos Olsztyński*, *Wroglawski Tygodnik Katolików*, *Problemy*, *Zycie Warszawy* ktp. En radio kaj televido okazis 26 prelegoj en la pola kaj 10 en Esperanto. Estis atingitaj ĉiutagaj duonhoraj elsendoj en Esperanto ekde marto.

Grandaj publikaj solenaĵoj en la kadro de la Universala Kongreso okazis en Varsovio, kie oni enmurigis tabulon en la Zamenhof-strato kaj metis florkronojn sur la tombon de Zamenhof, post kio sekvis silenta preterpasado de la tuta kongresanaro. En Białystok oni metis la unuan ŝtonon por konstruota monumento. Tra la lando oni faris en decembro memorigajn aranĝojn en 34 lokoj. Elstaris tiu en Varsovio, en salono *Adam Mickiewicz* de la Universitato, sub prezido de I. Dratwer, prezidanto de la ĉefurba Komitato por omaĝi la centjaran datrevenon. Ĉeestis la vicministroj pri klerigado kaj kulturo. Krom paroladoj estis prezentita altnivela arta programo kun kunlaboro de pluraj operkantistoj. Laŭ peto de la Ĉefurba Komitato la kuratorejo pri lernejoj dissendis cirkuleron kun rekomendo ke la 15-an de decembro okazu paroladetoj pri Zamenhof en la Varsoviaj lernejoj. Plue ĝi atingis, ke je la sama dato en la ĉefa poŝtoŝtampoficejo funkciis speciala poŝtstampo kaj ke estu nomitaj strato Esperanto kaj lernejo Zamenhof en la proksimeco de la strato Zamenhof. La Varsovia Esperanto-Klubo aranĝis en novembro grandan koncerton "Rideto de aŭtuno" kun 600 ĉeestantoj. En Łódź la memoriga solenaĵo okazis en la Klubo de la Internacia Gazetaro, kies prezidanto malfermis la programon. Post la paroladoj sekvis operkantado kaj deklamado. Dum ĉiuj festadoj tra la lando estis prezentitaj altnivelaj artaj programoj.

Novaj stratoj estis nomitaj krom en Varsovio ankaŭ en Toruń, Radom, Słupsk, Siedlce kaj Góra Śląska.

La pola ŝtato eldonis du memorigajn poŝtmarkojn en po 5.000.000 kaj 500.000 ekzempleroj. Ŝtata navigacia entrepreno en Gdańsk nomis 12.600 to-ŝipon "Zamenhof" laŭ iniciato de S-ro E. Nawrowski; la ŝtataj fervojoj aldonis Esperanto-tekston al la veturplano; ŝtata filmfarejo entreprenis filmon pri Zamenhof. Estis eldonitaj dulingva libro de M. Ziółkowska "Doktoro Esperanto" (pola/esp.) en 8000 ekz., informlibro pri Pollando kaj tri turismaj prospektaj. La pola landa asocio eldonis Zamenhof-medalon en bronzo kaj arĝento. Kajerfabriko eldonis 60.000 lerneajn kajerojn kun bildo de Zamenhof, dum aperis ankaŭ ilustritaj poŝtkartoj kun Esperanto-teksto.

Pluraj artikoloj de C.E.D. aperis en nacia lingvo. Grandan efikon havis ĉiuj okazaĵoj. La nombro da kursanoj, precipe ankaŭ de korespondaj kursoj, multe kreskis.

Portugalujo

En la I.P.K. havis lokon la verkisto Ferreira de Castro. Dignaj celebradoj kun prelegoj kaj bankedo okazis en Coimbra kaj Lisboa. En ambaŭ urboj estis ekspozicio. La gazetaro vaste raportis. La grava ĵurnalo *Novidades* publikigis artikolon de D-ro Pestana. Membro de I.O.K. estis S-ro José Antunes.

Sovet-Unio

Reprezentis en I.P.K. la sciencan kaj kulturen vivon Sergej Obručev, Membro de la Akademio de U.S.S.R.,

Paŭlo Ariste, lingvisto, Membro de la Akademio de la Estona Respubliko, Prof. Gurgen Sevak, lingvisto, Membro de la Akademio de la Armena Respubliko, Janko Maur, verkisto, Membro de la Belorusa Verkista Unuiĝo. Aperis pli ol 40 artikoloj en diversaj gazetoj kaj revuoj, inter kiuj aparte gravaj estis artikolo de Siitam en "Lingvo kaj Literaturo", la organo de la Estona Scienca Akademio, kaj alia de Kirjušin en "Literaturo kaj Arto", la organo de la Belorusa Scienca Akademio. Okazis 6 radio-elsendoj, inter kiuj prelego de Prof. E. Bokarev, vic-prezidanto de I.O.K.

Elstara dutaga aranĝo okazis en la "Domo de Sciencistoj" en Leningrad. Enkondukis ĝin Akademiano S. Obručev kaj faris prelegojn G. N. Teterin, S. N. Podkaminer, S. S. Čaĥotin kaj Z. V. Šemenova. Krome alt-nivela arta programo estis prezentita. Eleganta invitilo kun programo estis presita. Grava estis ankaŭ la celebrado en Moskvo en la "Domo de instruistoj", en kies programo prelegis Vera Zlotnikova, Prof. Armand, Prof. Bokarev, S-ino Nikiforova kaj Škapa.

En minimume 30 aliaj urboj okazis celebradoj i.a. en Riga, Tallinn, Lvov, Kiev, Stalingrad, Krasnodar, Ivanovo, Jalta, Kutaisi. Ofte ĉeestis 200-300 personoj. Ekspozicioj estis aranĝitaj en Leningrad, Riga, Lvov, Mičurinsk kaj Kutaisi. En Kaunas strato ricevis la nomon de Zamenhof.

Sud-Afriko

Estis nomita en I.O.K. S-ro E. W. Woodruff. Pro cirkonstancoj la agado povis esti nur tre modesta. Trisemajna ekspozicio estis aranĝita en la vestibla salono de la Johanesburga Urba Biblioteko, kie ĉiutage pasas multaj personoj. Kursoj estis starigitaj en Kapurbo kaj Johanesburgo.

Svedujo

Reprezentis la landon en I.P.K. la Ministro pri Kulturaj kaj Edukaj Aferoj R. Edenman kaj la Konsilanto pri Edukaj Aferoj E. Norinder. En I.O.K. funkciis Prof. D-ro Bj. Collinder (vic-prezidanto) kaj S-ro Jan Strönne. Partoj de la enhavo de la Baza Dokumentoj estis diversloke publikigitaj, i.a. en la nacilingva informilo *Esperanto-Nytt* (Esp. novaĵoj), aperinta en 5000 ekzempleroj kaj sendita al ĉiuj aŭtoritatuloj. Aperis 35 artikoloj en nacia lingvo kaj je la 15-a de decembro radio-intervjuo kun S-ro E. Malmgren.

Dum la landa kongreso en Lidköping okazis celebrado kun prelego de S-ro Tiberio Morariu. Grandaj publikaj solenaĵoj okazis en Stockholmo kaj Malmö. En la unua prelegis Prof. Bj. Collinder, S-roj E. Dahl, E. Ito (Japanujo) kaj E. Malmgren en ĉeesto de 400 personoj. En la dua parolis Prof. P. Neergaard (Danlando) kaj S-ro J. Strönne. Sekvis supeo kaj balo kun 200 personoj. En aliaj lokoj okazis entute 14 publikaj aranĝoj kaj 8 internaj. En Lund okazis pluraj aranĝoj en Universitata medio. Ekspozicio, prelego kaj debato estis aranĝitaj por la internacia studenta kurso en la Domo de la Akademia Asocio. En kunligo kun la tago de U.N. granda ekspozicio de infandeseĝnaĵoj estis montrita en salonoj de la Universitato. Kvardek lernejoj klasoj vizitis ĝin. La gazetoj raportis. Plue estis aranĝitaj ekspozicioj en la urba biblioteko kaj en du gimnazioj de Malmö.

Aparte grava aranĝo estis la Sveda Somera Semajno en Frostavallen, kies temo estis "Okcidento-Oriento". Prelegis Prof. I. Lapenna, S-ro E. Ito (por Prof. N. Kawasaki), Doc. S. Pragano kaj Lic. T. Sekelj. Generale la celebradoj bone influis la movadon en la lando.

Svislando

Membroj de I.P.K. estis Enrico Celio, antaŭa Prezidanto de la Svisa Konfederacio kaj Prof. D-ro Pierre Bovet, Hon. Profesoro de la Universitato de Genevo, estinta Direktoro de la Internacia Oficejo pri Edukado, estinta Direktoro de la Instituto J. J. Rousseau. En I.O.K. funkciis Prof. D-ro E. Privat (vic-prezidanto) kaj S-ro H. Kürsteiner. La Baza Dokumentoj en germana lingvo estis dissendita en 450 ekzempleroj. Aperis ĉ. 400 artikoloj i.a. en la plej gravaj ĵurnaloj. Estis eldonita 30-paĝa broŝuro

Deine Zweite Sprache (Via dua lingvo) verkita de D-ro Baur. Ĝi aperis en pluraj miloj da ekzempleroj kaj estas destinita por la svisa junularo.

Krom la regulaj Esperanto-elsendoj okazis 8 radio-prelegoj en franca, germana, angla, retoromanĉa kaj en Esperanto. Speciala solenaĵo okazis dum la landa kongreso en Biel dum kiu parolis Prof. E. Privat kaj S-ro Lienhard. Krome okazis celebradoj en Basel, Zürich kaj Neuchâtel, dum en la lasta urbo okazis ankaŭ speciala kunveno de edukistoj en la gimnazio en kiu prelegis Prof. Privat kaj Prof. Bovet. Samtempe okazis ekspozicio pri "Esperanto en la lernejoj".

Faris prelegvojaĝon tra la lando F-ino Joŝiko Kafino (Japanujo). En Genevo oni fiksis marmoran tabulon sur la domon, kie loĝis D-ro Zamenhof en 1906. La dokumentoj disponigitaj de C.E.D. estis multe uzataj. Pro la celebradoj la interesiĝo pri la lingvo sendube kreskis.

Turkujo

Aperis 7 artikoloj pri Zamenhof en turkaj kaj du en armenlingvaj gazetoj, la pli multaj kun fotoj de la aŭtoro de Esperanto. Inter ili estis la artikolo de Prof. Privat. Grandparte prizorgis la publikigojn la membro de I.O.K. Hasan Kocaman, kiu uzis por ili la materialojn de C.E.D.

Urugvajo

Prezis lokon en I.P.K. la Ministro de Eksterlandaj Aferoj kaj Membro de la Plenum-Komitato de U.N.E.S.C.O. Prof. Oscar Secco Ellauri, dum plue reprezentis la kulturan kaj publikan vivon verkistoj kaj sciencistoj Prof. D-ro Carlos Sabat Ercaŝty, Prof. Clemente Estable, Prof. José Claudio Williman. En I.O.K. estis nomita Prof. M. Fernández-Menéndez. La dokumento eldonita en Argentino estis ankaŭ ĉi tie dissendita. Krome aperis nacilingva eldono de la landa organo en 500 ekzempleroj.

Aperis 20 gazetinformoj inter kiuj 11 grandaj artikoloj kun fotoj, precipe en la gravaj ĵurnaloj *El Plata*, *El Dia*, *La Tribuna Popular*, *Anales de Instrucción Primaria* ktp. Ili estis rezultoj de gazetkonferenco en Montevideo kaj de 3 intervjuoj. Okazis 4 radio- kaj du televidoelsendoj.

Granda celebrado okazis en la Paranimfo de la Universitato, dum kiu parolis Prof. Carlos Sabat Ercaŝty, Prof. Reina Reyes kaj Prof. M. Fernández Menéndez. Sekvis muzika programo. Apartan festkunvenon aranĝis la Junulara Rondo Zamenhof. La artikoloj kaj dokumentoj de C.E.D. estis multe utiligitaj.

Usono

Akceptis patronecon Prof. Mario Pei, fama lingvisto. En I.O.K. funkciis S-ro John L. Lewine (vicprezidanto). Pro la vasteco de la lando estas maleble ekscii la nombron da artikoloj. La Informservo sub gvidado de S-ro D. Brink sendis bone prizorgitajn informojn al 700 diversaj gazetoj. En pluraj ĵurnaloj aperis grandaj artikoloj, i.a. en *The New York Times*.

Impona solenaĵo okazis en *The Wilkie Memorial Building* en New York. Parolis D-ro Mario Pei, profesoro ĉe la Columbia Universitato, D-ro Stephan Zamenhof (nevo de D-ro L. L. Zamenhof) kaj S-ro Claude Piron, prezidanto de la Esperanto-Klubo ĉe Unuiĝintaj Nacioj. Alia memoriga festo estis aranĝita en Los Angeles. Faris la festparoladon S-ro Glenn kaj sekvis bankedo kun 120 partoprenantoj. Okazis pluraj aliaj memorigoj tra la lando.

La landa asocio E.L.N.A. eldonis allogan flugfolion en nacia lingvo "La mondo fariĝas pli kaj pli malgranda". Komerca entrepreno *Clifton Cafeteria* eldonis 4-paĝan reklaman flugfolion en 150.000 ekz. kun unupaĝa teksto dediĉita al Esperanto.

Vjetnamio

Okazis granda celebrado en Hanoi en ĉeesto de la kulturaj ataŝeoj pola, soveta, ĉina kaj bulgara. Faris paroladon la Ministro pri Kulturo S-ro Hoang-Minh-Giam. Ĉeestis 500 personoj. La Vjetnama Radio kaj pluraj ĵurnaloj raportis pri la solenaĵo.

Honore al la Zamenhof-Jaro estis eldonita speciala numero de "Vjetnamio Antaŭenmarŝas".

Ĉi tiu raportaro montras la universalecon de la celebradoj. En kvin kontinentoj, en ĉiuj popoltavoloj, oni aŭdis kaj legis pri la Internacia Lingvo Esperanto. Laŭ la ricevitaj informoj aperis ĉ. 7400 gazetartikoloj kaj mallongaj sciigoj en la tutmonda gazetararo, sed verŝajne la nombro estas multe pli alta. Parteto de tiuj publikajoj estas montrita sur la fotopaĝoj de tiu ĉi libro.

Intertempe, la ĉieaj honorigoj vekis la atenton

U.N.E.S.C.O oficialigis la centjaran datrevenon de la naskiĝo de Zamenhof

Londono, la 27-an de februaro. Sciigo de unuaranga graveco atingis la Generalan Sekretarion de U.E.A. nur kelkajn horojn antaŭ la finpresigo de la gazeto :

La Plenuma Komitato de U.N.E.S.C.O. decidis dum sia lasta kunsido, ke la centjara datreveno de la naskiĝo de Zamenhof estu oficiale celebrata en 1960. Konforme al tiu decido, la aganta Generala Direktoro de U.N.E.S.C.O., S-ro René Maheu, sendis al ĉiuj registaroj kaj al ĉiuj neregistraj organizaĵoj leteron CL/1406 de la 15-a de februaro 1960, kies ĉefa parto tekstas :

"MEMORIGO DE DATREVENOJ DE GRANDAJ PERSONEKOJ

Sinjoro,

Mi havas la honoron altiri vian atenton al la Decido akceptita de la Plenuma Komitato dum ĝia 55-a Sesio (55 EX-Decision 4.4) koncerne la memorigon de datrevenoj de grandaj personecoj en 1960.

U.N.E.S.C.O. honorigas la nomon de D-ro Zamenhof

La Dekaj Sesio de la Generala Konferenco de UNESKO akceptis rezolucion (5.15), per kiu ĝi invitis ĉiujn Ŝtatojn-Membrojn kaj la Naciajn UNESKO-Komisionojn fari al la Generala Direktoro proponojn pri "celebrado de datrevenoj de grandaj personecoj kaj eventoj sur la kampoj de edukado, scienco kaj kulturo, okazantaj en 1959-1960".

La unuaj proponoj rilatis al celebrado de A. P. Ĉeĥov, F. Chopin, Charles Darwin, Pierre Janet (franca psikologo), Henri Bergson (franca filozofo), Friedrich von Schiller, Alexander von Humboldt, Franz Josef Haydn kaj Salom Aleĥem (Dok. 54 EX/7 de la 10-a de aprilo 1959). Ĉiuj ĉi proponoj estis akceptitaj de la Plenuma Komitato dum ĝia Junia Sesio, 1959 (Dok. 54 EX/Decisions de la 22-a de junio 1959, p-to 4, 6).

Intertempe formiĝis kaj ekfunkciis la Internacia Organiza Komitato (IOK) kaj la Internacia Patrona Komitato (IPK) por celebrado de la 100-jara datreveno de la naskiĝo de D-ro L. L. Zamenhof. La ampleksa Baza Programo komencis realiĝi. La IOK kaj ĉiuj organoj de la Esperanto-Movado ekagis sisteme kaj laŭplane en la tuta mondo. La rezultoj de tiu impona kaj ĉiufanka laboro estas pli-malpli konataj. Kompreneble, unu el la multnombraj aktivecoj estis direktita al UNESKO. Ne nur la Sekretariato de UNESKO, sed ankaŭ la Naciaj UNESKO-Komisionoj kaj la aliaj UNESKO-instancoj estis atentigitaj pri la 100-jara datreveno de la naskiĝo de Zamenhof. Al ĉiuj estis liveritaj abundaj dokumentaj materialoj. Tute speciale, la membroj de la Plenuma Komitato ricevis la bazan dokumentaron pri la Zamenhof-Jaro kaj la plej gravajn studojn eldonitajn de CED.

Pliaj proponoj, faritaj al la Generala Direktoro, rilatis al 6 nomoj, inter kiuj la fama hispana pentristo Diego Velasquez, kiu mortis en 1660, kaj D-ro L. L. Zamenhof. La proponon pri Zamenhof faris Brazilo, Japanujo kaj

de multaj oficialaj instancoj, ankaŭ de la plej alta instanco por edukado, scienco kaj kulturo en la mondo: U.N.E.S.C.O. Ĝi decidis, ankaŭ mem celebri la centjaran datrevenon de la naskiĝo de D-ro Zamenhof. Ĉi tie sekvas la unua informo pri tiu gravega fakto, aperinta en la marta numero 1960 de la revuo "Esperanto" kaj la tiurilata artikolo de Prof. D-ro Ivo Lapenna en la aprila numero.

La nomoj selektitaj per la Decido de la Komitato estas: . . . D-ro Lazaro L. Zamenhof, polo, iniciatoro de Esperanto, naskita en 1859.

Konforme mi havas la honoron inviti vian Registaron partopreni en la memorigo de tiuj ĉi datrevenoj en kiu ajn maniero ĝi opinias oportuna".

Tiu ĉi historia decido de la supera monda organizaĵo por edukado, scienco kaj kulturo signifas la plej elstaran rekonon iam ajn donitan al D-ro Zamenhof aŭ al lia memoro pro la genia verko, kiun li donis al la homaro kaj pro la noblaj ideoj de humanismo, kiujn li ligis al ĝi. Ankaŭ oficiale Zamenhof eniris en la liston de senmortuloj.

En la nomo de la Komitato kaj Estraro de U.E.A. la Prezidanto kaj Generala Sekretario esprimas tutkoran gratulon al la ankoraŭ vivantaj membroj de la familio Zamenhof. Al la kunlaborantoj, kiuj helpis al atingo de tiu ĉi krono de la Zamenhof-Jaro kaj al ĉiuj aliaj, kiuj per sia laboro aŭ financaj kontribuoj ebligis ĝian sukceson, varman dankon.

Universala Esperanto-Asocio, kiel organizaĵo en konsultaj rilatoj kun UNESKO (Dok. 55 EX/5 de oktobro 1959).

El la protokolo de la kunsido de la Plenuma Komitato, okazinta en Parizo la 25-an de novembro 1959, sekvas, ke la propono pri Zamenhof ricevis fortan apogon kaj estis unuanime akceptita. S-ro Kuypers (Belgujo) deklaris, ke laŭ la peto de la Nederlanda Nacia Komisiono de UNESKO "la Belga Nacia Komisiono decidis apogi la proponon koncerne la celebradon de la 100-jara datreveno de la naskiĝo de D-ro Zamenhof". S-ro De Alba (Meksikio) aliĝis al la propono de s-ro Kuypers por la celebrado de Zamenhof "simbolo de la interhoma frateco". S-ro Wierblowski (Pollando) dankis al la delegitoj, kiuj proponis "la celebradon de la datreveno de D-ro Zamenhof". S-ro Moreira de Mello (Brazilo) esprimis sian ĝojon, ke la propono rilate al D-ro Zamenhof "estas aprobita de multnombraj membroj de la Plenuma Komitato". S-ro Soebroto (Indonezio) apogis la proponon pri Zamenhof kaj akcentis, ke UEA "rapide vastigas siajn aktivecojn kaj li opinias ke la verko de D-ro Zamenhof meritas celebradon". La proponon apogis ankaŭ s-ro Stempel (Venezuelo). (Ĉiuj citaĵoj laŭ Dok. 55 EX/SR. 5 de la 27-a de nov. 1959).

Efektivigante la decidon de la Plenuma Komitato la Generala Direktoro de UNESKO sendis al ĉiuj Registaroj kaj Naciaj UNESKO-Komisionoj cirkuleran leteron CL/1406 de la 15-a de februaro 1960 invitante ilin celebri en 1960 la datrevenon de la naskiĝo de Zamenhof.

La decido de UNESKO estas vera krono de la brila Zamenhof-Jaro. Ĝi estas la plej alta honorigo, kiun iam ricevis la nomo de D-ro Zamenhof. Ĝi estas samtempe plia rekono al la grandeco de lia verko.

I. L.